

eLIBRO


*Charlotte Brontë*

# Jane Eyre

*Dua parto*



INKO



*Charlotte Brontë*  
**JANE EYRE, II**  
*El la angla tradukis H. J. Bulhuis*  
*Lingve reviziita en 2001*

**eLIBRO**

*Aranĝis: Franko Luin*

**ISBN 91-7303-123-2**

*inko@omnibus.se*

*<http://www.omnibus.se/inko>*

SEPTEMBRO 2001

## Ĉapitro XXI.

**A**ntaŭsentoj estas strangajoj! Same simpatioj kaj same antaŭsignoj. Kune ili triope estas mistero, kies solvon la homoj ankoraŭ ne trovis. Dum mia tuta vivo mi neniam povis ridi pri antaŭsentoj; ĉar mi mem rimarkinde spertis ilin. Simpatioj ekzistas same; tion mi certe kredas (ekzemple inter longe forestantaj, malproksime loĝantaj parencoj, kiuj jam de longe fremdiĝis unu al la alia kaj malgraŭ tio havas simpation, kiuj precize montras la saman originon, kie ili naskiĝis) simpatioj, kies efikoj etendiĝas malproksimen trans niaj komprensentoj. Kaj kiom ni scias, antaŭsignoj estas eble la simpatioj ekzistantaj inter la naturo kaj la homoj.

Kiam mi estis ankoraŭ apenaŭ sesjara knabino, mi aŭdis iun vesperon, ke Bessie Leaven diras al Martha Abbot, ke ŝi sonĝis pri infaneto, kaj ke tio estas certa antaŭsigno de mize-ro kaj malfeliĉo por ni mem aŭ por la parencoj. Tiu interparolo verŝajne ne estus fiksinta sin tiel forte en mia memoro, se ne tuj poste okazus io, kio konservis ĝin tie por ĉiam. La sekvantan tagon Bessie estis vokita al la mortlito de sia plej juna fratino.

En la lasta tempo tiu interparolo kaj ĝia sekvinta okazintaĵo ofte vekigis en mia memoro. Ĉar dum la lasta semajno preskaŭ neniuj noktoj pasis, en kiu mi ne sonĝis pri infaneto. Kelkfoje mi lulis ĝin sur miaj brakoj, aŭ mi balancis ĝin sur miaj genuoj, ofte mi vidis ĝin ludi per floroj eksterdome en

ĝardeno sur la herbejo, aŭ mi vidis ĝin serĉi multkolorajn ŝtonetojn kaj silikojn en bruetanta rivereto. Iun nokton ĝi estis ploranta infano, en alia ĝi ridis; jen ĝi flatpremiĝis al mi, jen ĝi kun ektimo forkuris de mi. Kian ajn humoron la aperaĵo montris, kiajn ajn vizaĝtraĵojn ĝi havis — ĝi aperis al mi en sep sekvaj noktoj, tuj kiam mi fermis la okulojn por dormi.

Tiu ĉiama revenado de unu sola aperaĵo estis al mi tre malagrabla — tiu stranga revenado de la sama bildo malkvietigis min, kaj igis min nervema, kiam proksimiĝis la tempo de enlitiĝo kaj kun ĝi la vizio. Estis la akompano de tiu infan-fantomo, kiu vekis min en tiu luna nokto, kiam mi aŭdis la krion. Kaj en la posttagmezo de la sekvanta tago venis al mi servistino kun komiso, ke en la ĉambro de Fairfax estas iu, kiu deziras paroli al mi.

Veninte malsupren, mi vidis viron, kiu atendis min; li aspektis kiel ĉambra servisto de eminenta sinjoro; li estis funebre vestita kaj la ĉapelo, kiun li havis en la mano, estis kripe ĉirkaŭvolvita.

”Vi eble ne rememoros min, fraŭlino,” li diris, ekstarante kiam mi eniris, ”sed mia nomo estas Leaven; kiam antaŭ ok aŭ naŭ jaroj vi estis en Gateshead, mi estis veturigisto de sinjorino Reed; ankoraŭ nun mi estas en ŝia servo.”

”Ho, Robert, estas vi! Kiel vi fartas? Mi memoras vin ankoraŭ tre bone. Vi ja rajdigis min ofte sur la bruna ĉevaleto de fraŭlino Georgiana. Kaj kiel fartas Bessie? Vi ja estas edziĝinta kun Bessie?”

”Jes, fraŭlino. Mia edzino estas tre sana. Mi dankas pro la interesiĝo; — antaŭ du monatoj ŝi donis al mi refoje infane-

ton — ni havas nun tri — kaj la patrino kaj la infanoj fartas bonege.”

”Kaj ĉu la familio en Gateshead ankaŭ estas sana, Robert?”

”Mi treege bedaŭras, fraŭlino, ke mi ne povas porti al vi pli bonajn sciigojn pri ili, ĉar nuntempe ili fartas tre malbone — ili troviĝas en granda malĝojo.”

”Mi esperas, ke neniu el ili mortis,” mi diris, montrante lian nigran vestaĵaron. Li rigardis la krepon ĉirkaŭ la ĉapelo kaj diris:

”Sinjoro John mortis en Londono antaŭ ok tagoj en sia loĝejo.”

”Sinjoro John?”

”Jes, fraŭlino.”

”Kiel lia patrino eltenas tion?”

”Nu, sciu fraŭlino Eyre, tio ne estas ordinara malfeliĉo; lia vivo estis tre sovaĝa. Dum la lastaj tri jaroj li faris vere strangaĵojn — kaj lia morto estis terura.”

”Mi jam aŭdis de Bessie, ke li malbone kondukis.”

”Ke li malbone kondukis! Li ja ne povis pli malbone konduki! Li ruinigis sian sanon, kaj siajn posedaĵojn li fordiboĉis en societo de malvirtaj viroj kaj la plej malbonaj virinoj. Li dronis en ŝuldoj kaj fine trafis — en la malliberejon. Dufoje lia patrino eligis lin el ĝi, sed apenaŭ li estis libera, li tuj reiris al siaj kunuloj kaj malvirtaĵoj. Lia kapo neniam estis forta, tion vi scias, kaj la friponoj, inter kiuj li vivis, trompis lin kaj priŝtelis en neaŭdita maniero. Antaŭ tri semajnoj li venis en Gateshead kaj postulis, ke la sinjorino cedu al li la tutan bienon. Ŝi rifuzis, ĉar pro lia diboĉado kaj ekstravagancoj ŝiaj posedaĵoj jam de longe malpligrandiĝis. Li do reiris Londonon kaj

la lasta, kion ni aŭdis pri li, estis lia mortsciigo. Dio scias, kiel li mortis! — La homoj diras, ke li sin mortigis.”

Mi silentis. Tio estis terura sciigo.

Robert Leaven parolis plie:

”Sinjorino estis jam longan tempon malsana; ŝi tre dikiĝis, sed ne estas sufiĉe forta; kaj la perdo de mono kaj la timo antaŭ la malriĉeco preskaŭ ruinigis ŝin. La mortsciigo pri sinjoro John kaj la kaŭzo de lia morto venis tro subite: ĝi kaŭzis apopleksion. Dum tri tagoj ŝi povis eligi neniun vorton, sed pasintan mardon ŝi ŝajnis iom resaniĝi; estis kvazaŭ ŝi volas ion diri, ĉar seninterrompe ŝi faris signojn al mia edzino kaj murmuris nekompreneblajn vortojn. Nur hieraŭ matene Bessie povis kompreni, ke ŝi elparolas vian nomon, kaj fine ŝi tre klare komprenis, ke ŝi diras: Voku ĉi tien Jane — — voku Jane Eyre, mi devas paroli kun ŝi.”

”Bessie tamen ne scias, ĉu ŝi deliris aŭ ĉu eble ŝi celas ion alian; sed ŝi ankaŭ diris tion al fraŭlino Reed kaj al Georgiana kaj konsilis al ili voki vin. Komence la junaj fraŭlinoj ne volis konsenti pri tio; sed ilia patrino iĝis tiel malkvieta kaj tiel ofte ŝi kriis: ”Jane! Jane! Jane!” ke fine ili konsentis. Hieraŭ mi foriris de Gateshead; kaj volonte mi kunprenus vin kun mi, se vi povus esti preta morgaŭ.”

”Jes, Robert, mi estos preta. Ŝajnas al mi, ke estas dezirinde, ke mi iru.”

”Tion mi ankaŭ opinias, fraŭlino; Bessie diris, ke vi tute ne rifuzos. Sed vi devos peti forpermeson antaŭ ol iri, ĉu ne?”

”Certe, kaj mi petos ĝin tuj.” Mi kondukis lin en la ĉambron de la servistaro, kaj rekomendinte lin al la zorgoj de la edzino de John kaj al la afablaĵoj de John, mi iris serĉi sinjoron Rochester.

Li estis en neniuj el la ĉambroj de la teretaĝo, li ne estis sur la korto, nek en la staloj, nek en la parko. Mi demandis al sinjorino Fairfax, ĉu ŝi vidis lin; — jes, ŝi kredis, ke li estas en la bilardĉambro ludante kun fraŭlino Ingram. Mi tuj rapidis en la bilardejon. La interkunpuŝado de la bilardpilkoj kaj la murmurado de voĉoj penetris renkonte al mi. Sinjoro Rochester, fraŭlino Ingram kaj la du fratinoj Eshton kaj ties admirantoj — ĉiuj vigle okupis sin pri la ludado. Kelkaj minutoj estis necesaj por interrompi la ludadon de tia eminenta societo; miaj aferoj estis tamen tiaj, ke ili ne suferis prokraston; mi tial alproksimiĝis al mia sinjoro, kiu staris apud fraŭlino Ingram.

Kiam mi proksimiĝis, ŝi turnis sin kaj ĵetis al mi fieran rigardon; ŝiaj okuloj ŝajnis demandi: "Kion do deziras de vi tiu ŝteliranta kreitaĵo?" Kaj kiam mi per mallauĝa voĉo diris: "Sinjoro Rochester," ŝi faris movon kvazaŭ ŝi sentus grandan deziron ordoni al mi tuj malproksimiĝi. Ankoraŭ nun ŝia apero kvazaŭ staras antaŭ mi — ŝi estis tiel gracia kaj karakteriza. Ŝi portis matenkostumon el ĉielblua krepo, diafana lazurkolora rubando kvazaŭ serpentumis tra ŝiaj harbukloj. Kun viva intereso ŝi estis sekvinta la ludadon, kaj kolera fiero ne povis malbeligi la fierajn trajtojn de ŝia ĉarma vizaĝo.

"Ĉu tiu persono deziras ion de vi?" ŝi demandis turnante sin al sinjoro Rochester. Li sin turnis por vidi, kiu estas tiu "persono". — Li faris strangan mienon — unu el siaj maloftaj, dusencaj elmontradoj — forĵetis la bilard-bastonon kaj sekvis min en la koridoron.

"Nu, Jane?" li demandis, apogante sin per la dorso al la instrueja pordo, kiun li ĵus fermis.

"Sinjoro, mi venis por peti al vi forpermeson dusemajnan."

"Pro kio? Kien vi iros?"

”Mi volas viziti malsanan sinjorinon, kiu vokigas min.”

”Kiun malsanan sinjorinon? Kie ŝi loĝas?”

”En Gateshead, en ...shire.”

”En ...shire? Tio estas cent mejlojn for de ĉi tie! Kio ŝi do estas al vi, por ke vi faru tiel longan vojaĝon pro ŝi?”

”Ŝia nomo estas Reed, sinjoro; sinjorino Reed.”

”Reed de Gateshead? Mi konis iun Reed de Gateshead, kiu estis magistrato.”

”Ŝi estas lia vidvino, sinjoro.”

”Kaj kiujn interrilatojn vi havas kun ŝi? Kiel vi konas ŝin?”

”Sinjoro Reed estis mia onklo, la frato de mia mortinta patrino.”

”Pro la diablo! Ĉu li estis? Kial vi jam longe ne diris tion al mi? Vi ĉiam diris, ke vi ne havas parencojn.”

”Mi havas neniujn, kiuj volis koni min, sinjoro. — Sinjoro Reed estas mortinta — kaj lia vidvino forpuŝis min de si.”

”Kial?”

”Ĉar mi estis malriĉa kaj ŝarĝo por ŝi. Ŝi persekutis min kaj malamis.”

”Sed, kiom mi scias, Reed postlasis infanojn. Vi do havas ankaŭ kuzinojn kaj kuzojn? Sinjoro George Lynn parolis hieraŭ pri iu Reed de Gateshead, kiu, kiel li diris, estas unu el la plej grandaj friponoj en Londono; kaj Ingram parolis pri iu fraŭlino Georgiana Reed de la sama bieno, fama belulino, kiu antaŭ kelkaj jaroj estis multe admirata en Londono.”

”John Reed ankaŭ mortis, sinjoro, li tute ruinigis sin kaj duone ruinigis sian familion kaj supozeble li memmortiĝis. — Tiu terura sciigo tiel multe trafis lian kompatindan patrinon, ke ŝin atakis apopleksio.”

”Kaj kion vi povos fari por ŝi? Sensencaĵo, Jane! Neniam mi

pensus pri tio fari centmejlajn vojaĝon por vidi maljunan sinjorinon, kiu eble jam estos mortinta, kiam vi atingos ŝin. Krom tio vi ja ĵus rakontis, ke ŝi forpuŝis vin de si.”

”Jes, sinjoro, sed tio okazis antaŭ longa tempo. Tiam la interrilatoj estis tute aliaj. Neniame mi sentus ripozon, se mi nun malatentus, ŝian deziron.”

”Kiom longe vi forrestos?”

”Kiom eble plej mallonge, sinjoro.”

”Promesu al mi forresti nur unu semajnon —”

”Tion mi anticipe ne povas promesi; se mi tion farus, mi eble devus rompi la promeson.”

”Sed ĉiukaze vi revenos; en neniue cirkonstanco decidu por ĉiam loĝi ĉe ŝi.”

”Ho ne! Mi revenos, kiam ĉio fariĝis denove bona.”

”Kaj kiu akompanos vin? Vi ja ne povas tute sola vojaĝi cent mejlojn.”

”Ne, sinjoro; ŝi sendis al mi sian veturigiston.”

”Fidindan personon?”

”Jes, sinjoro, li servis jam dek jarojn tiun familion.”

Sinjoro Rochester pripensis.

”Kiam vi intencas forvojaĝi?”

”Morgaŭ, jam tre frue, sinjoro.”

”Bone. Sed vi bezonas monon; vi ne povos vojaĝi sen mono kaj mi kredas, ke vi havas nur malmulte. Mi ne pagis al vi ankoraŭ vian salajron. Kiom vi posedas ankoraŭ, Jane?” li diris ridetante.

Mi aperigis mian monujon; ĝi estis preskaŭ malplena. ”Kvin ŝilingojn, sinjoro.”

Li prenis la monujon, ŝutis ĝian tutan enhavon sur sian

manon kaj ridis, kvazaŭ tiu sumeto kaŭzis al li plezuron. Tuj poste li eltiris sian monujon:

”Jen,” li diris, oferante al mi monbileton kvindekfuntan, kaj li ŝuldis al mi nur dekkvin funtojn. Mi diris, ke mi ne povas ŝanĝi ĝin.

”Vi ja ne bezonas ŝanĝi ĝin, tion vi scias. Ĝi estas via salajro!”

Mi rifuzis akcepti pli multe ol mi rajtis. Li sulkigis la frunton. Fine li diris kvazaŭ subite lin trafis penso:

”Jes, jes, vi tute pravas! Estas pli bone ne tuj doni al vi ĉion. Posedante kvindek funtojn, vi povus decidi forresti tri monatojn. Jen dek funtoj; ĉu tio sufiĉos?”

”Jes, sinjoro. Sed vi ŝuldos al mi ankoraŭ kvin.”

”Post via reveno vi ricevos ilin; mi restos via bankiero por kvar dek funtoj.”

”Sinjoro Rochester, volonte mi parolus kun vi pri alia afero, se vi havos la tempon.”

”Alia afero? Mi estas scivola aŭdi ĝin.”

”Vi kvazaŭ sciigis al mi, ke post mallonga tempo vi edziĝos.”

”Jes, kio poste?”

”En tiu okazo estos necese, ke Adèle iru lernejon: mi estas certa pri tio, ke vi komprenos tiun neceson.”

”Por forigi ŝin de la vojo de mia fianĉino, ĉu ne? Ĉar alie ŝi malatentos kaj ignoros ŝin? Tiu konsilo estas sendube tre saĝa. Jes, jes, Adèle vizitu lernejon; kaj vi sekve sen ĉirkaŭvojo devos iri — al la diablo?”

”Mi esperas, ke ne, sinjoro; sed iel mi devos serĉi alian funkcion.”

”Tio ne urĝas!” li kriis akra voĉe dum distordiĝis liaj vizaĝ-

trajtoj, kiuj esprimis ion komikan kaj samtempe ion tragikan. Poste li rigardis min kelkajn minutojn.

”Supozeble la maljuna sinjorino Reed kaj ŝiaj filinoj klopodos havigi al vi funkcion, ĉu ne?”

”Ne sinjoro. Miaj interrilatoj kun miaj parencoj ne estas tiaj, ke mi havos la rajton ricevi de ili favorojn. Sed mi anoncos en la ĵurnaloj.”

”Vi supreniros la piramidojn de Egiptujo!” li grumblis. ”Sed anoncu do je via propra danĝero! Mi vere deziris, ke mi donus al vi nur unu funton, anstataŭ dek. Redonu al mi naŭ funtojn, Jane; mi bezonas ilin.”

”Bezonu ilin, sinjoro,” mi respondis dum mi metis la manojn kun la monujo malantaŭ min. ”Sub neniuj cirkonstanco mi povos forvojaĝi sen tiu mono.”

”Malgranda avarulino!” li diris, ”vi vere rifuzas al mi tiun monpeton! Donu al mi kvin funtojn, Jane.”

”Eĉ ne kvin ŝilingojn, eĉ ne kvin pencojn.”

”Montru al mi ankoraŭfoje la monon.”

”Ne sinjoro, vi ne estas fidinda.”

”Jane!”

”Sinjoro?”

”Promesu al mi unu aferon.”

”Mi promesos al vi ĉion, sinjoro, kion mi povus plenumi.”

”Ne anoncu: sed konfidu al mi la taskon serĉi funkcion por vi. Mi sufiĉe frue trovos ĝin.”

”Tion mi volonte promesos, sinjoro, kondiĉe ke vi viaflanke promesos al mi zorgi pri tio, ke mi kaj Adèle estos feliĉe eksterdome, antaŭ ol via juna edzino ĝin eniros.”

”Tre bone, tre bone! Interkonsentite! Vi do forvojaĝos morgaŭ?”

”Jes, sinjoro, jam tre frue.”

”Ĉu vi subeniros hodiaŭ posttagmeze en la salonon?”

”Ne, sinjoro. Mi devos pretigi miajn vojaĝaferojn.”

”Tial ni jam nun devos adiaŭi unu la alian por mallonga tempo?”

”Tion mi supozas, sinjoro.”

”Kaj kiel kondutas homoj, kiuj adiaŭas sin reciproke, Jane? Instruu min pri tio, ĉar mi ne bone komprenas tion.”

”Ili diras: Adiaŭ, aŭ iun alian vorton, se ili preferas ĝin.”

”Diru ĝin do.”

”Fartu bone dum tiu tempo, sinjoro Rochester.”

”Kaj kion mi devas diri?”

”Tion saman, se vi volas, sinjoro.”

”Fartu bone dum tiu tempo, fraŭlino Eyre! Kaj tio estas ĉio?”

”Jes.”

”Laŭ mia opinio tio sonas seke kaj malamike kaj malvarme kaj senkore. Mi dezirus ion alian: malgrandan aldonon al tiu ceremonio. Ekzemple doni al si reciproke la manon —; sed ne, — ankaŭ tio ne kontentigus min. Vi do volas nenion alian krom diri al mi adiaŭ, Jane?”

”Tio sufiĉas, sinjoro; unu sola vorto enhavas ofte pli multan korecon ol multaj aliaj!”

”Eble! Sed ĝi tamen sonos sensignife kaj malvarme, tiu — adiaŭ!”

”Kiom longe li restos ankoraŭ tie staranta kun la dorso apogita al la pordo?” mi demandis min, ”mi volonte komencus la pakadon.”

La maten-sonorilo eksonoris kaj subite, dirante plu nenion li forpafiĝis tra la pordo. Tiun tagon mi lin ne revidis kaj la

sekvantan matenon mi jam longe estis survoje, antaŭ ol iu en la domo ellitiĝis.

En posttagmezo la unuan de majo mi atingis la parkon de Gateshead. Estis je la kvina horo. Antaŭ ol eniri la sinjoran domon, mi eniris la dometon de Leaven apud la parko. Ĝi estis eksterordinare pura kaj beleta. Antaŭ la arkitekturaj belaj fenestroj pendis malgrandaj blankaj kurtenoj; la planko estis senmakula; la fajrujo kaj la fajroprenilo estis brile poluritaj kaj gaje la fajro flamis. Bessie sidis apud la fajrujo kaj suĉiĝis sian nove naskiton kaj Robert ludis kviete kun sia fratinetto en angulo de la ĉarma ĉambro.

”Dio vin benu! — mi ja sciis, ke vi venos!” kriis sinjorino Leaven dum mi eniris.

”Jes, Bessie,” mi diris post kiam mi ĉirkaŭbrakis ŝin, ”kaj espereble mi ne venas tro malfrue! Kie nun fartas sinjorino Reed? — ĉu ŝi vivas ankoraŭ?”

”Jes, ŝi vivas ankoraŭ; kaj parte rericevis sian konscion. La doktoro diras, ke tiu stato povas daŭri ankoraŭ unu aŭ du semajnojn; sed resaniĝon ni ne povas atendi.”

”Ĉu ŝi antaŭ nelonge denove vokis min?”

”Hodiaŭ matene ŝi parolis pri vi kaj deziris, ke vi venu. Sed nun ŝi dormas. Almenaŭ ŝi dormis, kiam mi antaŭ dek minutoj estis en ŝia domo. En la lastaj tagoj ŝi preskaŭ seninterrompe la tutan posttagmezon kuŝas en speco de letargio kaj nur rekoneksias je la sesa aŭ sepa horo. Ĉu vi volas ripozigi ĉi tie unu horon, fraŭlino? Mi poste iros kun vi al ŝi.”

Robert eniris, kaj Bessie kuŝiĝis la dormantan infanon en la lulilon por salute renkonti lin.

Poste ŝi insistis pri tio, ke mi demetu mian ĉapelon kaj trinku tason da teo; ĉar mi aspektas tiel laca kaj pala, ŝi diris. Mi

estis ĝoja kaj danke akceptis ŝian inviton. Same nekontraŭstareble kiel mi lasis min senvestigi de ŝi, kiam mi estis ankoraŭ infano, mi ankaŭ nun konsentis, ke ŝi forprenu de mi miajn vojaĝ-vestaĵojn.

Kiel denove vidiĝis la iama tempo en mia rememoro, kiam mi rigardis ŝiajn agemajn multmovecojn! Ŝi metis la plej bonan porcelanan teservicon sur la tablon, tranĉis la buterpanojn, rostis kuketon kaj donis jen al la malgranda Robert jen al la malgranda Jane frapeton aŭ puŝegon — ĝuste kiel ŝi donis ilin al mi en la pasintaj tagoj. Bessie estis konservinta ne nur sian vivan karakteron, sed ankaŭ la rapidecon de siaj piedoj kaj sian plaĉan vizaĝon.

Kiam la teo estis preta, mi estis sidiĝonta ĉetable, sed per sia kutima ordona voĉtono ŝi diris al mi, ke mi restu kviete sidanta. Ŝi daŭrigis: "Mi volas servi al vi dum vi sidas apud la fajrujo"; poste ŝi metis antaŭ min etan, rondan tablon kun taso kaj telero plena de rostitaj buterpanoj; same kiel ŝi prizorgis min en pasintaj jaroj, per iel sekrete akirita frandaĵo, kiam mi sidis en mia infanseĝo. Ridetante mi obeis, kiel en pasintaj tagoj.

Ŝi volis scii, ĉu mi estas feliĉa en Thornfield Hall, kaj mi rakontu al ŝi, kia estas tie la dommastrino. Kiam mi diris, ke Thornfield havas nur dommastron, ŝi volis scii, ĉu li estas aminda kaj bona kaj ĉu mi ŝatas lin. Mi rakontis al ŝi, ke reale li estas malbela viro, sed entute ĝentlemano, ke li agas al mi tre bone kaj ke mi sentas min tie feliĉa. Plue mi priskribis al ŝi la ĝojan societeton, nun troviĝantan en Thornfield Hall, kaj Bessie aŭskultis tiun detalon kun granda atento, ĉar ĉio tio tre interesis ŝin.

Dum tiuj interparoloj unu horo rapidege pasis. Bessie

reportis al mi miajn ĉapelon kaj ŝalojn kaj kondukate de ŝi, mi eliris la dometon por direkti min al la sinjora loĝejo. Ankaŭ akompanate de ŝi mi antaŭ ĉirkaŭ naŭ jaroj laŭiris la piedvojon, kiun mi nun laŭiris. En malluma, nebula, sovaĝa mateno de januaro mi estis forlasinta la malamikan loĝejon kaj tion mi faris kun senespero kaj ĉagrenplena koro — kun sentoj de ekzilito kaj malbenito — por serĉi malvarman havenon en Lowood: en tiu malproksima kaj por mi nekonata restadejo. La sama malamika domo jen denove leviĝis antaŭ mi. Ankoraŭ ĉiam miaj perspektivoj estis dubaj, ankoraŭ ĉiam mia koro doloris al mi kaj ankoraŭ mi estis la soleca vagantino sur ĉi tiu tero; sed mi fidis min mem kaj mian propran forton; la timon antaŭ la subpremado mi ne sentis plu. La profundaj vundoj, kiujn en la tagoj de mia infaneco oni estis kaŭzinta al mi, estis nun resaniĝintaj; la flamo de mia venĝosentoj estingiĝis.

”Unue vi devos iri en la matenmanĝejon; la junaj fraŭlinoj eble estos tie.”

Post momento ni estis en tiu ĉambro.

Ĉiuj mebloj staris ankoraŭ sur la sama loko, kiel tiun matenon, kiam la unuan fojon mi tie estis prezentita al sinjoro Brocklehurst; la tapiŝo, sur kiu mi tiam staris, kuŝis ankoraŭ antaŭ la fajrejo. Kiam miaj rigardoj ŝvebis laŭlonge de la libroŝranko kun ĝia enhavo, estis al mi, kvazaŭ tiuj du verkoj de Bewick: ”La birdoj de Anglujo”, staras ankoraŭ sur sia malnova loko sur la tria breto, kaj ”La vojaĝoj de Guliver” kaj ”Mil kaj unu noktoj” staris super ili kiel antaŭe. La senvivaj objektoj restis tute sen ŝanĝo, sed la homoj estis ĝis nereconeble aliiĝintaj.

Mi vidis antaŭ mi du junajn personojn; unu estis tre alta,

eble tiel alta kiel fraŭlino Ingram, tre maldika kun pala vizaĝo kaj akraj trajtoj, ion asketan karakterizis ŝia rigardo, kion montris ankoraŭ pli multe la eksterordinare simpla nigra lana vesto kun glata robo, blanka tola kolumo, rekte el la frunto kombitaj haroj kaj monaĥina ornamaĵo, konsistanta el ebena perlaro kun pendanta granda krucifikso. Sen iu dubo, ŝi nepre estis Eliza, kvankam la longforma, pala vizaĝo malmulte similis tiun de la iama Eliza.

Kaj same sen dubo tiu alia nepre estis Georgiana, sed ne tiu, kiun mi povis memori, tiu gracilonga, blonda dekunuĵara knabino.

Ĉi tiu estis plenkreska fraŭlino en sia plena florado, blanka kaj delikata kiel vakso, kun regulaj vizaĝtrajtoj, bluaj okuloj kaj bukaj flavaj haroj. Ankaŭ ŝi portis nigran veston; la formo de tiu vesto tamen estis tiel diversa de tiu de ŝia fratino — tiel pli laŭmoda kaj gracia — ke ĝi aspektis same moderna kiel la alia aspektis puritana.

Ambaŭ fratinoj havis unu vizaĝtrajton simila al tiu de la patrino, sed nur unu solan. La maldika, pala pli aĝa filino havis la elstarantajn okulojn, — la floranta, bela, malpli aĝa havis ŝian mentonon kaj ŝiajn makzelojn, — eble la linioj estis iom pli molaj, tamen ili akriĝis la alie tiel petorŝercan, ĉarman vizaĝon.

Kiam mi iris al la du fratinoj, ili leviĝis por diri al mi bonvenon, kaj ambaŭ alparolis min kiel fraŭlinon Eyre. La saluto de Eliza estis elparolata en mallonga, abrupta maniero, kaj dume ŝia vizaĝo eĉ ne montris rideton. Post la reciproka saluto ŝi residiĝis, direktis siajn rigardojn sur la fajrejon kaj ŝajnis ne plu rimarki mian ĉeeston. Georgiana kontraŭe aldonis al sia: "Kiel vi fartas?" kelkajn pluajn ĉiutagajn rimarkojn pri

mia vojaĝo, pri la vetero kaj tiel plu. Ŝi parolis kun malrapida, tirtona kartava voĉo kaj dume per siaj rigardoj oblikve observis min de la kapo ĝis la piedoj; jen ŝi kvazaŭ ekzamenis la faldojn de mia bruna merinosa peltmantelo, jen ŝiaj okuloj ripozis sur mia tre simpla vojaĝĉapelo. Junaj fraŭlinoj en rimarkinda maniero kutimas sciigi al iu alia, ke ili rigardas tiun kiel stultulon, ne uzante por tio unu solan vorton. Io fiero en la rigardo, io malvarma en la eksteraĵo, io indiferenta en la voĉtono, sufiĉe klare esprimas ŝiajn opiniojn rilate al tio, kaj ili ne bezonas specialajn malĝentilajn vortojn aŭ agadojn por kompromiti sin mem.

Mokrideto, ĉu kaŝita ĉu malkaŝita ne plu faris sur min la impreson, kiun alie ĝi kutimis fari. Tiel sidante tie inter miaj kuzinoj, mi estis mirigita pri la indiferenteco, kiun al mi kaŭzis la kompleta malatento de unu kaj la duone sarkasma ĝentileco de la alia. Eliza ne estis kapabla humiligi min, Georgiana ne povis ĝeni mian trankvilecon.

Mi vere havis aliajn aferojn por pripensi. Dum la lastaj monatoj min regis sentoj, kiuj estis tiom pli potencaj ol kiuj ajn kapablaj vekis ilin —, tial la mienoj de ĉi tiuj du fraŭlinoj ne povis ĝojigi nek malĝojigi min.

”Kiel nun fartas sinjorino Reed?” mi baldaŭ demandis, kviete rigardante Georgianan en la vizaĝon; ĉi tiu ŝajnis esti devigata bridi tiun rektan demandon kiel tute nepermesitan liberecon.

”Sinjorino Reed? Ho! vi celas mian patrinon! Ŝi fartas tre malbone. Mi kredas, ke vi ne povos vidi ŝin hodiaŭ vespere.”

”Mi estus al vi tre danko, se vi bonvolus supreniri al ŝi por sciigi, ke mi alvenis.”

Georgiana videble ektimis kaj larĝe, sovaĝe malfermis siajn blujajn okulojn.

”Mi scias, ke ŝi nepre deziras vidi min,” mi parolis plue, ”kaj mi ne volonte pli prokrastus la plenumon de tiu deziro ol estas absolute necese.”

”Patrino ne volas esti ĝenata vespere,” rimarkis Eliza. Baldaŭ poste mi leviĝis, kviete neinvitite demetis mian ĉapelon kaj miajn gantojn kaj diris, ke mi volas iri al Bessie — kiu supozeble estas en la kuirejo — por peti ŝin informiĝi, ĉu sinjorino Reed dezirus vidi min ankoraŭ tiun vesperon. Mi iris, kaj trovinte Bessie kaj sendinte ŝin kun mia komisiono, mi daŭrigis miajn aranĝojn.

Ĝis tiu tempo mi ĉiam kutimis retiri min post ĉiu arogantaĵo; se antaŭ unu jaro oni estus ricevinta min kiel hodiaŭ en Gateshead, mi jam estus elirinta el domo; sed nun mi subite vidis, ke tio estus tre malsaĝa ago. Mi estis farinta pli ol centmejlajn vojaĝon por vidi mian onklinon kaj devis resti ĝis ŝi resaniĝis aŭ — estis mortinta. Mi ne atentis la fierecon kaj la malsaĝecon de ŝiaj filinoj — kaj sentis min antaŭ ili tute sendependa.

Mi tial direktis min al la mastrumistino, postulis de ŝi, ke ŝi montru al mi ĉambron kaj diris, ke verŝajne mi restos kiel gastino en la domo, portigis mian kofron en mian ĉambron kaj poste supreniris.

Sur la ŝtuparo min renkontis Bessie.

”Mastrino estas vekiginta,” ŝi diris. ”Mi rakontis al ŝi, ke vi alvenis; venu kaj ni vidos, ĉu ŝi rekonos vin.”

Mi ne bezonis kondukiston al la bone konata ĉambro. Kiel ofte en pasintaj tagoj mi estis tien vokita por ricevi riproĉon aŭ punon. Mi antaŭiris Bessie kaj singarde kaj senbrue mal-

fermis la pordon. La lampon sur la tablo kovris ŝirmilo. La vasta lito kun la sukcenkoloraj kurtenoj staris tie kiel en pasintaj jaroj. Jen staris ankaŭ la tualeta tablo, la brakseĝo kaj la piedbenketo, sur kiu mi pli ol centfoje estis kondamnita genui. Kiel ofte mi devis tie peti pardonon pro pekoj, kiujn mi ne faris. Mi rigardis en certan angulon kaj atendis jam vidi tie la konturojn de iam tiel timita vergo, kiu kutimis spione observi min kaj atendi la okazon elsalti kiel malica koboldo por salteti sur miaj dorso aŭ brakoj.

Mi proksimiĝis al la lito; mi flankentiris la kurtenojn kaj kliniĝis super la alte amasiĝintaj kusenoj.

Tre bone mi memoris la vizaĝon de sinjorino Reed kaj diligente serĉis la konatajn trajtojn. Estas vere feliĉe, ke la ĉion-kvietiganta tempo ankaŭ sufokas la venĝdeziron kaj plimildigas la inspirojn de kolero kaj abomeno: de ĉi tiu virino mi estis foririnta kun amara koro kaj malamo, nun mi reiris al ŝi kun neniua alia sento ol speco de kompato pro ŝiaj grandaj suferoj, kaj interna deziro pardoni ĉiun malbonon kaj por forgesi — por reamikiĝi kaj premi ŝian manon kiel amikino.

La konata vizaĝo estis tie: malhela, severa, senkompata kiel ĉiam antaŭe — tiuj karakterizaj okuloj, kies rigardon nenio kapablis moligi — tiuj okuloj, kiuj antaŭe fulme sendis al mi nur malamon kaj koleron kaj minacojn! Kiel vekigis la memoro al la angoro kaj al la mizero de mia juneco, kiam mi revidis tiujn akrajn vizaĝtrajtojn! Tamen mi kliniĝis super ŝi kaj kisis ŝin.

Ŝi suprenrigardis al mi.

”Ĉu estas Jane Eyre?” ŝi demandis.

”Jes, onklino Reed. Kiel vi nun sentas vin, kara onklino?”

Iam mi ĵuris, ke neniam plu mi nomos ŝin onklino. Sed

rompon de tiu ĵuro mi ne rigardis kiel pekon en tiu momento. Miaj fingroj ĉirkaŭprenis la manon, kiu kuŝis sur la litokovrilo: se ŝi estus preminta mian, mi sentus varman kaj koran ĝojon. Sed nesentemaj karakteroj ne facile moliĝas, kaj naturaj antipatioj ne estas baldaŭ neniigeblaj. Sinjorino Reed fortiris sian manon kaj kiam ŝi deturnis de mi sian vizaĝon, ŝi faris la rimarkon, ke la vespero estas tre varma. Kaj refoje ŝi rigardis min, tiel frostige malvarme, ke tuj mi sentis kiel ŝiaj opinioj rilate al mi ne ŝanĝiĝis kaj restos neŝanĝeblaj. Ŝiaj ŝtoniĝintaj okuloj, kiuj neniam malsekiĝis de larmoj kaj neniam ardis pro koreco, klare montris al mi, ke ŝi firme decidis rigardi min ĝis sia lasta elspiro kiel malbonan estaĵon; ĉar kredi min bona ne kaŭzus al ŝi plezuron — tio kontraŭe kaŭzus al ŝi humiligon.

Mi sentis doloron, poste min ekregis kolereto kaj fine mi decidis venki ŝin — estiĝi ŝia mastrino malgraŭ ŝia malmola karaktero kaj malgraŭ ŝia forta volo. Larmoj venis al mi en la okulojn, kiel en la tagoj de mia infaneco — sed mi repremis ilin al sia fonto. Poste mi metis seĝon ĉe la kapa parto de la lito. Mi sidiĝis kaj kliniĝis super la kuseno.

”Vi vokigis min,” mi diris, ”kaj nun mi estas ĉi tie; kaj mi intencas resti ĉi tie, ĝis mi vidis, ke via sanstato pliboniĝis.”

”Ho, kompreneble! Ĉu vi parolis kun miaj filinoj?”

”Jes.”

”Nun diru al ili, ke mia deziro estas restigi vin ĉi tie, ĝis mi povos paroli kun vi pri kelkaj aferoj kuŝantaj sur mia animo. Hodiaŭ vespere estas tro malfrue por fari tion, kaj estos al mi tro malfacile bone memori kaj pripensi ĉion tion. Sed ion mi deziras tuj diri — kio do ĝi estas? — —”

Ŝia vaganta rigardo kaj la aliiĝinta voĉo klare montris al mi,

kiel multe la neniigo de ĉi tiu, antaŭe tiel fortika korpo, jam progresis. Malkviete ŝi moviĝis tien kaj reen dum ŝiaj fingroj tiretis la litkovrilon. Mia brako, kuŝanta sur la kapkuseno, klopodis kvietigi ŝin. Tuj ŝi koleretiĝis.

”Forigu de mi la manon!” ŝi diris, ”ne ĉagrenetu min tiel tenante la litkovrilon! Ĉu vere vi estas Jane Eyre?”

”Mi estas Jane Eyre.”

”Kun tiu infano mi havis pli multan penon kaj pli grandan ĉagrenon ol povus kredi kiu ajn. Estis terure ŝovi sur min tian ŝarĝon! Kaj kiom da ĉagreno ŝi kaŭzis al mi ĉiutage kaj ĉiuhore pro sia nekomprenebla karaktero, pro siaj ekboloj de kolero kaj siaj nenaturaj, seninterrompaj spionadoj kaj subaŭskultoj rilate al ĉio, kion ni faris! Mi povas certigi, ke iun tagon ŝi parolis al mi kiel frenezulino — kiel vera diablo — neniuj infano iam aspektis aŭ parolis kiel ŝi! Neniuj infano! Mi tiel ĝojis, kiam fine mi seniĝis de ŝi. Kion do oni faris el ŝi en Lowood? Tie la febro eksplodis kaj multaj, multaj lernejoj mortis. Sed ŝi — ŝi ne mortis. Malgraŭ tio mi diris, ke ŝi estas mortinta! Ho kiel arde mi nun deziras, ke vere ŝi mortus!”

”Stranga deziro, sinjorino Reed! Kial do vi tiel ŝin malamas?”

”Ĉiam mi malamis ŝian patrinon, ĉar ŝi estis la sola fratino de mia edzo kaj li amis ŝin kun grandega amo. Li kontraŭstaris, ke la familio forrifuzu ŝin, kiam ŝi faris tian abomenan mezaliancon. Kaj kiam venis la sciigo pri ŝia morto, li ploris kiel malsaĝulo. Li nepre volis, ke la infano estu transportata al li, kvankam mi petegis lin, ke li enpensionigu ĝin kaj pagu por la edukado. Mi jam ŝin malamis, kiam miaj okuloj ŝin vidis por la unua fojo — ŝi estis malsaneta, plorema, mizera infano! Tutajn noktojn ŝi kutimis kuŝi en sia lulilo

daŭre plorante — ŝi ne ploris kore kaj forte kiel aliaj infanoj — ne, ŝi ĝemadis kaj bleketis. Reed ŝin kompatis. Li ofte karesis kaj kvietigis ŝin, kvazaŭ propran infanon, li eĉ sin okupis pri ŝi pli multe ol pri siaj propraj, kiam tiuj estis samaĝaj. Ankaŭ li klopodis, ke miaj infanoj konduku amike al la malgranda almozulino; sed ili ne povis ami ŝin kaj li koleretiĝis, kiam ili montris siajn malestimon kaj malŝaton. En sia lasta malsano li konstante portigis ŝin al sia lito kaj horon antaŭ sia morto li igis min ĵuri sanktan ĵuron, ke mi ĉiam vartos kaj restigos ĉe mi la kreitaĵon. Prefere mi estus preninta sur min la vartadon de infano el la malriĉulejo: sed Reed estis tiel malforta laŭ karaktero. John tute ne estas simila al sia patro — kaj pro tio mi ĝojas: John estas simila al mi kaj al miaj fratoj — li estas vera Gibson. Ho, mi dezirus, ke li ne plu turmentu min per petoj pri mono! Mi posedas plu nenion por doni al li: ni malriĉiĝas! Mi devis eksigi la duonon de la servistoj kaj devos fermi parton de la domo aŭ tute ludoni ĝin. Sed mi ne povas decidi fari tion — kaj tamen, kiel do ni vivos plu? Du trionoj de miaj enspezoj estas bezonataj por pagi la procenteg-ŝuldojn. John terure hazardludas kaj konstante malgajnas, la kompatindulo! Li estas ĉirkaŭata de nuraj sentaŭguloj kaj ŝtelistoj. John tute ruiniĝas — li aspektas terurige — mi hontas, vidante lin.”

Nun ŝin ekregis terura ekscitiĝo.

”Mi kredas, ke estas pli bone foriri de ŝi nun,” mi diris al Bessie, kiu staris ĉe la alia flanko de la lito.

”Eble tio estas pli bona, fraŭlino; sed en la vespero ŝi ofte tiel parolas — matene ŝi ofte estas multe pli kvieta.”

Mi leviĝis.

”Restu!” kriis sinjorino Reed. ”Mi havas ankoraŭ ion alian

por diri. Li minacas min — senĉese minacas, ke li mortigos sin. Kaj kelkfoje mi songas. ke mi vidas lin kun granda vundo en la kolo aŭ kun sangmakulita, terurita, malpura vizaĝo. Strangaj aferoj al mi okazas kaj mi estas en granda mizero. Sed kio estas farota? Kie mi prenos la monon?”

Bessie klopodis decidigi ŝin, ke ŝi prenu retrankviligan medikamenton; kaj post multaj klopodoj ŝi sukcesis. Tuj poste sinjorino fariĝis pli kvieta kaj dronis en duondormo. Mi lasis ŝin sola.

Pasis pli ol dek tagoj antaŭ ol ŝi donis al mi denove la okazon paroli kun ŝi. Daŭre ŝin atakis deliro aŭ la etargio kaj la doktoro malpermesis ĉion, kio povus dolori ŝin. Intertempe mi interrilatis kiel eble plej bone kun Eliza kaj Georgiana. Komence ili vere estis tre indiferentaj al mi. Eliza konstante sidis kaj kudris, skribis aŭ legis, tute ne parolante al mi nek al sia fratino. Georgiana dum horoj parolis sensencaĵon al sia kanarieto, tute ne atentante min. Sed mi estis decidinta zorgi pri distriĝo kaj amuzaĵoj, tial mi estis kunportinta mian pentraĵ-ilaron kaj ne enuis.

Kun multaj penikoj kaj kelkaj folioj da papero mi sidiĝis apud fenestro kaj pentris fantazi-vinjetojn, kiuj prezentis ĉiajn scenojn: mi pentris vidaĵon de la maro inter du ŝtonegoj; leviĝantan lunon kaj ŝipon pasantan la ruĝ-helan diskon; grupon da kanoj kaj akvoliliojn, super kiuj sin levis la kapo de lotuso kun sur ĝi sidanta najado; elfon, kiu sub girlando de sovaĝaj rozoj elrigardas el nesto de akcentoro.

Iun matenon mi komencis skizi vizaĝon, sed ne sciis kian. Mi prenis molan, nigran penikon, igis ĝin pinta kaj komencis diligente labori. Baldaŭ sur la papero staris larĝa, elstaranta frunto, la linioj de la vizaĝo estis akraj kaj angulformaj. La

konturoj faris al mi plezuron kaj miaj fingroj vigle moviĝis por aldoni la ceterajn trajtojn. Akre konturiĝantaj, horizontalaj brovoj devis esti metataj sub tiu frunto; poste sekvis belforma nazo kun rekta dorso kaj larĝaj nazaloj, kaj granda sed moviĝebla buŝo; dika mentono kun sulko en la mezo; poste mi desegnis nigrajn vangharojn kaj nigrajn kapharojn. Kaj fine la okulojn. Ĝis nun mi ne estis desegninta ilin, ĉar ili bezonis la plej grandan atenton. Mi desegnis ilin grandaj kaj donis al ili belan formon; la okulharoj fariĝis longaj kaj malhelaj, la irisoj brilaj kaj grandaj. "Ĝi estas bona, sed tute ne simila," mi pensis, atente rigardante la portreton; "mankas al ĝi la forteco kaj la spirito;" kaj mi malheligis la ombrojn, por ke la helaj lokoj pli klare sin montru — kelkaj sukcesplenaj penikotuŝoj mirinde efikis. Jen mi havis antaŭ mi la vizaĝon de amiko. Kaj estis al mi tute indiferente, ke la du fraŭlinoj turnis al mi la dorson. Mi rigardis la desegnaĵon kaj senvole ridetis pro la simileco. Mi kvazaŭ dronis en ĝi kaj estis kontenta.

"Ĉu tio estas la portreto de iu, kiun vi konas?" demandis Elisa, kiu nerimarkite alproksimiĝis al mi.

Mi respondis, ke ĝi estas nura fantaziaĵo, kaj rapide ŝovis la desegnaĵon sub kelkajn aliajn foliojn. Kompreneble mi mensogis: ĝi estis tre simila portreto de sinjoro Rochester. Sed tio ne estis ŝia afero. Tio estis afero, kiu tuŝis nur min. Ankaŭ Georgiana venis por rigardi la portreton. La aliaj desegnaĵoj multe plaĉis al ŝi, sed la portreton ŝi nomis "malbelega viro". Ambaŭ ŝajnis miri pro mia lerteco. Mi proponis ankaŭ desegni ilian portreton kaj ĉiu pozis tiucele. Poste Georgiana alportis al mi sian albumon. Mi promesis al ŝi akvarelon kaj per tio ŝi fariĝis bonhumora. Ŝi proponis al mi promenadon en la

parko. Apenaŭ ni estis du horojn eksterdome, ni jam tre intime interparolis. Ŝi rakontis al mi pri brila vintro, kiun ŝi pasigis en Londono antaŭ du jaroj, ŝi rakontis pri la admiro, kiun ŝi ĝuis, kaj eĉ aludis grandan faritan venkon. En la posttagmezo kaj en la vespero ŝi denove parolis pri tio kaj eĉ pli klare; ŝi ripetis kelkajn korajn interparolojn, priskribis al mi kelkajn sentimentalajn scenojn; per unu vorto, ŝi improvizis en tiu tago aron da noveloj de la fantazia vivo por amuzi min ... Ĉiutage ŝi rakontis al mi ion novan, tamen ĉiam pri tiu sama temo, koncerne sin mem, ĉiam rilate al ŝiaj amo kaj kordoloro. Strange estis, ke neniam ŝi parolis per unu vorto pri la malsano de sia patrino, pri la terura morto de sia frato kaj pri la malĝojaj cirkonstancoj de la familio. — Ŝajnis, ke ŝia animo nur sin okupis pri la rememoro al malaperinta feliĉo kaj al la espero de estontaj distraĵoj. Ĉiutage ŝi pasigis ĉirkaŭ kvin minutojn en la ĉambro de sia malsana patrino, krom tio ŝi ne atentis ŝin.

Eliza parolis malmulte; ŝajne ŝi ne havis la tempon interparoli kun mi. Neniam mi vidis pli laboreman personon. Malgraŭ tio estus malfacile diri, kion fakte ŝi faris, aŭ pli bone dirite, kio estis la rezulto de ŝia laboremo. Ŝi havis vekhorloĝon, kiu ĉiumatene vekis ŝin tre frue. Mi ne scias pri kio ŝi okupis sin antaŭ la matenmanĝo; post ĝi ŝi dividis sian tempon tre regule kaj ĉiu horo estis destinita al difinita tasko. Trifoje ĉiutage ŝi studis en malgranda libro, pli atente rigardinte ĝin mi rimarkis, ke ĝi estas "ĝenerala preĝaro". Foje mi demandis al ŝi en kio sin kaŝas la forta allogado de tiu libro kaj ŝi respondis: En la liturgio. Tri horojn ŝi pasigis stebante la borderon de kvarangula tuko, sufiĉe granda por utili kiel tapiŝo. Kiam mi demandis pri la celo de tiu objekto, ŝi respon-

dis, ke ĝi fariĝos altartuko por la preĝejo, konstruita antaŭ nelonge en la proksimeco de Gateshead. Du horojn ŝi dediĉis al sia taglibro; du plujn ŝi sola laboris en la kuireja ĝardeno; unu horon ŝi uzis por reguligi siajn kontojn kaj librojn. Ŝajne ŝi tute ne bezonis akompananton, nek konversacion. Mi kredas, ke ŝi en sia vivomaniero sentis sin tre feliĉa kaj tiu ĉiutage ripetiĝanta sencela vivo kontentigis ŝin plene; kaj nenio kaŭzis al ŝi pli grandan kolereton, ol neatendita okazo, kiu devigis ŝin ŝanĝi la teruran regulecon de siaj laboroj.

Unu vesperon, estante pli inklina paroli ol kutime, ŝi diris al mi, ke la konduto de John kaj la minacanta ruiniĝo de ŝia familio estis al ŝi la fonto de granda ĉagreno, sed ke nun ŝia animo kvietiĝis pro ia prenita decido. Ŝi zorgis pri tio, ke ŝia havaĵo estu asekurita, kaj post la morto de sia patrino — ĉar estis tute neverŝajne, ke iam ĉi tiu resaniĝu, aŭ ke la nuna stato povu longe daŭri, ŝi tre kviete rimarkis — ŝi volus efektiviĝi jam antaŭ longe formitan intencon: nome serĉi rifuĝejon tie, kie akurataj kutimoj malebligis ĉiamajn ĝenadojn, kaj starigos potencan intermuron inter ŝi kaj la malpia mondo.

Mi demandis: ĉu Georgiana akompanos vin?

Ho ne, kompreneble. Ŝi kaj Georgiana havas tro malsamajn karakterojn, ankaŭ neniam ili sekvas la samajn interesojn. Sub neniuj cirkonstanco ŝi metos sur sin la ŝarĝon de ŝia akompano. Georgiana sekvu sian propran vojon; ŝi, Eliza, sekvos sian.

Kiam Georgiana ne senŝarĝigis al mi sian koron, ŝi pasigis sian tutan tempon sur la kanapo, plendante pri la mallumecco de la domo kaj senhalte ripetis la deziron, ke ŝia onklino invitu ŝin iri kun si en Londonon.

”Estus pli bone,” ŝi diris, ”se mi povus foriri kaj forresti unu aŭ du monatojn, ĝis ĉio estos pasinta.”

Mi ne demandis, kion ŝi celas per ”ĝis ĉio estos pasinta”, sed mi konjektis, ke ŝi celis la proksiman morton de sia patrino kaj la sekvontan malĝojigan enterigon. Eliza ne pli atentis la malfervoron kaj la plendojn de sia fratino, ol kvazaŭ tiu grumblanta, plendanta, mallaborema kreitaĵo tute ne estus en la apudeco.

Unu tagon tamen, metinte flanken sian notlibron kaj rekomencinte sian brodadon, ŝi subite riproĉis ŝin jene:

”Georgiana, pli stulta, pli vanta kaj pli malsaĝa besto ol vi neniam sin movis sur la tero. Vi eĉ ne rajtis esti naskita, ĉar vi ne scias utiligi al vi la vivon. Anstataŭ vivi por vi, kun vi kaj en vi, kiel decas al ĉiu saĝa homo, vi klopodas apogi vin kun via malforteco al la fortenco de aliuloj. Kaj trovante nenium, kiu bonvolas zorgi pri tia dika, senutila, malforta estaĵo, tiam vi plendas, ke vi estas malzorgata kaj malbone traktata! Vi postulas, ke la vivo donu al vi ĉiaman ŝanĝon kaj ĉiaman ekscitadon, alie vi nomas la mondon malliberejo. Vi volas esti admirata kaj flatata, vi volas, ke oni amindumu vin — vi postulas muzikon, dancadon kaj societon — alie vi konsumiĝas kaj mortas. Ĉu vi ne posedas do tiom da prudento por eltrovi sistemon, kiu igos vin sendependa de ĉiuj aliaj ekscitoj, kaj de ĉiuj aliaj volo, krom viaj? Dispartigu do la tagojn; dispartigu ilin je sekcioj; ĉiu sekcio montru sian taskon; ne pasigu eĉ unu kvaronhoron farante nenium; uzu ĉiujn. Plenumu ĉiun parton de via laboro en la difinita tempo, sed laŭ speciala metodo kaj severe regule. Se vi tiel agus, la tago pasos antaŭ ol vi rimarkus ĝian komenciĝon. Tiam vi bezonus danki nenium, ĉar li helpis al vi utile pasigi senokupitan momenton. Tiam vi

ne estus devigata serĉi ies akompanon, nek deziri lian konversacion, lian simpatian aŭ indulgon; — mallonge dirite, tiam vi povus diri: mi vivas kiel sendependulo devas vivi. Sekvu mian konsilon — ĝi estas la unua kaj samtempe la lasta, kiun mi donas al vi; tiam vi sub nenia cirkonstanco bezonos nek min nek iun alian. Se vi malatentos tiun konsilon — se vi daŭrigos farante nenion, grumblante, ĝemante, dezirante kiel ĝis nun — tiam akceptu la sekvojn de via idiota stulteco, kiel ajn teruraj ili estos. — Malkaŝe mi tial diras al vi jene kaj bone aŭskultu, ĉar neniam mi ripetos tion kaj severe agos tiurilate. Post la morto de mia patrino mi ne plu volas min okupi pri vi; de post la tago, kiam oni portis ŝian ĉerkon en la ĉerkujon de Gateshead-preĝejo, ni ambaŭ, vi kaj mi, estos tiel malproksime disigitaj unu de alia, kvazaŭ ni neniam konus unu alian. Ne imagu, ke iam mi lasos ligi min al vi eĉ de la plej malforta pretendo nur tial, ĉar ni naskiĝis de la samaj gepatroj. Tion mi diras al vi: se la tuta homaro — escepte de ni ambaŭ — subite estus eksterminata de sur la tero kaj nur ni ambaŭ starus sur ĝi, tiam mi lasus vin sola sur la malnova tero kaj transirus tute sola sur la novan.”

Ŝi eksilentis.

”Vi povus ŝpari al vi la penon ellasi sur min tiun riproĉfluron,” respondis Georgiana. ”Ĉiu homo scias, ke vi estas la plej egoista, la plej senkora kreitaĵo, kiu iam ekzistis, kaj mi konas vian obstinan malamon kontraŭ mi. Mi tion ja spertis, kiam vi ŝpinis al mi tiun malicaĵon pri lordo Edwin Vere; vi ne povis toleri, ke mi staru pli alte ol vi, ke mi ricevu altan titolon kaj venu en societon, en kiu vi eĉ ne kuraĝas montri vian malican vizaĝon. Kaj pro tio vi ludis la rolon de spionino kaj

klaĉistino kaj por ĉiam ekstermis ĉiujn miajn esperojn pri mia vivofeliĉo.”

Georgiana elpoŝigis sian nazotukon kaj dum tuta horo purigis al si la nazon. Eliza sidis senmove kaj diligente laboris super sia altartuko.

Kelkaj personoj ne alte ŝatas sinceran, noblaniman senton; sed ĉi tie mi havis antaŭ mi du karakterojn, unu el kiuj fariĝis nesufereble ĉagrenita pro manko de tiu sento, dum la alia estis malestiminde sengusta. Sento sen la ĝusta opinio estas tre senforta senefika trinkaĵo, sed opinio ne moderigita de la sento, estas io tro amara al homo por trinki.

Estis malseketa, vintra posttagmezo. Georgiana estis endormiĝinta sur la kanapo legante romanon; Eliza estis elirinta por ĉeesti diservon honore al iu sanktulo en la nova preĝejo — ĉar en religiaj aferoj ŝi estis severa formalajulino, aŭ pli ĝuste dirite: hipokritulino; neniu vetero povis reteni ŝin de kiu ajn plenumado, kiun ŝi rigardis kiel preĝejan devon; indiferente ĉu la vetero estis bela aŭ pluva, ĉiudimanche ŝi iris trifoje en preĝejon kaj unu fojon en ĉiu alia tago, dediĉita al iu sanktulo.

Min trafis la penso iri supren por vidi, kiel fartas la mortanta virino, pri kiu preskaŭ neniu atentis. Ŝiaj servistinoj montris al ŝi nur malmultan atenton; kaj la dungita flegistino, kiu neniel estis kontrolata, ŝteliris el la ĉambro kiel eble plej ofte. Bessie tamen estis fidela; sed ŝi devis prizorgi sian propran familion kaj povis nur malofte eniri la sinjoran domon. Mi trovis la ĉambron de la malsanulino sen flegistino, kiel mi ankaŭ atendis; neniu estis tie; la pacientino kuŝis senmove kaj ŝajne en letargio; ŝia pala vizaĝo dronis en la kuseno; en la fajrujo la fajro estis estingiĝonta.

Mi enmetis novajn karbojn, ordigis la liton kaj mia rigardo dum momento fiksiĝis sur la kuŝantino, kiu ne povis rigardi min, kaj poste iris al la fenestro.

La pluvo bruege vipis la vitrojn; la vento fajfegis ĉirkaŭ la domo. Mi pensis: tie kuŝas iu, kiu baldaŭ estos liberigita de ĉiuj bataloj de la surteraj elementoj. Kaj kien flugos tiu animo, kiu nun sin liberigas de sia korpa kovraĵo, kiam fine ĝi liberigis sin?

Cerbumante pri tiu granda mistero, mi pensis al Helena Bums — ŝiaj lastaj vortoj revenis en mian memoron — ŝia kredo — ŝia kredo al la egaleco de ĉiuj senkorpigitaj animoj. Denove mi aŭskultis la sonon de ŝia neforgesebla dolĉa voĉo — denove mi revokis al mia memoro ŝian noblan rigardon, kiam ŝi tiel senmove kuŝis sur sia mortlito; ankoraŭ mi aŭdis ŝian sopirantan flustritan deziron, ke ŝi povu returni al la ĉiopotenca Patro — kiam subite malforta voĉo el la lito aŭdiĝis:

”Kiu estas tie?”

Mi sciis, ke sinjorino Reed dum multaj tagoj parolis neniun vorton. Ĉu ŝi nun revenis al la vivo? Mi iris al ŝi.

”Estas mi, onklino Reed.”

”Kiu — mi!” sonis la respondo. ”Kiu vi estas?” kaj kun miro kaj timo ŝi rigardis min, ”Vi estas al mi fremda — kie estas Bessie?”

”Ŝi estas en sia dometo, onklino.”

”Onklino!” ŝi ripetis. ”Kiu nomas min onklino? Vi do estas neniue el tiuj Gibsonanoj? — tamen mi rekonas vin — tiun vizaĝon, tiun frunton kaj tiujn okulojn — kiujn mi tiel bone konas; — vi aspektas kiel — kiel — Jane Eyre!”

Mi silentis ĉar mi timis kaŭzi katastrofon, klarigante al ŝi mian memon.

”Kaj tamen,” ŝi diris, ”mi timas, ke mi eraras. Miaj pensoj erarigas min. Mi deziris vidi Jane Eyre, kaj nun mi imagas vidi similaĵon, kiu tamen ekzistas. Krom tio ŝi ja nepre ŝanĝiĝis dum tiuj ok jaroj!”

Singarde mi klarigis, ke mi estas la persono, kiun ŝi supozis kaj kiun ŝi deziras vidi, kaj vidante, ke ŝi komprenas min kaj ke ŝi plene rekonsciiĝis, mi diris al ŝi, ke Bessie sendis sian edzon al Thornfield por veturigi min al Gateshead.

”Mi scias, ke mi estas tre malsana,” ŝi diris post momento. ”Antaŭ kelkaj minutoj mi klopodis turni min en la lito kaj sentis, ke mi ne povas plu movi eĉ unu membron. Estus bone, se mi povus malŝarĝigi mian animon antaŭ ol morti. Kio kaŭzas al ni malmultan pripensadon, kiam ni estas sanaj, tio peze ŝarĝas nin en horo, kiel la nuna estas al mi. Flegistino, ĉu vi estas tie? Aŭ estas neniu en la ĉambro, krom ni?”

Mi certigis al ŝi, ke ni estas duopaj.

”Nu, dufoje mi agis al vi maljuste, mi nun pripentas tion. La unua fojo estis tiu, kiam mi rompis la promeson, donitan al mia edzo, konstante teni vin ĉe mi kvazaŭ propran infanon; — la dua —” subite ŝi eksilentis.

”Nu, eble tio ne estas tiel grava,” ŝi murmuretis al si, — ”kaj eble mi resaniĝos, kaj tiam la penso estus terura, ke mi tiel malhumiliĝis antaŭ vi.”

Ŝi faris sian eblon kuŝiĝi alie, sed tio ne sukcesis al ŝi; ŝia vizaĝo aliiĝis; ŝi ŝajnis senti internan movon — eble la antaŭsignojn de la lasta lukto.

”Nu, mi devas tion transiĝi. — La eterneco kuŝas antaŭ mi. Estas tial pli bone diri tion al ŝi. — Donu al mi mian tualetokesteton, malfermu ĝin kaj elprenu la leteron, kiun vi tie trovos.”

Mi faris, kion ŝi ordonis al mi.

”Legu la leteron,” ŝi diris.

Ĝi estis mallonga kaj la enhavo estis:

”Sinjorino!

Ĉu vi bonvolos sendi al mi la adreson de mia nevino Jane Eyre kaj sciigi min, kiel ŝi fartas. Mi intencas skribi al ŝi post nelonge kaj peti ŝin veni al mi en Madejro. La Providenco favoris miajn klopodojn, kaj mi akiris grandan kapitalon, kaj ĉar mi ne havas edzinon nek infanojn, mi deziras adopti ŝin dum mia vivo kaj postlasi al ŝi mian tutan havaĵon post mia morto. — Mi estas, sinjorino

k. c.

John Eyre, Madejro.”

Ĝi estis datumita tri jarojn pli frue.

”Kial tio neniam estas komunikita al mi?” mi demandis malrapide.

”Ĉar mi tro multe kaj tro profunde malamis vin por kunhelpi en via financa prospero. Mi ne povis forgesi vian konduton al mi, Jane; mi ne povis forgesi la koleron, kun kiu vi iam vin turnis al mi; kaj la manieron, en kiu vi diris al mi, ke vi malamas min pli ol iun ajn en la mondo; kaj la malinfanan voĉon, kaj la nenaturan rigardon, per kiuj vi diris, ke la nura penso al mi malsanigas vin, per kio vi certigis, ke mi pritraktis vin per la plej mizera krueleco. Mi ne povis forgesi miajn sentojn, kiuj regis min, kiam vi tiam salte leviĝis kaj superŝutis min per la veneno de via animo: min kaptis teruro, kvazaŭ min subite per homaj okuloj rigardis besto, kiun mi estis pik-

inta aŭ batinta, kaj kvazaŭ ĝi malbenis min per homa voĉo. — Donu al mi iom da akvo! Rapidu! Ho! Rapidu do!”

”Kara sinjorino Reed!” mi diris, donante al ŝi la deziritan trinkaĵon, ”ne pensu plu al ĉiuj tiuj okazintaĵoj, forigu ilin el via memoro: tiam mi estis ja nur infano; post tiu tempo pasis ok, preskaŭ naŭ jaroj.”

Ŝi ne atentis miajn parolojn; sed trinkinte la akvon kaj profunde spirinte, ŝi parolis plue:

”Mi diras al vi; mi ne povis forgesi tion, kaj mi volis venĝon. Mi ne povis toleri la penson, ke via onklo adoptos vin kaj samtempe levos vin al feliĉo kaj prospero. Mi skribis al li. Mi skribis, ke mi bedaŭras kaŭzi al li ĉagrenon, sed ke Jane Eyre mortis pro tifo en Lowood. Vi nun agu, kiel al vi plaĉas; skribu al li kaj kontraŭdiru mian sciigon — malkovru mian mensogon tiel baldaŭ kiel vi volos. Mi pensas, ke vi naskiĝis por esti mia turmento; mia lasta horo estas turmentata de la rememoro al ago, kiun neniam mi kapablus fari al iu alia persono.”

”Se mi povus nur decidigi vin, onklino Reed, ne plu pensi al ĉi tiu afero kaj rigardi min kun boneco, indulgo kaj pardono —”

”Vi havas tre malican karakteron,” ŝi diris, ”kaj krom tio tian, kian mi ĝis hodiaŭ ne kapablis kompreni. Neniam mi povis kompreni, kiel vi povis kviete kaj pacience toleri dum naŭ jaroj tiun malbonan traktadon kaj subite eksplodi en fajra kolero.”

”Mia karaktero ne estas tiel malbona kiel vi pensas, onklino Reed, mi estas pasia sed ne malica. Kiam mi estis infano, mi estus ĝoja kaj feliĉa, se vi nur volus min ami, kaj mi tutkore aspiras reamikiĝon. Kisu min, onklino.”

Mi proksimigis mian vangon al ŝiaj lipoj; ŝi ne tuŝis ĝin. Ŝi diris, ke mia kliniĝo super la lito timigas ŝin, kaj ree ŝi dezi-  
ris trinki. Kiam mi kuŝigis ŝin, ĉar dum la trinkado mi estis  
sidiginta ŝin, apogante ŝin per mia brako — mi kovris ŝian  
glacie malvarman, malseketan manon per mia; la malfortaj  
fingroj tremetis sub mia tuŝado — la vitrecaj okuloj evitis  
mian rigardon.

”Nu, malamuzo min aŭ amuzo min, laŭ via plaĉo,” fine mi diris,  
”sed mi plene pardonas vin; nun preĝu al la ĉiopotenco Dio,  
por ke ankaŭ Li pardonu vin — kaj estu paca.”

Kompatinda, turmentita virino! Nun estis por ŝi tro mal-  
frue. Nun ŝi ne povis plu streĉi sian volon por aliigi sian ani-  
mon. Dum ŝia vivo ŝi estis nur malamuzinta min — ankaŭ mor-  
tante ŝi devis malamuzi min ankoraŭ.

La flegistino eniris kaj ŝin sekvis Bessie.

Mi restis ankoraŭ duonan horon, esperante signon de ami-  
keco kaj pardono; sed estis vane, ŝi ne vidis min plu. Ŝi pli kaj  
pli fordronis en senkonscio kaj ne plu rekonsciiĝis. Je la dek  
unua horo en tiu nokto ŝi mortis. Mi ne estis tie por povi fer-  
mi ŝiajn okulojn; ankaŭ ŝiaj filinoj ne restis apud ŝi. La sek-  
vantan matenon venis la flegistino kaj Bessie por sciigi al ni,  
ke ĉio pasis. Oni jam kuŝigis ŝin sur la paradan liton. Eliza kaj  
mi iris por vidi ŝin ankoraŭ unu fojon. Georgiana eksplodis en  
laŭta spasma plorado dirante, ke ŝi ne havas la kuraĝon iri al  
ŝi. Jen kuŝis la korpo de Sara Reed, iam tiel forta, vivoplena,  
nun rigida, malvarma kaj senmova. La malvarmaj palpebroj  
kovris la akrajn, senkompatajn okulojn; la frunto kaj la rigi-  
daj trajtoj montris ankoraŭ la markon de ŝia nefleksebla, sen-  
kompata animo. Tiu kadavro havis ion strangan, ion solenan  
por mi. Tremetante kaj malĝojante mi rigardis ĝin: ĝi inspi-

ris al mi nenion kompatan, nenion esper-naskantan aŭ ion, kio povus agordi ripozon; sed nur korŝirantan, timigan ĉagrenon pro ŝia mizero — ne pro io, kion mi perdis — kaj malluma, senlarma teruro pro la morto en tia formo.

Eliza kviete rigardis malsupren al sia patrino. Post kelkaj minutoj de silentado ŝi rimarkis:

”Kun sia sano ŝi povus atingi altan aĝon. Sed ĉagreno mallongigis ŝian vivon.”

Tiam ŝia buŝo konvulsie kuntiriĝis, sed nur mallongan momenton. Tuj poste ŝi eliris la ĉambron. Mi ankaŭ faris tion. Neniu el ni verŝis unu larmon.

## Ĉapitro XXII.

**S**injoro Rochester estis permesinta al mi nur unu liberan semajnon, sed malgraŭ tio pasis tuta monato antaŭ ol mi forlasis Gateshead. Mi volis forvojaĝi tuj post la enterigo, sed Georgiana petis min resti ĝis estos al ŝi eble vojaĝi en Londonon, kien fine ŝia onklo, sinjoro Gibson estis invitinta ŝin. Li estis veninta por ordigi ĉiujn preparojn de la enterigo de sia fratino, kaj tiujn de la familiaj financaferoj. Georgiana diris, ke ŝi timas resti sola kun Eliza; de sia fratino ŝi ne povis esperi simpatian pri sia malĝojo, nek helpon pri siaj premego kaj subteno en siaj vojaĝpreparoj. Tial mi suferis kiel eble plej multe ŝiajn malgrandanimajn ĝemadojn kaj egoistajn plendojn, dum mi kudris kaj laboris por ŝi kaj enpakis ŝiajn tolaĵojn kaj vestojn. Vere estas, ke ŝi iris tien kaj reen farante tute nenion dum mi laboris, kaj tre ofte mi pensis: "Nu, kuzino, se ni estus kondamnitaj kune vivi, ni baldaŭ ŝanĝus tiun manieron de kunlaborado. Mi ne bonvole konsentus esti nur la laboranta parto; ankaŭ al vi mi cedus vian parton de la laboro kaj devigus vin fari ĝin. Ankaŭ mi postulus, ke vi kaŝu en via brusto kelkajn el tiuj nur duone sincerajn plendojn kaj ĝemojn. Nur tial ke nia kunesto estas okaza kaj baldaŭ finiĝonta, kaj koincidas kun tre malĝoja tempo, mi submetas min esti tiel pacienca kaj bonvola al vi."

Fine venis la momento de la forvojaĝo de Georgiana, sed tiam Eliza petis min resti ankoraŭ unu semajnon. Kiel mi

diris: ŝiaj planoj okupis ĉiujn ŝiajn tempon kaj atenton. Ŝi intencis vojaĝi al iu nekonata lando kaj la tutan tagon ŝi pasigis en sia ĉambro. La pordo estis ŝlosita interne, kaj ŝi okupigis enpakante kofrojn, malplenigante tirkestojn, kaj en tiu laboro neniu ĝenu ŝin. De mi ŝi deziris, ke mi prizorgu la mastrumadon, ricevu vizitantojn kaj respondu la kondolencleterojn.

Iun matenon ŝi diris al mi, ke ŝi nun ne bezonas min plu. "Kaj," daŭrigis ŝi, "mi estas al vi tre danka pro viaj eksterordinaraj servoj kaj pro via diskreta konduto. La diferenco vere estas grandega vivi kun vi aŭ kun Georgiana. Vi portas vian propran ŝarĝon en la vivo kaj turmentas kaj ĝenas neniun." Ŝi diris plue: "Morgaŭ mi iros al la kontinento. Mi ekloĝos en pia domo — en monaĥinejo, kiel oni kutime ĝin nomas. Tie mi vivos kviete kaj neĝenate. Dum kelka tempo mi dediĉos min al la provo de la romkatolikaj dogmoj kaj zorge ekzamenos la verkojn pri la sistemo de tiu religio. Trovinte — kiel mi atendas — ke ĝi plene kapabligas al ni plenumi ĉiujn aferojn de la vivo en bona ordo kaj kviete, mi konvertiĝos al tiu religio de Romo kaj verŝajne estiĝos monaĥino."

Mi tute ne esprimis mian miregon pro tiu decido kaj tial ne klopodis deteni ŝin de ĝi. Mi pensis: "Tiu vokinklino plene taŭgos por vi, mi esperas, ke ĝi faros al vi bonon!"

Kiam ni disiris, ŝi diris: "Fartu bone, kuzino Jane Eyre; mi deziras al vi ĉion bonan, vi havas prudenton."

Mi respondis: "Ankaŭ vi ne estas senprudenta, kuzino Eliza; sed la prudento, kiun vi posedas, eble estos intermurigita en franca monaĥinejo antaŭ ol pasos unu jaro. Sed tio ja tute ne interesas min, kaj estos al mi indiferenta, se nur tio povos fari vin feliĉa."

”Vi pravas” ŝi diris. Post tiuj vortoj ni disiris kaj ĉiu iris sian vojon.

Ĉar mi ne havos la okazon denove paroli pri ŝi kaj pri ŝia fratino, mi jam nun rakontos, ke Georgiana edziniĝis kun riĉa sed diboĉinta eminenta viro, kaj ke Eliza vere fariĝis monaĥino kaj ankoraŭ estas en la monaĥinejo, kie ŝi pasigis sian novicecon. Sian havaĵon ŝi donacis al ĝi.

Kiel homoj sentas, kiam ili revenas hejmen post mallonga aŭ longa tempo de foresto, tion mi ne sciis. Mi ja neniam spertis tian senton. Sed bone mi sciis, kion mi kiel infano sentis, kiam mi revenis en Gateshead post longa promenado —: tiam mi estis insultriproĉata, ĉar mi aspektis malĝoja kaj preskaŭ frostiĝinta, kaj poste mi spertis, kion signifas en Lowood, kiam mi revenis hejmen post longa irado el la preĝejo —: tiam mi aspiris bonan riĉan manĝaĵon kaj varman kamekofajron, sed ricevis neniun el ambaŭ. Neniu el tiuj rehejmiĝoj estis tre agraba aŭ dezirinda; neniu magneto altiris min al certa loko kaj pligrandigis la fortecon kaj allogadon laŭ tio, ke mi pli kaj pli proksimiĝis.

Mi devis ankoraŭ sperti, kion signifos al mi la rehejmiĝo en Thornfield.

Mia vojaĝo estis teda — tre teda. Mi devis vojaĝi kvindek mejlojn en la unua tago, pasigi la nokton en vilaĝa gastejo, kvindek mejlojn mi devis vojaĝi en la dua tago. La unuajn dekdu horojn mi pensis al sinjorino Reed kaj al ŝiaj lastaj horoj; mi vidis ŝian flavpalan, distordiĝintan vizaĝon kaj aŭdis la strange ŝanĝigintan voĉon. Mi pensis pri la tago de enterigo, pri la ĉerko, la funebra veturilo, la longa, nigra procesio de lufarmistoj kaj servistoj — ĉeestis nur malmultaj familianoj — la oscedanta tombovolbo, la silenta preĝejo, la

solena diservo. Poste mi pensis pri Eliza kaj Georgiana. La unuan mi rigardis kiel la allogaĵon de balsalono, la duan kiel loĝantinon de monaĥina ĉelo, kaj longan tempon mi pasigis analizante iliajn malsamajn specialecojn pri karaktero kaj persono.

La malfrua enveno en la urbeto ... forpelis tiun pensadon; la nokto kondukis ĝin en alian vojon. Kiam mi estis enlitiĝinta, la memorado min forlasis kaj mi pensis nur pri la estonteco.

Mi do estis reironta al Thornfield; kiel longa estos mia tiea restado? Ne longa, pri tio mi estis certa. Dum la tempo de mia foresto mi aŭdis pere de sinjorino Fairfax, ke la ĝoja eminenta societo, kiu estis kune je mia forvojaĝo, disiris ĉiuloken. Sinjoro Rochester pasigis tri semajnojn en Londono, sed reen venis de tie antaŭ dekkvar tagoj. Sinjorino Fairfax konjektis, ke li iris tien por prizorgi la preparojn de sia edziĝo, ĉar li parolis pri tio, ke li intencas aĉeti novan veturilon. Ŝi sciigis plue, ke la penso, ke li edziĝos kun fraŭlino Ingram, ŝajnas al ŝi tre stranga; sed laŭ la diroj de ĉiuj homoj, kaj laŭ tio, kion ŝi propraokule vidis, ne estas plu dube, ke la afero estas baldaŭ okazonta.

"Vi estus tamen neordinare nekredema, se vi dubus pri tio," mi diris al mi, "mi mem ne dubas pri tio unu momenton."

Nun sekvis la demando: "Kien mi tiam iru?" La tutan nokton mi sonĝis pri fraŭlino Ingram; klara dummaten-sonĝo vidigis al mi, kiel ŝi fermis al mi ĉiujn pordojn de Thornfield kaj fingre montris al mi alian vojon; sinjoro Rochester kviete ĉeestis kun krucitaj brakoj kaj lasis ŝin agi; ŝajnis, ke li sarkasme ridas pri ŝi kaj pri mi.

Mi ne antaŭsciigis al sinjorino Fairfax pri la tago de mia alveno, ĉar mi ne deziris, ke oni sendu renkonte al mi veturilon al Millcote. Mi decidis kviete piediri sola tiun parton de la vojaĝo; kaj konfidinte mian kofron al la stalservisto, mi nerimarkite forlasis la "Hotelon sankta Georgo" kaj iun belan junivesperon je la sesa horo mi ekiris la malnovan vojon al Thornfield — vojon, kiu plejparte kondukis tra kampoj kaj kiu estis malmulte uzata.

La vespero estis varma, milda sed ne brile varmega; la kapolaboristoj laboris laŭlonge de la tuta vojo; la ĉielo, kvankam ne sennuba, promesis bonan veteron por la venonta tago; ĝia bluo — kie ni povis vidi ĝin, — estis milda, kaj la nuboj ŝvebis alte kaj travideblaj pluen. Ankaŭ la okcidento estis varma; neniuj akvohavaj radioj ĝenis la bildon, estis, kvazaŭ fajro estis bruligita, kvazaŭ altaro brulis malantaŭ tiu nebula kurteno, kaj kie ĝi tie kaj alie estis ŝirita, tralumis orkolora neĝo.

Ĝojo ekregis min, kiam mi vidis la antaŭ mi kuŝantan vojon plimallongiĝi; mi estiĝis tiel ĝoja, ke unu fojon mi haltis por mirigite demandi, kion do signifas tiu sento de feliĉo, kaj por memori al mia prudento, ke mi ne returnen iras al mia propra hejmo aŭ al daŭra ripozejo, aŭ al loko, kie min atendas kaj sopiras fidelaj, karaj amikoj.

Sed mi diris al mi: "Sinjorino Fairfax bone akceptos vin kun amika rideto, kaj la eta Adèle frapos la manojn kaj saltos pro ĝojo, kiam ŝi vidos vin, — sed vi bone scias, ke ne estas ili, al kiuj vi pensas — kaj ke tiu unu ne pensas al vi."

Sed kio estas tiel obstinema kiel la juneco? Kio tiel blinda kiel la nesperteco? Ili certigas, ke estas jam sufiĉe feliĉe nur rigardi sinjoron Rochester, indiferente ĉu li rigardas min aŭ

ne, kaj ili daŭrigis — ”Rapidu, rapidu! Restu ĉe li tiel longe, kiel estos al vi permesate; ankoraŭ malmultaj tagoj pasos, eble malmultaj semajnoj, kaj por ĉiam vi estos disigita de li!”

Kaj poste min sufokis alia animdoloro — io terura, terurega, kion mi ne kuraĝis konfesi, kies potenco ne devus regi min — kaj mi iris pluen.

Ankaŭ sur la herbejoj de Thornfield la laboristoj vigle kolektis fojnon, aŭ reale la falĉistoj ĵus finis sian tagan laboron kaj iris hejmen kun falĉiloj, rastiloj kaj fojnoforkegoj pendantaj sur la ŝultroj; tia estis la horo de mia reveno. Nur unu aŭ du kampojn mi estis traironta kaj la landvojon — kaj mi estos antaŭ la pordo de la domo. Kiel bele floras la rozoj de la plektobariloj! Sed mi ne havas la tempon deŝiri kelkajn; mi deziras eniri la domon! Mi preteriris altan dorno-arbetaĵon, kiu etendiĝas ĝis la vojo; mi vidas la mallarĝan vojeton kun la ŝtonaj ŝtupoj; kaj — mi ekvidas sinjoron Rochester, kiu tie sidas, li havas libron kaj krajonon en la mano kaj estas skribanta.

Nu, li ja ne estas spirito; tamen miaj nervoj ektremas; dum mallonga momento mi ne povas regi min. Kion do tio signifas? Mi ne estis pensinta, ke mi tiel tremos je lia rigardo — kaj ke mi perdos ĉiun povon de mia voĉo, aŭ de mia movo en lia ĉeesto. Tuj kiam mi povos moviĝi, mi returnos min; mi ja ne bezonos montri min kiel vera malsaĝulino. Estas ja alia vojo al la domo. Sed estas indiferente koni eĉ dudek aliajn vojojn; ĉar li jam vidis min.

”Hola!” li krias kaj enpoŝigas libron kaj krajonon. ”Jen vi revenas! Alproksimiĝu, mi petas!”

Mi volas alproksimiĝi, sed mi ne scias kiel; ĉar mi ne konscias, kion mi faras aŭ sentas nek kiel mi penos esti kvietaj, kaj

precipe kiel regi la ekscititajn muskolojn de mia vizaĝo, kiuj energie ribelas kontraŭ mia volo kaj kiuj volonte esprimus, kion mi per ĉiuj miaj fortoj volas kaŝi. Sed mi havas vualon kaj ĝi kovras mian vizaĝon. Eble sukcesos al mi aperi antaŭ li kun deca eksteriĝo.

”Kaj jen vere estas Jane Eyre? Ĉu vi venas de Millcote kaj piede? Jes — tio estas ree unu el viaj malsaĝaĵoj! ne venigi veturilon sed iri trans kampojn kaj vojojn kiel ordinara homo! Tiel enŝteliĝi hejmen en la krepusko, kvazaŭ mi aŭ ŝi estus sorĉaĵo aŭ nura ombro! Kion pro la diablo vi do faris dum la lasta monato?”

”Mi estis ĉe mia onklino, kiu mortis.”

”Jen ree respondo de Jane! La bonaj anĝeloj protektu min! Ŝi venas de la alia mondo — de loĝejo de mortintoj; kaj tion ŝi rakontas al mi, kiam ŝi renkontas min ĉi tie tute sola en la krepusko! Se mi kuraĝus, mi vokus al ŝi por vidi, ĉu ŝi estas ombro aŭ io vere ekzistanta — ho elfo! sed same bone mi povus klopodi kapti bluan *ignis fatuus* sur la marĉo. Ho forkurintino! forkurintino!” li parolis plue, silentinte kelkan tempon. ”Tiel forresti de mi tutan monaton, kaj mi povas ĵuri pri tio, ke ŝi tute min forgesis!”

Mi sciis, ke estas al mi ĝojo revidi mian mastron, kvankam la timo malĝojigis min, ke li baldaŭ ĉesos esti mia mastro, kaj la konscio, ke mi estas al li tute indiferenta. Sed sinjoro Rochester tiom posedas la povon feliĉigi aliajn — tion almenaŭ mi kredis — ke eĉ paneroj, kiujn li ĵetis al kompatinda, fremda, erarvaganta birdo, kiel mi, estis kvazaŭ bongusta nutraĵo. Liaj lastaj vortoj estis al mi balsamo: ili ŝajnis pravi, ke ne estas al li indiferece, ke mi lin ne forgesis. Kaj li estis

parolinta pri Thornfield kvazaŭ ĝi estus mia hejmo ho ve! ke ĝi do estu mia hejmo!

Li ne foriris de la ŝtona vojeto kaj mi ne kuraĝis peti lin fari al mi spacon por ke mi preteriru lin. Mi demandis nur, ĉu li ne estis en Londono.

”Jes, supozeble via ’dua vido’ sciigis tion al vi.”

”Sinjorino Fairfax skribis tion al mi en letero.”

”Ĉu ŝi ankaŭ detale skribis pri la celo de mia vojaĝo?”

”Ho jes, sinjoro! Ĉiu ja konas tiun celon.”

”Vi devas foje rigardi la veturilon, Jane, kaj diri al mi, ĉu vi ne opinias, ke ĝi plene plaĉos al sinjorino Rochester, kaj ĉu ŝi ne aspektos kiel reĝino, dronante en la malhele-ruĝa kuseno. Mi nur dezirus Jane, ke mia eksteriĝo iom pli ŝin induis. Diru do al mi, ĉar vi estas ja feino, ĉu vi ne povas doni al mi sorĉilon aŭ sorĉtrinkaĵon, kiu faros el mi belan viron?”

”Neniu sorĉpovo kapablas tion, sinjoro;” kaj fundkore mi diris plue: ”nur aminda okulo estas la sorĉo, kiu ĉi tie estas bezonata; io tia ja plene sufiĉas, via serioza rigardo estas pli potenca, ĝi estas pli efika ol ĉiu sorĉo de la beleco.”

Sinjoro Rochester jam ofte legis miajn ne-elparolitajn pensojn per akra vido, kiu estis al mi nekomprenebla; en ĉi tiu okazo li ne atentis mian tiel rapide elparolitan respondon; sed li ridetis al mi per sia stranga rideto, kiu apartenis nur al li kaj kiun li uzis en la tre maloftaj okazoj. En ordinaraj cirkonstancoj li rigardis ĝin kiel tro bonan; ĝi estis ceremonia sunbrilo de la sento — nun li briligis ĝin sur min.

”Iru do, Jane,” li diris, farante por mi spacon, por ke mi povu transiri la ŝtupon de la ŝtona vojeto, ”iru nun hejmen kaj donu iom da ripozo al viaj malgrandaj migre laciĝintaj piedoj.”

Mi povis nur silente obei lin; aliaj kaŭzoj por daŭrigi la interparolon ne ekzistis. Dirante plu nenion, mi transiris la ŝtupon, intencante kviete foriri de li. Impulso retenis min — nevidebla potenco devigis min turniĝi. Mi diris — aŭ pli ĝuste — io en mi diris sen mia volo:

”Mi dankas vin pro via granda boneco, sinjoro Rochester. Gajigas min eksterordinare refoje esti ĉi tie kaj ĉe vi; kaj kie vi estas, tie estas mia hejmo — mia sola hejmo.”

Rapide mi foriris, tiel rapide, ke li ne kapablis kuratingi min, eĉ se li tion volus. La eta Adèle estis duone freneza pro ĝojo, kiam ŝi ekvidis min. Sinjorino Fairfax ricevis min kun sia ordinara simpla koreco. Leah ridetis, kaj eĉ Sophie diris amike ”*bonsoir*”. Ĉio tio estis tre agrabla. Ne estas pli granda feliĉo ol esti amata de siaj proksimuloj kaj senti, ke nia proksimeco pligrandigas iliajn ĝojon kaj bonplaĉon.

En tiu vespero mi decidis fermi miajn okulojn antaŭ la estonteco. Mi ne volis aŭskulti la admonantajn voĉojn, kiuj avertis min kontraŭ la preskaŭ tuja disiĝo kaj estonta ĉagreno.

Kiam la tetrinkado estis pasinta, sinjorino Fairfax estis preninta sian trikilaron, mi estis sidiĝinta ĉe ŝia flanko kaj Adèle, genuante sur la tapiŝo, flate sin premis al mi, tiam ŝajnis al mi kvazaŭ konscio de reciproka amo ĉirkaŭas nin per ora ringo, kaj mi sendis senparolan preĝon ĉielen, ke nia disiĝo estu kiel eble plej malproksima. Ni sidis ankoraŭ kune, kiam sinjoro Rochester eniris. Li rigardis nin kaj lia ĝojo pro tiu feliĉa grupo ŝajnis plaĉi al li. Tiam li diris, ke la aĝa sinjorino sin sentas espereble tre feliĉa, ĉar ŝi denove havas apud si sian adoptitinon kaj li parolis plue, ke li vidas, ke Adèle estas *prete a croquer sa petite maman anglaise*<sup>1</sup>. — Kaj tiam min

1 estas manĝonta sian etan anglan patrinon

kaptis la deziron, ke ankaŭ post sia edziĝo li lasu nin kviete kunigitaj kaj sub sia protektado kaj ke li ne tute ekzilu nin ekster la sunbrilo de sia apudesto.

Dek du tagoj de duba kvieteco pasis post mia reveno de Gateshead. Pri la edziĝo de nia mastro neniu parolis kaj ankaŭ mi ne rimarkis preparojn, kiuj povus celi la efektivigon de tia proksima okazontaĵo. Preskaŭ ĉiutage mi demandis al sinjorino Fairfax, ĉu ŝi aŭdis ion definitivan pri tio, kaj ĉiam la respondo estis nea. Unu fojon ŝi diris, ke ŝi demandis sinjoron Rochester, kiam li kondukos hejmen sian junan edzinon; li tamen estis respondinta nur per evitanta vorto kaj per unu el siaj strangaj rigardoj, kaj ŝi sciis nenion pli ol antaŭe.

Tre mirigis min tamen, ke okazis neniu vojaĝo tien kaj reen, nek vizitoj al Ingrams parko. Estis vere, tiu bieno kuŝis dudek mejlojn malproksime, sur la limo de alia graflando, sed kio estas tiu distanco por fajra amanto? Por tia lerta kaj senlaca rajdanto, kia estis sinjoro Rochester, tia vojo estis ja nur dummaten-rajdado. Mi ekflatis la esperon, kiun mi ne rajtis esperi, nome, ke la gefianĉiĝo rompiĝis, ke la famo pri estonta geedziĝo estis falsa, ke unu el la geedziĝontoj ŝanĝis opinion. Konstante mi ekzamenis la vizaĝon de mia mastro, ĉu ĝi estas malĝoja aŭ malbonhumora; sed mi ne povis memori al mi la tempon, en kiu ĉio estis tiel sennuba kaj senmalkvietigaj sentoj kiel nun. Li estiĝis eĉ gaja kaj parolema, kiam mi kaj mia lernantino en lia ĉeesto parolis nenion aŭ dronis en ne kontraŭstarebla malĝojo. Neniam antaŭe li tiel ofte kaj longe deziris mian societeton; neniam li estis pli bonkora, pli plenama — kaj ho ve! neniam mi lin amis pli kore!

## Ĉapitro XXIII.

Ĉarmega somermezo brilis super Anglujo. Nur malofte nia ondĉirkaŭita lando estis feliĉigata de ĉielo tiel klara, de sunlumo tiel radianta, kiel ni havis ĝin sen interrompo en tiu somermezo. Estis, kvazaŭ aro da italaj tagoj, kiel armeo da belegaj migraj birdoj venis el la sudo por malsupreniĝi sur la ŝtonegojn de Albiono por ripozi tie. Ĉiu fojno estis jam rikoltita. La kampoj ĉirkaŭ Thornfield estis verdaj kaj kvazaŭ ĵus razitaj, la landvojoj estis varmegaj kaj plenaj de polvo, la arboj paradis en la malluma verdo. Plektobariloj kaj arboj per sia plena malluma foliornamaĵo kontrastis la helajn herbejojn, sur kiuj ili staris.

En la somermeza tagfino Adèle, kiu la tutan tagon jam serĉis sovaĝajn fragojn en Haylane kaj tial estis laca, enlitiĝis je la malleviĝo de la suno.

Mi sidiĝis apud ŝi ĝis ŝi dormis kaj poste foriris de la knabino kaj eniris la ĝardenon.

Estis la plej ĉarma el ĉiuj dudek kvar horoj de la tago. La plej granda varmego pasis kaj sur la akvosopirantan teron kaj la brule varmegan monteton falis la bonfaranta roso. Kie la suno antaŭe malsupreniris en sia simpla belegeco, ne amasigante ĉirkaŭ si la pompon de la nuboj, tie sin etendis solena, ruĝa striego, en kiu tie kaj alie ardis kiel la fajro de brila gemo aŭ la moviĝanta flamo de altforno. Alte kaj malproksime, ĉiam pli malforta ĝi movis sin trans la horizonton. Sola stelo

supreniris en la mallume blua oriento, baldaŭ ĝin sekvis la luno, sed ĝi estis ankoraŭ super la horizonto.

Kelkajn momentojn mi iris tien kaj reen sur la pavimita teraso; sed baldaŭ laodoro, kiun mi bone konis, nome tiu de cigaro, eliris al mi tra la malfermita fenestro; mi rimarkis, ke la fenestra pordo de la biblioteka ĉambro estas malfermita proksimume je manlarĝo, kaj mi sciis, ke de tie oni povas bone observi min. Tial mi malsupreniris en la fruktarbo-ĝardenon. En la tuta parko ne estis loketo, kiu povis esti komparata kun ĝi pri kvieteco kaj paradiza belegeco; ĉi tie kreskis la ombrioriĉaj arboj, la odorantaj floroj; tre alta muro ĝin apartigis de la mastrumada korto je unu flanko, je la alia flanko fagaleo ventoŝirmis la vastan herbejon kuŝantan post ĝi. Je la fino estis ruiniĝanta plektobarilo, la sola dispartigilo inter la solecaj grenkampoj; al tiu plektobarilo kondukis kurba piedvoĵeto, laŭ kies bordoj kreskis laŭroarboj etendiĝantaj ĝis giganta kaŝtanujo, ĉirkaŭ kies trunko estis metita oportuna benko. Tie nevidate oni povis promeni. La roso falis; estiĝis pli kaj pli mallume, kviete, kaj estis al mi, kvazaŭ mi ĉiam povus resti en ĉi tiu ŝirmata loko. Sed kiam mi transrigardis la florbedojn kaj arbogrupejn ĉe la fino de ĉi tiu izolita angulo, subite miaj paŝoj estis retenataj — ne de objekto, nek de brueto, sed refoje de avertantaodoro.

Jasmenoj kaj diantoj kaj rozoj jam longe cedis sian ĉiuvesperan odoron; ĉi tiu novaodoro devenas nek de ia floro nek de arbeto — ĝi devenas, tion mi scias tre bone, de la cigaro de sinjoro Rochester. Mi rigardis ĉirkaŭe kaj aŭskultis. Mi vidas la arbojn riĉe ŝarĝitaj de fruktoj. Duonmejlon de ĉi tie mi aŭdas en ĉarma arbetaĵo la kanton de najtingalo. Neniu moviĝanta homa figuro estas videbla, neniu proksimiĝanta

paŝo estas aŭdebla, sed tiuodoro plifortiĝas: mi devas forkuri. Mi iras al la kradpordo, tra kiu oni povas eniri la arbokulturojn — kaj rimarkas sinjoron Rochester enirintan. Mi paŝas flanken al la hedero. Kovrita niĉo; li ja ne restos longe; li ja baldaŭ reiros al la loko de kie li ĵus venis, kaj ne vidos min, se mi restos staranta senmove.

Sed ne — la vespera kvieteco estas same bonfaranta al li kiel al mi, kaj ĉi tiu antikva ĝardeno efikas al li la saman gravitadon; kaj li paŝetas pli malproksimen. Jen li levas la branĉon de grosarbeto por gustumi la ĉarman frukton; ili estas grandaj kiel prunoj kaj peze pendas teren. Li deŝiras maturan ĉerizon de la spaliro; ree li sin klinas super grupo da floroj, ĉu por enspiri ĝian odoron, ĉu por admirari la roserojn sur la kalikoj. — Granda tineo murmurante preterflugas min; ĝi sidiĝas sur planton je la piedoj de sinjoro Rochester; li vidas ĝin kaj kliniĝas pli profunden por atente observi ĝin.

”Nun li turnas al mi la dorson,” mi pensis, ”kaj estas okupita pro tiu observado; eble mi povos forŝteliĝi ne vidite, se mi senbrue foriras.”

Mi ŝteliris laŭ la rando de la florbedo, por ke min ne perfidu la knaretado de la ŝtonetoj kuŝantaj sur la vojo, kelkajn paŝojn de la loko, kiun mi estas paŝonta, li staris inter la florgrupetoj; evidente la tineo altiris lian atenton. ”Sendube mi pasos lin nerimarkite,” mi pensis. Kiam mi pasis trans lian ombron, kiun la ĵus surironta luno ĵetis trans la piedvojeton, li diris kviete ne turnante sin:

”Jane, venu ĉi tien kaj foje rigardu tiun insekton.”

Mi ne estis farinta bruon: li ne havis okulojn en la dorso — ĉu do lia ombro povis senti? En la unua momento mia koro sentis skueton, tiam mi proksimiĝis al li.

”Rigardu tiujn flugilojn,” li diris, ”ili rememorigas min pri okcidenta insekto; en Anglujo oni malofte vidas tian grandan kaj gajan noktovaganton: ho, jen ĝi flugas for!”

Kaj la tineo forflugis. Ankaŭ mi volis foriri; sed sinjoro Rochester sekvis min kaj kiam ni atingis la pordon, li diris:

”Reiru kun mi; la vespero estas tro bela por pasigi ĝin interne; kaj neniu povas deziri jam enlitiĝi, kiam la subiro de la suno kaj la suriro de la luno tiel mirinde bele koincidas.”

Unu el miaj eraroj estas, ke mia lango, kiu ofte kapablas doni trafan respondon, kelkfoje rifuzas al mi sian servon, kiam ĝi devas eligi senkulpigon, kie rapide elparolita vorto aŭ akceptebla preteksto povus savi min de granda embaraso. Ne estis al mi agrable promeni kun sinjoro Rochester en la fruktoĝardeno je ĉi tiu horo, sed pretekston mi ne trovis por povi foriri de li.

Per hezitantaj paŝoj mi sekvis lin, mi cerbumis pri la rimedo tiri min el la afero, sed li mem estis tiel kvieta kaj gravmiena, ke mi hontis pro mia konfuziĝo. La malpraveco — se mi povus paroli pri nuna aŭ estonta malpraveco — ŝajnis esti nur ĉe mia flanko; lia animo estis senkonscia kaj kvieta.

”Jane,” li ree parolis, kiam ni suriris la laŭbo-plantitan vojon kaj malrapide nin direktis al la ruiniĝanta plektobari-lo kaj al la kaŝtanarbo, ”Jane, Thornfield estas belega resta-dejo en la somero, ĉu ne?”

”Jes, sinjoro.

”Sendube vi jam komencis iom ami la domon, ĉar vi ŝatas naturbelecon kaj krom tio amas hejmecon.”

”Tre certe, mi tre amas kaj ŝatas Thornfield.”

”Kaj kvankam mi ne komprenas la kialon, mi tamen vidas,

ke vi sentas ion simpatian rilate al tiu malsaĝa eta Adèle kaj same al la modesta sinjorino Fairfax.”

”Jes, sinjoro, en malsamaj manieroj mi kore amas ambaŭ.”

”Kaj ĉu vi ne malĝojus disiĝi de ili?”

”Jes.”

”Estas bedaŭrinde!” li diris ĝemante. Tiam li longe silentis. Post kelka tempo li parolis plue: ”Tiel okazas en la mondo, apenaŭ oni trovis feliĉan restadejon, kiam subite sonas voĉo, kiu ordonas: ’leviĝu ĉar la tempo de via ripozo pasis.’ ”

”Ĉu do mi devos foriri, sinjoro?” mi demandis. ”Ĉu mi devos forlasi Thornfield?”

”Mi kredas, ke vi devos, Jane. Mi tre bedaŭras Jane, sed vere mi kredas, ke vi devas foriri.”

Tio estis por mi forta bato; sed mi ne lasis min ĵeti de ĝi sur la teron.

”Nu, sinjoro, mi estos preta, kiam venos la ordono de foriro.”

”Ĝi jam venis — ĉar mi devas hodiaŭ vespere sciigi al vi tiun ordonon.”

”Vi do estas edziĝonta, sinjoro?”

”Vi tion ĝuste divenis — precize divenis. Per via ordinara saĝeco vi denove trafis la kapon de la najlo.”

”Ĉu baldaŭ, sinjoro?”

”Tre baldaŭ, mia —, tre baldaŭ fraŭlino Eyre; kaj vi memoras ankoraŭ, kiam la famo aŭ mi mem sciigis al vi la unuan fojon, ke estas mia intenco, kurbigi mian maljunan fraŭlon — kon sub la sankta jugo — ke mi intencas submeti min al la sankta edziĝostato kaj premi al mia brusto, mallonge dirite (ŝi estas plenbrakaĵo: sed tio estas indiferenta — oni ne povas havi tro multon de tia bonegaĵo, kia estas mia belega Blanche)

nu do, kiel mi diris — aŭskultu min, Jane! Ne plu turnu la kapon por rigardi post alia tineo, ĝi estas nur kokcino flu-ganta hejmen. Mi nur volis memori al vi, ke estis vi, kiu unua diris al mi kun tiu via diskreteco, kiun mi tiel ŝatas — kun tiuj antaŭvido, prudento kaj humileco, kiuj decas al via respondebla kaj dependa situacio — ke, se mi edziĝos kun fraŭlino Ingram, vi prefere tuj foriros kun la eta Adèle. Mi ne volas aludi la ofendon, kiu por la adoratino de mia koro sin kaŝas en via deziro; vere, Jane, mi penas forgesi tiun ofendon, kiam vi estos malproksime de ĉi tie; mi penas forgesi pri ĝi kaj pensas nur al la antaŭzorgo, kiu kuŝas en ĝi; ĝi estis tiel granda, ke mi eĉ volas fari ĝin la gvidilo de miaj agoj. Adèle devas esti sendata al instituto kaj vi, fraŭlino Eyre, devos havi novan funkcion.”

”Jes, sinjoro, mi tuj presigos anoncon en la ĵurnaloj, sed mi supozas —” mi volis diri, ”mi supozas, ke mi povos resti ĉi tie, ĝis mi trovis alian hejmon,” sed mi eksilentis sentante, ke estus al mi neeble diri tiun longan frazon, ĉar en tiu momento mi ne povis regi mian voĉon.

Sinjoro Rochester parolis plue, ”Mia edziĝo okazos proksimume antaŭ la paso de monato, kaj en tiu intertempo mi ĉirkaŭrigardos por trovi por vi funkcion kaj novan hejmon.”

”Dankon, sinjoro, mi bedaŭras kaŭzi al vi tiom da peno.”

”Ho! ne senkulpigu vin! Mi opinias, ke subulo, kiu tiel bone plenumis sian devon, kiel vi, havas la rajton postuli malgrandan subtenon kaj helpon de sia mastro, precipe kiam li sen multa peno povos oferi ilin; mi eĉ aŭdis, ke mia estonta bopatrino scias pri funkcion, kiu eble taŭgos por vi; ŝi parolis pri la edukado de la kvin filinoj de certa sinjorino Dionisius O’Gall en Bitternutlodge, en la graflando Connaught en Irlan-

do. Irlando plaĉos al vi, mi kredas; oni diris al mi, ke la tieaj homoj estas varmkoraj kaj bonaj.”

”Sed tio estas tiel malproksime de ĉi tie, sinjoro.”

”Ne gravas — saĝulinon kiel vi ja ne timigos la longa vojaĝo aŭ la malproksimeco — ĉu ne?”

”La vojaĝo estas al mi indiferenta — sed la malproksimo, kaj krom tio la maro estos interbarilo — —”

”Inter kiuj, Jane?”

”Inter Anglujo, Thornfield, kaj —”

”Nu?”

”Kaj vi, sinjoro.”

Tion mi diris malvole; kaj ne povante retenigi la larmojn, ili venis al mi en la okulojn. Sed mi ne ploris tiel laŭte, ke oni povis aŭdi tion; mi retenis la singultojn. La penso pri sinjorino O’Gall en Bitternutlodge kaj ŝiaj kvin filinoj glaciigis mian koron; kaj ankoraŭ pli glaciiga estis la penso al la ondegoj kaj la ondoŝaŭmo, kiuj kiel ŝajnis, estis destinitaj muĝi inter mi kaj la viro, ĉe kies flanko mi nun estis promenanta; kaj plej terura estis la penso pri tiu vasta, profunda, neŝpirebla maro — riĉeco, situacio, moroj, kutimoj — disiganta min de tio, kion mi tiel nature kaj neeviteble amis.

”Ĝi estas tiel malproksime de ĉi tie,” mi diris refoje.

”Tre certe, kaj kiam vi estos en Bitternutlodge, graflando Connaught en Irlando, tiam mi neniam revidos vin, Jane, tio estas ne kontraŭdireble vera. Ĉar neniam mi iros al Irlando, mi ne simpatias kun tiu lando. Sed, ĉu ne vere, Jane, ni estis ĉiam bonaj amikoj.”

”Jes, sinjoro.”

”Kaj kiam bonaj amikoj estas kune en la antaŭvespero de disiĝo, tiam ili sentas sin feliĉaj, se ili povos pasigi la pasigo-

tan tempon unu flanke de la alia. Venu — ni kviete parolu ankoraŭ horon aŭ pli longe pri la disiĝo kaj la vojaĝo kaj dume ni rigardu la stelojn, kiel ili kviete unu post la alia supreniras sur la ĉielo. Ni sidiĝu ĉi tie sur tiu benko sub la alta honorinda kaŝtanujo. Ni sidiĝu tie hodiaŭ vespere en paco; eble la sorto decidis, ke neniam poste ni sidos tie.” — Li premis min sur la benkon, kaj sidiĝis ĉe mia flanko.

”La vojo al Irlando estas tre longa, Jane, ke fariĝas al mi malfacile sendi mian etan amikinson al tia longa, laciga vojaĝo; sed kion fari, se mi ne havas la povon fari ion pli bonan? Ĉu vi kredas, ke niaj karakteroj estas iel parencaj, Jane?”

En tiu momento ne estis al mi eble doni iun ajn respondon; la emocio, kiun sentis mia koro, estis tro granda.

”Ĉar,” li parolis plue, ”ofte min atakas strangaj sentoj rilate al vi, precipe kiam vi estas tiel proksima al mi, kiel nun; tiam estas al mi, kvazaŭ mi portas en mia brusto iun fadenon, kiu firme kaj nerompeble estas ligita al sama loko en via malgranda, delikata korpeto. Kaj mi timas, ke por ĉiam rompiĝos tiu kunigita fadeno, kiam tiu ventega kanalego kaj pli ol ducent mejloj da tero kuŝas inter ni. Kaj tiam min teruras la angoro, ke tiam mi devos morti pro interna sangoperdo. Rilate al vi — vi — baldaŭ forgesos min.”

”Tion mi povus neniam sinjoro — Vi scias, ke...” — mi ne estis kapabla paroli plue.

”Jane, ĉu vi aŭdas kiel la najtingalo kantas tie en la arbaro? Aŭskultu do.”

Dum mi aŭskultis, mi komencis konvulsie singulti; ĉar mi ne povis plu regi miajn sentojn; mi devis cedi kaj mia longe retenita doloro tremigis mian tutan korpon. Kiam mi reko-

mencis paroli, mi faris tion nur por elparoli la pasian deziron, ke neniam mi naskiĝus aŭ venus al Thornfield.

”Ĉu estos al vi malfacile foriri de ĉi tie, Jane?”

La potenco de tiu sento, kiu naskis en mi amon kaj ĉagrenon, luktis por estiĝi la plej forta kaj volis eksplodi — ĝi volis perforte venki, ĝi volis sin montri, ĝi volis vivi, leviĝi, regi; jes — ĝi eĉ volis paroli.

”Mi malĝojas, ĉar mi devas forlasi Thornfield, ĉar mi amas Thornfield — mi ĝin amas, ĉar mi vivis ĉi tie plenan, feliĉegan vivon almenaŭ dum mallonga tempo. Ĉi tie oni ne piedpremis min. Ĉi tie mi ne ŝtoniĝis, oni ne enŝlosis min kun stultaj animoj, oni ne metis min ekster ĉion, kio estas brila, alta kaj plenforta. Mi povis vizaĝon kontraŭ vizaĝo paroli kun tio, kion mi honoras; kun fortega, grandanima, malproksimen rigardanta karaktero. Mi konatiĝis kun vi, sinjoro Rochester, kaj teruro kaj angoro min kaptas, ĉar por ĉiam mi estos fortirata de vi. Mi vidas la necesecon de mia forvojaĝo kaj ĝi fantome min rigardas kiel la necesecon de la morto.”

”Kie do vi vidas tiun necesecon?” subite li demandis al mi.

”Kie? Vi mem, sinjoro, ŝovis ĝin antaŭ min.”

”En kiu formo?”

”En la formo de fraŭlino Ingram, nobla, belega virino — via fianĉino.”

”Mia fianĉino! Kiu fianĉino? Mi ne havas fianĉinon!”

”Vi havos ŝin.”

”Jes — mi havos! — mi havos!” Li kunpremis la dentojn.

”Tial mi devos foriri — vi mem tion diris.”

”Ne: vi restu! Mi ĵuras tion — kaj tiun ĵuron mi plenumos.”

”Mi diras, ke mi iru,” mi respondis, pasie emociiĝinta. ”Ĉu vi kredas, ke mi povos resti, kaj esti nenio al vi? Ĉu vi kredas,

ke mi estas aŭtomato? — maŝino sen sento? Ke mi povas toleri, ke oni forbatu de mia buŝo la panpecon, ke oni fortiru de mia mano la kalikon kun la klara akvo? Ĉu vi kredas, ke mi estas senanima, senkora, ĉar mi estas malriĉa, malgranda? — Vi malprave pensas! Mi havas tiom da animo, kiom vi — tiom da koro, kiom vi! Se Dio estus donacinta al mi nur iom da beleco kaj grandan riĉaĵon, tiam mi kaŭzus al vi tiom da peno kaj ĉagreno forlasi min, kiom vi al mi kaŭzas iri de vi. Mi nun ne parolas per la medio de la kutimo, eĉ la karno nun ne parolas al la karno — nun ĝi estas mia animo, kiu parolas al via, estas kvazaŭ ili ambaŭ trairus la pordon de la morto, kaj kvazaŭ ni starus antaŭ la piedoj de Dio — kiel egaluloj kiaj fakte ni estas!”

”Kiaj fakte ni estas!” ripetis sinjoro Rochester — ”tiel” li diris plue kaj ĉirkaŭbrakis min, premis sur sian koron, premis sian buŝon sur mian kaj diris: ”tiel, Jane!”

”Jes, tiel, sinjoro,” mi diris kiel li, ”sed tamen ne tiel; ĉar vi estas edziĝonta viro — aŭ preskaŭ edziĝonta — kaj eĉ kun iu, kiu staras tre malsuper vi — kun iu, kiun vi ne simpatias — kiun neeble vi povas kore ami; ĉar mi vidis kaj aŭdis, kiel vi mokis ŝin. Mi malestimus tian geedziĝon, tial mi estas pli bona ol vi — lasu min iri!”

”Kien, Jane? Al Irlando?”

”Jes, al Irlando. Mi nun diris mian opinion kaj nun mi povas iri, kien mi volos.”

”Jane, silentu; ne tiel luktu kiel sovaĝa birdo, kiu pro senespero disŝiras siajn proprajn plumojn.”

”Mi ne estas birdo, kaj neniu reto, neniu birdkaptisto kapablas kapti min. Mi estas libera homa estaĵo kun sendependa volo, kaj nun mi uzas tiun volon, dum mi foriras de vi.”

Dua, forta klopodo liberigis min kaj mi staris rekte antaŭ li.

”Kaj via volo ankaŭ decidu pri via sorto,” li diris. ”Mi oferas al vi mian manon, mian koron kaj parton de ĉio, kion mi posedas.”

”Vi ludas farson, kiun mi priridas.”

”Mi petas vin iri ĉe mia flanko tra la vivo — esti mia dua duono kaj plej bona akompanantino.”

”Rilate al tio vi jam longe faris vian elekton, tenu ĝin.”

”Jane, silentu kelkajn momentojn; vi estas tro ekscitita. Ankaŭ mi klopodos kvietiĝi.”

Ventopuŝo trairis la laŭro-aleon kaj murmuris tra la branĉojn de la kaŝtanujo. Ĝi iris pluen — pli kaj pli pluen ĝis ĝi formortis en la malproksimo. La kantado de la najtingalo estis nun la sola sono aŭdata, kaj dum mi aŭskultis ĝin, miaj larvoj ekfluis. Sinjoro Rochester sidis senmove kaj amike kaj grave rigardis min. Mallonga momento pasis antaŭ ol li ree ekparolis; fine li diris:

”Sidiĝu ĉe mia flanko, Jane, kaj ni klopodu kompreni unu alian.”

”Neniam mi sidiĝos plu ĉe via flanko. Mi devis cedi tiun lokon kaj ne reprenos ĝin.”

”Sed, Jane, mi petas tion al vi, kiel al mia edzino; nur kun vi mi volas edziĝi.”

Mi silentis, pensante, ke li primokas min.

”Venu, Jane — venu ĉi tien.”

”Via fianĉino staras inter ni.”

Li salte leviĝis kaj per unu paŝo estis apud mi.

”Mia fianĉino estas ĉi tie,” li diris, ree tirante min al si, ”ĉar

vi estas mia egalulino kaj ĉar vi similas min, Jane, ĉu vi volas estiĝi mia edzino?”

Mi ankoraŭ ne respondis, kaj ree mi luktis por liberigi min de liaj brakoj, ĉar mi ankoraŭ ne kredis al li.

”Ĉu do vi ne kredas, kion mi diras, Jane?”

”Ne, tute ne.”

”Ĉu do vi ne fidas min?”

”Neniel.”

”Ĉu mi estas mensogulo en viaj okuloj?” li kolerete demandis. ”Eta dubulino, mi konvinkos vin. Kio estas al mi fraŭlino Ingram? Tute nenio. Kaj tion vi tre bone scias. Kion ŝi sentas por mi? Nenion, kaj mi faris mian eblon por ricevi la pruvon pri tio. Mi zorgis por tio, ke ŝin atingis la famo, ke mia posedajo ne estas la triono de tio, kion oni supozis, kaj poste mi vizitis ŝin por vidi la efikon; kaj de ŝi kaj de ŝia patrino mi estis ricevata tre indiferece, malvarmete. Mi ne povus kaj ne volus edziĝi kun fraŭlino Ingram. Ho vi — vi stranga, preskaŭ supertera estaĵo! — Vin mi amas kiel mian propran karnon. Vin — ho malriĉa, eta, kvankam ne bela — vin mi petegas akcepti min kiel vian edzon.”

”Kion, min!” mi kriis, komencante kredi lian sincerecon pro lia graveco kaj precipe pro lia malĝentileco. ”Ĉu min, kiu havas neniun amikon, krom vi — almenaŭ se vi estas tia. Kiu posedas nenion krom tio, kion vi al mi donis?”

”Jes, vin. Jane. Vi devas estiĝi mia — tute mia. Ĉu vi konsentas? Diru jes kaj tuj.”

”Sinjoro Rochester, montru al mi vian vizaĝon; turnu ĝin al la lunlumo.”

”Kial?”

”Ĉar mi volas legi vian vizaĝon — turnu ĝin al la lunlumo!”

”Jen! Vi trovos nur malmulton legeblan krom ĉifita, plenskribita paĝo. Sed provu legi — tamen rapide, ĉar mi suferas.”

Lia vizaĝo estis tre ekscitita kaj ruĝa; spasmaj linioj kuris sur lia vizaĝo kaj liaj okuloj brilis per stranga ardo.

”Ho, Jane, vi turmentas min!” li kriis. ”Vi turmentas min per tiu esplora kaj tamen korfidela kaj noblanima rigardo!”

”Kiel mi povas fari tion? Se vi estas sincera kaj via ofero sincera, miaj solaj sentoj al vi devas esti dankemo kaj dediĉo — ili ne povas turmenti.”

”Dankemo!” li kriis; kaj sovaĝe li diris plue — ”Jane, akceptu min rapide. Diru Edward — nomu min per mia nomo — Edward — mi volas edziĝi kun vi.

”Ĉu vi ne mokas? Ĉu vere vi amas min? Ĉu sincere vi deziras, min kiel vian edzinon?”

”Tion mi deziras, kaj se ĵuro estas necesa por pruvi tion, mi ĵuras.”

”Tiam, mi volas edziĝi kun vi, sinjoro.”

”Diru Edward, ne: sinjoro.

”Kara Edward!”

”Venu al mi — kiel eble plej proksime,” — li diris; kaj premante sian vangon al mia, li flustris: ”faru min feliĉa kaj mi feliĉigos vin.”

”Dio pardonu al mi!” li diris al si mem, ”kaj ke la mondo sin ne loku inter nin. Ŝi estas mia, ŝi restos mia.”

”Sed neniu povus loki sin inter nin.”

”Ne, — kaj tio estas tre feliĉa,” li diris. Kaj se mi amus lin malpli multe, mi trovus en tiu momento liajn ravitan rigardon kaj voĉtonon sovaĝaj; sed sidante tiel ĉe lia flanko, vekita de la premsonĝo de disiĝo — kaj vokita al la paradizo de la rekuniĝo mi pensis nur pri la feliĉo, kiu abunde estis al mi

oferata. Kaj ĉiam denove li demandis: "Ĉu vi estas feliĉa, Jane?" Kaj ĉiam mi respondis lin: "Jes!" Kaj tiam li murmuris: "Per tio ĉio kvitiĝos — per tio ĉio kvitiĝos. Ĉu mi ne trovis ŝin sen amikoj kaj senkonsola? Ĉu nun mi ne protektos, amos kaj konsolos ŝin? Ĉu mia koro ne estas plena de amo kaj ĉu miaj decidoj ne estas firmaj? Ĉi tio ne estos. alkalkulita al mi kiel peko antaŭ la dia tribunalo. Mi scias, ke mia Kreinto aprobas, kion mi nun faras. Rilate al la juĝo de la mondo — ĝi estas al mi tute indiferenta. Mi kontraŭstaros ĉies opinion."

Sed kio okazis al la vespero? La luno ankoraŭ ne subiris kaj malgraŭ tio ni jam dronis en la mallumo. Apenaŭ mi povis vidi la vizaĝon de mia mastro, kvankam mi sidis tuj apud li. Kaj kio okazis al la kaŝtanujo? Ĝi ĝemis kaj kurbigis siajn branĉojn dum subite la vento fajfegis trans nin tra la laŭro-aleo.

"Ni devos iri internen," diris sinjoro Rochester, "la vetero ŝanĝiĝas. Mi povus sidi kun vi ĉi tie ĝis morgaŭ matene, Jane."

"Kaj mi kun vi," mi pensis. Kaj eble mi estus dirinta tion, sed blindiganta fulmo pafiĝis el nuboj, al kiu okaze mi suprenrigardis; sekvis bruego, kraketado kaj tondrobato tiel terura, ke mi kaŝis miajn blindigitajn okulojn sur la ŝultro de sinjoro Rochester.

La pluvo ekfalis torente. Rapide li tiris min post si laŭ la piedvojo, tra la parko, ĝis ni atingis la domon. Sed ni ambaŭ estis trempe malsekaj antaŭ ol ni transiris la sojlon. Li estis deprenanta mian ŝalon en la koridoro, kaj forĵetanta la akvon el miaj disiĝintaj haroj, kiam sinjorino Fairfax venis el sia ĉambro.

Komence mi ne rimarkis ŝin, nek sinjoro Rochester. La lampo brulis. Estis preskaŭ noktomezo.

”Iru tuj demeti viajn malsekajn vestojn,” li diris, ”kaj: bonan nokton — dormu bone, mia karulino!”

Ripete li kisis min. Rigardante supren kaj liberiginte min el lia ĉirkaŭbrako, mi vidis la palan, gravan kaj konsternitan vidvinon. Mi ridetis al ŝi kaj rapidis supren. ”Klarigoj sekvas poste,” mi pensis. Sed atinginte mian ĉambron, mi sentis la okazintaĵon ĝenege terura, ke ŝi klarigus al si malbone, kion ŝi ĵus vidis. Tiu timo baldaŭ foriĝis, ĉar mia ĝojego forpelis ĉiun alian senton; kaj kvankam la vento fajfegis kaj la fulmo-tondro bruegis, kaj la fulmoj ĉiam denove heligis mian ĉambron, kaj la pluvego kiel akvofalo falis el la ĉielo, mi ne sentis plu timon kaj eĉ malmultan respektimponon. Sinjoro Rochester venis tri fojojn al mia ĉambro dum la ventego por demandi, ĉu mi estas kvieta, kaj tio konsolis min kaj donis al mi la forton por elteni ĉion.

Antaŭ ol mi ellitiĝis en la sekvanta mateno, eta Adèle enkuris mian dormejon por rakonti al mi, ke la alta sovaĝa kaŝtano en la nokto estis trafita de la fulmo kaj ke ĝi duone estas frakasita.

## Ĉapitro XXIV.

**E**llitiĝante kaj vestiĝante, mi pensis ankoraŭ fojon pri ĉio, kio okazis kaj kun miro mi demandis al mi, ĉu ĉio tio ne estis sonĝo. Mi ne povis kredi al la vero, antaŭ ol mi revidus sinjoron Rochester kaj denove aŭdus liajn amvortojn kaj lian amkonfeson.

Suprenligante miajn harplektaĵojn, mi konsideris mian vizaĝon en la spegulo kaj vidis, ke ĝi ne estas plu malbela; ĝi esprimis esperon kaj viva ruĝo kovris la vangojn. Miaj okuloj rigardis kvazaŭ ili estus vidintaj la fonton de la vivo kaj pruntintaj sian brilon de la ludantaj ondoj. Ofte mi estis rigardinta mian mastron, dum mi timis, ke mia rigardo povus esti al li malagrabra. Nun mi tamen sciis, ke mi povos levi mian vizaĝon al lia kaj ke ĝi ne malvarmigis lian amon. Mi prenis simplan sed puran, helan somerveston el mia ŝranko kaj vestis min per ĝi; estis al mi, kvazaŭ neniu vestaĵo tiel bone vestis min — mi ja ankaŭ neniam portis ĝin en tiu feliĉega animstato.

Malsuprenirante al la halo, mi tute ne estis mirigita pro tio, ke rava junia mateno sekvis la teruran dumnoktan uraganon. Freŝiganta, aromplena aertrablovo iris al mi renkonte tra la malfermita vitro-pordo. La naturo ja nepre estu gaja, kiam mi estis tiel feliĉega.

Almozulino kun sia knabeto — ambaŭ palaj, mizeraj kaj ĉifone vestitaj — supreniris la larĝan ĝardenvojon; mi iris al

ili renkonte kaj donis al ili la monon, kiun mi havis en mia monujo; pli ol kvar ŝilingojn; ĉiuj homoj ĉu bonaj ĉu malbonaj, devis partopreni mian feliĉegon. La korvo gratadis, la birdetoj kantis, sed nenio estis tiel ĝoja kaj belsona kiel la muziko de mia propra koro.

Sinjorino Fairfax mirigis min, dum ŝi kun malĝoja vizaĝo rigardis tra la fenestro dirante grave: "Fraŭlino Eyre, ĉu vi volas eniri por matenmanĝi?" Dum la manĝo ŝi estis kvieta kaj malvarma, sed la momento ankoraŭ ne venis por doni al ŝi la intencitan klarigon. Mi devis atendi ĝis la veno de mia mastro, kiu klarigos al ŝi ĉion, kaj tiel longe ankaŭ ŝi devis atendi. Mi manĝis, kion mi povis kaj tuj poste rapidis supren.

Mi renkontis Adèle, kiu venis el la lerneja ĉambro.

"Kien vi iras? La studohoro ja komenciĝis."

"Sinjoro Rochester sendis min al la infanĉambro."

"Kie li estas?"

"Tie," ŝi diris, montrante la ĉambron, kiun ŝi ĵus forlasis."

Mi eniris. Jen li staris.

"Eniru kaj diru al mi, 'bonan matenon'," li diris. Gaje mi iris al li. Ne malvarman, bonmanieran salutvorton aŭ indiferentan manpremon li donis al mi, sed koran ĉirkaŭbrakon kaj koran kison. Tio ŝajnis al mi tre natura; estis sankta konscio esti de li amata, esti tiel kore de li amata.

"Jane, vi aspektas tiel floranta, tiel ridanta kaj ĉarma," li diris, "vere ĉarma hodiaŭ matene. Ĉu tio estas mia pala, eta elfino? Ĉu tio estas mia mustard-semereto? Ĉi tiu eta, suna knabino kun kavetoj en la vangoj kaj rozaj lipoj? Kun la silke mola, kaŝtankoloraj haroj kaj brilantaj brunaj okuloj?"

Kara leganto, mi havis verdajn okulojn, sed pardonu al li la eraron; supozeble ili ŝajnis al li freŝe koloritaj.

”Tio estas Jane Eyre, sinjoro.”

”Kaj estos baldaŭ Jane Rochester,” li parolis plue, ”en kvar semajnoj, Jane; ne unu tagon pli longe. Ĉu vi aŭdas kaj komprenas min?”

Mi aŭdis lin, sed ne povis kompreni tion. Ĝi kaŭzis al mi kapturniĝon. La sento, kiun tiu sciigo naskis en mi, estis io pli forta ol ĝojo — ĝi estis io, kio doloris kaj surdigis min.

”Viaj vangoj ĵus estis ruĝetaj, Jane, nun ili iĝas morte palaj. Kial do?”

”Ĉar vi donis al mi novan nomon — Jane Rochester, kaj tio sonis tiel strange.”

”Jes, sinjorino Rochester,” li diris, ”la juna sinjorino Rochester, la knabino-fianĉino de Fairfax Rochester.”

”Ŝajnas al mi, kvazaŭ tio estas neebla, sinjoro! Ĉio tio estas tiel neverŝajna. Sur ĉi tiu tero neniu akiras plenan feliĉegon. Mi ja ne naskiĝis por pli bona sorto ol miaj proksimuloj. Estus fea rakonto nura sonĝo, se tia sorto okazus al mi.”

”Sed mi realigos tiun sonĝon. Ankoraŭ hodiaŭ mi komencos la efektivigon. Hodiaŭ matene mi skribis al mia bankiero en Londono, ke li sendu al mi certajn juvelojn, kiujn li konservas por mi — heredaĵojn de la sinjorinoj de Thornfield. Mi esperas, ke post du aŭ tri tagoj mi povu ŝuti ilin sur viajn genuojn, ĉar okazos al vi ĉiuj privilegioj kaj atentoj, kiuj iam okazos al la filino de senatano, se kun ŝi mi edziĝus.”

”Ho, sinjoro, ne parolu pri juveloj! — Mi ne amas, ke oni parolu pri ili. Juveloj por Jane Eyre! Tio estus stranga kaj nenatura! Pli volonte mi ne havos ilin.”

”Mi mem volas meti la diamantĉenon ĉirkaŭ vian kolon kaj kroni vian frunton per la diademo! Kiel rave ili vestos vin! Ĉar, Jane, la naturo stampis sur via frunto la markon de

nobeleco! Kaj mi volas ornami ĉi tiujn delikatajn brakojn per braceletoj, kaj plenŝarĝi ĉi tiujn etajn feo-fingrojn per multekostaj ringoj.”

”Ne, ne, sinjoro! Pensu pri aliaj aferoj, parolu pri io alia kaj alimaniere! Ne parolu al mi kiel al belaĵo; mi estas nenio krom via simpla, kvakersimila guvernistino.”

”En miaj akuloj vi estas belaĵo kaj eĉ belaĵo laŭ mia koro; delikata kaj elfsimila.”

”Malgranda kaj sensignita, vi volas diri. Ho, sinjoro, vi sonĝas, aŭ vi volas moki min. Pro la boneco de Dio, ne estu ironia!”

”Mi ankoraŭ sukcesos en tio, ke la mondo akceptos vin kiel belaĵon,” parolis li plue, kaj pro la maniero de lia parolo mi fariĝis malkvieta, ĉar mi sentis, ke li al si kredigas ĉion tion aŭ ke li provas kredigi tion al mi.

”Mi volas vesti mian Jane per silko kaj puntaĵo kaj rozojn ŝi devos porti sur la haroj; kaj la kapon, kiu super ĉio estas al mi kara, mi volas kovri per multekosta netaksebla vualo.”

”Sed tiam vi ne rekonos min plu, sinjoro; kaj mi ne estos plu via iama Jane Eyre, sed simio en arlekona vestaĵo — pigo en pruntitaj plumoj. Vere, sinjoro Rochester, pli mi amus vidi vin en teatra kostumo, ol min mem en la robo de korteganiĉo. Kaj mi ne diras, ke vi estas bela, sinjoro, kvankam mi senlime vin amas: multe tro kore kaj vere por flati vin. Tial ankaŭ vi ne flatu min.”

Tamen li daŭrigis pri sia temo, ne rimarkante miajn malkonsentajn malaprobojn.

”Ankoraŭ hodiaŭ mi veturos kun vi al Millcote, por ke vi elektu kelkajn vestaĵojn por vi. Mi ja diris, ke ni en kvar semajnoj estos geedziĝintaj. La edziĝo okazos tute senbrue en

tiu preĝejo kaj tuj poste mi kondukos vin al la ĉefurbo. Post kelka restado en Londono, mi kondukos mian trezoron al regionoj pli proksimaj al la suno, al francaj vinberĝardenoj kaj italaj ebenaĵoj; kaj ĉion vi vidis, kio estis fame konata en la antikva historio kaj multekosta en la nuna epoko. Vi vidis ankaŭ la vivon en la grandaj urboj, kaj vi lernos alte ŝati vin, komparante vin kun aliuloj.”

”Ĉu mi vojaĝos? — Kaj kun vi sinjoro?”

”Vi vizitos kun mi Parizon, Romon kaj Napolon, ni iros al Florenco, Venecio kaj Vieno; viaj piedoj tuŝos la lokojn, kie iam mi promenis; ili ŝvebos trans la ombrojn, kiujn mi transiris. Antaŭ dek jaroj mi senripoze vagadis kiel frenezulo tra la tuta Eŭropo; naŭzo, malamo kaj kolero estis miaj akompanantoj; nun mi resaniĝinte laŭiros la saman vojon, sed ĉaste kaj ĉe la flanko de anĝelo, kiu konsolos min.”

Mi ridis pro tiuj liaj paroloj.

”Mi ne estas anĝelo,” certigis mi, ”kaj mi ne fariĝos anĝelo, antaŭ ol mi estos mortinta kaj en la paradizo. Mi estos nur mi mem. Sinjoro Rochester, vi atendu de mi nek ion ĉielan, nek vi postulu tion — ĉar tian postulon mi ne povus plenumi, mi ja ankaŭ ne povus postuli ion tian de vi.”

”Kion do, mia etulino, vi atendas de mi?”

”Dum mallonga tempo vi eble restos, kiel vi estas nun, — sed nur mallongan tempon. Kaj poste vi estiĝos malvarma kaj kaprica, eble fine vi estiĝos severa kaj rigora, kaj mi havos multan penon kontentigi vin; sed kiam vi plene alkitimiĝos al mi, vi eble denove min ametos — mi diras: vi ametos, sed ne amos min. Mi supozas, ke via amo estos bolanta dum ses monatoj aŭ pli mallonge. En libroj, verkitaj de viroj mi vidis, ke tiu periodo estas la plej longa, ĝis kiu povas atingi la amo

de viro. Malgraŭ tio mi esperas, ke nenian mi, kiel amikino kaj akompanantino, estos tute indiferenta al mia kara sinjoro.”

”Ne estos tute indiferenta! Kaj denove ameti vin! Mi kredas, ke ĉiam denove mi ametos vin, kaj unu tagon vi konfesos al mi, ke mi ne nur ametas, sed vere kaj daŭre amas vin.”

”Ĉu vi ne estas kaprica, sinjoro?”

”Al virinoj, kiuj neniel plaĉas al mi krom ilia vizaĝo, mi estas vera diablo, kiam mi ekscias, ke ili havas nek koron nek animon, se ili montras al mi nur perspektivon de sensignifeco, malsaĝeco, krudeco kaj maliceco; — sed al klara okulo kaj elokventa lango, al arda animo kaj karaktero, kiu sin kurbas sed ne rompiĝas kiu samtempe estas fleksebla kaj forta, konstanta kaj tamen facile traktebla — al tiuj mi ĉiam estas fidela kaj vera.”

”Ĉu vi konatiĝis kun tia karaktero, sinjoro? Ĉu vi amis tian?”

”Mi ĝin amas nun.”

”Sed antaŭ ol vi konis min, se vere mi povas plenumi tiajn malfacilajn ecojn?”

”Neniam mi trovis vian egalulinon. Jane, vi plaĉas al mi kaj vi regas min — ŝajne vi submetiĝas, kaj mi admiras la flekseblecon, kiun vi montras; kaj dum mi volvas la malmolan silkon ĉirkaŭ mia fingro, ĝi tremetigas mian koron. Vi influis je mi, venkis min, kaj tiu influo estas pli dolĉa, ol mi povas diri; kaj la venko, al kiu mi devas submetiĝi, estas pli ĉarma ol iu ajn triumfo, kiun mi povus venki. Kial vi ridetas, Jane? Kion do signifas tiu neklarigebla, nebela ŝangiĝo de via vizaĝesprimo?”

”Mi pensis, sinjoro (pardonu al mi tiun ideon, kiu estis sen-

vola) mi pensis pri Herkuleso kaj Samson kaj al iliaj ĉarmulinoj —”

”Vere, mia eta elfo —”

”Eksilentu, sinjoro! Vi ne parolas tre saĝe en ĉi tiu momento; ne multe pli saĝe ol agis tiuj du viroj. Sed, se ili estus edziĝintaj, ili sendube per sia severeco kiel edzoj, estus kompensintaj sian malsaĝecon kiel svatiĝantoj, — kaj mi timas, ke vi agus tutsame. Mi dezirus jam nun scii, kion vi respondos al mi post paso de unu jaro, kiam mi petos de vi komplezon, kies plenumo ne estos al vi agrabla.”

”Petu al mi nun ion, Jane — nur bagatelon, mi dezirus, ke vi petus ion al mi —”

”Certe, sinjoro, mi petos ion, mi havas peton farotan.”

”Parolu! Sed se vi rigardos supren kaj ridas al mi per tia esprimo, tiam mi ĵuras plenumi vian peton antaŭ ol mi ĝin konos, kaj tio faros el mi malsaĝulon.”

”Tute ne, sinjoro. Mi petas nur la jenon: ne venigu la juvelojn, kaj ne kronu min per rozoj; vi ja povus same bone borderi per veraj oraj strioj tiun simplan poŝtukon, kiun vi tenas en la mano.”

”Same bone mi povus orumi veran oron. Tion mi scias. Via peto tamen estas konsentita — almenaŭ por ĉi tiu momento. Mi nuligos la ordonon faritan al mia bankiero. Sed vi petis ankoraŭ nenion, vi nur petis, ke mi retenu donacon: petu de nove.”

”Nu, sinjoro, bonvolu do kontentigi mian scivolemon, kiu rilate al unu punkto fariĝis tre granda.”

Li rigardis min konfuzita. ”Kio ĝi estas? Kio ĝi povas esti?” li demandis rapide. ”La scivolemo estas danĝera petantino. Estas feliĉe, ke mi ne ĵuris plenumi ĉiun peton —”

”Tamen ne povas esti danĝere plenumi la celitan, sinjoro.”

”Eldiru ĝin, Jane. Sed mi pli amus, se vi petus al mi la duono de mia posedaĵo, ol ke vi povus eldemandi misteron.”

”Sed, ho reĝo Ahaŝveros! Al kio povus utili al mi la duono de via posedaĵo!! Ĉu vi kredas, ke mi estas procentegisto, kiu dezirus rentometi sian arĝenton per landpropraĵoj? Multe pli volonte mi posedus vian tutan konfidon. Vi do ne rifuzos al mi tiun fidon dum vi donas al mi lokon en via koro?”

”Prenu mian tutan fidon, se tio estas penvalora, Jane. Sed pro la amo de Dio, ne metu sur vin neporteblan ŝarĝon! Ne aspiru venenon — ne fariĝu vera Evo en miaj manoj!”

”Kial ne, sinjoro? Vi ja ĵus diris al mi, ke vi amas esti venkata kaj kiel volonte vi lasas vin konvinki. Ĉu vi ankaŭ ne opinias, ke mi devas uzi tiun konfesion kaj ke mi devas komenci per flatado kaj petado —, eĉ se necese per plorado — nur por vidi, kiel granda estas mia potenco?”

”Mi provokas vin riski tian provon; se vi komencas arogi tro multe aŭ se vi estiĝos tro postulema, la ludo finiĝis.”

”Vere, sinjoro? Tiam vi estas cedema. Kiel grave vi nun aspektas! Viaj brovoj fariĝis tiel dikaj, kiel miaj fingroj kaj via frunto estas simila al tio, kion mi iam aŭdis nomi ’tondronubo’ en stranga poemo. Supozeble, sinjoro, vi konstante montros tiun vizaĝon post kiam vi estos edziĝinta?”

”Se vi, post kiam vi estos edziniĝinta, aspektos kiel nun, tiam mi kiel deca kaj bonmaniera kristano tre baldaŭ forigos de mi la penson kuniĝi kun koboldeto aŭ salamandro, Sed, kara etulino, kion do vi volus peti? — Rapide diru!”

”Jen, nun vi estas vere malpli ol ĝentila. Sed tiu malĝentileco estas al mi pli agrabla ol flataĵo. Pli volonte mi estas etu-

lino ol anĝelo. Jen kion mi volus demandi: Kial do vi tiel penis kredigi al mi, ke vi intencis edziĝi kun fraŭlino Ingram?"

"Ĉu vi tion celis? Dank'al Dio, ke ne estis pli grave!"

Lia frunto sereniĝis; li malsupren rigardis al mi, ridetis, karesis miajn harojn, kvazaŭ li kore ĝojis, ke granda danĝero estis fordeturnita.

"Mi kredas, ke mi povas konfesi tion al vi," li parolis plue, "eĉ kaŭzante per tio vian kolereton. Jane, mi ja vidis kia fajra spirito vi povas esti, kiam vi estas ekscitita. Eĉ hieraŭ en la malvarma lunlumo mi vidis vin ardi, kiam vi ribelis kontraŭ la sorto kaj pretendis, ke vi postulis esti konsiderata de mi kiel mia egalulo. Jane, flanken dirite, vi mem kaŭzis, ke mi tiel agis."

"Kompreneble, mi estis kulpa. Sed ni revenu al la afero, mi petas, sinjoro — — fraŭlino Ingram?"

"Nu, do; aŭskultu; laŭŝajne mi amindumis fraŭlinon Ingram, dezirante, ke vi enamiĝu same freneze je mi, kiel mi enamiĝis je vi; kaj mi sciis, ke ĵaluzo estos mia plej forta samligano, kiun mi povus alvoki por helpi min!"

"Bonege! — Nun vi estas malgranda — ne multe pli granda ol la supro de mia malgranda fingro. Estas hontinda maljustaĵo tiel agi. Ĉu vi tiam tute ne pensis pri la sentoj de fraŭlino Ingram, sinjoro?"

"Ŝiaj sentoj koncentriĝas nur en unu punkto, nome en ŝia senlima fiereco; kaj ĝi devis esti humiligata. Ĉu vere vi estis ĵaluza, Jane?"

"Estas indiferece, sinjoro Rochester. Neeble povas interesi vin tion scii. Respondu al mi ankoraŭ unu fojon sincere. Ĉu vi ne kredas, ke fraŭlino Ingram suferos pro via malhonesta koketaĵo? Ĉu ŝi ne konsideros sin forlasitino.

”Neeble! — Mi ja rakontis al vi, kiel kontraŭe ŝi forlasis min. La flamo de ŝia amo en unu momento malpligrandiĝis, aŭ pli bone dirite, estingiĝis pro la famo de mia nesolvente-co.”

”Vi havas strangan, intrigan karakteron, sinjoro Rochester. Mi timas, ke rilate al multaj aferoj vi havas ekscentrajn principojn.”

”Miaj principoj neniam estis trejnataj; eble ili malrektiĝis pro manko de disciplino?”

”Ankoraŭ unu fojon plensincere: ĉu mi povos ĝui la grandan akiritan feliĉon sen timo, ke neniu alia sentos la amaran doloron, kiun mi mem sentis antaŭ nelonge?”

”Tion vi povos, mia malgranda knabineto. Sur la tuta tero troviĝas neniu alia, krom vi, kiu sentas por mi la saman puran amon, ĉar la kredo al via amo, Jane, estas la saniga, bonfaranta balzamo, kiun mi bezonas por mia animo.”

Mi premis miajn lipojn sur lian manon, kiu ripozis sur mia ŝultro. Mi tre amis lin, multe pli ol mi kuraĝis konfesi al li — pli ol povis esprimi vortoj.

”Petu ankoraŭ ion alian de mi,” li diris post kelkaj sekundoj, ”mia plej granda ĝojo estas, ke vi faras al mi peton kaj ke mi povas cedi.”

Mi ree havis peton.

”Sciigu al sinjorino Fairfax viajn intencojn, Sinjoro, hieraŭ vespere ŝi vidis nin en la halo kaj estis skandaliĝinta. Klarigu al ŝi la situacion antaŭ ol mi estos devigata renkonti ŝin denove. Mi ofendiĝas, ke tiel bona virino havu malfavoran juĝon pri mi.”

”Iru al via ĉambro kaj surmetu vian ĉapelon,” li respondis. ”Mi deziras, ke vi akompanu min hodiaŭ matene al Millcote,

kaj dum vi aranĝas la preparojn por la vojaĝo, mi volas lumigi la cerbon de la maljuna virino.”

”Mi kredas, ke ŝi opinias, ke mi forgesis pri via situacio, same kiel pri mia, sinjoro.”

”Situacio! — situacio! — Via situacio estas en mia koro kaj sur la nuko de tiuj, kiuj povus ofendi vin nun aŭ estonte. — Nun iru.”

Baldaŭ mi estis vestita kaj aŭdante, ke sinjoro Rochester forlasis la ĉambron de sinjorino Fairfax, mi rapidis al ŝi. La aĝa sinjorino ĵus legis ĉapitron el sia biblio — la epistolon por la tago. La biblio kuŝis malfermita antaŭ ŝi kaj la okulvitroj kuŝis sur ĝi. Ŝi ŝajnis ne pensi pri sia legado, kiun estis interrompinta sinjoro Rochester.

Ŝiaj okuloj, fiksitaj sur la kontraŭa vando, esprimis la mi-regon de kvieta karaktero, kiu estis ekscitita pro neordinara novaĵo. Vidante min, ŝi regis sin; ŝi klopodis rideti kaj diris kelkajn gratulvortojn. Sed la rideto foriĝis kaj ne finiĝis la gratuloj. Ŝi denove surmetis la okulvitrojn, fermis la biblion kaj ŝovis malantaŭen sian seĝon.

”Mi estas tiel mirigita,” ŝi komencis, ”ke apenaŭ mi scias, kion diri al vi, fraŭlino Eyre. Estas al mi, kvazaŭ mi songis, sed mi ja ne songis, ĉu ne vere? Sed kiam mi sidas tiel tute sola, mi ofte dronas en duondormo kaj tiam mi vidas kaj aŭdas ĉiajn aferojn, kiuj tute ne ekzistas. Pli ol unu fojon mi vidis en mia dormeto mian karan edzon, kiel li eniris kaj sidiĝis ĉe mia flanko; li mortis antaŭ pli ol dek kvin jaroj, sed malgraŭ tio mi ofte aŭdis lin voki mian nomon, Alico!! Alico!! kiel mi antaŭe estis nomata. Ĉu vi nun povas diri al mi, ĉu estas vere kaj certe, ke li petis vin edziĝi kun li? Ne ridu je mi! Sed estas al

mi kvazaŭ li estis ĉi tie en la ĉambro, dirante, ke vi estiĝos lia edzino en unu monato.”

”Tion saman li diris al mi,” mi respondis.

”Ĉu vere li diris tion? Ĉu vi kredas al li? Ĉu vere vi akceptis lin?”

”Jes.

Ŝi rigardis min konsternite.

”Tion mi neniam povus pensi. Li estas fiera viro. Ĉiuj Rochesteroj estis fieraj. Kaj krome lia patro tre amis la monon. Ankaŭ pri li oni ĉiam diras, ke li estas tre singarda kaj ŝparema. Ĉu vere li intencas edziĝi kun vi?”

”Almenaŭ tion li diris al mi.”

Ŝi explore rigardis min de la kapo al la piedoj. Mi vidis en ŝiaj okuloj, ke ŝi trovas je mi neniun ĉarmon, kiu estas sufiĉe forta por solvi la enigmon.

”Ne,” parolis ŝi plue, ”tio estas al mi nekomprenebla, sed nepre ĝi estas vera, ĉar vi mem tion diras. Kiel tio finiĝos — Dio scias: mi vere ne scias tion. En tiuj okazoj egaleco pri rango kaj posedaĵo estas tre konsilinda, kaj la diferenco je aĝo inter vi estas pli ol dudek jaroj. Li povus esti via patro.”

”Ho ne, sinjorino Fairfax!” kolerete mi kriis. ”Li tute ne similas mian patron. Neniu, vidante nin kune, supozus ion tian. Sinjoro Rochester aspektas tiel juna kaj li estas tiel juna kiel plej multaj viroj dudekkvin-jaraj.”

”Kaj ĉu vere li edziĝos kun vi pro amo?” ŝi demandis plue. Ŝiaj duboj kaj skeptikoj kaj ŝia malvarmeteco tiel ofendis min, ke miaj okuloj pleniĝis per larmoj.

”Mi bedaŭras, ke tio doloras vin,” parolis plue la bonkora, maljuna vidvino, ”sed vi estas tiel juna, vi konas tiel malmulte la homojn, mi volonte farus vin iom singarda. La malnova

proverbo diras: 'Ne ĉio brilanta estas diamanto', kaj mi timas, ke ni trovos en ĉi tiu afero multon, kio estas tre diversa de tio, kion vi kaj mi atendas."

"Kial? — ĉu do mi estas monstro?" mi demandis. "Ĉu estus neeble, ke sinjoro Rochester sentus por mi sinceran inklinon?"

"Ne, vi estas ja sufiĉe beleta kaj en la lasta tempo vi eĉ multe plibeliĝis. Estas do eble, ke sinjoro Rochester tre vin amas. Mi ĉiam rimarkis, ke li por vi sentas certan preferon. Estis momentoj, kiam mi pro vi malkvietiĝis kaŭze de la tiel klare montriĝanta prefero kaj ofte mi deziris fari vin iom singarda. Sed ŝokis min tuŝi nur la eblecon de maljustaĵo. Mi sciis, ke tia ideo ofendus, eble kolerigus vin, kaj vi mem estis tiel diskreta, kaj tiel saĝa kaj modesta, ke mi esperis, ke oni povus lasi, ke vi mem protektu vin. Mi ne povas priskribi al vi, kion mi suferis, kiam hieraŭ vespere mi serĉis vin tra la tuta domo kaj ne povis trovi vin nek nian sinjoron. Kaj kiam mi vidis vin rehejmiĝi kun li je noktomezo!"

"Nun, jam ne maltrankviliĝu kaj ne pensu plu pri tio," mi malpacience ŝin interrompis, "kontentigu vin la penso, ke ĉio tute estis en ordo.

"Mi volas nur esperi, ke fine ĉio estos en ordo," ŝi diris, "sed kredu al mi, ke vi ne povas esti tro singarda. Faru vian eblon por teni sinjoron Rochester je certa distanco. Fidu lin tamen tiom malmulte, kiom vin mem. Sinjoroj de lia rango ordinare ne edziĝas kun siaj guvernistinoj."

Mi vere sentis min ofendita; feliĉe Adèle enkuris en la ĉambron.

"Kunveturigu min, — kunprenu min ankaŭ al Millcote!" kriis ŝi. "Sinjoro Rochester ne volas kunpreni min, kvankam

tiom da loko estas en la nova veturilo. Ho, mademoiselle, petu lin por mi, ke li min kunprenu.”

”Tion mi petos, Adèle,” kaj ĝoja, ĉar mi povis foriri de mia malgaja admonistino, mi kun la knabino foriris de ŝi. La veturilo staris preta, la veturigisto ĵus haltis antaŭ la ĉefa portalo; mia sinjoro kaj ordonanto iris tien kaj reen antaŭ la domo, Piloto malpacience sekvis lin de proksime.

”Ĉu ne vere, sinjoro, Adèle povas akompani nin.”

”Mi tion rifuzis al ŝi. Mi iros sen infanaĉo — nur kun vi.”

”Kunirigu ŝin, sinjoro Rochester, mi vin petas. Estas vere pli bone.”

”Ne, ŝi ĝenus nin.”

Li parolis en tre ordona tono; liaj rigardoj mirigis min. Mi estis ankoraŭ sub la malvarma influo de la avertoj de sinjorino Fairfax; pensante pri la dubo, kiun ŝi eldiris, min ree atakis kvazaŭ tremfrosto. Miaj espero estis premitaj pro sento de necerteco kaj senbazeco. La konscio de mia povo super li subite foriĝis. Mi estis obeanta lin sen plua kontraŭstaro. Helpante min eniri en la veturilon, li rigardis min en la vizaĝon.

”Kio estas?” li demandis. ”Ĉiu sunbrilo malaperis — ĉu vi do vere deziras, ke la infano akompanu nin? Ĉu vere vi ĉagrenigis, ĉar la etulino restos hejme?”

”Mi tre ŝatus, se ŝi kunirus, sinjoro.”

”Nu, rapidu kaj surmetu vian ĉapelon, sed rapidu kiel la fulmo,” li kriis al Adèle.

Ŝi obeis lin kiel eble plej rapide.

”Reale la ĝeno dum unu sola mateno ne estas tiel grava,” li diris, ”ĉar baldaŭ vi, viaj pensoj, paroloj kaj societo plene okupos min — por la tuta vivo.”

Kiam Adèle estis metita en la veturilon, ŝi kisis min, por

montri al mi sian dankon pro mia perado. Tuj li ŝovis ŝin en angulon sur la alia flanko. Tiam ŝi kliniĝis al mi preter lin. Ŝia gravmiena najbaro inspiris al ŝi multan devigon. Ŝi ne kuraĝis fari rimarkon pro lia nuna neafabla humoro, nek kuraĝis peti al li ian klarigon aŭ informon.

”Lasu ŝin veni al mi,” mi petis, ”eble ŝi ĝenos vin, sinjoro; sur ĉi tiu loko estas ankoraŭ sufiĉa loko.”

Li metis ŝin kiel hundeton al mia flanko. ”Mi tamen sendos ŝin al instituto,” li diris, sed nun li ridetis.

Adèle aŭdis lian diraĵon kaj demandis, ĉu ŝi ”*sans mademoiselle*” estos sendata al instituto.

”Jes,” li diris, ”tre decidite, *sans mademoiselle*; ĉar mi vojaĝos kun mademoiselle al la luno kaj tie mi serĉos kavernon en unu el la blankaj valoj inter la fajrokraĉantaj montoj, kaj tie supre mademoiselle vivos kun mi, tute sola kun mi.”

”Sed tie vi havos nenion por manĝi; tie vi mortos pro malsato,” rimarkis Adèle.

”Tage kaj nokte mi kolektos por ŝi manaon: la ebenaĵoj kaj la montodorsoj estas blankaj per la manao tie supre en la luno, Adèle.”

”Sed kiam ŝi suferos pro malvarmo kaj bezonos varmon, kiel ŝi tiam ricevos fajron?”

”La fajro suprenŝprucas el ĉiuj lunmontoj; kiam frostos, mi portos ŝin ien sur montsupron kaj kuŝigos ŝin sur la randon de la kratero.”

”*Oh, qu'elle y sera mal — peu confortable!*<sup>1</sup> Kaj ŝi eluzos siajn vestojn — kiel do ŝi ricevos novajn?”

Sinjoro Rochester kvazaŭ ne povante doni respondon al tiu demando,” diris:

1 Ho, kiel malbone ŝi estos tie — tute ne komforte!

”Hm — — Kion vi farus, Adèle? Rompu al vi la kapon por trovi taŭgan rimedon.

Kiel laŭ via opinio aspektus blanka aŭ roza nuboj kiel vesto? Kaj el ĉielarko oni eble povus fari belan skarpon.”

Post kiam Adèle estis pripensinta nomenton, ŝi diris: ”Ne, ĉi tie ŝi estos multe pli bone; krome ŝi ja terure enuus loĝante nur kun vi sur la luno. Se mi estus mademoiselle, mi neniam konsentus iri kun vi.”

”Ŝi jam konsentis: ŝi promesis kuniri.”

”Sed vi ja tute ne povos konduki ŝin supren; ne estas vojo al la luno; ĉar estas nur aero; kaj vi ne povas flugi, nek mademoiselle.”

”Adèle, rigardu tiun kamparon.”

Ni estis nun ekster la pordego de Thornfield kaj la veturilo senskue laŭiris la ebenan landvojon al Millcote. Pro la uragano ne estis polvo sur la vojo; la malaltaj kreskaĵ-bariloj ambaŭflanke de la vojo brilis verde pro la freŝa pluvego.

”Adèle, sur tiu kamparo mi iris antaŭ ĉirkaŭ dek kvar tagoj, tio okazis vespere en tiu tago, kiam ni kune kolektis fojnon sur la granda herbejo en la fruktoĝardeno. Ĉar mi estis laca de la laboro, mi sidiĝis sur barilo. Mi elpoŝigis libreton kun krajono kaj skribis pri malfeliĉo, kiu trafis min antaŭ nelonge; kaj mi skribis la fajran deziron, ke iam venu por mi feliĉaj tagoj. Mi skribis tre rapide, kvankam la taglumo jam estis foriĝonta, kiam sur la piedvojeteto io alproksimiĝis, kio haltis je kelkaj paŝoj antaŭ mi. Mi rigardis ĝin. Tio estis eta, tre eta objekto, kiu portis vualon el araneaĵoj sur la kapo. Mi geste vokis ĝin al mi; baldaŭ ĝi sidis sur miaj genuoj. Mi ne parolis al ĝi — ĝi ne parolis al mi — per vorto; sed mi legis en ĝiaj

okuloj kaj ĝi legis en miaj; nia senparola interparolado estis proksimume jene:

”Ĝi diris, ke ĝi estas elfo venanta el la feujo; ĝi venis por fari min feliĉa, sed mi devus iri kun ĝi el la ordinara mondo al izolita loko — ekzemple al la luno — kaj ĝi fingre montris tien, kie la luno nun ruĝe brilas trans la altaĵo — kaj rakontis al mi pri la alabastraj kavernoj kaj arĝentaj valoj, kie ni povus vivi. Mi diris, ke volonte mi irus kun ĝi, sed mi memorigis la etan estaĵon, kiel ĵus vi faris, ke mi ne posedas flugilojn por flugi.”

’Ho,’ respondis la elfo, ’tio ne malhelpas! Jen vi havas talismanon, kiu forigos ĉiujn barilojn,’ kaj ĝi levis antaŭ miaj okuloj helan, oran ringon.

’Ŝovu ĝin ĉirkaŭ la kvaran fingron de mia maldekstra mano kaj mi apartenos al vi, kaj vi apartenos al mi; kaj ni forlasos ĉi tiun teron kaj serĉos tie supre nian ĉielon.’ Tiam la estaĵeto klinsalutis al la luno.

”La ringon, Adèle, mi portas en mia brustopoŝo, mi ŝanĝis ĝin en libron, sed baldaŭ mi ekzorcis ĝin kaj faros el ĝi ringon.”

”Sed kion do ĉio tio tuŝas mademoiselle? La elfo estas al mi tute indiferenta; vi ja diris, ke vi portos mademoiselle al la luno —?”

”Mademoiselle estas ja elfo,” li diris misterplene flustrante. Tiam mi diris al ŝi, ke ĉio tio estas nur babilaĵo, kiun ŝi ne atentu; kaj ŝi siaflanke montris riĉan kvanton da veraj francaj skeptikaĵoj, dum ŝi nomis sinjoron Rochester vera mensogulo *”un vrai menteur”* dirante al li, ke ŝi ne atentos liajn feorakontojn, kaj ke *”du reste il n’y avait pas de fees, et quand*

*meme il yen avait*<sup>1</sup> ŝi estis konvinkita, ke neniŭ aperos antaŭ li, ke neniŭ oferos al li ringon aŭ vojaĝos kun li al la luno.”

La horo, kiun ni pasigis en Millcote, estis al mi turmentiga. Sinjoro Rochester devigis min iri al certa silkokomercejo, kaj tie li ordonis al mi elekti seson da silkaj vestoj. Mi malamis tion kaj petis, ke li prokrastu, sed vane — tiu afero devis esti aranĝita. Per miaj fortaj petegoj, kiujn mi time flustris al li, li reduktis la seson je du; sed li ĵuris, ke li mem elektos ilin. Kun vera angoro mi vidis, kiel liaj rigardoj ŝvebis trans la multkoloran varprovizon. Ili fiksiĝis sur riĉa ametist-kolora silkaĵo kaj belega roza atlaso. Ree mi flustris al li, ke li same bone povus aĉeti por mi oran veston kaj arĝentan ĉapelon, ĉar neniam mi havus la kuraĝon porti la vestojn, kiujn li elektis. Li estis obstina kiel ŝtono kaj post senfina peno mi sukcesis decidigi lin, ke li ŝanĝis ilin kontraŭ hele perlogriza robo el silko.

”Post tiu momento, mia volo venku,” li diris, ”sed iam li tamen volus vidi min vestita belkolora kiel florbedo.”

Mi ĝojis kiam fine mi eliris la silkvaran komercejon kaj poste el la butikoj de juvelisto; ĉar ju pli li aĉetis por mi, des pli mi sentis supreniri en miajn vangojn la ruĝo pro ĉagreneto kaj humiligo. Kiam ni ree sidis en la veturilo kaj mi apogis min malantaŭen en la kusenoj, min trafis la penso, kiel mi dum la malĝojaj kaj feliĉaj okazintaĵoj tute forgesis pri la letero de mia onklo, John Eyre al sinjorino Reed: nome pri lia intenco adopti min kaj igi min lia heredantino.

Mi pensis: ”Estus al mi vera senŝarĝiĝo, se mi havus nur la plej malgrandan sendependecon en monaj rilatoj; neniam mi povus suferi esti kiel ornamita pupo de sinjoro Rochester, aŭ

1 Krome feoj tute ne ekzistas kaj se ili ekzistus

sidi kiel dua Danae vidante malsuprenfali sur min la oran pluvon. Reveninte hejmen mi tuj skribos al Madejro por sciigi mian onklon, ke mi estas edziniĝonta kaj kun kiu; pli facile mi suferos esti subtenata de sinjoro Rochester, se mi nur havus la perspektivon, ke li pere de mi iun tagon ricevus grandan riĉaĵon.”

Post tiu penso, laŭ kiu mi agis ankoraŭ la saman tagon, mi denove ricevis kuraĝon rigardi mian ordonanton kaj amanton en la okulojn, kiuj daŭre serĉis miajn, kvankam mi fortunis miajn vizaĝon kaj okulojn. Li ridetis, kaj al mi lia rideto estis simila al tiu, per kiu sultano kutimas feliĉigi la sklavinon, kiun li ornamis per siaj oro kaj juveloj. Mi kore premis lian manon, kiu daŭre estis serĉinta mian, kaj tiam ĝin forpuŝis de mi; ĝi estis ankoraŭ ruĝa pro mia pasia premo.

Mi diris: ”Vi ne bezonas tiom min rigardi; se vi ankoraŭ foje faras tion, mi ĝis la fino portos nenion krom miaj malnovaj vestoj de Lowood. Mi edzinigos min en ĉi tiu siringkolora vesteto el katuno kaj el la perlogrizaj silkaĵoj vi povos farigi por vi noktoveston, kaj el la nigra atlaso senfinan aron da vestoj.”

Li subridetis, frotis al si la manojn. ”Ho, estas granda ĝuo aŭdi kaj vidi ŝin tiel!” li kriis. ”Ĉu ŝi ne estas originala? Ĉu ŝi ne estas pikanta? Mi ne volus ŝanĝi ĉi tiun etan anglan knabinon kontraŭ la tuta haremo de la grandturko, kun ĉiuj ĝiaj huri-okuloj kaj gazelo-formoj!”

Tiu orienta aludo refoje koleretigis min. ”Mi neniel volus plenumi ĉe vi la rolon de harema sinjorino,” mi diris, ”tial mi petas vin ne konsideru min tia. Se vi intencas ion tian, tiam senprokraste foriru al la bazaro de Stambulo, kaj uzu vian

restantan monon, kiun ŝajne vi ne povas elspezi laŭ via plaĉo, por starigi sklavo-komercadon.”

”Kaj kion vi tiam farus, Jane, se mi komencus per tiom da bareloj da karno kaj provizo da nigraj okuloj?”

”Mi pretigus min eliri kiel misiistino al ĉiuj landoj por prediki liberecon al ĉiuj vivantaj en sklaveco — inter aliaj ankaŭ al la loĝantinoj de haremoj. Oni akceptus min tie kaj mi instigus al ribelado. Kaj vi, trivosta paŝao, baldaŭ starus antaŭ ni kiel katenita malliberulo; kaj mi ne konsentus al senkatenigo antaŭ ol vi estus subskribinta liberalan leĝon, kian despoto ankoraŭ neniam donis.”

”Mi submetus min al vi senkondiĉe, mia eta Jane.”

”Mi ne indulgus, sinjoro Rochester, eĉ se vi petegus min per tiaj okuloj. Se vi tiel aspektus, mi estas certa, ke vi, ree liberiĝinte, tuj malobeus ĉiun leĝon, kiun vi sub devigo subskribis.”

”Nu, Jane, kion do fakte vi volas de mi? Mi timas, ke vi devigos min okazigi ankoraŭ duan edziĝoceremonion, krom tiu antaŭ la altaro. Vi postulos ankoraŭ tute specialajn kondiĉojn; tion mi jam vidas — kiuj ili estos?”

”Mi dezirus nur malpezan animon, sinjoro, sur kiu ne premas devoj. Ĉu vi memoras ankoraŭ, kion iam vi diris pri Céline Varens? pri la diamantoj kaj la kaŝmiraj ŝaloj, kiujn vi donacis al ŝi. Mi ne volas esti via angla Céline Varens. Mi daŭrigos esti la guvernistino de Adèle, per tio mi perlaboras enloĝadon kaj salajron, kaj krom tio ankoraŭ tridek sterlingajn funtojn. Per tiu mono mi aĉetos miajn vestojn, kaj vi donos al mi nenion krom —”

”Nu, krom?”

”Krom via estimo; kaj se mi interŝanĝe donos al vi mian, tiam ni kvitiĝis unu kun alia.”

”Vere, rilate al malvarma, natura malrespekto, kaj pura refleksebla fiereco, vi ne havas vian egalulinon,” li diris. Ni nun atingis Thornfield.

”Ĉu plaĉus al vi tagmanĝi kun mi hodiaŭ?” li demandis, kiam ni veturis tra la parkopordon.

”Ne, mi dankas vin, sinjoro.”

”Kaj kial, 'ne, mi dankas vin, sinjoro', se mi rajtas demandi?”

”Mi neniam manĝis kun vi, sinjoro, kaj mi ne vidas, kial mi nun faru tion, antaŭ ol —”

”Nu, antaŭ ol? Tiuj duonfrazoj ŝajnas ĉarmi vin.”

”Antaŭ ol mi devos tion.”

”Ĉu vi eble kredas, ke mi manĝas kiel kanibalo aŭ kiel gulo, ĉar vi ne volas esti mia kunmanĝantino?”

”Mi tute ne formis al mi ideon pri tiu afero, sinjoro; sed mi dezirus vivi ankoraŭ unu monaton kiel ĝis nun mi faris.”

”Ne, vi tuj metos flanken vian guvernistinan sklavecon.”

”Vere! Mi petas pardonon, sinjoro, sed tion mi ne faros. Mi vivos plue kiel antaŭe. La tutan tagon mi estos for de vi, kiel mi kutimis; se vi deziras vidi min, vi povos vokigi min en la vespero; tiam mi venos; sed ne en alia tempo.”

”Mi dezirus fumi cigaron, Jane, aŭ pipon da tabako, por konsoli min pro ĉio tio '*pour me donner une contenance*' kiel Adèle dirus; kaj malfeliĉe mi forgesis mian cigarujon kaj mian tabakujon. Sed aŭdu, nun vi povas disponi pri via tempo, eta tiranino, sed post mallonge venos mia vico. Kaj post kiam mi kaptis vin por ĉiam, por teni kaj teni vin, tiam mi — figure dirite — surmetos al vi ĉi tiun katenon.” Dirante tion li tuŝis

sian horlogoĉenon. ”Jes, ho mia kara etulino, mi portos vin tuj apud mia koro, por ke mia juvelo ne perdiĝu.”

Tion li diris, dum li helpis min eliri el la veturilo; kaj dum li poste elportis Adèle, mi eniris la domon kaj feliĉe povis iri supren.

En la vespero li kiel kutime vokis min. Mi estis elpensinta okupadon por li; ĉar mi certe decidis ne pasigi kun li la vesperon tête-à-tête. Mi memorigis al mi lian belan voĉon; mi sciis, ke li amis kanti; bonaj kantistoj ordinare amas tion. Mi mem ne povis kanti kaj laŭ lia severa opinio mi eĉ ne posedis muzikan talenton. Sed estis al mi ĝojego aŭdi bonan kantadon. Apenaŭ krepuskiĝis kaj venis la horo de la romantiko kaj apenaŭ ĝi etendis sian bluan kaj orstelan standardon antaŭ nia fenestro, mi leviĝis, malfermis la pianon kaj petis lin je la nomo de la ĉielo kanti por mi. Li diris, ke mi estas kaprica sorĉistino kaj ke prefere li kantus al mi alian fojon; sed mi certigis, ke nenio egalvaloras la estantecon.

”Ĉu mia voĉo do tiel plaĉas al vi?”

”Tre multe.”

Reale mi ne intencis flati lian grandan vantecon; sed ĉi tiun fojon mi estis malfidela al mia principo pro specialaj motivoj, kaj mi instigis kaj petegis lin.

”Tiam vi lud-akompanu, Jane.”

”Bone, sinjoro, mi faros mian eblon.”

Kaj mi faris mian eblon, sed tuj li forigis min de la seĝeto kaj nomis min ”malgranda fuŝludantino”.

Post kiam li ŝovis min flanken senceremonie — kion mi antaŭe deziris — li prenis mian lokon kaj komencis akompani sin mem, ĉar same bone li ludis kiel kantis. Mi kaŝis min sur la fenestrobenco kaj dum mi sidis tie rigardante eksteren al

la mallumiĝanta ĝardeno kaj la senmovaj arbogrupoj, mi aŭskultis la dolĉan kanton, kiu estis kantata de ĉarma voĉo.

La enhavo de la kanto temis pri turmentata koro, kiu fine renkontis la aspiritan amon, kaj finiĝis per la vortoj:

*"Mia amatino ĵuris kun sigelanta kiso, ke ŝi volas  
Vivi kun mi — kaj morti ;  
Fine mi ricevis mian neelparoleblan benon:  
Mi estas amata — kiel mi amas!"*

Li ekstaris kaj iris al mi; mi vidis, ke lia vizaĝo ardas, liaj falkosimilaj okuloj brilegis kaj pasio speguliĝis en liaj trajtoj. Dum momento mi perdis la kuraĝon — sed mi regis min. Mi ne volis amoscenon, nek kuraĝan demonstracion — kaj ambaŭ minacis min en tiu momento. Armilo por defendi min estis necesa kaj mi akriĝis mian langon. Kiam li staris ĉe mia flanko, mi severe demandis: kun kiu li estis edziĝonta?

"Tio estas stranga demando el la buŝo de mia amatino, Jane!"

"Vere! Mi rigardas ĝin tre natura kaj antaŭ ĉio tre necesa. Vi parolis pri tio, ke via estonta edzino mortos kun vi? Kion vi opinias per tia idolana ideo? Mi tute ne intencas morti kun vi — atentu tion."

"Ho, ĉio, kion mi aspiris kaj petegas, estas, ke estos al ni permesite vivi kune! La morto ja ne estas io por vi."

"Vere, vi pravas. Mi same bone kiel vi havas la rajton morti, kiam venos mia tempo; sed mi volas atendi tiun tempon kaj ne lasi forbruligi min kiel hinda vidvino."

"Ĉu vi volas pardoni al mi tiun egoistan penson kaj montri vian pardonon per kiso?"

"Ne, prefere ne, se estas eble."

Mi aŭdis, ke li nomas min malmolnuka etulino, poste mi aŭdis, ke li grumblas: "Ĉiu alia virino estus tuŝita ĝis la midolo, aŭdinte tian kanton honore al sia laŭdo."

Mi certigis lin, ke laŭkaraktere mi estas malmolkora — kiel fajroŝtono — kaj ke li spertos tion tre ofte; kaj ke krom tio mi estis decidinta montri al li kelkajn krudajn ecojn de mia karaktero, antaŭ ol pasis la estontaj kvar semajnoj; ĉar li devos scii, kian agadon li estis entreprenonta, dum ne estos ankoraŭ tro malfrue eviti ĝin.

"Ĉu vi nun ne volas silenti aŭ prudente paroli kun mi?"

"Mi silentos, se vi tion deziras; sed rilate al la prudenta parolado, mi povas certigi, ke mi jam faris tion."

Li grincigis la dentojn, dirante: fi do, kaj pa!

"Bone!" mi pensis, "furiozu laŭplaĉe. Sed mi estas certa pri tio, ke ĉi tio estas la plej bona maniero trakti kaj bridigi vin. Mi amas vin pli ol paroloj povas diri, sed mi ne volas fordoni min al sentopatoso, kaj per mia akra respondmaniero mi volas ankaŭ vin reteni de tiu abismo, kaj eĉ plie, per tiu mia mordanta helpilo mi konservos tiun distancon inter ni, kiu plej multe taŭgas por konduki nin al nia reciproka feliĉo."

Pli kaj pli mi ekscitis lin; post kiam fine grumblante li retiris sin en la fundo de la ĉambro, mi leviĝis kaj diris en mia kutima, respektplena maniero: "Mi deziras al vi bonan nokton, sinjoro." Tiam mi elŝteliĝis el la ĉambro.

Kun tiu tiel komencita sistemo mi daŭrigis la tutan provotempon kaj eĉ kun la plej bona sukceso.

Ĉiuokaze en tiu maniero mi daŭre tenis lin en kolereta humoro; sed ĉion konsiderante, mi tamen rimarkis, ke li eksterordinare bone sin amuzis, kaj ke ŝafa submetiĝo kaj turto-simila sentimentaleco, kiuj nur pligrandigus lian despotis-

mon, estus malpli konvenintaj liajn prudenton, racion kaj precipe lian tutan estetikan senton.

En ĉeesto de aliuloj mi estis kiel antaŭe respekt-montra kaj kvieta, ĉar ĉiu alia konduto estus maldeca; estis nur dum niaj vesperaj interparoloj kaj tête-à-têtes, ke mi tiel turmentetis, incitetis lin kaj disput-batalis kontraŭ li. Tamen li daŭrigis ĉiufoje, precize je bato de la sepa horo, venigi min al si, kvankam li, kiam mi aperis antaŭ li, neniam plu uzis la miel dolĉajn vortojn kiel "karulino" kaj "anĝelo"; la plej bonaj, kiujn li nun elektis por mi, estis "turmentanta pupo", "malica elfo", "ŝanĝemulino" kaj tiel plu. Anstataŭ karesoj, mi ricevis grimacojn; anstataŭ premi mian manon, li pinĉis mian brakon; anstataŭ kiso sur la vangon, li tiritis mian orelon. Sed tiel estis bone. En tiu tempo mi preferis tiujn aĉajn favormontrojn ol ĉiun alian kareson. Mi vidis, ke sinjorino Fairfax aprobis mian konduton; ŝiaj timoj kaj zorgoj pro mi foriĝis; tial mi estis certa, ke mi juste agis.

Intertempe sinjoro Rochester certigis, ke per mia pritrakto mi ŝanĝas lin je skeleto, kaj li minacis min per sia venĝo, kiun li eksplodigos sur min en ne tre malproksima tempo. Tiuj minacoj igis subrideti min.

"Nur per saĝa traktado mi kapablas regi kaj bridu vin," mi pensis, "kaj mi ne dubas, ke ankaŭ estonte mi sukcesos en tio. Kiam unu rimedo perdis siajn povon kaj efikon, mi rapide pripensu alian."

Kaj tamen mia tasko ne estis tre malpeza; ofte mi pli volonte farus al li bonon aŭ gojigus lin, anstataŭ turmenteti lin. Mia estonta edzo jam estiĝis mia tuta mondo, pli ol la mondo; li estiĝis mia espero pri la ĉiama feliĉo. Li staris inter mi kaj ĉiuj

religiaj pensoj, kiel sunmallumiĝo venas inter la hela suno kaj la homoj. En tiuj tagoj mi ne povis diferencigi Dion de Lia kreitaĵo, kiun mi estis farinta mia idolo.

## Ĉapitro XXV.

**L**a monato de nia amindumado estis finiĝonta; ĝiaj lastaj horoj rapide pasis. La tago de la geedziĝo ne povis esti plu prokrastata kaj ĉiuj preparoj estis faritaj. Mi mem havis nenion plu por plenumi, antaŭ la vando de mia ĉambreto staris miaj kofroj, enpakitaj, ŝlositaj, ĉirkaŭitaj de ŝnuroj, unu flanke de alia; morgaŭ je ĉi tiu horo ili jam estos survoje al Londono, kaj same mi mem, aŭ pli bone dirite, certa Jane Rochester, persono, kiun mi ĝis nun ankoraŭ ne konis. Restis nenio por fari krom najli sur la kofroj la kartojn kun la adreso. Jen ili kuŝis, kvar etaj kvadrataĵoj, sur la komodo. Sinjoro Rochester mem estis skribinta sur ili la nomon kun la celloko: "Sinjorino Rochester, Hotelo Western, Londono", sed mi ne povis decidi surnajli aŭ surnajligi ilin. Sinjorino Rochester! Ŝi ja ne ekzistis, ne antaŭ la morgaŭo ŝi vidos la lumon de la mondo, mallonge post la oka matena horo, kaj mi volis atendi, ĝis mi estis certa, ke ŝi viva eniris la mondon, antaŭ ol mi skribe cedis al ŝi mian tutan posedaĵon. Estis jam sufiĉe grave, ke en ŝranko kontraŭe de mia tualototablo, la al ŝi destinitaj vestoj estis anstataŭintaj mian nigran lanan veston el Lowood kaj la pajlan ĉapelon. Ĉar tiuj edziĝvestoj, tiu perlolora vesto, tiu vualo delikata kiel araneaĵo, kiuj pendis sur la plenŝarĝita vestokroĉilo, ne apartenis al mi. Mi fermis la ŝrankon por kaŝi la strangan fantomaspektan vestaĵon, kiu en ĉi tiu vesperhoro — estis la naŭa — ĵetis fantoman brilon

trans la ombron de la ĉambro. ”Mi lasos vin sola, blanka sonĝo,” mi diris. ”Mi havas febron. Mi aŭdas la venton muĝadi. Mi iros eksteren por rigardi kia estas la vetero.” Ne sole la trorapidaj preparoj nervigis min, sed ankaŭ la atendo de grandaj ŝanĝoj — la nova vivo, kiu morgaŭ komenciĝos. Sendube tiuj du cirkonstancoj kunlaboris por fari min senripose ekscitita kaj sendube ĉio kune pelis min en la mallumiĝantan parkon je ĉi tiu malfrua horo; sed tria kaŭzo pli influis mian animon ol la du aliaj.

En mia koro mi sentis strangan malkvietecon. Io okazis, kion mi ne povis kompreni; nur mi sola sciis pri tiu okazintaĵo, nur mi ĝin vidis. Tio okazis en la antaŭa nokto. Sinjoro Rochester tiun nokton ne estis hejme, kaj ankaŭ nun li ne rehejmiĝis. Pro aferoj li iris al malgranda bieno de du aŭ tri farmejoj, kiujn li posedis je distanco de tridek mejloj — pro aferoj, kiujn li persone devis aranĝi, antaŭ ol li laŭ nia plano forvojaĝos el Anglujo. Mi nun atendis lian revenon, dezirante rakonti al li, kion mi sentis en mia koro, kaj klopodi trovi ĉe li la solvon de la enigmo, kiun mi ne povis solvi. Restu ĉe mi, leganto, ĝis li venos, kaj kiam mi senŝarĝigos mian koron de la sekreto, kiu ĝin premas, tiam vi partoprenos en tio.

Mi eniris la fruktogardenon por serĉi tie rifuĝejon kontraŭ la vento, kiu la tutan tagon forte blovis el la sudo, ne kunportante unu solan pluveron. Anstataŭ kvietiĝi, kiam krepuskis, ĝi ŝajnis fariĝi ankoraŭ pli forta. La arboj sin klinis ĉiuflanken, dum la paso de unu horo ili apenaŭ povis leviĝi: tiel furiozis la vento, kiu konstante kurbigis iliajn pezajn suprojn norden kaj pelis amasegojn da nuboj de polo al polo. En ĉi tiu julio-tago ne unu sunradio falis sur nian teron, niaj okuloj ne vidis unu bluan lokon sur la ĉielo.

Ne sen plaĉo mi igis min peli de la vento kaj transdonis mian kormalkvieton al la senbrida aerfluego, brue pafiĝanta tra la vasto. Irante laŭlonge de la laŭro-aleo, mi subite staris antaŭ la detruita kaŝtanarbo; jen ĝi staris nigra, disrompita; la trunko, kies unu duono estis frakasita, aspektis fantome terura. La dispecigitaj pecoj ankoraŭ kunligiĝis, ĉar la firma tero, la fortikaj radikoj tenis ilin kune, kvankam la vivoforto estis rompita — la suko ne povos plu flui; la dikaj branĉoj je ambaŭ flankoj estis senvivaj, kaj la ventegoj de la estontaj vintroj nepre ĵetos la unuan duonon teren; kvankam oni povis ankoraŭ diri, ke ili formas arbon — ili estis nur ruino.

”Vi agis bone, ke vi tenis vin kune,” mi diris; kvazaŭ la gigantaj splitoj estus vivantaj estaĵoj, kaj povus aŭdi min. ”Kiel ajn rompите, bruligite kaj mizere vi aspektas, estas tamen al mi, kvazaŭ sin kaŝas ankoraŭ en vi iom da vivo, kiu devenas de la sindoneco de la honestaj, fidelaj radikoj. Neniam vi portos plu la verdan folioornamaĵon — neniam vi vidos plu la birdojn konstrui siajn nestojn sur viaj branĉoj, kaj neniam vi aŭdos plu iliajn laŭdkantojn en via supro; via tempo de amo kaj feliĉo estas for, sed soleca vi ne estas, vi havas samsortulon, kiu priploras kun vi la dekadencan!”

Kiam mi rigardis supren al ĝi, la luno aperis momenteton sur tiu parto de la ĉielo, kiu estis videbla tra ĝia fendo; la disko estis sange ruĝa kaj kvazaŭ volvita en nebulo; ŝajne ĝi ĵetis al mi nur unu solan malĝojan, konsternitan rigardon kaj tuj poste sin retiris en la antaŭen rapidantajn nubojn. Dum momenteto kvietiĝis la ventego, kiu estis furiozinta ĉirkaŭ la sinjora domo de Thornfield, sed fore trans arbon kaj akvon la vento sovaĝe kaj ĝemante daŭrigis sian vojon; estis malĝoje aŭdi ĝin kaj denove mi iris pluen.

Mi trairis la fruktoĝardenon kaj kolektis la pomojn, per kiuj estis kovrita la herbo sub la arboj; poste mi dispartigis la maturajn de la nematuraj. Mi portis ilin hejmen kaj metis ilin en la provizo-ĉambro. Post tio mi direktis min al la biblioteka ĉambro por certigi min, ĉu la fajro jam estas bruligita; ĉar kvankam estis somero, mi sciis, ke sinjoro Rochester ĝojos vidi belan hejmecan kamenofajron post sia rehejmiĝo. La fajro jam longe estis bruligita kaj gaje brulis. Mi ŝovis brakseĝon apud la kamenon, kaj rulis tablon antaŭ ĝin; la fenestrokurtenojn mi tiris malsupren kaj ordonis, ke oni enportu la bruligotajn kandelojn. Farinte tiujn aranĝojn, mi ne povis kviete sidiĝi, eĉ mi ne povis resti hejme. Jen la malgranda franca kamenhorloĝo de la ĉambro kaj la malnova horloĝo en la halo batis samtempe la dekan horon.

”Kiel malfrue jam estas!” mi diris, ”mi iros malsupren al la parkpordo; tiam kaj tiam la luno lumas; mi povas transvidi longan parton de la landvojo. Eble li baldaŭ venos, kaj irante renkonte al li, mi forpelos dum kelkaj minutoj la timon.”

La vento bruegis tra la altaj arboj, kiuj ĉirkaŭis la parkpordon; sed la tuta landvojo; kiun mi povis transrigardi, estis kvieta kaj soleca. Nur la ombroj de la nuboj kelkfoje glitis trans ĝin, kiam la luno sin montris, alie ĝi estis mallarĝa, hela striego, sur kiu nenio moviĝanta estis videbla.

Larmo malsekigis mian okulon, kiam mi tiel rigardis antaŭ mi — larmo de seniluziiĝo kaj malpacienco; mi hontis pro ili kaj rapide forviŝis ĝin. Tamen mi restis tie staranta; la luno nun retiris sin en sian nuboĉambro kaj malsuprenigis siajn nubkurtenojn; la nokto iĝis pli kaj pli malhela; nun la ventego alportis pluvegon.

”Ho, ke li nur venus! Ke li nur estus ĉi tie!” mi kriis, kapti-

ta de malĝoja antaŭsento. La horo de tetrinkado jam atendis lian revenon, nun estis jam tute mallume. Kio do retenis lin? Ĉu okazis katastrofo? Ree mi pensis al la okazintaĵo de la antaŭa vespero. Mi nun klarigis ĝin kiel anoncanton de granda malfeliĉo. Mi timis, ke miaj esperoj estas tro brilaj por esti efektivigataj. Mi spertis tiom da feliĉego en la lastaj tagoj kaj kredis, ke mia feliĉo transpasis sian meridianon kaj nun estas malleviĝonta.

”Mi ne povas nun reiri en la domon,” mi pensis; ”mi ne povas kviete sidi apud la kameno, dum li estas ekstere en la malbela sovaĝa vetero. Pli volonte mi volas lacigi miajn piedojn ol eksciti mian koron ĝis la plej alta grado. Mi volas iri pluen renkonte al li.”

Mi do ekiris, rapide sed ne malproksimen. Antaŭ ol mi estis irinta kvaronan mejlon, mi aŭdis hufofrapadon, rajdanto plengalope proksimiĝis, hundo kuris je lia flanko. For la malbonajn antaŭsentojn! Estis li! Jen li alte sidis sur la ĉevalo, sur Messour, kaj Piloto sekvis lin. Li vidis min, ĉar ĵus la luno aperis sur vasta blua loko en la ĉielo kaj nun ŝvebis antaŭen sur la klara ebenaĵo. Sinjoro Rochester deprenis sian ĉapelon kaj svingis ĝin alte super la kapo. Mi kuris renkonte al li.

”Jen rigardu!” li kriis, klinante sin malsupren kaj etendante al mi la manon,” vi ne povas vivi sen mi, tio ja estas tre klara. Metu la piedon sur la pinton de mia boto, donu al mi ambaŭ manojn kaj saltu sur la ĉevalon.”

Mi obeis. La ĝojo tremetigis min, mi salte surĉevaliĝis. Li donis al mi koran salutkison kaj triumfis iomete, ĉar mi ne kontraŭstaris lin. Li interrompis siajn ĝojmontrojn kaj demandis:

”Ĉu io malbona okazis, Jane, ĉar vi venas renkonte al mi en ĉi tiu horo? Ĉu okazis akcidento?”

”Ne, sed mi kredis, ke vi neniam revenos. Mi ne povis plu elteni atendi vin ankoraŭ pli longe; kaj krom tio: kia pluvo, kia vento!”

”Vere —pluvo kaj vento! Jes, vi estas malseka kiel virineto de maro; volvu vin en mia mantelo; sed vi tremetas, mi kredas; viaj vangoj kaj manoj estas brule varmaj. Ree mi demandas: ĉu io okazis?”

”Ĉio nun pasis. Mi estas ree nek timanta nek malfeliĉa!”

”Sekve vi estis ambaŭ?”

”Iomete, jes. Sed iom post iom mi rakontos al vi ĉion tion, sinjoro; kaj mi estas konvinkita, ke vi ridos pro miaj doloroj.”

”Kiam pasis la morgaŭo, mi kore ridos pri vi; antaŭe mi ne havos la kuraĝon fari tion; ankoraŭ ne estas certa mia venko. Ĉu vere estas vi, kiu dum la tuta lasta monato estis glata kiel angilo kaj dorna kiel eglanterio? Nenie mi povis meti mian manon, kaj ne esti pikata, kaj nun estas al mi, kvazaŭ mi tenas erarvagintan ŝafidon en la brakoj. Vi foriris de via ŝafaro por serĉi vian paŝtiston, ĉu ne, Jane?”

”Mi sopiris je vi. Sed pro tio ne fariĝu tro kuraĝa. Jen ni estas en Thornfield. Metu min teren.”

Li igis min malsupreniri sur la terason. Kiam John transprenis de li la ĉevalon, li sekvis min en la halon dirante, ke mi rapide ŝanĝu la vestojn kaj poste venu al li en la bibliotekan ĉambron. Kiam mi estis suprenironta la ŝtuparon, li retenis min kaj promesigis min reveni baldaŭ. Mi tial rapidis kaj post ne pli ol kvin minutoj mi ree estis apud li. Li estis vespermanĝanta.

”Sidiĝu, Jane, kaj restu momenton; se plaĉos al Dio, ĉi tio

estas la antaŭlasta manĝo, kiun vi prenos en Thornfield en longa tempo.”

Mi sidiĝis je lia flanko, sed diris, ke mi ne povas manĝi.

”Ĉu tio estas pro la longa farota vojaĝo, Jane? Ĉu tio estas pro la penso, ke vi vidos Londonon, ĉu tio forigas vian apetiton?”

”Hodiaŭ vespere miaj perspektivoj ne kuŝas klare antaŭ mi, sinjoro; apenaŭ mi scias, kiaj pensoj trairas mian kapon. Ĉio ŝajnas al mi tiel stranga, tiel neverŝajna.”

”Escepte de mi mem, ĉu ne? Mi ja estas veraĵo? Jen, tuŝu min.”

”Vi, sinjoro, vi estas la plej fantoma el ĉio — Vi estas nenio krom songo.”

Li etendis al mi la manon kaj ridante demandis: ”Ĉu tio estas songo?” Tiam li metis ĝin antaŭ miajn okulojn. Li havis belrondforman muskolfortan manon kaj longan, fortan brakon.

”Jes, kvankam mi tuŝas ĝin — ĉio estas songo,” mi diris, flanken ŝovante la manon. ”Ĉu vi finis vian vespermanĝon, sinjoro?”

”Jes, Jane.”

Mi sonorigis kaj ordonis, ke oni forportu la manĝaĵon. Kiam ni estis ree solaj, mi iom incitis la fajron kaj sidiĝis sur malalta benketo je la piedoj de mia sinjoro.

”Noktomezo estas proksimiĝonta,” mi diris.

”Jes, Jane, sed vi do ne forgesis, ke vi promesis al mi, esti veka kun mi en la nokto antaŭ nia geedziĝo?”

”Tion mi bone memoras kaj mi tenos mian promeson; almenaŭ unu aŭ du horojn. Mi ne sentas la deziron jam dormi.”

”Ĉu vi aranĝis jam ĉiujn preparojn?

”Ĉion mi aranĝis, sinjoro.”

”Mi same,” li diris, ”ĉion mi aranĝis, kaj morgaŭ unu horon post nia reveno el la preĝejo ni foriros de Thornfield.”

”Tre bone, sinjoro.”

”Kun kia eksterordinare stranga rideto vi diris tiujn vortojn: ’tre bone, sinjoro’. Kia ardanta ruĝo kovras viajn vangojn! Kaj kiel brilegas viaj okuloj! Vi do sentas vin bone?”

”Mi kredas, ke jes.”

”Vi kredas! Kio do okazis? Diru do al mi, kion sentas via koro.”

”Tion mi ne povus, sinjoro. Vortoj ne kapablus esprimi, kion mia koro sentas. Mi dezirus, ke la nuna horo neniam finiĝu! Kiu scias, kian teruran sorton alportos la plej proksima.”

”Tio estas la plej granda hipokondrio, Jane. Vi estas ekscitita aŭ trolaciĝinta.”

”Vi do estas kvieta kaj feliĉa, sinjoro?”

”Ĉu kvieta? — ne, sed feliĉa — ĝis la plej profunda loko de mia koro.”

Mi supren rigardis al li, por legi la signojn de lia feliĉo en liaj trajtoj; ili estis ekscititaj, lia vizaĝo estis ruĝa.

”Donu al mi vian fidon, Jane,” li diris, ”senŝarĝigu vian animon; forigu ĉiun ŝarĝon, kiu ĝin premas, sciigante al mi ĉion. Kion vi timas? — Ke mi ne estos bona edzo por vi?”

”Tiu penso estas al mi pli malproksima ol ĉiu alia.”

”Ĉu iom timigas vin la nova sfero, en kiun vi estas enironta? la nova vivo, kuŝanta antaŭ vi?”

”Ne.”

”Vi malkvietigas min, Jane. Tiuj rigardo kaj malĝoja tono turmentas kaj koleretigas min. Mi volas klarigon.”

”Aŭskultu do, sinjoro. — Hieraŭ vespere vi estis eksterdome.”

”Mi estis, tion mi scias; kaj antaŭ momento vi aludis pri tio, ke dum mia foresto io okazis. Eble nenio grava okazis, sed ĉiuokaze ĝi malkvietigis vin. Sciigu al mi tion. Eble sinjorino Fairfax ion diris? Eble vi subaŭskultis klaĉadon de la servistoj. — Eble via sentema memestimo iel vundiĝis?”

”Ne, sinjoro.”

Noktomezo batis — mi atendis ĝis la arĝentaj sonoj de la malnova horloĝo formortis — tiam mi parolis plue:

”La tutan tagon hieraŭ mi estis tre okupita kaj dum mia seninterrompa okupado mi sentis min senfine feliĉa, ĉar la nova sfero tute ne timigis min, nek la nova vivo, kiel vi ŝajne kredis, ĉar mi pensas, ke ĝi estos io senfine feliĉa, vivi kun vi, ĉar mi sentime vin amas. Ne, sinjoro, ne karesu min nun — lasu min senĝene paroli plue. Hieraŭ mi fidis je la providenco kaj kredis, ke ĉio kunlaboras en nia reciproka feliĉo. Kiel vi povas rememori, la tago estis bela, la kvieto en la aero kaj sur la ĉielo malpermesis ĉiun timon rilate al viaj komforto kaj sendanĝereco dum la vojaĝo. Trinkinte teon, mi iris momenton tien kaj reen sur la teraso pensante al vi. Image mi vidis vin tiel proksime al mi, ke mi ne sentis vian foreston. Mi pensis pri la antaŭ mi kuŝanta vivo — pri via vivo, sinjoro — pli vasta, pli movoplena ol mia; pli movoplena ol la profundoj de la maro en kiun sin ĵetas la rivereto. Mirigite mi demandis al mi, kial moralistoj nomas ĉi tiun mondon malĝoja sovaĝejo; por mi ĝi estis floranta kaj radianta kiel rozo. Je sunleviĝo la aero fariĝis malvarma kaj la ĉielo plena de nuboj. Mi eniris la

domon. Sophie vokis min supren por ke mi rigardu la ĵus portitan edziĝo-veston. Kaj en la kesto mi trovis ankaŭ vian donacon — la vualon, kiun vi venigis el Londono kaj kiu, kiel ŝajnis al mi, decidigus min porti ion same multekostan, kiel la juveloj de mi rifuzitaj. Mi ridetis, kiam mi malfaldis la pintaĵon kaj jam projektis planon inciti vian aristokratan guston pro viaj klopodoj kaj kiel vi volis maski vian plej belan fianĉinon per la atributoj de nobela filino. Mi pensis pri tio, ke mi aperigu la kvadratan nebroderitan vualon, faritan de mi mem kaj kovru per ĝi mian maleminentan kapon kaj demandu al vi, ĉu ĝi ne estas sufiĉe bela por virino, kiu povas doni kiel doton nek belecon, nek posedaĵojn nek altrangecon. Klare mi vidis, kiel vi aspektus; kaj mi aŭdis viajn sovaĝajn, respublikajn respondojn kaj vian fieran certigon, ke vi ne bezonas kunligi vian riĉecon per edziĝo de monujo aŭ vian rangon per kunligo de nobela krono.”

”Kiel bone vi kapablas diveni miajn pensojn, ho, eta sorĉistino!” interrompis min sinjoro Rochester. ”Kion vi trovis en la vualo krom la brodaĵo? Ĉu vi trovis en ĝi venenon aŭ ponardon, ĉar vi nun aspektas tiel malĝoja?”

”Ne, ne, sinjoro, krom la delikateco kaj la riĉeco de la laboro, mi trovis nur la fierecon de Fairfax Rochester; kaj tiu ne timigis min, ĉar mi jam kutimiĝis pri la rigardo de tiu demono. Sed, kiam mallumiĝis, la vento levigis; hieraŭ vespere ĝi blovis — ne kiel nun, sovaĝe kaj laŭte — sed per ĝemanta tono, kio estis pli fantomsimila.

Kiel mi deziris, ke vi estu hejme. Mi eniris ĉi tiun ĉambron, kaj la vido de la malvarma, nigra kameno, de via neokupita brakseĝo tremigis min. Enlitiĝinte, mi longe ne povis dormi — sento de angora eksciteco turmentis min. La ankoraŭ daŭ-

re ĝemanta vento ŝajnis supertoni alian tonon; mi komence ne povis aŭdi ĉu ĝi venas el la domo aŭ de ekstere, sed tuj kiam la vento momenton kvietiĝis, mi aŭdis tiun tonon denove, malrapide, melankolie, tirtone. Fine mi kredis, ke ĝi estas hundo, blekeganta en la proksimo. Mi ĝojis, kiam fine ĝi silentis. Post kiam mi estis ekdorminta, mi kunportis kun mi en miajn sonĝojn la bildon de ventega nokto. Sed ankaŭ mi kunportis la ardan deziron esti apud vi kaj la konscion pri malhelpaĵo, kiu leviĝante, sin lokis inter ni. Dum la unua horo de mia dormo mi sekvis nekonatan vojon; plena mallumo ĉirkaŭis min, la pluvo malsekigis min; mi portis pezan ŝarĝon, etan infanon, delikatan estaĵeton, kiu estis tro juna kaj tro malforta por iri kaj ĝi tremetis en miaj brakoj kaj ĝemploris. Estis al mi, kvazaŭ vi iras antaŭ mi sur la sama vojo sed je granda distanco kaj mi strecis ĉiujn miajn nervojn por kuratingi vin; mi seninterrompe klopodis voki vian nomon kaj peti vin halti — sed miaj movoj estis paralizitaj kaj mia voĉo ne estis aŭdita, dum vi — tion mi sentis pli kaj pli malproksimiĝis.”

”Kaj tiuj sonĝoj premas ankoraŭ vian animon, Jane, kvankam mi estas apud vi? Ho malgranda, nervema etulino! Forgesu vian imagan malĝojon, kaj pensu nur al via vera feliĉo! Vi diras, ke vi amas min, Jane, jes — tion mi neniam forgesos; kaj tion vi ankoraŭ ne povas nei. Tiuj vortoj ne formortis sur viaj lipoj. Mi aŭdis ilin, klare, dolĉe; eble vi diris ilin tro solene, sed tamen ili sonis en miaj oreloj kiel muziko. — ‘Estas io rava, ho Edward, povi esperi ĉiam esti apud vi, ĉar mi vin amas.’ — Ĉu vi amas min, Jane? Rediru tion.

”Mi amas vin, sinjoro. — Tutkore mi amas vin.”

”Nu,” li diris post mallonga silentado, ”estas strange, sed

tiuj vortoj dolorige traboris mian bruston. Kial? Mi ne scias tion. Eble ĉar vi diris tiujn vortojn tiel solene kaj kun tiom da pia emfazo; kaj ĉar via rigardo al mi esprimis tiom da fido kaj dediĉo. Estas kvazaŭ iel fantomo ŝvebas ĉirkaŭ mi. Aspektu kolere, Jane, tion vi tiel bone kapablas; ridu al mi per tiu sovaĝa, timema, instiganta rideto; diru al mi, ke vi malamas min — incitetu min, kolerigu min, faru ĉion, kion vi volas, sed ne moligu min; pli volonte mi dezirus, ke vi igu min kolera ol mola.”

”Ĝis la fino rakontinte, mi volas kiel eble plej multe kole-rigi kaj inciti, sinjoro. Sed nun vi devos ankoraŭ aŭskulti min?”

”Mi kredis, ke vi jam ĉion rakontis al mi, Jane. Mi kredis, ke la fonto de via melankolio naskiĝis de tiu sonĝo!”

Mi kapneis.

”Kion? Ĉu estas ankoraŭ io alia? Sed mi ne volas esperi, ke estu io grava. Mi tamen jam antaŭe diras al vi, ke mi ne kredos al vi. Nun parolu plue, mia eta karulino!”

La malkvieto de lia rigardo, la terura malpacienco, kiun li montris, mirigis min, tamen mi rakontis plue:

”Mi sonĝis ankoraŭ alian sonĝon, sinjoro. Thornfield Hall ŝajnis al mi esti malĝoja ruino, rifuĝejo de strigoj kaj vespertoj. Estis al mi, kvazaŭ de la majesta fronto restis nur peco de tre alta kaj tre rompebla muro. En lunbrila vespero mi promenis sur la herbejkovrita interspaco interne de la muroj. Tie mi faletis trans marmoran kamenon kaj trans falintan pecon de kornico. Mi portis ankoraŭ la nekonatan infanon, volvitan en ŝalo, mi ne kuraĝis meti ĝin teren, kvankam miaj brakoj laciĝis — kiel ajn la pezo de la ploretanta estaĵo min ĝenis — mi devis ankoraŭ ĉiam porti ĝin. En la malproksimo mi aŭdis

hufofrapadon de ĉevalo sur la landvojo; mi estis certa, ke vi venas, kaj mi sciis, ke vi foriras al malproksimaj landoj por multaj, multaj jaroj. Mi grimpis sur la malfortikan muron kun freneza danĝerminacanta rapido, esperante vidi vin tie supre ankoraŭ unu fojon; la ŝtonoj forruliĝis el sub miaj piedoj; la hederobranĉoj, al kiuj mi kroĉiĝis, cedis; la infano kun angoro sin premis al mia kolo, kaj preskaŭ premsufokis min. Fine mi atingis la mursupron. Mi vidis vin en la malproksimo kiel punkteton sur la vojo, kiu fariĝis ĉiam pli malgranda. La vento tiel forte blovis, ke mi ne povis stari. Mi sidiĝis sur la mallarĝa rando; mi klopodis kvietigi la plorantan infanon en miaj brakoj. Jen vi laŭiris la angulon de la landvojo; mi klinis min antaŭen por lastfoje vidi vin; la muro enfalis; mi perdis la ekvilibron, la infano elglitis el miaj brakoj, mi salte sekvis ĝin, falis kaj vekiĝis.”

”Espereble tio estis ĉio, Jane.”

”Ĝi estas la antaŭparolo, sinjoro; la vera rakonto sekvos. Kiam mi vekiĝis, blindiĝis min lumo. En la unua momento mi pensis: ”Ho, jam tagiĝis!” Sed mi eraris. Ĝi estis nur la brilo de kandelo. Mi supozis, ke Sophie eniris. Sur mia vestotablo staris lumo, kaj la pordo de la malgranda kabineto, en kiu mi estis pendiginta mian edziĝoveston kaj mian vualon antaŭ ol mi enlitiĝis, kaj kiun tiam mi estis ferminta, estis nun malfermita. Bruo venis de tie. Mi demandis: Sophie, kion vi faras tie? Neniu respondis, sed figuro eliris el la kabineto; ĝi kaptis la lumon, levis ĝin kaj atente rigardis la vestojn pendantaj sur la vesto-kroĉiloj.

”Sophie ! Sophie !” ree mi kriis — kaj ankoraŭ la figuro ne eligis sonon. Mi estis leviĝinta en la lito kaj kliniĝis antaŭen; unue min regis miro, poste konstemo — kaj fine la sango gla-

ciîĝis en miaj vejnoj. Ne estis Sophie, nek Leah, nek sinjorino Fairfax — ne, ĝi ne estis — ne, pri tio mi estus certa kaj tamen, ĝi eĉ ne estis tiu stranga persono, Grace Poole.”

”Unu el ili ĝi tamen nepre estis,” min interrompis mia ordonanto.

”Ne, sinjoro, mi povas certigi al vi la malon. Tiel longe, kiel mi estis en Thornfield Hall, miaj okuloj neniam vidis la figuron, kiu staris antaŭ mi. La vizaĝo, la membroformoj estis al mi tute nekonataj.

”Priskribu la figuron, Jane.”

”La figuro ŝajnis al mi esti virino, kies longaj nigraj haroj dense disfalis trans la dorson. Mi ne scias, kiaj estis la vestoj, kiujn ŝi portis; ili estis blankaj kaj malvastaj, sed mi ne kapablas diri ĉu estis vesto, litotuko aŭ vesto de mortinto, en kiu ŝi estis volvita.”

”Ĉu vi vidis ŝian vizaĝon?”

”En la unua momento mi ne vidis ĝin. Sed subite ŝi kaptis mian vualon, etendis ĝin antaŭ si, konsideris ĝin longe, ĵetis ĝin sur sian kapon kaj poste sin rigardis en la spegulo. En tiu momento mi vidis ŝian spegulbildon kaj ŝian tutan figuron en la malluma longforma spegula vitro.”

”Kaj ili estis?”

”Ili ŝajnis al mi teruraj kaj fantomaj, sinjoro! Ho, neniam mi vidis tian vizaĝon! — Ĝi estis sangruĝa — sovaĝa. Mi dezirus, ke mi povus forgesi la ruladon de la ruĝaj okuloj — kaj la terurajn, ŝvelintajn vizaĝtrajtojn!”

”Sed ordinare fantomoj estas palaj, Jane!”

”Ĉi tiu fantomo tamen estis blue ruĝa, sinjoro; la lipoj estis ŝvelintaj kaj malhelaj, la frunto plena de sulkoj; la nigraj bro-

voj formis altan arkon super la okuloj subpleniĝintaj per sango. Ĉu mi diru, pri kio ili memorigis min?"

"Diru tion."

"Pri la frostremiga, germana fantomo — pri vampiro."

"Ah! — Kaj kion ĝi faris?"

"Fine ĝi prenis mian vualon de sia kapaĉo, ŝiris ĝin en pecojn, ĵetis ĝin teren kaj piedpremis ĝin."

"Poste?"

"Poste ĝi ŝovis flanken la fenestrokurtenojn kaj rigardis eksteren. Eble ĝi vidis, ke tagiĝas, ĉar ĝi prenis la kandelon kaj iris al la pordo. Tuj apud mia lito la figuro haltis dum la sangecaj okuloj rigardis min — ĝi levis ĝis mia vizaĝo la lumon kaj blovestingis ĝin. Mi sentis, ke ŝia malluma vizaĝo pli kaj pli proksimiĝis al mia tiam mi perdis la konscion; la duan fojon en mia vivo la teruro senkonsciigis min."

"Kiu estis apud vi, kiam vi rekonsciiĝis?"

"Neniu, sinjoro, krom la hela taglumo. Mi leviĝis, malvarmigis mian vizaĝon per akvo kaj trinkis; kvankam mi estis laca, mi tamen ne sentis min malsana, kaj tial mi decidis al neniu paroli pri tiu vizio. Nun, sinjoro, diru al mi, kiu kaj kio estis tiu virino?"

"La efiko de tro ekscitita cerbo, mi estas certa, ke ĝi estis nur tio. Mi devos zorge gardi vin, mia trezoro. Nervoj kiel viaj ne estas faritaj por elporti kontraŭajn fatalojn."

"Estu certa pri tio, sinjoro, ke miaj nervoj ne estis kulpaj, ĉio vere okazis."

"Kaj viaj antaŭaj songoj? Ĉu ili ankaŭ estis veraj? Ĉu Thornfield Hall estas ruino? Ĉu mi estas apartigita de vi per netransirbla barilo? Ĉu mi iras de vi sen unu larmo? — sen kiso? — aŭ sen vorto?"

”Ankoraŭ ne.”

”Ĉu mi estas faronta tion? — La tago, kiu por ĉiam kunligos nin, jam venis; kaj kiam ni estos kunligitaj, tiuj animaj turmentoj kaj teruroj ne revenos; pri tio mi garantias vin.”

”Ĉu animaj turmentoj kaj teruroj, sinjoro! Mi dezirus, ke mi povus kredi, ke ili estas nur tiaj; nun mi tion deziras pli ol iam, ĉar vi mem eĉ ne povas klarigi al mi la sekreton de tiu terura vizito.”

”Kaj ĉar mi ne povas tion, la vizito ankaŭ ne vere okazis, Jane.”

”Sed sinjoro, kiam ellitiĝante en ĉi tiu mateno, mi diris tion saman al mi kaj ĉirkaŭrigardis en la ĉambro, por reakiri kuraĝon kaj konsolon per la hela taglumo kaj per la rigardo de ĉiu konata kaj amata objekto — tiam mi vidis — antaŭ mi sur la tapiŝo — tion, kio klare refutis mian hipotezon — la vualon, kies pecoj kuŝis sur la planko!”

Mi sentis, kiel sinjoro Rochester timiĝas kaj tremas; ambaŭmane li ĉirkaŭprenis min kriante: ”Dank’al la ĉiopotenca Dio, ke nur la vualon trafis malfeliĉo, se malica monstro troviĝis en via apudeco. — Ho! kio povus okazi!”

Li rapide spiris kaj tiel forte premis min al si, ke mi komencis tusi.

Post silento de kelkaj minutoj li subite parolis plue:

”Nun mi klarigos ĉion al vi, Jane. Estis duone sonĝo, duone vero; mi ne dubas plu pri tio, ke virino estis en via sanktejo: kaj tiu virino estis — Grace Poole. Vi nomas ŝin stranga persono; post ĉio, kion vi scias, vi estas prava, ke vi tiel nomas ŝin — ĉar pensu nur, kion ŝi faris al mi: kion ŝi faris al Mason! — En stato inter maldormo kaj dormo vi rimarkis ŝian eniron kaj ŝiajn gestojn; sed febre ekscitite, preskaŭ delirante, vi ri-

gardis ŝin kiel fantomon, tute diversa de ŝia vera eksteraĵo; la longaj senordiĝintaj haroj, la ŝvelinta vizaĝo. La nenatura eksteraĵo, ĉio tio estis efikaĵoj de via imago; la rezulto de premsonĝo. La kolera disŝirado de via vualo estis realeco — kaj ion tian ni povas atendi de ŝi. Mi vidas en viaj okuloj, ke vi dezirus demandi, kial mi konservas en mia domo tian estaĵon. Kiam ni estos geedziĝintaj unu jaron kaj unu tagon, mi ĉion klarigos al vi. Ne ankoraŭ nun. Ĉu vi estas kontenta, Jane? Ĉu la klarigo de la mistero kontentigas vin?"...

Mi pripensis momenton, kaj poste lia klarigo ŝajnis al mi la sola ebla. Tamen tute kontenta mi ne estis, sed pro amo al li, mi ŝajnis min kvazaŭ mi estas tia — kaj vere mi ankaŭ estis kvietigita. Mi certigis tion al li kun rideto. Kaj ĉar la noktomeza horo jam longe pasis, mi preparis min por forlasi lin.

"Ĉu Sophie kaj Adèle dormas en la infanĉambro?" li demandis ekbruligante mian kandelon.

"Jes, sinjoro."

"Kaj por vi estas sufiĉa spaco en la lito de Adèle. Ĉi tiun nokton vi devos dividi ĝin kun ŝi, Jane. Ne estas mirige, ke okazintaĵo, kiun vi rakontis al mi, igis vin nerva kaj mi dezirus, ke vi ne dormu sola. Promesu al mi, ke vi iros al la infanĉambro."

"Mi tre ĝojas povi fari tion, sinjoro."

"Kaj zorge ŝlosu la pordon interne. Veku Sophien irante supren, kun la preteksto, ke vi petas ŝin frue veki vin morgaŭ matene. Ĉar vi devos matenmanĝi kaj esti vestita antaŭ la oka. Kaj nun forpelu la malgajajn pensojn, Jane! Ĉu vi ne aŭdas, ke la ventego kvietigis kaj ke la vento flustras nur dolĉe kaj mallaŭte? La pluvego ne vipas plu la fenestrojn: rigardu

eksteren,” — li ŝovis flanken la kurtenojn — ”la nokto estiĝis ĉarma!”

La nokto vere estis ĉarma. La duono de la ĉielo estis hela kaj sennuba. La nuboj, kiujn la vento pelis antaŭ si, ŝvebis je longaj arĝentaj kolonoj okcidenten kaj la luno amike lumis sur la dormetantan teron.

”Nu?” diris sinjoro Rochester, demande rigardante en miajn okulojn, ”kiel nun sin sentas mia Jane?”

”La nokto estas kvieta kaj serena, sinjoro, — kaj mi estas tute sama.”

”Kaj vi ne plu songos pri disiĝo kaj malfeliĉaĵoj kaj malĝojoj, sed nur pri feliĉaj geedziĝo kaj unuiĝo!”

Tiu antaŭdiro veriĝis nur duone. Mi ne songis pri disiĝo kaj malĝojoj, sed ankaŭ ne pri ĝojo kaj feliĉa amo; ĉar mi dormis eĉ ne unu momenton. Mi tenis la malgrandan Adèle en la brakoj kaj gardis la feliĉan dormon de la infaneco — tiel kvietan, tiel senpasian, tiel senkulpan — kaj tiel mi atendis la proksimiĝantan tagon. La vivo pulsus forte en miaj vejnoj, kaj kiam leviĝis la suno, ankaŭ mi mem leviĝis. Mi memoras, kiel forte Adèle sin kroĉis al mi, kiam mi ellitiĝis. Mi memoras ankoraŭ, kiel kore mi ŝin kisis, kiam mi malligis ŝiajn malgrandajn manojn, kiuj tenis miajn; stranga emocio ekregis min, mi eksplodis en larmoj kaj devis ŝteliri de la lito, timante, ke miaj singultoj vekos ŝin. Ŝi dormis ankoraŭ profunde. Ŝi estis la simbolo de mia ĝistiam viva, kaj li, por kiu mi estis vestonta min por poste renkonti lin, estis al mi la timata, sed adorata personigo de mia estonteco.

## Ĉapitro XXVI.

**J**e la sepa horo Sophie venis por vesti min; daŭris longe antaŭ ol ŝi plenumis tiun taskon; tiel longe, ke sinjoro Rochester, kiu, kiel mi supozis, senpacientiĝis pro tiu longdaŭra laboro, sendis iun supren por demandi, kial mi ankoraŭ ne venis. Ŝi ĵus kunligis mian vualon (fine mi estis devigata preni mian simplan tulan) per multekosta pinglo. Kiel eble plej baldaŭ mi tuj poste liberigis min el ŝiaj manoj kaj rapidis malsupren.

”Haltu!” kriis ŝi france. ”Rigardu vin do en la spegulo: vi eĉ ne ĵetis unu rigardon al ĝi.”

Mi turnis min sur la sojlo de la pordo. En la spegulo mi vidis fremdulinon; ĉar tiu blanke vestita, vualita figuro neeble estis mi mem.

”Jane!” sonis voĉo kaj mi kuris malsupren. Apud la malsupro de la ŝtuparo sinjoro Rochester atendis min.

”Malfruantino,” li diris, ”mia kapo ardas pro malpacienco kaj vi forrestas tiel longe!”

Li kondukis min en la manĝoĉambron, ekzamene rigardis min de la kapo ĝis la piedoj, nomis min delikata kiel lilio, kaj ne nur la fiero de sia vivo, sed ankaŭ la deziro de siaj okuloj, kaj dirante al mi, ke li donas al mi nur dek minutojn por matenmanĝi, li sonorigis.

Unu de li antaŭ nelonge dungita servisto eniris.

”Ĉu John pretigas la veturilon?”

”Jes, sinjoro.”

”Ĉu ĉiu pakaĵo estas portita malsupren?”

”La servistoj estas portantaj ĝin malsupren.”

”Nun iru en la preĝejon por vidi, ĉu la pastro, sinjoro Wood, kaj la pedelo estas jam tie. Poste rapidu reen por sciigi al mi tion.”

Kiel jam scias mia leganto, la preĝejo staris tuj apud la parka pordego. La servisto tial revenis post malmultaj momentoj.

”Sinjoro Wood estas jam en la sakristio kaj almetas la surplison.”

”Kaj la veturilo ...?”

”La ĉevaloj estas aljungataj.” ...

Ni ne bezonas la veturilon por iri preĝejon, sed la veturilo devas atendi nian revenon; ĉiu pakaĵo devas esti surŝarĝita kaj ligita, la veturigisto devos sidi sur sia sidejo.”

”Jes, sinjoro.”

”Jane, ĉu vi estas preta?”

Mi ekstaris. Mi ne havis fianĉin-kondukanton, nek fianĉin-fraŭlinojn, neniun parenco kondukis aŭ atendis min. La tuta procesio konsistis nur el sinjoro Rochester kaj mi. Sinjorino Fairfax staris en la halo, kiam ni trairis ĝin. Tiel volonte mi dezirus paroli al ŝi, sed li tenis mian manon kvazaŭ per feraj fingroj. Li tiris min kun si kaj iris tiel rapide, ke apenaŭ mi povis sekvi; kaj kiam mi rigardis sinjoron Rochester en la vizaĝon, mi klare sentis, ke li ne cedus al mi unu minuton da prokrasto, sub neniun preteksto. Mi dezirus scii, ĉu iam fianĉo ek de la komenco de la mondo, tiel aspektis, kiel li — tiel furioze decidite, tiel energie decidite por agi. Mi dezirus scii,

ĉu iam la okuloj de viro, iranta la vojon al geedziĝo, tiel brilegis sub obstine kuntiritaj brovoj.

Mi ne scias, ĉu la tago estis bela, klara aŭ ventege pluva; irante laŭlonge de la larĝa vojo, mi rigardis nek ĉielon nek teron; miaj okuloj sekvis mian koron, kaj ambaŭ estis ĉe sinjoro Rochester. Mi volis vidi ion nevideblan, al kio li ŝajne fiksis siajn sovaĝajn rigardojn. Mi volis koni ĉiujn liajn pensojn, kontraŭ kiuj li luktis kaj batalis.

Apud la pordo de la preĝeja korto li haltis, li rimarkis, ke mi preskaŭ perdas la spiron.

”Ĉu mi estas kruela en mia amo?” li demandis. ”Ni atendu momenton. Apogu vin al mi, Jane.”

Nun mi ree vidas antaŭ mi la bildon de tiu griza, malnova preĝejo, kiel ĝi leviĝis kviete kaj potence en la rozkolora matena ĉielo. Rabobirdo flugis ĉirkaŭ la preĝeja turo. Mi memoras pri la verda tomboaltaĵo, ankaŭ mi ne forgesis tiujn du fremdajn figurojn, kiuj iris tien kaj reen inter la malaltaj tomboj kaj legis la surskribojn, kiuj staris sur la malmultaj per musko kovritaj tombŝtonoj. Mi rimarkis ilin, kiam ili je nia proksimiĝado ĉirkaŭiris la preĝejon, kaj mi ne dubis unu momenton pri tio, ke ili iros tra la flankoalo en la preĝejon por ĉeesti la geedziĝan ceremonion. Sinjoro Rochester ne rimarkis ilin, grave li rigardis mian vizaĝon, el kiu en tiu momento forfluis la sango; ĉar mi sentis, ke malvarma angora ŝvito kovris miajn frunton kaj vangojn kaj ke miaj lipoj estas glaci-malvarmaj. Kiam mi ree min regis, kio baldaŭ okazis, li iris malrapide kaj antaŭzorge kun mi laŭ la vojo al la preĝeja portalo.

Ni eniris la kvietan, modestan preĝejon. La pastro staris en sia blanka surpriso apud la malalta altaro kaj atendis. Ĉe lia

fianko staris la pedelo. Ĉie regis profunda, sankta silento. En la malproksima angulo moviĝis du ombroj. Miaj supozoj estis veraj: la fremduloj estis antaŭ ni enirintaj la preĝejon kaj nun ili staris apud la tomboarkaĵo de la Rochesteroj. Ili estis turnintaj al ni la dorson kaj rigardis tra la kradaĵo al la malnova marmorŝtono, de la tempo nigre kolorigita, kie genuanta anĝelo gardis la terajn restaĵojn de Damer de Rochester, batalmortigita en la internamilito sur Marston Moor. Flanke de li ripozis Elizabeth, lia edzino.

Ni staris apud la sankta vespermanĝa tablo. Aŭdante mallaŭtan paŝon post mi, mi rigardis trans mian ŝultron: unu el la du fremduloj — ŝajne ĝentlemano — proksimiĝis al la altarejo. La diservo komenciĝis. La deklaro de la fincelo de la geedziĝo estis legata. Poste la pastro faris unu paŝon antaŭen kaj klinante sin trans sinjoron Rochester, li parolis plue:

”Kaj mi postulas de vi ambaŭ (ĉar en la terura tago de la juĝado, kiam la sekreto de ĉiuj koroj estos malkovrata, vi de tio donos respondecon), ke se unu el vi konas malhelpaĵon, pro kiu vi ne povus leĝe geedziĝi, vi tion konfesu nun. Ĉar sciu, ke multaj vivas kune alie ol ligitaj de la vorto de Dio, multaj ne estos ligitaj de Dio kaj ilia geedziĝo estos nenio laŭ la leĝo.”

Laŭkutime li haltis. Kiam tiu paŭzo estis interrompita de respondo? Eble ne unu solan fojon en tuta jarcento. Kaj la pastro, kiu ne levis sian rigardon de la libro, kaj kiu nur unu momenton retenis sian spiron, parolis plue. Lia mano jam etendiĝis al sinjoro Rochester kaj li malfermis la buŝon por demandi: ”Ĉu vi volas akcepti ĉi tiun knabinon kiel vian edzinon” — kiam klara voĉo diris:

”La geedziĝo ne povas plenumiĝi. Mi deklaras, ke malhelpaĵo ekzistas.”

La pastro rigardis supren kaj rigardis la parolinton. — Senparole li staris tie, same kiel la pedelo. Sinjoro Rochester faris geston, kvazaŭ tertremo eksplodis sub liaj piedoj. Tuj poste li ekregis sin kaj ne turnante la kapon li ordonvoĉe diris: ”Daŭrigu!”

Granda silento regis post tiu vorto. La vorton li estis dirinta mallaŭte sed firme. Sed sinjoro Wood respondis.

”Mi ne povas daŭrigi, antaŭ ol mi esplors tiun aserton, kiun ĵus iu diris. Mi devas ekzameni, ĉu tiu aserto estas mensoga aŭ vera.”

”La geedziĝa ceremonio ĉi tie finiĝas,” respondis la voĉo post ni. ”Mi povas pruvi, ke mia aserto estas vera. Netransirebla malhelpaĵo por ĉi tiu geedziĝo ekzistas.”

Sinjoro Rochester bone aŭdis tion, sed li nenion atentis; rigide kaj firme li staris tie. Li ne faris gestojn, sed pli forte li premis mian manon. Kiel forta, potenca, varmega premo tio estis! — Kiel marmorsimila estis lia pala, alta frunto en tiu momento! Kiel brilegis liaj okuloj, kiel kviete, gardeme kaj tamen arde ili aspektis!

Sinjoro Wood en tiu momento ŝajne ne sciis, kion fari.

Fine li demandis: ”Kio estas tiu de vi aludita malhelpaĵo; eble ĝi estas forigebla — venkebla?”

”Neniel,” sonis la respondo. ”Mi nomis ĝin netransirebla kaj mi faris tion post konsiderado.”

La parolinto paŝis antaŭen kaj sin klinis trans la kradaĵon de la altarejo. Klare, kviete, ne interrompante sin, li daŭrigis, sed ne laŭte.

”Ekzistas jam frue plenumita geedziĝo. Sinjoro Rochester havas edzinon, kiu vivas ankoraŭ.”

Tiuj mallaŭte, kviete parolitaj vortoj tiel tremigis miajn nervojn, kiel fulmobato ne kapablas — mia sango subite estis regata de tia sento, kian ĝi neniam antaŭe spertis nek pro malvarmo nek pro varmego. Sed mi estis preskaŭ preparita al io terura kaj la danĝero de senkonscio ne minacis min. Mi rigardis sinjoron Rochester kaj devigis lin, ke li rigardu min. Lia tuta vizaĝo aspektis en tiu momento kiel senkolora roko. Liaj okuloj estis samtempe fajreroj kaj fajroŝtonoj. Li neis nenion. Li nur aspektis kvazaŭ li estus preta kontraŭstari ĉiujn terajn kaj ĉielajn potencojn. Li ne parolis; li ne ridetis, ŝajne li ne rekonis plu en mi vivantan estaĵon. Li per sia forta brako ĉirkaŭprenis mian talion kaj tiel li tenis min ĉe sia flanko.

”Kiu vi estas?” li demandis al la fremdulo.

”Mia nomo estas Briggs — mi estas advokato en Regent Street, en Londono.”

”Kaj vi volus imputi al mi edzinon?”

”Ne sinjoro, mi volis nur memori al vi la ekziston de via edzino! La leĝo atestas pri via unua geedziĝo, kvankam vi mem ne intencas tion fari.”

”Faru al mi la komplezon priskribi tiun sinjorinon — nomu ŝian nomon — ŝian devenon, ŝiajn parencojn — ŝian loĝlokon.”

”Certe, sinjoro, mi estas tute preta servi vin tiurilate.”

Sinjoro Briggs kviete tiris paperon el sia poŝo kaj legis iom oficiale kaj nazosone:

”Mi atestas kaj povas pruvi, ke la dudekan de oktobro *anno domini* (sekvis jaro, kiu datumis ĉirkaŭ dekkvin jaroj pli frue) Edward Fairfax Rochester de Thornfield Hall, en la graflando —, kaj de Ferndean-Manor en — shire, Anglujo edziĝis kun mia fratino Bertha Antoinette Mason, filino de Jonas Mason, negocisto, kaj lia edzino Antoinette, kreolino, en la preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj en Spanish Town, Jamajko. La protokolo pri tiu geedziĝo estas notita en la libroj de la nomita preĝejo — kopio troviĝas nuntempe en miaj manoj.

Subskribita de

Richard Mason.”

”Tio povus pruvi — se la dokumento estas vera, ke iam mi estis edziĝinta, sed tio ne pravas, ke la virino, kiu en la dokumento estas nomata kiel mia edzino, vivas ankoraŭ.”

”Ĉiukaze ŝi vivis ankoraŭ antaŭ tri monatoj,” respondis la advokato, ”tio estas pruvebla.”

”Kiel vi scias tion?”

”Pri tiu fakto mi havas atestanton, sinjoro; eĉ atestanton, kies certigon eĉ vi mem ne povus kontraŭbatali nek senfortigi.”

”Prezentu lin tuj — se ne, iru al la diablo!”

”Mi prezentos lin al vi — li estas tre proksime. Sinjoro Mason, bonvolu paŝi antaŭen.”

Kiam sinjoro Rochester aŭdis tiun nomon, li grincigis la dentojn; forta konvulsia tremado trairis lian tutan korpon; li tiel forte premis min al si, ke mi devis kunsenti la konvulsian tremadon pro kolero kaj senespero, kiu trairis lian tutan figuron.

La dua fremdulo, kiu ĝis nun tenis sin je kelka distanco,

ankaŭ paŝis antaŭen. Pala vizaĝo rigardis trans la ŝultron de la leĝa scienculo — jes — tie estis sinjoro Mason proprapersone. Sinjoro Rochester sin turnis kaj rigardis lin. Mi jam ofte rakontis, ke liaj okuloj estis nigraj — nun tamen ilia koloro estis ruĝebruna, ne, ili montris sangecan brilon en sia malhelco; — lia vizaĝo ŝanĝiĝis laŭ koloro — la olivkoloraj vangoj, la pala frunto estis kovritaj de koloro, kiu ŝajnis supreniri el martirita koro. Subite li faris geston, levis la fortan brakon — li estis teren fraponta Mason, li estis sternonta lin sur la plankon de la preĝejo, li estis senindulge mortigonta lin — sed Mason terurite paŝis malantaŭen kaj senhelpe kriis: "Ĉiopotenca Dio!"

Tiam subite senlima malestimo ekregis sinjoron Rochester kaj li kvietiĝis — lia pasio estingiĝis kvazaŭ la frosto per unu bato neniigis ĝin kaj li demandis nur: "Kion vi havas ankoraŭ por diri?"

Neaŭdebla respondo liberiĝis el inter la palaj lipoj de sinjoro Mason.

"La diablo prenu vin, se vi ne povos klare respondi. Ankoraŭ unu fojon mi demandas al vi, kion vi havas por diri," kriis al li sinjoro Rochester.

"Sinjoro — sinjoro," interrompis nun la pastro, "ne forgesu, ke vi troviĝas en sanktigita ejo."

Poste li sin turnis al sinjoro Mason kaj milde demandis: "Ĉu vi scias, sinjoro, ĉu la edzino de ĉi tiu sinjoro ankoraŭ vivas, aŭ ne?"

"Kuraĝon, — kuraĝon!" instigis lin la advokato, "parolu malkaŝe."

"Ŝi vivas ankoraŭ — kaj eĉ en — Thornfield Hall," klarvoĉe

diris Mason. "Lastfoje mi ŝin vidis tie en aprilo. Mi estas ŝia frato."

"En Thornfield Hall!" konsternite kriis la pastro. "Neeble! Mi estas maljuna loĝanto de ĉi tiu regiono, sinjoro, kaj ankorauŭ neniam mi aŭdis pri sinjorino Rochester en Thornfield Hall."

Mi vidis, ke terura rideto distordis la lipojn de sinjoro Rochester.

Li grumblis:

"Ne, je mia Dio! Mi zorgis pri tio, ke neniu aŭdu tion — nek pri ŝi — sub tiu nomo."

Li pripensis. Pli ol dek minutojn li konsultis sin mem. Tiam li decidis kaj parolis:

"Sufiĉe — sufiĉe! Nun ĉio per unu fojo eliĝu, kiel la kuglo el la kanono. — Wood, fermu vian libron kaj demetu vian surpluson; John Green (tion li diris al la pedelo) eliru el la preĝejo. Hodiaŭ geedziĝo ne okazos plu."

La viro faris, kion oni ordonis al li.

Sinjoro Rochester parolis plue kuraĝe kaj decide:

"Bigamio estas terura vorto! Kaj tamen mi havis la intencion estiĝi bigamiisto! — Sed la sorto superruzis min — aŭ la providenco retenis min, — eble la lasta okazis. En ĉi tiu momento mi estas malmulte pli bona ol diablo, kaj eble la pastro ĉi tie diros, ke mi sendube meritas la plej terurajn punojn de la ĉielo — la eternan fajron — la ĉiaman malbenon. Sinjoroj, mia plano malsukcesis! — vera estas tio, kion diras ĉi tiu advokato kaj lia kliento: mi estas edziĝinta — kaj la edzino, kun kiu mi edziĝis, vivas! Vi diras, Wood, ke neniam vi aŭdis paroli pri iu sinjorino Rochester tie en la bona domo, sed mi konjektas, ke ofte vi klinis vian oreilon antaŭ la babi-

ladoj pri tiu misterplena frenezulino, kiu estas enŝlosita tie sub severa gardado. Kelkaj homoj flustris al vi, ke ŝi estas mia kontraŭleĝa duonfratino, aliaj flustris ke ŝi estas mia de mi forpuŝita amatino, kiun mi per tio frenezigis! Sed nun mi diras al vi, ke ŝi estas mia edzino, kun kiu mi edziĝis antaŭ dekkvin jaroj, — kies nomo estas Bertha Mason, kaj kiu estas la fratino de decidita, sentima viro, kiu nun per siaj tremetantaj membroj kaj mortpala vizaĝo pruvas, kian kuraĝan koron kelkaj homoj portas en la korpo! — Kuraĝon, Dick! — ne timu antaŭ mi, mi pli volonte batus sendefendan virinon ol kompatindulon, kia vi estas! — Bertha Mason estas freneza; kaj ŝi devenas de freneza familio — idiotoj kaj frenezuloj dum tri generacioj! Ŝia patrino, kreolino, estis freneza kaj trinkulino samtempe! Tion mi eksciis nur post kiam mi edziĝis kun ŝia filino, ĉar antaŭ mia edziĝo oni silentis pri familiaj sekretoj. Bertha, kiel devofidela filino imitis sian patrinon en ambaŭ rilatoj. Mi havis ĉarman kunulinon — puran, senkulpan, saĝan, modestan — KREDU al mi, ke mi estis feliĉa edzo! — Mi travivis la plej belajn scenojn! Ho! miaj spertoj estis ĉiuspecaj! Se vi nur scius ĉion tion! Sed mi ne ŝuldas al vi plurajn klarigojn. Briggs, Wood, Mason, — mi invitas vin ĉiujn eniri en la bienan domon por viziti la pacienton de Grace Poole, mian edzinon! — Propraokule vi vidos, kiel oni trompis min, kiam oni edzigis min al tiu kreitaĵo. Kaj vi juĝos, ĉu mi havis aŭ ne havis la rajton rompi tian edziĝon por trovi kompaton ĉe estaĵo, kiu estas homa.”

”Wood,” li parolis plue, ”ĉi tiu knabino, same kiel vi mem, konjektis tute nenion pri tiu naŭza sekreto. Ŝi kredis, ke ĉio okazis laŭleĝe kaj en bona ordo; neniam ŝi songis pri tio, ke ŝi estas fikcie edziniĝonta kun trompema, mizera krimulo, kiu

estas jam ligita al malbona, freneza kaj bestiginta virino! Venu ĉiuj! — sekvu min!”

Ankoraŭ tenante min kvazaŭ per fera mano, li eliris el la preĝejo. La tri sinjoroj sekvis nin. Antaŭ la granda pordego de la halo ni vidis la veturilon.

”Returne veturigu ĝin en la remizon, John,” diris sinjoro Rochester tre kviete kaj trankvile, ”mi ne bezonos ĝin plu hodiaŭ.”

Kiam ni reiris en la domon, sinjorino Fairfax, Adèle, Leah kaj Sophie venis renkonte al ni por gratuli nin.

”Iru for! ĉiu al sia laboro!” — kriis la mastro, ”iru for kun viaj gratuloj! Kiu bezonas ilin? — Ne mi! — Ili estas dek kvin jarojn tro malfruaj!”

Ĉiam tenante mian manon li rapidis preter la amasiĝintajn virinojn kaj signe ordonis al la sinjoroj sekvi lin, kaj tion ili faris.

Ni supreniris la unuan ŝtuparon, transiris la galerion kaj fine haltis antaŭ la tria etaĝo.

Per ŝlosilego sinjoro Rochester malŝlosis la malaltan nigran pordon kaj enirigis nin en la per tapiŝoj tapetitan ĉambron en kiu staris granda lito kaj malnovmoda bela ŝranko.

”Vi konas tiun ĉi ĉambron, Mason,” diris nia kondukanto, ”estis ja ĉi tie, kie ŝi mordis vin kaj penis trapiki vin per ponado.”

Li levis la kurtenon de la vando kaj aperigis al niaj okuloj duan pordon, kiun li ankaŭ malŝlosis.

En ĉambro sen fenestro brulis granda hela fajro, malantaŭ alta fortika kamentŝirmilo. Lampo pendis je ĉeno ligita al la plafono. Grace Poole staris kliniĝinta super la fajro kaj ŝajne sin okupis kuirante ion en kaserolo. En la fundo de la ĉam-

bro sen halto iris tien kaj reen iu stranga figuro en profunda ombro. Je la unua rigardo oni ne povis distingi, ĉu tiu figuro estas besto aŭ homa estaĵo. Estis kvazaŭ ĝi iris kvarpiede. Ĝi eligis krietojn kiel sovaĝa besto. Sed ĝi estis kovrita per vestoj kaj griziĝantaj sovaĝecaj kolharoj kovris la kapon kaj la vizaĝon.

”Bonan matenon, sinjorino Poole!” diris sinjoro Rochester. ”Kiel vi fartas? Kaj kiel fartas hodiaŭ via ŝarĝo?”

”Mi vin dankas, sinjoro,” respondis Grace, ”Ni ambaŭ fartas sufiĉe bone.” Ŝi metis la kuirantan manĝaĵon singarde sur la kamenkornicon. ”Sufiĉe malafabla ŝi estas, sed ne furioza.”

Sovaĝa krio ŝajne volis malpravigi tiun favoran raporton. La vestita hieno leviĝis kaj staris rekte sur la malantaŭaj piedoj.

”Ho, sinjoro. Ŝi vidis vin!” kriis Grace; ”estus pli bone, se vi forirus!”

”Nur kelkajn minutojn, Grace, kelkajn minutojn vi devas permesi al mi.”

”Sed estu singarda, sinjoro! pro la volo de Dio estu singarda!,”

La frenezulino eligis blekegadon. Ŝi forigis la sovaĝajn harojn de la vizaĝo kaj bestmaniere rigardis siajn vizitantojn. Mi tuj rekonis tiun bluruĝan vizaĝon, — tiujn ŝvelintajn trajtojn. Sinjorino Poole proksimiĝis.

”Iru flanken,” diris sinjoro Rochester dum li forpuŝis ŝin de si, ”mi esperas, ke ŝi en ĉi tiu momento ne havas tranĉilon; krom tio mi atentus.”

”Neniam mi povas scii, kion ŝi havas, sinjoro; ŝi estas tiel ruza, estas neeble kompreni ŝian ruzecon.”

”Estus plej bone se ni forirus,” flustris Mason.

”Iru al la diablo!” rekomendis al li lia bofrato.

”Atentu!” kriis Grace. Samtempe la tri sinjoroj iris al la fundo.

Sinjoro Rochester puŝis min malantaŭ sin: la frenezulino sin ĵetis sur lin, furioze kaptis lian gorĝon kaj ŝiaj dentoj penetris lian vizaĝon. Ili ekluktis. Ŝi estis fortega virino, preskaŭ same alta kiel ŝia edzo, krom tio ŝi estis korpulenta. En ĉi tiu luktado ŝi montris viran fortecon; pli ol unu fojon ŝi estis premsufokonta lin. Per unu bone celita batego li povus surterigi ŝin; sed li ne volis bati, li volis nur lukti. Fine li estis kapabla kapti ŝiajn brakojn; Grace Poole donis al li ŝnuron, ke li ligu ŝiajn brakojn sur ŝia dorso; per dua ŝnuro, kiun rapide oni al li donis, li ligis la frenezulinon sur seĝo. Ĉio tio okazis dum blekanta kriado, kaj la ligitino konvulsie penis liberigi sin. Nun sinjoro Rochester sin turnis al la ĉeestantoj. Li rigardis ilin kun ridetado, kiu estis amara kaj senkonsola.

”Jen mia edzino!” li diris. ”Jen la sola ĉirkaŭbrako, kiun mi povas atendi de mia edzino — jen la karesoj, kiuj devus konsoli min! — Kaj estas ĉi tiu, kiun mi sopiris posedi, (li metis sian manon sur mian ŝultron) ĉi tiu juna knabino, kiu tiel serioze kaj kviete staras apud la faŭko de la infero kaj kiu trankvile rigardas kun mi la saltetojn de demono. Mi sopiras ŝin — nur kvazaŭ ŝanĝon post tiu pikanta raguo. Wood kaj Briggs! Rigardu do la diferencon! Komparu ĉi tiujn klarajn okulojn kun tiuj ruĝaj kugloj — komparu ĉi tiun vizaĝon kun tiu masko — ĉi tiun formon kun tiu dika fiamaso — kaj poste kondamnu min, ho pastro de la evangelio kaj viro de la tribunalo. Sed memoru, ke vi estos juĝataj pro la sama juĝo, laŭ kiu vi juĝos! Nun foriru de ĉi tiu loko, mi devas ŝloskaŝi mian trezoron.”

Ni ĉiuj eliris el la ĉambro. Sinjoro Rochester restis tie ankoraŭ momenton por doni siajn ordonojn al Grace Poole.

Kiam ni malsupreniris la ŝtuparon, la advokato sin turnis al mi.

”Vi, fraŭlino,” li diris, ”estas senigita de ĉiu mallaŭdo: via onklo ĝojos, aŭdante tion, se li vivas ankoraŭ — kaj kiam sinjoro Mason estos reirinta al Madejro.”

”Mia onklo! Kion vi scias pri li? Ĉu vi konas lin?”

”Sinjoro Mason konas lin. Sinjoro Eyre dum kelkaj jaroj estis la korespondanto de lia domo en Funchal. Kiam via onklo ricevis vian leteron, en kiu vi skribis pri via intenco edziniĝi kun sinjoro Rochester, sinjoro Mason okaze estis en Madejro pro sia resaniĝo kaj tie li intencis pasigi kelkajn semajnojn ĉe via onklo, antaŭ ol revojaĝi al Jamajko. Dum interparolo sinjoro Eyre okaze sciigis al li pri via letero, ĉar li bone sciis, ke mia kliento konis iun sinjoron nomitan Rochester. Sinjoro Mason, kiu kiel vi povas imagi, estis mirigita kaj konsternita, tiam malkovris la tutan situacion de la aferoj. Mi bedaŭras devi sciigi al vi, ke via onklo nun estas tiel malsana, ke verŝajne li ne resaniĝos — se oni pensas pri la speco de lia malsano, la ftizo, kaj pri la stadio, kiun ĝi jam atingis. Li mem tial ne povis rapidi Anglujon, por liberigi vin el la kaptilo, en kiun vi trafis; sed li petegis sinjoron Mason ne perdi unu momenton kaj senprokraste kapti la rimedojn por malhelpi ĉi tiun kontraŭleĝan geedziĝon. Li turnigis lin al mi kaj petis mian kunhelpon. Mi aplikis la plej grandan rapidon kaj estas feliĉa, ke mi ne venis tro mafrue. Kaj mi ne dubas pri tio, ke same vi estas. Se morale mi ne estus certa, ke via onklo jam mortis antaŭ ol vi atingos Madejron, mi konsilus al vi vojaĝi tien kune kun sinjoro Mason; sed en la nunaj cirkonstancoj

mi opinias, ke estas pli bone por vi resti en Anglujo, ĝis vi ricevis sciigon de aŭ pri sinjoro Eyre.”

”Ĉu vi atendas ankoraŭ ion?” li demandis turnante sin al sinjoro Mason.

”Ne, ne — ni tuj foriru,” kun timo respondis la alia, kaj ne adiaŭinte sinjoron Rochester, li rapide foriris tra la halpordego. La pastro restis por diri al sia fiera paroĥano kelkajn vortojn de konsolo aŭ de mallaŭdo. Farinte sian devon ankaŭ li foriris.

Mi aŭdis lin foriri, kiam mi staris apud la duone malfermita pordo de mia ĉambro, en kiun mi estis retirinta min. Post kiam ĉio kvietiĝis en la domo kaj mi sciis, ke ĉiuj fremduloj estas for, mi enŝlosis min, riglis la pordon, por ke neniu ĝenu min kaj komencis — ho ne, mi ne komencis vekrii kaj laŭte malĝoji; mi estis ankoraŭ tro kvieta por fari tion — sed senkonscie demetis mian edziĝvestaĵojn anstataŭante ilin per la lanaj, kiujn mi portis ankoraŭ en la pasinta tago kaj, kiel mi tiam esperis, la lastan fojon. Poste mi sidiĝis. Mi sentis min lacega. Mi metis la brakojn sur la tablon kaj sur ilin mian kapon. Nun mi komencis pripensi. Ĝis tiu momento mi estis nur aŭdinta, rigardinta kaj movinta min — mi estis irinta supren kaj malsupren kien oni kondukis kaj puŝis min — mi estis vidinta, kiel unu terura okazintaĵo sekvis alian, — nur nun mi komencis pensi!

La mateno, kun escepto de la mallonga okazintaĵo kun la frenezulino, estis estinta sufiĉe kvieta. La sceno en la preĝejo estis okazinta sen bruo, sen laŭta disputo, sen perforto, neniu estis defiinta, rifuzinta aŭ verŝinta larmojn. Estis parolitaj nur malmultaj vortoj, nome kviete dirita protesto kontraŭ la edzigo, nur kelkaj rigoraj demandoj de la flanko de sinjoro

Rochester; respondoj kaj klarigoj estis donitaj kaj pruvoj liveritaj; mia sinjoro kaj ordonanto publike estis konfesinta la veron, — kaj poste ni vidis la vivantan pruvon! Nun ĉiuj tiuj entruduloj jam foriris. — Ĉio finiĝis!

Kiel kutime, mi estis en mia ĉambro — kaj mi estis mi mem, sen la plej malgranda videbla ŝanĝiĝo. Mi ne estis vundita — neniu estis batinta, neniu estis ofendinta min! — Sed malgraŭ tio! Ĉu mi estis la hieraŭa Jane Eyre? — Kie estis ŝia vivo? — Kie estis ŝia espero por la vivo?

Jane Eyre, kiu preskaŭ estis amata edzino plena de espero — estis ree malvarma, rigida, soleca knabino. Ŝia vivo estis senkolora, ŝiaj atendoj senkonsolaj. En la somermeza tempo jam venis severa vintrofrostoj; rigida decembra ventego jam regis en junio; sul la maturiĝantaj fruktoj kuŝis prujno; neĝoventoj premis la rozburĝonojn; glacia mortotuko kovris la florantajn herbejojn kaj ondiĝantajn grenkampojn; vojoj kun plektobariloj, kiuj hieraŭ brilis pro la odorantaj floroj, estis nun neĝ-difektitaj kaj malfacile ireblaj; kaj la arbaroj, brumoviĝantaj antaŭ dek du horoj kvazaŭ tropikaj, kuŝis nun sovaĝaj kaj blankaj kiel abiaj arbaroj en vintra Norvegujo. Ĉiuj miaj esperoj estis formortintaj sub terura juĝo, kiel antaŭe mortis en unu sola nokto ĉiuj unuenaskitoj egiptaj. Mi rigardis miajn plej karajn dezirojn — hieraŭ ili estis ankoraŭ tiel brilaj kaj ridantaj — ili nun kuŝis tie kiel malvarmaj, rigidaj, palaj mortintoj, kiujn nenio povis plu revoki al la vivo. Tiam mi rigardis mian amon: tiun senton, kiu apartenis al mia sinjoro —, kiun li estis vekinta; ĝi vivis en mia koro kiel malsana infano en malvarma, malmola lulilo; angoro kaj malsano kaptis ĝin; ĝi ne povis plu serĉi la brakon de sinjoro Rochester — sur liabrusto ĝi ne povis plu trovi vivovarmon. Ho,

neniam plu ĝi povos peti lian protekton, ĉar la fido forflugis — la konfido estis neniigita! Sinjoro Rochester ne estis plu al mi, kiu li antaŭe estis, ĉar li ne estis tia, kia mi pensis lin. Mi tamen ne volis atribui al li malvirtecon. Mi ne volis diri, ke li trompis min, sed pensante pri li, mi ne plu pensis pri senmakula viro. Kaj nun mi devos foriri de lia ĉeesto — tion mi klare komprenis kaj sentis. Sed mi ankoraŭ ne sciis kiam — kiel — kien. — Tamen mi estis certa pri tio, ke li kiel eble plej rapide foririgas min el Thornfield. Ŝajnis, al mi, ke li neniam sentis por mi veran amon. Ĉio estis nur nekonstanta pasio, kies kontentigo estis malsukcesigita; li ne bezonos min plu! Mi eĉ timis renkonti lin: li ja malamos mian alrigardon. Ho! kiel blindaj do antaŭe estis miaj okuloj! Kiel kompatinde malforta mia sinteno!

Miaj okuloj estis kovritaj kaj fermitaj. Turniĝanta mallumo ŝajnis ĉirkaŭi min; kiel nigra, flamanta torento la pensoj sin ĵetis sur min. Mi estis tro malforta por ion peni; estis al mi, kvazaŭ mi kuŝas en la sekiĝinta kuŝujo de granda rivero: mi aŭdis kvazaŭ bruantan torentegon, kiu malsupren rapidis de malproksimaj glacimontoj, mi sentis, ke la torento estas proksimiĝonta — sed mi ne havis la kuraĝon leviĝi, nek por forkuri. Senforta mi kuŝis tie; mi aspiris nur la morton! Nur unu sola penso sin trudis al mi: la penso al Dio. Kaj ĝi vekis en mi nediritan preĝon; la vortoj moviĝis tien kaj reen en mia malluma animo kiel io, kio devas esti frustrata: sed mi ne havis la energion elflustru ilin:

”Restu apud mi, ho Dio, ĉar la provo proksimiĝas kaj neniu helpanto ĉeestas!”

Ĝi estis tiel proksima, kaj ĉar mi ne sendis la preĝon al la ĉielo por eviti ĝin — ĉar mi ne plektis la manojn, nek genu-

is, nek movis la lipojn — ĝi venis per grandaj pezaj ondoj, la torento sin ĵetis sur min. En formo de griza teruriga maso, la konscio de mia ruinigita vivo, de mia perdita amo, de mia estingiĝinta espero, de mia mortinta fido, torente fluis trans min. Mi ne povis priskribi tiun teruran momenton. En vero: la torento enfluis en mian animon; mi dronis en profunda marĉo, apogo mankis al mi, mi trafis en la fundon, — la ondoj plue bruis trans min.

## Ĉapitro XXVII

**L**a posttagmezo venis kaj mi levis la kapon, rigardante ĉirkaŭe mi vidis, ke la lastaj radioj de la subiranta suno falis sur la vandon de mia ĉambro kaj mi demandis: "Kion mi nun faros?"

Sed la respondo, kiun donis mia animo al mi: "Tuj forlasu Thornfield" — sekvis tiel rapide, tiel terure rapide, ke mi ŝtopis miajn orelojn. Mi diris, ke mi ne povas nun aŭdi tiajn vortojn. "La plej malgranda parto de miaj suferoj estas, ke mi ne estas la edzino de Edward Rochester," mi certigis. "Terure estas, ke mi vekiĝas el miaj ravaj sonĝoj kaj trovas ilin ĉiujn vantaj kaj trompaj, sed tio estas io suferebla kaj venkebla; tamen nesufereble estas, ke mi devas forlasi lin tuj kaj por ĉiam! Kaj tion mi ne povas!"

Sed tiam interna voĉo certigis min, ke mi tamen povos tion kaj ĝi antaŭdiris al mi, ke mi faros tion. Mi luktis kontraŭ mia propra decido; mi volis esti malforta, por eviti la vojon de estontaj suferoj, kiun mi tiel klare vidis antaŭ mi; kaj mia konscienco, fariĝinte tirano, kaptis la pasion je la kolo kaj make diris al ĝi, ke ĝi ĝis nun tuŝis nur per unu piedo la ŝlimon kaj ĵuris, ke ĝi per fera brako ĵetos ĝin en la ne sondeblan profundon de la agonio.

"Fortiru min do!" mi kriis. "Iu alia devas helpi min!"

"Ne, vi mem devas ŝirliberigi vin, neniu devas helpi vin. Vi mem elŝiros al vi la dekstran okulon, vi mem devos dehaki al

vi la dekstran manon. Via koro estu la ofero kaj vi mem la pastrino, kiu oferos ĝin.”

Subite mi salte leviĝis, terurita pro la soleco, en kiu parolis tiu senkompata juĝisto — pro la senbruo, tra kiu sonis nur tia terura voĉo. Mi sentis kapturniĝon tiel starante tie. Mi sentis, ke mi fariĝas malsana pro eksciteco kaj trolaceco. Tiun tagon nek manĝaĵo nek trinkaĵo tuŝis miajn lipojn, mi eĉ ne matenmanĝis. Kaj per strange doloranta malĝojo min trafis la penso, ke neniu informiĝis pri mi, kiel mi fartas, ke neniu homa voĉo invitis min veni malsupren. Eĉ la malgranda Adèle ankoraŭ ne estis frapinta la pordon kaj ankaŭ sinjorino Fairfax ne vizitis min.

”Amiko ĉiam forlasas tiujn, kiujn forlasis la feliĉo,” mi murmuris, kiam mi fortiris la riglilon kaj eliris. Mi faletis pro malhelpaĵo, mia kapo sentis ankoraŭ la turniĝadon, mia rigardo estis malklara kaj miaj korpo-membroj malfortaj. Nur malrapide mi povis rekonsciiĝi. Tiam mi falis, sed ne teren, etendita brako kaptis min; mi rigardis supren — sinjoro Rochester apogis min! En brakseĝo li estis gardinta antaŭ la sojlo de mia ĉambro.

”Fine vi do eliras,” li diris. ”Jam tiel longe mi atendis vin kaj aŭskultis, sed mi ne aŭdis la plej mallaŭtan brueton, nek movon nek plorĝemadon. Post kvin pluaj minutoj da tia morta silento mi estus perforte rompinta tiun pordon, kiel rabisto. Sekve vi volas eviti min? — Vi enŝlosas vin kaj malĝojas tute sola! Pli bone mi eltenus, se vi estus veninta por fari al mi akrajn riproĉojn. Vi estas pasia: mi atendis ian scenon. Mi estis preparita al varmega plorfluado: sed mi nur volis, ke vi verŝus ĝin sur mian bruston. Nun kompata tapiŝo aŭ via malseka poŝtuko ensorbis ĝin. Sed ne; mi eraras! Vi tute ne plo-

ris! Mi vidas palajn vangojn kaj lacajn okulojn — sed neniun postsignon de larmoj. Tial mi supozas, ke via koro ploris sangon?”

”Nu, Jane? Neniu vorto de riproĉo? Neniu amaraĵo? — neniu akra ekbolo de pasio? neniu ofendo? Kviete vi tie sidas, kie mi sidigis vin kaj rigardas min per lacaj, suferantaj okuloj?”

”Ho Jane, mi ne volis tiel profunde vundi vin. Kiam viro, posedanta nur unu ŝafideton, kiu estis kara al lia koro, kiel lia infano, kiu manĝis de lia pano kaj trinkis el lia pokalo, kiu ripozis sur lia koro — se la viro per iu eraro ĝin buĉus sur buĉotablo — li ne povus pli penti sian sangan eraron ol mi nun pripentas mian. Ĉu iam vi povus pardoni min?”

Leganto! mi jam pardonis al li en tiu sama momento. En liaj okuloj mi vidis tian profundan penton, tian veran kompaton mi aŭdis en lia voĉo, tiom da vira energio mi vidis en ĉio, kion li nun diris kaj faris! Krom tio liaj rigardoj kaj aspekto montris tiom da neŝanĝita amo — mi pardonis al li ĉion! Sed ne per vortoj, — nur en la plej profunda loko de mia koro.

”Vi scias Jane, ke mi ne estas mizerulo kaj fripono?” li demandis malĝoje post kelkaj momentoj. Li miris pro mia seninterrompa silentado, pro mia okulŝajna kvieto. Ili pli multe devenis de mia malforteco ol de mia volo.

”Jes, sinjoro.”

”Se ne, diru tion senhezite, per akraj, koleraĵoj vortoj. Ne indulgu min, ho ne indulgu min!”

”Mi ne povas. Mi estas laca kaj malsana; mi dezirus iom da akvo!”

Li eligis tremantan ĝemon; tiam li prenis min sur la brakojn kaj portis min malsupren. Komence mi ne sciis, en kiun

ĉambro li portis min; ĉio estis nebula antaŭ miaj vitrecaj okuloj; sed baldaŭ mi sentis la revivigantan varmon de fajro, ĉar malgraŭ la somero, en mia ĉambro estiĝis frostmalvarme. Li metis glason da vino al miaj lipoj, mi trinketis kaj sentis reveni miajn fortojn; poste mi manĝis iom, kion li portis al mi — kaj baldaŭ mi estis denove mi mem. Mi estis en la libreja ĉambro — mi sidis sur lia seĝo — li estis tute proksima al mi.

Mi pensis: "Se mi povus nun eliri el ĉi tiu vivo ne suferante tro grandan doloron, tiam mi estus feliĉa, tiam mi ne bezonus tiel peni disŝiri mian koron, forkurante de sinjoro Rochester. Sed mi devas forkuri de li. Ho jes, mi devas. Sed mi ne volas forlasi lin — mi ne povas forlasi lin."

"Kiel nun vi sentas vin, Jane?"

"Multe pli bone sinjoro. Mi baldaŭ sentos min ree tute bone."

"Trinku ankoraŭ iom da vino, Jane."

Mi trinkis. Li metis la glason sur la tablon, ekstaris antaŭ mi kaj atente min rigardis. Subite li deturnis sin de mi, subpremante ekkrion, per kiu li volis eligi sian tutan emocion. Poste li iris tien kaj reen en la ĉambro kaj revenis al mi; li sin klinis kvazaŭ li volus kisi min; sed mi pensis pri tio, ke ĉiuj karesoj nun estas malpermesitaj. Mi turnis mian kapon kaj puŝis lian flanken.

"Kion!?" li kriis abrupte. "Ho! mi ja scias, vi ne volas kisi la edzon de tiu Bertha Mason? Vi opinias, ke mi jam posedas estaĵon, kiu rajtas ricevi miajn karesojn!"

"Ĉiuokaze, sinjoro, ĉi tie ne estas plu loko por mi, ĉar mi ne rajtas je ĝi."

"Kial Jane? Mi volus ŝparigi al vi la penon multon diri. Mi

volas respondi por vi. Ĉu ne vere, vi volis respondi al mi, ke mi havas edzinon — ĉu mi ĝuste divenis?”

”Jes.”

”Opiniante tiel vi havas pri mi strangan ideon. Vi devos rigardi min kiel malbonan senvirtan friponon, kiu hipokritis al vi dediĉantan amon por logi vin en bone pripensitan kaptilon kaj rabi viajn honoron kaj memestimon. Kion vi nun respondos al tio? Mi vidas, ke vi ne kapablas ion diri. Unue vi estas ankoraŭ laca kaj nur kun peno povas spiri, due vi ne povas kutimiĝi al tio, kio okazis, por kulpigi kaj insultiproĉi min. Krome viaj larmo-kluzoj estas malfermitaj kaj ili transfluus, se vi parolus tro multe. Ankaŭ vi ne deziras fari al mi riproĉojn, nek postuli klarigon aŭ fari scenon. Vi pensas pri tio, kiel agi — la parolon vi konsideras superflua. Mi konas vin — mi scios kontraŭagi.”

”Ho, sinjoro, mi tute ne intencas agi kontraŭ vi,” kaj mia malfirma voĉo admonis min interrompi la frazon.

”Ne laŭ la senco de viaj vortoj, sed en miaj vi intencas neniigi min. Vi ja diris, ke mi estas edziĝinta viro — la edziĝintan viron vi volas eviti, vi volas iri el lia vojo — vi ĵus rifuzis kisi min. Vi intencas fremdiĝi antaŭ mi; vivi en ĉi tiu domo nur kiel la guvernistino de Adèle. Kaj se mi diros al vi amikan vorton, — se iam amika sento ree povos en mi naskiĝi, vi diros:

’Tiu viro preskaŭ faris el mi sian amatinon, por li mi povas esti nur glacio kaj marmoro’, — kaj tuj vi estiĝos glacio kaj marmoro.”

Mi penis firmigi mian voĉon por respondi:

”Ĉio ĉirkaŭ mi kaj por mi ŝanĝiĝis, sinjoro: tial necesas, ke ankaŭ mi fariĝu alia persono — pri tio ne ekzistas dubo, kaj

por eviti ŝanceliĝadon de sentoj, por eviti daŭran bataladon de la rememoro de mia amo, troviĝas nur unu elirejo: — Adèle devos havi alian guvernistinon.”

”Ho! Adèle iros al edukejo; tion mi jam decidis; ankaŭ mi ne intencas turmenti vin per la teruraj rememoroj al Thornfield Hall — al tiu malbenita loko — al tiu tendo de Aĥan — al tiu senhonta konstruaĵo, kiu montras al la ĉiela taglumo la abomenaĵon de vivanta mortinto — al tiu malvasta ŝtona infero kun sia vera diablo — kiu estas pli malbona ol legio da tiaj, naskitaj de nia fantazio. — Jane, vi ne restos ĉi tie, nek mi. Malprave mi agis, venigi vin al Thornfield Hall, ĉar mi sciis, ke ĝi estas fantomvizitata. Longe antaŭ ol mi vidis vin, mi ordonis al ĉiu en la domo, zorge kaŝi antaŭ vi ĝian malbenon, ĉar mi timis, ke neniam guvernistino volus resti ĉe Adèle sciante, kun kiu ŝi loĝos sub la sama tegmento. Kaj neniam mi intencis konduki tiun frenezulinon al alia loko, kvankam mi posedas malnovan domon (Ferndean Manor), kiu estas ankoraŭ pli kaŝita kaj pli izolita ol ĉi tiu, kaj kie mi povus kaŝi ŝin ankoraŭ pli bone. Sed skrupuloj pro la malsaniga loko, kuŝanta en la mezo de densa arbaro, timigis mian konsciencon preni tiajn aranĝojn. Verŝajne la mucidaj muroj baldaŭ senigus min de la terura ŝarĝo; sed ĉiu krimulo havas sian specialan krimon! Mia krimo ne emas peran mortigon, eĉ ne kontraŭ tiu estaĵo, kiun mi tiel senlime malamas.”

”Kaŝi por vi la proksimecon de tiu frenezulino tamen estis tiel saĝe, kiel se oni kaŝus infanon per mantelo kaj metus ĝin apud upason; la proksimeco de ĉi tiu demono estas venenita kaj ĉiam ĝi estis tia. Sed mi foriros el Thornfield Hall kaj ŝlosos ĝin, mi najlfermos la grandan enirejon kaj la subajn fenestrojn mi plenigos per brikoj; al sinjorino Poole mi ĉiu-

jare donos ducent sterlingajn funtojn por vivi ĉi tie kun *mia edzino*, kiel vi nomas tiun abomenan virinaĉon. Por mono Grace faras multon, kaj havos ĉe si sian filon, la kampgardiston de Grimsby-hejmo, por ke li loĝu kun ŝi kaj estu apude por protekti ŝin, kiam *mian edzinon* kaptos ŝiaj paroksismoj kaj ŝia malbona spirita instigos ŝin forbruligi nokte la homojn en ilia lito, atakos per ponardo, aŭ per la dentoj disŝiros al ili la karnon kaj tiel plu.”

”Sinjoro,” interrompis mi lin,” vi estas senkompata rilate al tiu malfeliĉa virino; vi parolas pri ŝi kun malamo. Tio estas terura — ĉu ŝi estas kulpa, ĉar ŝi estas freneza?”

”Jane, mia eta karulino, (tiel mi ĉiam nomos vin, ĉar tia vi restos al mi) vi ne scias, kion vi diras; denove vi malbone juĝas min. Mi ne malamas ŝin, ĉar ŝi estas freneza. Ĉu vi kredas, ke mi malamus vin, se vi estus freneza?”

”Tion vere mi kredas, sinjoro.”

”Tiam vi eraras kaj ne konas min; tiam vi ne komprenas tiun amon, kiun mi kapablas senti. Ĉiu atomo de vi mem estas al mi tiel kara, kiel mia propra, ĝi restos al mi same kara en mizero, doloro kaj malsano. Via spirito estas mia trezoro — kaj se ĝi rompiĝus, ĝi malgraŭ tio restos mia trezoro; se vi delirus, miaj brakoj ĉirkaŭprenus vin, sed ne kiel frenezuljako, kaj via tuŝo eĉ en frenezo estus al mi ĝuego. Se vi sovaĝe atakus min, kiel tion faris tiu virino hodiaŭ matene, mi ĉirkaŭbrakus vin kaj klopodus kvietigi vin per karesoj. Mi ne forturnus min de vi kun naŭzo kiel de tiu virino; en viaj kvietaj momentoj vi havus min kiel flegiston; mi prizorgus vin kun nelacigebla dediĉo, eĉ se vi ne dankus min per nur unu rideto; neniam mi laciĝus, rigardi en viajn okulojn eĉ se neniu radio de rekono brilus al mi renkonte. — Sed kial paroli plue

pri tio? Mi ja diris, ke mi intencas forkonduki vin de Thornfield. Vi scias, ke ĉiuj preparoj de baldaŭa forvojaĝo jam estas faritaj. Jam morgaŭ vi foriros. Mi petas vin, Jane, eltenu ankoraŭ unu nokton sub ĉi tiu tegmento; kaj poste finiĝu por ĉiam ĉiuj ĉi tiuj mizeroj kaj teruraĵoj! Mi konas lokon, kien ni povos iri, ĝi estas certa sanktejo kaj fortika rifuĝejo kontraŭ malamataj rememoraĵoj, ĝi protektos nin kontraŭ nebonvenaj vizitantoj — eĉ kontraŭ falsaĵo kaj kalumniado.”

”Kaj ĉu vi kunkondukos Adèle, sinjoro?” interrompis mi, ”ŝi estos al vi bona akompanino.”

”Kion per tio vi intencas diri, Jane? Mi ja diris, ke mi sendos Adèle al edukejo; pro kio mi bezonus infanon kiel akompaninon? Kaj eĉ ne mia propra infano ŝi estas, sed infano de franca dancistino. Kial do vi ŝarĝus min per ŝi? Ankoraŭ unu fojon mi demandas, kial vi donas al mi Adèle kiel akompaninon?”

”Vi parolis pri soleco, sinjoro, kaj soleco estas malĝoja — tro malĝoja por vi.”

”Soleco! Soleco!” li kolerete kriis. ”Mi vidas, ke mi pli bone devos klarigi min. Mi ne komprenas la sfinksan esprimon sur via vizaĝo. Vi devos partopreni mian solecon. Ĉu vi min ne komprenas?”

Mi kapneis. La grado de kuraĝo estis necesa por doni tiun signon de rifuzo, ĉar mi estis tre ekscitita. Kelkan tempon li iris tien kaj reen en la ĉambro, subite li restis staranta kvazaŭ najlita sur la loko. Li longe kaj fikse rigardis min. Mi deturnis de li miajn okulojn kaj direktis ilin al la fajro, klopodante konservi kvietan sintenadon.

”Jen la hoko en la karaktero de Jane,” li fine diris; li parolis pli kviete ol mi povus atendi laŭ liaj rigardoj. ”La silko-

bobeno ĝis ĉi tie turniĝis senbrue kaj sen malhelpo; sed mi jam sciis, ke venos la nodo. Jen ĝi estas. Kaj nun venos ĉagreno, senespero kaj senfina mizero! Je Dio! Mi sentas la deziron uzi atomon de la fortoj de Ŝimŝon por disŝiri la implikaĵon kiel stupon!”

Denove li ekiris tien kaj reen; sed baldaŭ li ree haltis kaj tuj antaŭ mi.

”Jane, ĉu vi fine volas esti prudenta?” Li sin klinis super mi kaj liaj lipoj tuŝis mian oreilon. ”Ĉar se vi ne estos tia, mi uzos perforton.”

Lia voĉo estis raŭka. Lia esprimo estis de viro, kiu tuj disrompos nesufereblan katenon kaj kiu estis ĵetonta sin en sovaĝan senbridecon. Mi komprenis tion tuj, kaj se lia koloro pligrandiĝus ankoraŭ je unu atomo, mi ne estas plu kapabla reteni lin. Tiu tuja momento — ĝi estis nur unu sekundo — estis ĉio, kio apartenis al mi, nur nun mi povus retenigi kaj regi lin; se mi montrus movon de abomeno aŭ de timo, mia sorto kaj ankaŭ lia estus konfirmita. Sed mi ne timis — ne unu minuton! Mi sentis en mi forton, kiu subtenis min. La krizo estis danĝera, sed ĝi havis sian ĉarmon, kian eble spertas indiano, kiam li en sia boateto rapidas trans rapidfluon. Mi kaptis lian pugnigitan manon, disigis la tremantajn fingrojn kaj diris kvietigante:

”Sidiĝu. Mi volas paroli kun vi tiel longe, kiel vi deziras; mi volas ĉion aŭskulti, kion vi havos por diri, indiferece, ĉu ĝi estos saĝa aŭ malsaĝa.”

Li sidiĝis, sed ne tuj ekparolis. Jam longe mi perforte retenis miajn larmojn sciante, ke li ne devos vidi min plori. Sed nun mi opiniis, ke estas pli bone libere lasi ilin flui tiel longe,

kiel ili volus. Estus des pli bone, se ili ĉagrenus lin. Mi ne plu retenis ilin kaj laŭkordezire ploris.

Baldaŭ mi aŭdis, ke li serioze petis min kvietiĝi. Mi respondis, ke mi ne povas, kiam li estas en tia kolero.

”Sed mi ne estas en kolero, Jane. Mi nur tro multe vin amas — jen ĉio. Kaj via eta pala vizaĝo aspektis tiel malvarma, tiel decidita, ke mi ne povis elteni tion. Nun kvietiĝu kaj sekigu viajn okulojn.” Lia voĉo montris al mi, ke li estas venkita; tial ankaŭ mi fariĝis pli kvieta. Nun li klopodis meti la kapon sur mian ŝultron, sed tion mi ne volis toleri. Li volis ĉirkaŭbraki min — sed ankaŭ tion mi ne konsentis.

”Jane! Jane!” li diris kun tia amara malĝojo, ke ĉiu nervo de mia korpo ekstremis.

”Ĉu vi ne plu amas min? Vi do nur celis la rangon de mia edzino? Nun, ĉar mi ne plu povos estiĝi via edzo, vi repuŝas min kaj evitas miajn tuŝojn, kvazaŭ mi estus bufo aŭ simio.”

Tiuj paroloj tratranĉis mian koron. Sed kion mi povus? Eble mi devus diri aŭ fari tute nenion, sed mia konscienco riproĉis min, ke mi vundis lian senton, kaj mi ne povis kontraŭstari la deziron eligi la sanigan balzamon sur lian vunditan koron.

”Mi amas vin,” mi diris, ”pli ol iam. Sed mi ne povas plu montri tiun senton, kaj por la lasta fojo mi konfesas tion al vi.”

”Por la lasta fojo, Jane! Kion! Ĉu vi kredas, ke vi povos ĉiutage vidi min kaj vivi ĉe mi kaj tamen povos resti malvarma kaj kvazaŭ indiferenta?”

”Ne, sinjoro, mi certe scias, ke mi ne povus tion. Kaj tial mi konas nur unu solan vojon. Sed vi ree koleriĝos, kiam mi nomos ĝin.”

”Ho, nomu ĝin! Kiam mi bruas kaj koleras, tiam vi posedas la arton plori.”

”Sinjoro Rochester — mi devas foriri de vi.”

”Kiom da tempo, Jane? Malmultajn minutojn por ordigi viajn harojn, kiuj malordiĝis aŭ por malvarmigi al vi la vizaĝon, kiu febre ardas?”

”Mi devas foriri de Adèle kaj de Thornfield. Mi devas por la tuta vivo foriri de vi! Mi devas komenci novan vivon inter fremduloj, sub fremda ĉielo.”

”Certe. Mi ja diris al vi, ke vi faru tion. Mi ne parolos plu pri la malsaĝa penso, ke ni diru unu de alia. Vi volas diri, ke vi devos fariĝi parto de mi. Rilate al la nova vivo, vi pravas. Tamen vi devos estiĝi mia edzino: mi ne estas edziĝinta. Vi fariĝos sinjorino Rochester ne nur laŭ la nomo sed reale. Mi tenos min je vi tiel longe kiel vi kaj mi vivos. Vi iros al bieno, kiun mi posedas en Sud-Francujo, ĝi estas amika, blanka kampodomo apud la bordo de la Meza Maro. Tie vi ĝuos feliĉan, protektitan kaj senkulpan vivon. Ne timu, ke mi povus delogi vin al peko — ke mi volus fari vin mia amatino! Kial vi kapneas? Jane, estu saĝa, alie la kolero vere min denove regos.”

Lia voĉo kaj lia mano tremis; liaj okuloj brilis; malgraŭ tio mi kuraĝis paroli.

”Sinjoro, via edzino vivas; tio estas fakto, kiun en ĉi tiu mantenado vi mem konfesis. Mi estus nur via amatino, se mi vivus ĉe vi kiel vi deziras, — estas sofismo diri ion alian.

”Jane, mi ne estas dolĉanima viro — pri tio vi ne pensas. Mia pacienco ne estas granda. Mi ne havas malvarman, senpasian karakteron. Pro kompatado al mi kaj al vi, metu vian manon sur mian pulson, sentu kiel ĝi batas kaj — gardu vin!”

Li nudigis la manartikon kaj etendis ĝin al mi, la sango estis forfluinta el liaj vangoj kaj lipoj, ili estis kadavre blankaj. Mi sentis min nedireble mizera. Estis terure eksciti lin plue per kontraŭstaro, kiun li tiel abomenis.

Tamen cedi al li estis io neebla. Mi faris, kion ĉiu homo instinkte faras, kiam li estas pelita ĝis ekstremo — petante helpon mi suprenrigardis al tiu, kiu helpas, kiam homa helpo estas vana: la paroloj "Dio helpu al mi!" eliris senkonscie el inter miaj lipoj.

"Mi estas malsaĝulo!" kriis sinjoro Rochester subite, "Mi ripete certigas al ŝi, ke mi ne estas edziĝinta, sed ne klarigas la tialon. Mi ne pensis pri tio, ke ŝi scias nenion pri la karaktero de tiu virino, nek pri la cirkonstancoj, kiuj akompanis nian unuiĝon. Ho, mi estas certa, ke Jane samopinios kun mi, kiam ŝi scios ĉion, kion mi scias! Nun metu vian manon sur mian, Jane, por ke mi sentu vian tuŝon, por ke mi sciu, ke vi estas proksima — kaj per malmultaj vortoj mi klarigos al vi la veran staton de la aferoj. Ĉu vi volas aŭskulti?"

"Jes, sinjoro, multajn horojn, se vi deziras."

"Mi petas nur minutojn, Jane, ĉu vi neniam aŭdis aŭ ĉu vi scias, ke mi ne estas la pli aĝa filo de mia domo? Ke mi havas pli aĝan fraton?"

"Mi memoras, ke sinjorino Fairfax tion al mi rakontis."

"Ĉu vi ankaŭ aŭdis, ke mia patro estis avara, avidema viro?"

"Mi aŭdis ion pri tio."

"Kaj, Jane, ĉar tio estis vera, li decidis teni kunigitaj posedaĵon kaj financojn; li ne povis elteni la penson dispartigi siajn havaĵojn kaj doni al mi belan parton. Li decidis, ke mia frato Roland ricevu ĉion. Sed ankaŭ li ne povis elteni la pen-

son, ke unu el liaj filoj estos malriĉulo. Por mi li zorgos pere de riĉa edzino. Sinjoro Mason, riĉa komercisto kaj posedanto de plantejo en Okcidenta Hindio estis lia delonga amiko. Li estis certa pri tio, ke liaj posedaĵoj estas grandaj kaj realaj. Li informiĝis pri ĉio kaj eksciis, ke sinjoro Mason havas filon kaj filinon, kaj de li mem li estis aŭdinta, ke li estas inklina donaci al sia filino doton da tridek mil sterlingaj funtoj: tio sufiĉis. Kiam mi forlasis la universitaton, mi estis sendita al Jamajko por edzinigi la jam por mi elektitan fianĉinon. Mia patro diris nenion pri ŝia posedaĵo, sed li diris al mi, ke fraŭlino Mason pro siaj beleco kaj fiereco estas la fanfaronado de tuta Spanish Town. Tio ne estis mensogo. Mi trovis ŝin belulino — laŭ la stilo de Blanche Ingram: svelta, malhela, majesta. Ŝiaj parencoj deziris nian geedziĝon, ĉar mi estis de bona familio; kaj ankaŭ ŝi opiniis tiel. Ŝi estis prezentita al mi en brila kostumo kaj dum festetoj. Malofte mi vidis ŝin sola, kaj preskaŭ neniam mi interparolis kun ŝi private. Ŝi flatis min kaj montris al mi ĉiujn siajn belecon, konon kaj talentojn. Ĉiuj viroj en ŝia rondo ŝajnis admiri ŝin kaj envii min. Mi estis kvaŭzaŭ blindigita, plena de kuraĝo; miaj sentoj estis ekscititaj kaj estante juna, nesperta, mi kredis ami ŝin. Ne ekzistas malsaĝeco, kiel ajn granda, al kiu juna viro en siaj trorapideco kaj tro granda fervoro ne povas esti instigata pro la konkurado en societaj rondoj. Ŝiaj parencoj kuraĝigis min; kunamantoj stimulis min; ŝi allogis min, la geedziĝo fariĝis antaŭ ol mi konsciis, kio al mi okazis. Ho, mi perdas ĉiun memestimon pensante pri tiu faro! — agonio de interna malestimo tiam regas min. Neniam mi ŝin amis, neniam mi ŝin estimis — eĉ neniam mi konis ŝin. Mi ne estis certa pri la ekzisto de nur unu virto en ŝia karaktero; mi rimarkis nek modestecon, nek

bonkorecon, nek malkaŝemon, nek purecon de animo aŭ de konduto — malgraŭ ĉio tio mi: blinda, kruda, mallerta stultulo edziĝis kun ŝi! Kun pli malgranda peko mi povus — sed mi rememoru, al kiu mi parolas.

La patrinon de mia fianĉino mi neniam estis vidinta, mi kredis ŝin mortinta. Sed kiam pasis la mielmonato, mi eksciis, ke mi eraris; ŝi estis freneza kaj en frenezulejo. Ankaŭ vivis pli maljuna frato, muta idioto. La pli aĝa, kiun vi vidis ĉi tie (kaj kiun mi ne povas malami, kvankam mi sentas abomenon pri tuta lia parencaro), ĉar li ŝajnas havi en sia malforta kapo restaĵon da amo, kion li montras per sia daŭra intereso por sia mizera fratino, kaj ankaŭ per la hunda sindoneco, kiun li iam sentis por mi; eble ankaŭ li idiotiĝos post kelka tempo. Ĉion ĉi sciis mia patro kaj mia frato Roland; sed ili pensis nur al la granda doto kaj tial konspiris kontraŭ mi.

Tiuj malkovroj estis teruraj, sed nur al mia edzino mi faris riproĉojn pri tiuj perfidaj kaŝoj, al neniuj aliaj, eĉ ne tiam, kiam mi eksciis, ke ŝia karaktero estas tute kontraŭa al mia, ŝia animo estas malnobla, malvasta, kaj tute malkapabla okupiĝi pri pli altaj aferoj, — mi eĉ ne faris al ŝi riproĉojn kiam mi speritis, ke mi ne povas agrable kaj kviete pasigi kun ŝi unu solan vesperon, eĉ ne unu solan horon, ke amika interparolo kun ŝi estas neebla, ĉar ĉiun temon ŝi tuj ŝanĝas al banalaĵo — mi eĉ ne faris riproĉojn, kiam mi rimarkis, ke neniam mi havos kvietan, ordan mastrumadon, ĉar neniuj servantino povus toleri la daŭrajn ekbolojn de ŝiaj akraj malsaĝaj kapricoj aŭ la absurdajn tiranajn ordonojn de tia mastrino! Ankoraŭ ĉiam mi regis min kontraŭ ŝi! Mi evitis ĉiujn riproĉojn, mi faris nur malfortajn kontraŭ-proponojn; mi klopodis sekrete venki

mian ĉagrenon kaj subpremis la profundan antipation, kiun mi sentis.

Jane, mi ne volas turmenti vin per abomenaj detaloj. Kelkaj fortaj vortoj esprimos, kion mi havas por diri. Kun tiu virino mi vivis kvar jarojn, kaj antaŭ la paso de tiu tempo ŝi lacigis mian paciencon. Ŝia karaktero maturiĝis kaj disvolviĝis kun teruriga rapideco; ŝiaj malvirtoj tiel plimultiĝis, ke nur krueleco povus rompi ilin, sed kruelecon mi ne volis uzi. Kiel malgranda estis ŝia prudento, kaj kiel gigantaj estis ŝiaj malicaj inklinoj. Kiel terura estis la malbeno, kiun tiuj inklinoj kaŭzis al mi! Bertha Mason — la vera, inda filino de abomena patrino — trenis min tra ĉiuj senhonorigantaj kaj teruraj bataloj, kiujn viro devas travivi, alligita al virino, kiu samtempe estis malĉasta kaj — sin donis al drinkado.

Intertempe mia frato estis mortinta; kaj post paso de kvar jaroj ankaŭ mortis mia patro. Mi tiam estis sufiĉe riĉa, sed malgraŭ tio tre malriĉa: virino tiel kruda, tiel malĉasta kaj degenerita, kian mi ankoraŭ ne vidis alian, estis ligita al mi, kaj ne nur la societo, sed ankaŭ la leĝo nomis ŝin parto de mi mem. Kaj neniuj leĝoj povis senigi min de ŝi, ĉar la kuracistoj malkovris, ke mia edzino estas freneza. Ŝiaj ekscesoj maturiĝis antaŭtempe la ĝermojn de ŝia frenezeco. Jane, mi vidas, ke mia rakonto ne plaĉas al vi; vi aspektas malsana — ĉu mi rakontu plue alian fojon?"

"Ne sinjoro, rakontu nun plue. Mi profunde kompatas vin.

"Kompato, Jane, estas por iuj io insulta kaj neakceptinda, kion oni rajtas reĵeti al la vizaĝo de la altrudanto; sed tio estas tia kompato, kiu vekigigas en malsentemaj, egoistaj koroj. Ĝi estas egoista doloro, sentata dum oni aŭskultas la dolorojn de aliuloj, ĝi estas doloro je kiu oni sentas malsaĝan malestimon

por tiuj, kiuj suferis ilin. Sed tia ne estas via kompato, Jane. Ĝi ne estas la sento, kiu en ĉi tiu momento tiel klare respuguliĝas en viaj okuloj kaj kiu plenigas ilin de larmoj, kiu batigas pli rapide vian koron, kaj kiu tremigas vian manon en mia. Via kompato, mia karulino, estas la suferanta patrino de la amo. Ĝia doloro eĉ estas la naskdoloro de la dia pasio. Mi akceptas ĝin, Jane; tiu idino, la amo, venu — miaj brakoj estas etenditaj por ricevi ŝin.”

”Rakontu plue sinjoro! Kion vi faris, kiam vi eksciis, ke ŝi estas freneza?”

”Jane, mi estis freneziĝonta. Inter tiu stato kaj mi estis nur peceto da memestimo. Laŭ la opinio de la homoj mi estis verŝajne senhonorigita; sed mi decidis resti ĉasta laŭ mia propra opinio — kaj ĝis la ekstremo mi luktis kontraŭ la morala malpurigo kaj ĝiaj krimoj. Malgraŭ tio la societo kunligis ŝian nomon al mia, mian personon al ŝia. Mi vidis kaj aŭdis ŝin ĉiutage, ŝia spiro kvazaŭ fetorigis la aeron, kiun mi enspiris, krom tio mi rememorigis al mi konstante, ke iam mi estis ŝia edzo — tiu rememoro estis tiam kaj estas ankoraŭ nun nedireble abomena al mi. Plue — mi sciis, ke dum ŝia vivo, mi neniam povos estiĝi edzo de alia kaj pli bona virino; kaj kvankam ŝi estis kvin jarojn pli aĝa ol mi (ŝia familio kaj mia patro rilate al tio estis trompinta min) estis tamen verŝajne, ke ŝi vivos same longe kiel mi, ĉar ŝi estis tiel forta en la korpo kiel malforta en spirito. — Tiel mi staris tie kiel dudeksesjarulo — sen esperoj! — En unu nokto mi estis vekita de ŝiaj kriadoj — post kiam la kuracistoj deklaris ŝin freneza, ŝi kompreneble estis enŝlosita — tio okazis en varmega nokto en Okcidenta Hindio; unu el tiuj noktoj, kiuj ofte antaŭiras la ventegojn en tiu regiono. Ĉar estis al mi neeble resti enlite, mi estis levi-

ĝinta kaj malfermita la fenestron. La aero ŝajnis esti sulfurvaporoj — nenie estis troveblaj refreŝigo aŭ malvarmigo. Moskitoj arope enflugis kaj svarmis zumante ĉirkaŭe. La maro, kies muĝadon mi povis aŭdi de malproksime, ruliĝis obtuze kiel tertremo — nigraj nuboj ŝvebis supren; la luno malsupreniris en la nubojn, granda kaj ruĝa kiel ardanta kanonkuglo — ĝi ĵetis sian lastan sangruĝan rigardon sur la teron, kiu tremis sub la bruado de la ventego. Tiu bildo kaj la atmosfero influis min fizike, kaj en miaj oreloj sonis la furiozaj kriadoj, kiujn seninterrompe eligis la frenezulino. Ŝi blekkriis mian nomon en demona malamo, aldonante terurajn insultojn! La degenerinta virino eligis vortojn pli malpurajn ol profesia malĉastulino iam uzis. Kvankam du ĉambroj apartigis ŝin de mi, la maldikaj muroj de la domo ne povis sufiĉe obtuzigi la sovaĝajn kriojn, kiuj penetris al mi.

Fine mi diris: — Ĉi tiu vivo estas infero! Ĉi tie min turmentas ĝia aero, tie fartas la bruado de senfunda profundo! Mi havas la rajton liberigi min de ĝi, kiam mi povos. La turmentoj de ĉi tiu vivo malproksimiĝos de mi kun la tera karno, kiu nun premas mian animon. Mi ne sentas timon antaŭ la purgatorio de la fanatikulo; — neniu estonta stato povas esti pli terura ol la nuna — mi volas for de ĉi tie — mi volas rehejmiĝi al Dio!”

Dirante tion mi genuiĝis kaj malfermis kofron, en kiu kuŝis du sargitaj pistoloj. Mi intencis pafmortigi min. Nur unu momenton mi havis tiun intencon; ĉar pro tio, ke mi ne estis freneza, tiu krizo de la ekstrema, vera senespero, kiu naskis la deziron kaj la intencon pri memmortigo, pasis en unu sekundo.

Freŝa vento de Eŭropo venis trans la oceanon kaj penetris

en mian ĉambron. La uragano eksplodis, la pluvego rivere malsupren falis; tondris, fulmis — kaj la aero fariĝis pura. Subite min ekregis firma decido. Irante tien kaj reen sub la gutegantaj oranĝarboj en mia malseka ĝardeno, inter la granatoj kaj ananasoj, dum la brilanta tago de la tropiklando komenciĝis — mi pensis jene, Jane — kaj nun aŭskultu min, ĉar ĝi estis la vera saĝeco, kiu en tiu horo konsolis min kaj montris al mi la rektan irotan vojon.

La dolĉa vento de Eŭropo flustre blovis ankoraŭ en la freŝigita foliaro; mia koro, kiu estis velkinta longan tempon, ŝvelis pro tiuj tonoj, freŝa, viva sango denove batigis ĝin — mia tuta estaĵo aspiris renaskiĝon — mia animo soifis pro freŝa trinkaĵo. Mi vidis, ke la espero reviviĝas — mi sentis, ke renaskiĝo estas ebla. De florkovrita foliaro ĉe la fino de mia ĝardeno mi rigardis trans la maron, kiu estis pli blua ol la ĉielo. Tie en la malproksimo kuŝis la malnova mondo. Klaraj perspektivoj montriĝis al mi.

'Iru,' diris la espero. 'Vivu denove en Eŭropo; tie neniu scias, kian malpuran nomon vi portas, nek kiun malpuran ŝarĝon vi trenas kun vi. Vi povas kunkonduki la frenezulinon al Anglujo; enŝlosu ŝin kun devofidelaĵoj gardistoj kaj kun la necesa singardo en Thornfield. Poste iru al kiu ajn alia loko kaj serĉu novan interligon, se vi povos. Tiu virino, kiu tiel longe malbone uzis vian paciencon — malpurigis vian nomon — malhonorigis vian honoron — detruis vian junecon — tiu virino ne estas via edzino; vi ne estas ŝia edzo. Faru vian eblon, ke ŝi estu flegata kaj gardata kiel tion postulas ŝia cirkonstanco, — kaj vi faris ĉion, kion Dio kaj homa devo postulas de vi. Enterigu ŝian identecon, vian geedziĝon en la forgesemon. Nenio devigas vin konfidi al kiu ajn tiun lastan.

Donu al ŝi komforton kaj sendanĝerecon; ĉirkaŭu ŝian degeneradon per vualo de mistero — kaj forlasu ŝin.’

Laŭ tiu inspiro mi akurate agis. Mia patro kaj mia frato ne sciigis al siaj konatoj pri mia edziĝo; ĉar jam en mia unua letero mi skribis al ili pri mia edziĝo, ĉar jam tiam mi komencis senti la teruran antipation kontraŭ iliaj konsekvencoj; kaj vidante antaŭ mi abomenan estontecon pro la karaktero kaj la sanstato de la familio, mi aldonis la plej severan ordonon, ke ili tenu sekreta mian edziĝon. Kaj tre baldaŭ poste la konduto de la virino, kiun mia patro estis elektinta por mi, estiĝis tia, ke li hontis rekoni ŝin kiel bofilinon.

Sekve, timante publikigi la geedziĝon, li same kiel mi time klopodis sekretigi ĝin.

Tuj mi iris kun ŝi Anglujon. La vojaĝo kun tia monstro sur la ŝipo estis terura. Mi ĝojis, kiam fine ŝi estis en Thornfield sendanĝera en tiu triaetaĝa ĉambro, kiu kiel interna sekreta loko jam dek jarojn estas por ŝi kvazaŭ la kaverno de sovaĝa besto — la ĉelo de demono. Multan penon mi havis trovi por ŝi flegistinon, ĉar estis necese elekti tian, je kies fideleco mi povus kalkuli; ĉar en siaj frenezatakoj ŝi perfidus mian sekreton; krome ŝi kelkfoje dum multaj tagoj havas klarajn momentojn, kiujn ŝi pasigas eligante pri mi la plej grandajn insultofendojn. Fine mi dungis Grace Poole el la frenezulejo de Grimsby. Ŝi kaj la kirurgo Carter, kiu tiun vesperon, kiam Mason estis vundita, bandaĝis lian brakon, estas la solaj du homoj, al kiuj mi iam konfidis mian sekreton. Sinjorino Fairfax eble konjektis ion, sed precizan konon pri la faktoj ŝi ne povas havi. Grace entute montriĝis esti lerta gardistino, kvankam ŝia gardemo pro manko, kiun mi ne povas plibonigi kaj kiu devenas de ŝia laciga ofico, pli ol unu fojon ekdormis. La

frenezulino estas ruza kaj malica; neniam ŝi preterlasis uzi la maloftajn senzorgecojn de sia gardistino kaj laŭ sia maniero utiligi ilin al si. Unu fojon ŝi kaptis tranĉilon per kiu ŝi vundis sian fraton, kaj du fojojn ŝi prenis la ŝlosilon de sia ĉelo por forkuri en la nokto. En la unua okazo ŝi klopodis forbruligi min en mia lito, en la dua ŝi tiel fantome vizitis vin. Al la providenco, kiu gardis vin, mi dankas, ke ŝi en sia furiozeco kontentigis sian koleron disŝiri nur viajn edziĝvestojn; eble ili memorigis ŝin pri ŝia propra edziniĝa tago. Sed mi ne kuraĝas pensi, kio eble povus okazi. Mia sango ekbolas, kiam mi pensas, kiel tiu vampiro hodiaŭ matene sin ĵetis al mi por sufoki min, mi tremas, kiam mi imagas, ke ŝia nigreblua, skarлата vizaĝo sin klinas super mia karulino.

”Kaj kion vi faris, sinjoro,” mi demandis, kiam li haltis, ”post kiam vi enŝlosis ŝin ĉi tie? Kien vi iris?”

”Kion mi faris, Jane? Mi ŝanĝis min je erarlumo. Kien mi poste iris? Mi iris ĉien kaj returne. Mi tramigris la kontinenton kaj ĉiujn ĝiajn landojn. Mia sola deziro, mia monomanio estis serĉi kaj trovi bonan, prudentan edzinon, kiun mi povus ami, la malon de la furio, kiun mi postlasis en Thornfield —”

”Tamen vi ne povus edziĝi, sinjoro!”

”Mi decidis kaj estis konvinkita, ke mi povus kaj devus. Komence mi ne intencis trompi iun, kiel mi trompis vin. Mi intencis simple rakonti mian historion kaj malkaŝe fari la edziĝopeton; kaj ŝajnis al mi tute nature, ke oni rigardos min rajtigita ami kaj esti amata; mi tiel tute ne dubis trovi virinon, kiu estos kapabla kompreni mian situacion kaj akcepti min malgraŭ la malbeno, kiu ŝarĝkuŝis sur mi.”

”Kaj nun, sinjoro?”

”Ĉiam mi devas ridi, Jane, kiam vi estiĝas scivola. Vi tiam

levas la okulojn kiel timigita birdo kaj de tempo al tempo faras senripozan movon. Estas kvazaŭ la respondoj kaj klarigoj ne venas sufiĉe rapide kaj kvazaŭ vi volas rigardi en la plej profundan lokon de mia koro. Sed antaŭ ol mi parolos plie, vi devas diri al mi, kion vi celas diri per: "Kaj nun, sinjoro?" Tio estas esprimo, kiun vi ofte uzas, kaj kiu ofte instigis min al senfina interparolo; kaj mi mem ne scias kial."

"Mi celis demandi: Kaj kio poste okazis? Kion plue vi faris? Kiujn sekvojn havis tiu faro?"

"Ĝuste! Kaj kion vi nun dezirus scii."

"Ĉu vi iun trovis, kiun vi amis? Ĉu vi deziris ŝin kiel edzinon, kaj kion ŝi diris."

"Mi povas diri, ĉu mi trovis iun, kiun mi amis kaj ĉu mi petis, ŝin, edziniĝi kun mi — sed kion ŝi respondis — tion instruos la estonteco! Dek jarojn mi ĉien vagadis, jen mi vivis en ĉefurbo, jen en alia; kelkfoje ankaŭ en Sankta Peterburgo, sed pli ofte en Parizo; okaze en Romo, Napolo kaj Florenco. Posedante abundon da mono kaj krom tio malnovan nomon, kiu efikis kiel "Sezamo malfermiĝu!" mi povis elekti mian socion, kaj neniu estis por mi fermita. Mi serĉis mian idealon de edzino inter anglaj nobelinoj, francaj grafinoj, italaj kaj germanaj baroninoj, sed mi ne trovis mian idealon. Kelkfoje, dum rapida momento mi kredis vidi rigardon, aŭdi tonon aŭ rimarki figuron, kiu promesis la realigon de mia atendo, — sed baldaŭ mi estis rapide seniluziigita. Tamen ne kreu, ke mi serĉis perfektaĵon, nek pri korpo, nek pri animo. Mi sopiris nur tion, kun kio mi povus simpatii — mi deziris nur la malon de la kreolino. Kaj inter ili ĉiuj mi trovis ne unu — eĉ se mi plene estus libera — kiun mi dezirus kiel edzinon, ĉar mi antaŭe spertis la danĝeron, la teruron, la malbenon de

malbona geedziĝo. La seniluziigoj igis min sovaĝa kaj senripoza. Mi klopodis per distradoj — sed neniam per diboĉadoj — ĉar tion mi ĉiam malamamis kaj ankoraŭ nun malamas. Nur tion ŝatis mia hinda. Mesalina. La enradikita malamo, kiun mi sentis antaŭ tio kaj antaŭ ŝi, retenis min de multaj amuzaĵoj. Ĉiu ĝuo, kiu memorigis min pri diboĉo donis al mi la senton, kvazaŭ ĝi malaltigas min al ŝiaj vicoj kaj tial mi evitis ĝin.

Sed sola mi ne povis vivi; tial mi serĉis la societon de amatinoj. La unuan, kiun mi elektis, estis Céline Varens — tio estis faro, kiu plenigas min kun memmalestimo, kiam mi repensas pri ĝi. Vi ja scias, kio ŝi estis kaj kiel finiĝis nia kunvivado. Ŝi havis du posteulinojn, nome italinon, Giacinta kaj germaninon, Klara; ambaŭ estis eksterordinare belaj. Sed kio estis al mi tiu beleco post paso de malmultaj semajnoj? Giacinta estis senpripensa, facilanima — post tri monatoj ŝi tedis min. Klara estis honesta kaj kvieta; sed mallerta, senanima kaj malvarmkora. Ŝi tute ne estis laŭ mia plaĉo. Mi tre ĝojis, ke mi povis doni al ŝi sufiĉe grandan monsumon, per kiu ŝi fondis negoc-entreprenon kaj per kiu mi povis senigi min de ŝi en deca maniero.

Sed Jane, mi vidas sur via vizaĝo, ke vi en la lasta momento ne havas tre favoran opinion pri mi. Vi rigardas min kiel sentantan, facilaniman friponon — ĉu ne vere?”

”Vi estas prava, sinjoro, mia opinio pri vi ne estas plu tiel bona, kiel ĝi iam estis. Ĉu vi mem ne devas mallaŭdi, ke vi vivis en tia maniero unue kun amatino kaj poste kun alia? Vi parolas pri tio, kvazaŭ tio estus la plej natura afero en la mondo.”

”Por mi ĝi estis ankaŭ tia. Sed mi abomenas tian vivon. Tiu vivmaniero estis malnobla kaj estus al mi neeble rekomenci

ĝin. Elekti amatinon estas proksimume same kiel aĉeti sklavon; pri karaktero ambaŭ estas malsupera al viro kaj vivi kun malsuperulo en familiara maniero estas humilige. Mi nun eĉ malamas la rememoron al la tempo, kiun mi pasigis kun Céline, Giacinta kaj Klara.”

Mi sentis la veron de tiuj paroloj; kaj mi konkludis el ili la nerefuteblan certecon, ke se iam mi povus forgesi pri mi mem kaj pri la doktrinoj, kiuj estis semitaj en mia intelekto, kaj estiĝus la posteulino de tiuj kompatindaj estaĵoj — sub kiuj ajn preteksto kaj senkulpigo: — li iun tagon rigardus min kun la samaj sentoj, kiuj nun la rememoron al ili profanis en lia spirito. Sed tiun konvinkon mi ne eldiris. Sufiĉis senti ĝin. Mi gravuris ĝin en mian koron, por ke ĝi restu tie ĝis la tempo, kiam ĝi en la horo de la delogo povu protekti min.

”Nu Jane, kial do vi ne rediras ’Kaj nun sinjoro?’ ĉar mi ankoraŭ ne finis. Vi aspektas tiel gravmiena. Mi vidis, ke vi ankoraŭ ĉiam malaprobas mian agmanieron. Sed mi rakontu la ĉefan parton. Pasintan januaron gravaj aferoj revokis min al Anglujo, mi estis senigita de ĉiuj amatinoj kaj sentis la plej amaran agordon en mia koro, tio estis la rezulto de senutila, vagada, soleca vivo. Mi estis seniluziiginta kaj sentis antipation kontraŭ ĉiuj homoj precipe kontraŭ la virina sekso, ĉar mi komencis kredi, ke la bildo de prudenta, fidela, amanta virino estas nur bildo de sonĝo.

En frosta vintra posttagmezo Thornfield Hall denove aperis antaŭ miaj rigardoj. Malamata loko! Mi tie ne atendis pacon — nek ĝojon. Sur plektobarilo en Hay Lane mi vidis malgrandan solecan figuron, kiu estis tie tute sola sidanta. Mi preterrajdis ŝin — tiel neatente, kiel la sensupraĵigitan salikon ĉe la alia vojflanko. Neniun antaŭsenton mi havis pri tio, kio

ŝi iam estos al mi; nenio diris al mi, ke la arbitracia juĝistino de miaj vivo kaj morto — mia bona aŭ malbona spirito — tie en simpla vestaĵo atendas min. Mi eĉ tion ne sciis, kiam ŝi post la akcidento de Mesrour, alpaŝis al mi, malhumile kaj modeste etendis al mi la manon! Infaneca, milda estaĵo! Estis al mi, kvazaŭ fringo saltetis antaŭ miaj piedoj kaj proponis porti min sur siaj rompeblajflugiloj. Mi estis malafabla, sed la estaĵeto ne volis foriri. Ĝi staris flanke de mi kun stranga persisteco kaj en parolo kaj rigardo sin kaŝis pripenso! Mi devis akcepti helpon de ĝia mano. Kaj ĝi helpis al mi!

Kiam mi estis apoginta min al la malforta ŝultro, min ekregis io nova — nekonata sento atakis min — alia sango fluis tra miaj vejnoj. Estis bone, ke mi eksciis, ke tiu elfo reiros al mi — ke ĝi apartenas al mia hejmo — alie mi ne estus tolerinta, ke ĝi foriru de mi, ke ĝi kviete kaj rapide malaperu post tiu dika plektobarilo.

Tiun vesperon mi aŭdis vin enveni en mian domon, Jane; kvankam vi verŝajne ne sciis, ke mi pensis al vi kaj vin atendis. En la sekvinta tago mi ekzamene rigardis vin — eĉ nevidate — kiam vi dum duona horo ludis kun Adèle en la galerio. Mi memoras tion ankoraŭ, la tago estis neĝa, kaj vi ne povis iri eksteren. Mi estis en mia ĉambro, la pordo estis duone malfermita, mi povis aŭdi kaj vidi vin. Adèle okupis vian tutan atenton, sed malgraŭ tio mi imagis, ke viaj pensoj estas aliloke. Sed vi estis tre pacienca kun ŝi, mia eta Jane; longe vi amuzis ŝin kaj interparolis kun ŝi. Kiam fine ŝi foriris, vi tuj dronis en pensoj, en profundaj meditadoj; malrapide vi iris tien kaj reen en la galerio. Tie kaj aliloke vi elrigardis eksteren tra fenestro al la seninterrompe falanta neĝo; vi aŭskul-

tis la muĝantan venton kaj denove vi iris tien kaj reen en profunda meditado.

Mi kredas, ke tiuj viglaj meditadoj ne estis malĝojaj, tiam kaj tiam viaj okuloj brilis amike, dolĉa eksciteco regis viajn trajtojn — tio ne estis amara, galeca, hipokondria zorgmeditado, viaj rigardoj pli montris la dolĉan cerbumadon de la juneco, kiam la animo per malpezaj flugiloj sekvas la flugadon de la espero kaj sin direktas al ideala ĉielo. La voĉo de sinjorino Fairfax, parolanta en la halo, vekis vin el la revado, kaj kiel strange vi tiam ridis pri vi mem, Jane! Multa senco estis en via rideto; ĝi estis tre delikata kaj ŝajnis moki vian spiritforeston. Ĝi ŝajnis diri: 'miaj belegaj vizioj estas tre mirindaj, sed mi ne forgesu, ke ili estas tute malrealaj, sed mi tre bone scias, ke tie ekstere kuŝas antaŭ miaj piedoj kruta vojo, kiun mi devas trairi, kaj ke ĉirkaŭ mi kunbuliĝas nigraj fulmontondraj nuboj, kiujn mi devas kontraŭstari. Tiam vi iris mal-supren kaj petis al sinjorino Fairfax, ke ŝi donu al vi okupon, nome por reguligi la kontojn pri la mastrumado aŭ ion similan. Ĉu mi ne pravas? Tiam mi koleris vin, ĉar vi evitis miajn rigardojn.

Malpacience mi atendis la vesperon, por ke mi povu voki vin al mi. Mi supozis en vi novan — por mi novan — nekutiman karakteron. Mi sentis la deziron studesplori ĝin. Vi eniris en la ĝardenon kun rigardo, kiu montris modestecon kaj samtempe sendependecon. Vi estis simple vestita — proksimume kiel nun. Mi paroligis vin — kaj ne daŭris longe, kiam mi trovis, ke en vi estas la plej strangaj kontrastoj. Viaj vestoj kaj manieroj estis pro la normo limigitaj kaj ĝenitaj; viaj mienoj kaj agmaniero estis ofte plenaj de malkonfido, sed nepre delikatigitaj el naturo, kvankam absolute nekutimiĝintaj al socie-

to. Mi sentis, kiel vi timis igi vin malfavore okulfrapanta; sed kiam oni alparolis vin, tiam vi levis klaran, kuraĝeman okulon al la vizaĝo de via kunparolanto, en ĉiu el viaj rigardoj estis forto kaj penetremo; kiam oni faris al vi malfacilajn demandojn, vi trovis ĉiam klarajn, trafajn respondojn. Tre baldaŭ vi ŝajnis kutimiĝi al mi — Jane mi kredas, ke vi sentis, ke ekzistas simpatio inter vi kaj via kolerema, severa sinjoro; ĉar estis mirinde vidi, kiel rapide ia ĝoja plaĉo kvietigis vian tutan personon; kiel ajn mi grumblis, vi montris nek miregon, nek timon pro mia malafableco. Vi nur rigardis min per rideto, kiu montris tiom da simpla kaj saĝa ĉarmo, ke mi ne kapablas priskribi ĝin. Kion mi vidis, tio plaĉis al mi kaj mi deziris vidi pli multon. Tamen mi traktis vin longan tempon malvarme kaj nur malofte serĉis vian ĉeeston. Mi estis saĝa epikurano kaj deziris plilongigi la kontentecon, kiun havigis al mi ĉi tiu nova konatiĝo. Krome min turmentis longe la timo, ke la ĉarmo falos de la floro, ke perdiĝos ĝia freŝeco, se tro ofte mi tuŝus ĝin. Mi tiam ne sciis, ke ĝi ne estas velkebla floro, sed pli multe radianta simileco de floro, ĉizita en ĉiam ekzistanta gemo. Krome mi volis sperti, ĉu vi venos viziti min, se mi evitus vin — sed tion vi ne faris. Vi restadis en la instrua ĉambro, same silente kiel viaj pupitro kaj pentrista stablo. Kiam okaze mi renkontis vin, vi tiel rapide kaj strange pasis min, kiel estis dece laŭ la leĝoj de la bonmaniereco. Via ordinara vizaĝesprimo en tiuj tagoj, Jane, estis enpenso, ne premita, ĉar vi ne estis malsaneta; sed gajvigla ĝi tamen ne estis, ĉar esperon kun vera ĝuo vi ne havis. Mirigite mi demandis al mi, kion vi pensas pri mi, aŭ ĉu efektive vi pensas al mi — kaj por esplori tion, mi denove komencis okupi min pri vi. En via rigardo estis io amika; io simpatia estis en la maniero je kiu

vi parolis kun mi; mi vidis, ke vi havas komunikeman koron — sekve nur la senbrua instru-ĉambro, la monotoneco de via ĉiutaga vivo, igis vin malĝoja. Mi permesis al mi la plezuron esti ĝentila al vi, kaj tiu ĝentileco vekis vian kunsenton. La esprimo de via vizaĝo mildiĝis, via voĉo moliĝis; tio plenigis min de feliĉo kaj ĝojo, kiam vi elparolis mian nomon en dank-feliĉa tono. Tiam ĝojigis min, Jane, kiam mi kvazaŭ okaze renkontis vin; vi rigardis min iom malkviete — iom dube, ĉar vi ne sciis, kiu kaprico regas min — ĉu ree mi agos kiel sinjoro, ĉu mi estos severa aŭ montros amikecon aŭ bonvolecon. En tiu tempo mi jam amis vin tro multe por ludi la unuan rolon; kaj kiam mi etendis al vi mian manon, tiam en viaj junaj malĝojaj trajtoj aperis lumo kaj feliĉo, tiel ke mi devis kontraŭbatali mian deziron ĉirkaŭbraki kaj premi vin sur mia koro.”

”Ne parolu plu pri tiuj tagoj, sinjoro,” mi interrompis lin forviŝante kelkajn sekretajn larmojn de miaj okulharoj. Liaj paroloj estis al mi torturoj, ĉar mi sciis, kion mi devos fari — kaj baldaŭ faros — kaj ĉiuj tiuj rememoroj faris mian devon ankoraŭ pli malfacila.

”Ne Jane,” li daŭrigis, ”kial do paroli pri la estinteco, kiam la estanteco oferas tiom da certeco kaj la estonteco estas tiel klara.”

Mi sentis tremeton, kiam mi aŭdis tiun malsaĝan klarigon.

”Vi vidas, kiel nun staras la afero,” li parolis plue. ”Pasiginte mian junecon kaj miajn jarojn de vireco en nedirebla mizero kaj duone en malĝoja soleco, mi por la unua fojo trovis, kion mi vere povas ami — nome vin. Vi estas mia simpatio, mia anĝelo, vin mi amas per forta amo. Mi kredas vin bona, talenthava, saĝa, aminda, en mia koro estas ardanta, sankta

pasio; ĝi sentas inklinon al vi, ĝi gvidas mian tutan internan ekzistadon, — kaj dum ĝi flamas, ĝi kunfandas vin kaj min en unu tuton!

Sentante tion, mi decidis edziĝi kun vi. Estas sensenca moko, respondi al mi, ke mi havas jam edzinon. Vi scias nun, ke mi havas nur abomenan demonon. Estis terura maljusteco, ke mi klopodis trompi vin, sed mi timis la obstinecon kuŝanta en via karaktero. Mi timis frue enradikiĝintajn antaŭjuĝojn; mi volis konduki vin en sendanĝeran lokon, antaŭ ol konfidi al vi tiujn intimajn sciigojn. Tio estis malkuraĝa. Unue mi devus pensi pri via grandanimeco kaj pri via nobleco, kiel mi faras nun — mi devus malkaŝi al vi mian tutan vivon, mi devus klarigi mian malsaton, mian soifon al pli alta, pli inda ekzistado — mi devus montri al vi ne mian decidon (tio estas malforta vorto) sed mian neeldireblan deziron ami fidele kaj kore, kie mi trovos fidelan kaj koran reciprokan amon. Nur poste mi devus peti vin akcepti mian promeson pri la fideleco, kaj repeti vian, Jane — donu ĝin nun al mi.”

Sekvis paŭzo.

”Kial vi silentas, Jane?”

Mi suferegis; fajra mano kaptis en mian vivon. Mi travivis teruran momenton plenan de luktado, mallumo kaj doloro! Neniu vivanta estaĵo povus deziri pli sinceran amon ol tiu, kiu estis al mi oferata, kaj mi adoris lin, kiu tiel min amis! Malgraŭ tio mi devis malakcepti mian idolon kaj lian amon!

Mia terura devo enhavis nur la ordonon: ”Forvojaĝu!”

”Jane, vi ja komprenas, kion mi petas de vi? Nur la promeson — mi volas esti via, sinjoro Rochester.”

”Sinjoro Rochester, mi ne volas esti via.”

Ree sekvis longa paŭzo.

”Jane!” li denove ekparolis kun dolĉanimeco, kiu tremigis min kaj kvazaŭ rompis mian koron — ĉar tiu kvieta voĉo estis la spiregado de leviĝanta leono — ”Jane, ĉu vi per tio volas diri, ke vi volas iri vian propran vojon, kaj ke mi iru mian?”

”Jes.”

”Jane,” li diris, kliniĝante super mi kaj ĉirkaŭbrakante min, ”ĉu vere vi tion intencas?”

”Jes!”

”Kaj nun?” dum li kisis miajn fruntojn kaj vangon.

”Jes!” — kaj rapide mi liberigis min de lia ĉirkaŭpreno.

”Ho, Jane! tio estas amara! Tio estas peka. Ne estus peke ami min.

”Estus peke obei vin.”

Sovaĝa rigardo el liaj okuloj trafis min — dum momento liaj trajtoj kuntiriĝis. Li leviĝis, sed ankoraŭ regis sin. Mi kaptis seĝon por apogi min: mi tremis, mi sentis timon — sed mi estis decidinta.

”Ankoraŭ unu momenton, Jane. Ĵetu nur unu rigardon sur mian teruran vivon, kiel ĝi estiĝos, se vi forlasas min. Kun vi tuta mia feliĉo denove foriros de mi. Kio restos al mi? Kiel edzinon mi havas nur tiun frenezulinon; same bone vi povus ligi min al kadavro en la tombejo. Kion mi faros, Jane? Kie mi trovos kunulinon? Kie esperon?”

”Faru, kion mi faras. Fidu al Dio kaj al vi mem. Ĉu vi kredas je la ĉielo kaj je unuiĝo tie?”

”Vi do ne volas cedi?”

”Ne.”

”Vi do kondamnas min vivi malfeliĉe kaj morti kun malbeno?” Lia voĉo iĝis pli kaj pli laŭta.

”Mi nur konsilas al vi senpeke vivi, kaj mi deziras al vi kviete morti.”

”Ĉu vi do volas rabi de mi ĉiun amon? — Ĉu mi devas rekomenci mian antaŭan pekan vivmanieron?”

”Sinjoro Rochester, mi tute ne deziras, ke vi reiru al via antaŭa vivmaniero, mi mem ja ne vivis tiel. Ni naskiĝis por celi la bonon kaj por suferi — tio rilatas ne nur vin, sed ankaŭ min. Do, agu tiel. Vi estos forgesinta pri mi antaŭ ol mi forgesis pri vi.”

”Dirante ion tian vi nomas min mensogulo. Vi malpurigas mian honoron. Mi ja diris al vi, ke neniam mi aliiĝos. Kaj vi diris al mi rekte en la vizaĝo, ke mi aliiĝos tre baldaŭ. Kian malĝustan ideon vi havas pri mi, kaj kiel ŝanĝiĝis subite via konduto! Ĉu estas pli bone malesperigi homon ol peki kontraŭ homa leĝo — dum neniu havas malprofiton pro tiu peko? Ĉar vi havas nek parencojn nek konatojn, vi ne bezonos timi ofendi ilin per nia kunvivado.”

Tio estis vera. Kaj dum li parolis, miaj konscienco kaj prudento perfidis min kaj kulpigis min pro krimo, ĉar — mi kontraŭstaris lin. Ili parolis preskaŭ tiel laŭte, kiel la sento, kaj ĉi tiu kriis: ”Ho cedu do! Pensu pri liaj suferoj, pri la danĝero, en kiu li sin trovas, pripensu, en kian staton li trafos, se vi lasos lin sola; pensu pri lia trorapida karaktero; pensu pri la facilriskeco, kiu sekvas post malespero. — Klopodu kvietigi lin. Savu lin; amu lin; diru al li, ke vi amas lin kaj ke vi volas estiĝi lia. Kiu en la mondo interesiĝas pri vi? Kiu estos damaĝita per tio, kion vi faros?”

Malgraŭ ĉio tio, mia respondo estis firma, neŝanĝebla: — ”Mi sentas tro multan estimon por mi mem. Ju pli soleca mi estas, ju malpli multajn amikojn mi havas, kaj ju malpli da

helpo mi povas atendi, des pli multe mi estimos min mem. Mi obeos la leĝon, kiun Dio donis kaj kiun sanktigis la homoj. Mi severe sekvas miajn principojn, kiujn mi ricevis, kiam mi havis ankoraŭ mian prudenton, kaj kiam mi ne estis freneza, kiel mi estas nun. La leĝo kaj la principoj ne estas por tempoj, en kiuj pri repaciĝo ne estas parolate. Ili estas por tempoj kiel ĉi tiu, en kiu korpo kaj animo ribelas kontraŭ ilia severeco; ili estas severaj, sed restos neŝanĝeblaj. Al kiuj ili utilis, se mi povus rompi ilin laŭ mia plaĉo? Ĉiam mi kredis en ilia valoro; kaj se mi nun ne povas kredi en ili, tiam tio okazas, ĉar mi estas freneza; en miaj vejnoj fluegas fajro, kaj mia koro batas tiel rapide, ke mi ne povas plu kalkuli ĝiajn batojn. Antaŭaj ricevitaĵoj, decidoj, kiuj estas klaraj, estas nun la solaj rimedoj por helpi min en mia mizero, sur ili mi apogas min.”

Kaj tion mi faris. Sinjoro Rochester, rigardante mian vizaĝon, rimarkis mian decidon. Lia pasio atingis sian plej altan gradon. Unu momenton li devis sin doni al ĝi — kiu ajn estu la sekvo. Li alpaŝis al mi, kaptis mian brakon kaj ĉirkaŭis mian talion. Per flamantaj rigardoj li ŝajnis engluti min! Fizike mi sentis min en tiu momento tiel malforta, kiel pajlero elmetita al la ardo de altforno. Fizike mi havis nur mian animon kaj per ĝi la senton de la fina sendanĝereco. La animo feliĉe havas tradukiston — ofte senkonscian, tamen ĉiam fidelan tradukiston — la okulon! Miaj okuloj leviĝis al liaj, kaj rigardante lian sovaĝe ekscititan vizaĝon, mi senkonscie eligis profundan ĝemon. Lia ĉirkaŭpreno doloris min kaj miaj troŝarĝitaj fortoj estis eluzitaj.

”Neniam,” li diris, grincigante la dentojn, ”neniam ekzistis estaĵo, kiu samtempe estis tiel delikata kaj tiel malfleksebla, tiel malvenkebla. En miaj manoj ŝi estas nur malforta

kano!” Li skuis min per ĉiuj siaj fortoj. ”Mi povus rompi ŝin per la dik- kaj montrofingroj. Sed al kio tio utilis, se mi rompus ŝin, disŝirus aŭ pulvorigus. Rigardu nur ŝiajn okulojn! Rigardu tiun decideman, sovaĝan, liberan estaĵon, kiu kontraŭas min per pli ol kuraĝo — per sovaĝa triumfo. Kion ajn mi faris kun la ĉirkaŭvolvaĵo, mi ne povus penetri la internon. Ho, sovaĝa, bela kreitaĵo! Se mi perforte rompus ĉi tiun delikatan malliberejon, nur la malliberigito estus libera. La domon mi povus malkonstrui, sed la loĝantino liberiĝus ĉielen ankoraŭ antaŭ ol mi povus nomi min la posedanto de ŝia surtera loĝejo. Kaj ĝuste la animon — kun ĝiaj volo kaj energio kaj virto kaj pureco, mi deziras posedi. Se vi nur volus, vi povus propravole kaj per malpezaj flugilbatoj veni al mi por fleksi vin je mia koro. Se mi volus kapti vin kontraŭ via deziro, vi liberiĝus el mia mano, same kiel disvastiĝas la dolĉaodoro de floro, antaŭ ol ni enspiris ĝin. Ho Jane, venu al mi, venu!”

Dirante tion li ellasis min kaj ankoraŭ min rigardis. Estis multe pli malfacile kontraŭstari tiun rigardon ol lian frenezan ĉirkaŭbrakon. Tiam idioto estus cedinta al li. Mi kontraŭstaris lian koleron kaj mi venkis. Nun mi devis zorgi pri tio, ke ne estiĝu la ofero de liaj doloro kaj ĉagreno. Mi retiriĝis al la pordo.

”Ĉu vi foriras, Jane?”

”Mi foriras, sinjoro.”

”Por forlasi min?”

”Jes.”

”Ĉu vi ne volas veni al mi? — Vi ne volas esti mia konsolantino, mia liberigantino? — Ĉu miaj profunda amo, sovaĝa ĉagreno, ardaĵ petegoj estas nenio al vi?”

Kia nepriskribebla patoso estis en liaj tonoj! Kvankam estis al mi malfacile, mi ripetis decidite: "mi foriras!"

"Jane."

"Sinjoro Rochester!"

"Iru do — mi konsentas — sed ne forgesu, ke vi lasas min ĉi tie en angoro. Iru al via ĉambro; pripensu ĉion, kion mi diris al vi, kaj poste, Jane, reĵetu unu rigardon al miaj suferoj — pensu al mi!"

Li deturnis sin, ĵetiĝis sur la kanapon kaj kaŝis la vizaĝon per la manoj.

"Ho, Jane! mia espero — mia amo — mia vivo!" li kriis dolore.

Poste sekvis profundaj, korŝirantaj singulto. Mi jam atingis la pordon, sed reiris al li, same decidinte kiel mi estis irinta. Mi genuis ĉe lia flanko; mi levis lian vizaĝon, mi forkisis la larmojn de liaj vangoj kaj karesis liajn senordiĝintajn harojn.

"Dio vin benu, mia kara sinjoro," mi diris. "Dio retenu vin de maljusteco kaj peko! Li konduku kaj konsolu vin! Precipe Li rekompensu vin pro via senlima bono al mi!"

"La amo de mia eta Jane estus al mi pli bona," li respondis. "Sen ŝi mia koro estas rompita. Sed tamen Jane donos al mi sian amon! Ŝi estos nobla kaj grandanima!" La sango eniris en lian kapon. Liaj okuloj ardis kiel flamoj; li salte leviĝis kaj rekte stariĝis antaŭ mi. Li etendis la brakojn. Sed mi evitis lian ĉirkaŭprenon kaj — eliris el la ĉambro.

"Adiaŭ!" kriis mia koro dum mi forlasis lin. Kaj la malespero aldonis: "Adiaŭ por ĉiam!"

\* \* \*

Mi antaŭe ne kredis, ke tiun nokton mi dormos; sed kompartema dormo kaptis miajn membrojn, tuj post kiam mi kuŝiĝis. La dormo portis min reen al mia infaneco. Mi songis, ke mi kuŝas en la ruĝa ĉambro en Gateshead; la nokto estis malluma kaj stranga timo premis mian animon. La luno, senfortiginte min, ludis rolon en mia songo kaj ŝajnis supren rampi sur la muro kaj fine restis staranta en la mezo de la malluma plafono daŭre tremetante. Mi levis la kapon por rigardi ĝin; la plafono ŝanĝiĝis al nuboj altaj kaj malhelaj. La krepusko similis tian, kian la luno ĵetas sur la nebulojn, kiujn ĝi estas disŝironta. Mi vidis kiel ĝi leviĝas — mi rigardis ĝin kun stranga atendo, kvazaŭ la juĝo elparolonta mian sorton estus skribita sur ĝia disko. Poste ĝi, disrompante la nubojn, aperis kiel neniam antaŭe: unue mano ŝoviĝis tra la mallumaĵo kaj puŝis ĝin flanken. Poste aperis sur la lazuro — ne la luno — sed blanka homa figuro, kiu klinis malsupren sian radiantan frunton. Fikse ĝi rigardis min. Ĝi parolis al mia animo, el nemezurebla malproksimo venis la sonoj, sed tamen ili estis tiel proksimaj. Al mia koro ĝi flustris:

”Mia filino, forkuru de la tento!”

”Patrino, tion mi volas!”

Tiel mi respondis, kiam mi vekiĝis el la ekstaza songo. Estis ankoraŭ nokto. Sed juliaj noktoj estas mallongaj; baldaŭ post noktomezo krepuskiĝas.

Mi pensis: ”Ne povas esti tro frue por komenci mian taskon plenumotan.” Mi ellitiĝis; mi estis ankoraŭ vestita, ĉar nur la ŝuojn mi estis demetinta. Mi sciis, kie en mia tirkesto mi povos trovi iom da tolaĵo, ringon kaj medalon. Dum mi serĉis tiujn objektojn, miaj fingroj tuŝis la perlojn de ĉirkaŭkolo, kiun antaŭ kelkaj tagoj sinjoro Rochester devigis min

akcepti. Mi lasis ĝin kuŝanta; ĝi apartenis ja al la fianĉino, al tiu figuro en la aero, kiu solviĝis je nenio. La aliajn objektojn mi kunvolvis en pakaĵon; mian monujon, kiu enhavis dudek ŝilingojn, mian tutan posedaĵon, mi metis en la poŝon. Mi surmetis la pajlan ĉapelon, kunvolvis mian ŝalon, prenis la pakaĵon kaj miajn ŝuojn, kiujn mi ankoraŭ ne volis almeti kaj ŝteliris el mia ĉambro.

”Adiaŭ, bona sinjorino Fairfax!” mi flustris, irante preter ŝian pordon.

”Adiaŭ, mia kara Adèle!” mi diris, ĵetante rigardon al la pordo de la infanĉambro. Mi ne kuraĝis doni min al la penso eniri kaj ĉirkaŭbraki ŝin. Mi devis erarigi akran orelon! Eble ĝi estis aŭskultanta.

Mi jam pasis la ĉambron de sinjoro Rochester, sed ĉar mia koro en tiu momento ĉesis bati, mi estis devigata halti minuton. Sed dormo ne regis tie. Li senripoze trairis la ĉambron de unu flanko al alia. Ripete li eligis ĝemegojn dum mi, aŭskultante, staris tie. Se mi volus, en tiu ĉambro estus mia ĉielo, mia, surtera ĉielo. Mi bezonus nur eniri kaj diri:

”Sinjoro Rochester, mi volas vin ami kaj resti ĉe vi ĝis la fino de mia vivo,” kaj en mian animon mi verŝus fonton da ĝuo kaj feliĉego.

Al tio mi pensis.

La bona viro, mia sinjoro kaj ordonanto, kiu nun ne povis trovi la dormon, malpacience atendis la venontan tagon. En la mateno li irigos iun por serĉi min — ĉar mi estos for, sed li vane serĉigos min! Li sentos sin forlasita, li kredos sian amon malestimita. Li suferos, eble lin regos la senespero. Ankaŭ al tio mi pensis. Mia mano moviĝis al la pordofermilo. Sed mi retiris ĝin kaj ŝteliris plue.

Malĝoje mi iris malsupren. Mi sciis, kion mi devos fari kaj tion mi faris mekanike. En la kuirejo mi serĉis la ŝlosilon de la flankpordo; krome mi prenis boteleton kun oleo kaj plumon por oleoŝmiri la seruron. Mi trinkis iom da akvo kaj prenis panpecon; eble mia vojo estos longa kaj miaj fortoj, de kiuj mi postulis tiom multe en la lasta tempo, eble forlasos min. Ĉion ĉi mi faris sen la plej mallaŭta bruoj. Mi malŝlosis la pordon, eliris kaj ŝlosis ĝin. Malĝoja krepusko dise kuŝis sur la korto. La grandaj pordoj estis ŝlositaj, sed flankaj pordoj en unu el ili estis nur riglile fermita. Tra ĝi mi iris eksteren kaj fermis ĝin post mi. Nun Thornfield kuŝis malantaŭ mi.

Unu mejlon de tie, transe de la kamparo, kuŝis vojo, kondukanta en la kontraŭa direkto al Millcote. Ĝi estis vojo, laŭ kiu mi ankoraŭ neniam veturis, kiun mi tamen estis rimarkinta, dum mirigite mi demandis al mi, kien ĝi kondukas. Al tiu vojo mi direktis min. Nun mi ne povis doni min al miaj pripensoj; neniun rigardon mi ĵetu reen — eĉ neniun en la estontecon. La unua estis folio en la libro de la sorto, tiel ĉiele dolĉa — tiel morte amara — ke ĝi ŝanceligus mian kuraĝon, neniigus mian energion, se mi eĉ nur unu momenton volus legi en ĝi. La lasta estis griza dezerto: simila al la tero post la forfluo de la diluvo.

Mi laŭiris la kampojn, plektobarilojn kaj vojetojn ĝis la suno leviĝis. Mi kredas, ke estis ĉarmega somermateno. Mi memoras ankoraŭ, ke miaj ŝuoj, kiujn mi estis almetintaj, forlasante la domon, baldaŭ estis malsekaj de la roso. Sed mi ne rigardis la sunon, nek la ridetantan ĉielon, nek la vekigantan naturon. Viro, kiu laŭiras belan vojon al eŝafodo, ne pensas al la floroj, kreskantaj sur la deklivoj de la longfosaĵoj, sed al la bloko kaj hakilo; al la disigo de korpo kaj animo, al la osce-

danta tombo, lin atendanta — kaj mi pensis al la malĝoja forkuro kaj al la senhejma migrado, kaj kun disŝirita koro mi pensis al tio, kion mi lasis post mi! Mi ne povis agi alie. Nun mi pensis al li, kiel li senripoze iris tien kaj reen en sia ĉambro atendante la tagiĝon; kiel li esperis, ke baldaŭ mi venos kun peto resti ĉe li kaj estiĝi lia. Mi aspiris aparteni al li; mi sentis la tenton reiri. Ne estis ankoraŭ tro malfrue. Mi povis ankaŭ savi lin de la profunda doloro de disiĝo. Mia forkuro sendube ne estis ankoraŭ rimarkita. Mi povis ankoraŭ reiri kaj esti lia konsolantino, — lia fiero, lia malliberigintino el profunda mizero, eble la savantino de lia perejo. Ho, tiu timo, ke li denove sin donos al la diboĉado — kiel min suferigis tiu timo! Tio estis kvazaŭ venenita sago en mia brusto, ĝi disŝiris mian karnon, kiam mi klopodis eltiri ĝin; ĝi estis mortigonta min, kiam la rememoro puŝis ĝin ankoraŭ pli profunden en mian koron! Sur la kamparo kaj en la arbetoj la birdoj ekantis. La birdoj estis fidelaj unu al alia, ili estas la simbolo de la vivo! Sed kio mi estis? En la mezo de miaj ĉagrenoj, senesperaj ekscitiĝoj resti fidela al miaj principoj, mi abomenis min mem. Mi estis ofendinta, vundinta, forlasinta mian sinjoron! En miaj okuloj mi estis malaminda. Tamen mi ne povis reiri — eĉ ne unu paŝon. Sendube Dio kondukis min!

Pasia ĉagreno estis neniiginta mian propran volon kaj silentiginta mian konsciencan. Mi verŝis sovaĝajn, varmegajn larmojn, kiam mi tiel daŭrigis mian solecan vojon. Mi iris rapide, rapide kiel febromalsanulo. Malforteco, venanta de interne kaj tute reganta min, ĵetis min teren. Kelkajn minutojn mi kuŝis tie premante mian vizaĝon en la malsekan herbon. Mi timis — pli multe mi deziris, resti tie kuŝanta por morti. Sed baldaŭ mi releviĝis kaj rampis pluen sur manoj kaj

genuoj. Fine mi staris ree sur la piedoj — firme decidante kaj dezirante atingi la landvojon.

Atinginte ĝin mi estis devigata sidigi min por ripozi kontraŭ plektobarilo. Sidante tie, mi ekaŭdis la bruon de radoj kaj vidis alveturantan veturilon. Mi stariĝis kaj signodonis per la mano. La veturilo haltis. Mi demandis, kien ĝi veturas. La veturigisto nomis tre malproksiman lokon, pri kiu mi certe sciis, ke sinjoro Rochester ne havas konatojn. Mi demandis, por kiu monsumo li volus kunpreni min; li respondis: por tridek ŝilingoj; post kio mi diris, ke mi posedas nur dudek. Li pripensis, ĉu li povus kunpreni min por tiu sumo, fine li konsentis al mi sidiĝi en la veturilon, ĉar ĝi estas malplena. Mi eniris ĝin. La pordeto ĵetfermiĝis — la veturilo veturis pluen. Kara leganto, mi esperas, ke neniam vi spertos, kion mi tiam sentis, ke neniam viaj okuloj verŝos tiajn varmegajn, sangajn larmojn, kiajn mi tiam verŝis. Ke neniam vi petos al la ĉielo per petegoj, kiuj tiam eliris el inter miaj lipoj. Ke neniam, kiel mi, vi timos estiĝi la ilo de malbono de tio, kion vi fundkore amas. —

## Ĉapitro XXVIII.

**P**asis du tagoj. Estas somera vespero. La veturigisto eliris min el sia veturilo en loko nomata Whitcross. Por la monsumo, kiun mi pagis al li, li ne povis veturigi min pli malproksimen kaj mi ne posedis plu unu ŝilingon. La veturilo estas jam unu mejlon de ĉi tie. Mi estas sola. Kaj nun mi subite rimarkas, ke mi forgesis preni mian pakaĵon el la veturila kaŝejo, kien mi metis ĝin pro sekureco. Tie ĝi restos — kaj por ĉiam mi estas senigita de ĝi.

Whitcross ne estas urbeto, eĉ ne vilaĝeto, sed nur ŝtona kolono, metita sur loko, kie kvar vojoj kruciĝas; tre alta, por ke ĝi estu videbla en la malproksimo kaj en la mallumo — kiel mi supozis. El ĝia supro disetendiĝas kvar brakoj; laŭ la surskribo, la plej proksima urbo, al kiu unu el tiuj brakoj etendiĝas, situas je dekmejla distanco; la aliaj je ankoraŭ pli ol dudek mejla. Pro la bone konataj nomoj de tiuj urboj, mi sciis en kiu graflando mi eliris el la veturilo. Mi vidas nur nordan mezland-graflandon kun malhelaj marĉejoj, ĉirkaŭitaj de montoj. Malantaŭ kaj antaŭ mi kuŝas vastaj torfmarĉejoj; malantaŭ tiu profunda valo ĉe miaj piedoj leviĝas altaj montaroj. La loĝantaro sendube estas malgranda ĉi tie kaj mi vidas nek piedirantojn nek rajdantojn sur ĉi tiuj vojoj, ili etendiĝas norden, orienten, suden kaj okcidenten — helaj, larĝaj, solecaj; ĉiuj estas metitaj trans la marĉon kaj la eriko sovaĝe kaj abunde kreskas ĝis iliaj bordoj. Kaj tamen eble piediran-

to okaze preteriros; sed mi ne deziras renkonti fremdajn okulojn; oni kun miro demandus, kion mi devas fari ĉi tie, apoganta min kontraŭ la vojmontrilo, videble sen celo — perdita! Eble oni demandus al mi, kaj mi kapablus respondi nur ion nekredindan — kaj mi kaŭzus suspekton. Ne unu interligo kunigas min plu al la homoj en ĉi tiu momento — neniu ĉarmo, neniu espero vokis min tien, kie estis miaj kunhomoj — neniu, vidante min ĉi tie, havos por mi amikan personon aŭ bonan deziron. Kiel parencon mi havas nur nian komunan patrinon, la naturon! Mi volas ĵeti min sur ĝian bruston kaj petegi ripozon!

Tuj mi direktis min al la erikejo; mi laŭiris malgrandan profundan vojeton, kiu tratanĉis la brunan marĉon. Mi ĝis la genuoj vadis tra la malhelajn kreskaĵojn, mi sekvis ĉiujn ĝiajn kurbiĝojn kaj trovante muskokovritan granitŝtonon en kaŝita angulo, mi sidiĝis sur ĝin. Altaj marĉaltaĵoj ĉirkaŭis min; la rifo protektis mian kapon. Kaj supre de ĉio tio sin etendis la ĉielo.

Pasis kelka tempo antaŭ ol mi trovis min sendanĝera ĉi tie. Mi sentis neklaran timon, ke sovaĝaj brutaroj estas en la proksimo, aŭ ke ĉasisto aŭ ŝtelĉasisto malkovros min. Kiam ventpuŝego sin movis trans la ebenaĵon, mi kun teruro rigardis supren kredante, ke ĝi estas la sovaĝa kuro de virbovo; kiam vanelo fajfis, mi kredis aŭdi homajn voĉojn. Sed vidinte, ke miaj timoj estas senmotivaj, kaj sentante, ke la profunda silento reganta ĉe noktiĝo, kvietigis min — tiam min regis konfido.

Ankoraŭ mi ne estis pripensinta. Mi nur estis aŭskultinta, timinta. Nun la kapablo de la meditado revenis al mi.

Kion mi komencos fari? Kien mi iros? Ho, tiuj demandoj

estis nesufereblaj, ĉar mi povis nenion komenci kaj nenien iri! — kaj dum miaj lacaj tremantaj kruroj devos iri tro longan vojon, antaŭ ol mi atingos loĝejon de homoj — kie mi devos peti malvarman kompaton antaŭ ol trovi lokon por ripozi; ĉie mi certe ricevos rifuzan respondon, antaŭ ol oni aŭskultos mian rakonton aŭ antaŭ ol oni kvietigos miajn bezonojn!

Mi tuŝis la erikon, ĝi estis seka kaj ankoraŭ varma pro la varmego de la somertago. Mi rigardis supren al la ĉielo; ĝi estas malgranda; amika stelo brilis sur la supro de la roka rifo. Ekrosiĝis sed feliĉe nur malmulte kaj eĉ ne venteto blovis. La naturo ŝajnis esti al mi bonvola kaj amika. Mi sentis, ke ĝi amas min, ĉar mi estis forpeltino; kaj mi kun infana molkoreco alkroĉis min al ĝi, ĉar mi povis atendi de la homoj nur mal-konfidon, malakcepton kaj ofendojn. Ĉi tiun nokton mi volis esti ĝia gastino — mi ja estis ĝia infano. La patrino naturo ja konsentus al mi senpagan rifuĝejon. Mi havis ankoraŭ pecceton da pano; ĝi estis la restaĵo de bulko, aĉetita de mi en urbo, kiun ni pasis je tagmezo kaj pagita per pfenigo, mia lasta monero. Tie kaj alie mi vidis maturajn mirtelojn, kiuj brilis kiel perloj inter la erikoj; mi kolektis da ili plenmanon kaj manĝis ilin kun mia panpeco. Mia antaŭa mordetanta malsato estis parte kontentigata per tiu ermita manĝo. Fine mi diris mian vesperpreĝon kaj serĉis mian dumnoktan kuŝejon.

Flanke de la rok-rifoj la eriko estis tre alta. Kiam mi kuŝiĝis en ĝi, miaj piedoj malaperis sub la kreskaĵo; ambaŭflanke ĝi tiel alte leviĝis, ke ĝi preskaŭ kuniĝis super mi tiel, ke la nokta aero tute ne ĝenis min. Mi sternis la ŝalon sur min kiel kovrilon; malalta muska altaĵeto estis mia kapkuseno. Tiel protektite, mi ne sentis malvarmon en la komenco de la nokto.

Mia nokta ripozo eble estus kvietita, se mia turmentita koro

ne estus interrompinta ĝin. Ĝi plendis pro siaj sangantaj vundoj, pro sia interna doloro, pro siaj disŝiritaj flankoj. Ĝi tremis pro sinjoro Rochester kaj lia sorto; ĝi priplendis lin kun profunda kompatato; ĝi sopiris al li kun senfina dezirego, kaj, senhelpe kiel birdo, kies flugiloj estas rompitaĵoj, ĝi batis per siaj vunditaj flugiloj, vane klopodante flugi al li.

Trolaciĝinte pro tiuj animaj cerbumadoj mi levis min kaj stariĝis surgenu. La nokto jam venis kaj ĝiaj planedoj staris brile sur la ĉielo. Ĝi estis tiel bela, kvietaj, tiel pura kaj hela, ke neeble oni povus sin doni al timo. Ni scias, ke Dio estas ĉie; sed tre certe ni plej klare sentas Lian ĉeeston, kiam Liaj grandaj kaj belegaj laboroj tiel brile sin etendas antaŭ ni. Kaj la sennuba noktoĉielo, sur kiu Liaj mondoj plenumas siajn kvietajn rondiradojn, plej multe sentigas al ni Lian senfinecon, Lian ĉiopotencon kaj Lian ĉie ĉeestadon! Mi kuŝis surgenu por preĝi por sinjoro Rochester. Rigardante supren per miaj larmoplenaj okuloj, mi vidis la imponan laktan vojon. Memorigante al mi, kiu reale mi estas — kiuj sennombraj sistemoj rondiras tie supre nur kiel ununura lumbrilo — tiam subite mi sentis la povon kaj la forton de Dio. Mi estis certa pri Lia potenco, mi estis certa pri tio, ke la tero ne povas pereii, nek iu ajn kreitaĵo vivanta sur ĝi, kaj mi ŝanĝis mian preĝon en dankon: la fonto de vivo estis ankaŭ la liberiganto de la animoj. Sinjoro Rochester estis ekster danĝero; li estis de Dio, kaj Dio protektus lin!

Ree mi kuŝiĝis sur la brusto de la tero kaj ne daŭris longe, ke la dormo forgesigis al mi ĉiun mizeron.

Sed la sekvintan matenon ĝi ree prezentis sin al mi. Mi leviĝis longe post kiam la birdetoj eliris el siaj nestoj kaj la

abeloj komencis suĉi la mielon el la erikoj, kaj la roso disvaporigis.

Kia kvieta, varma, delikata tago! Kia ora dezerto estis tiu ĉirkaŭ mi disetendiĝanta marĉejo! Ĉie estis sunlumo! Mi deziris, ke mi povus vivi en ĝi kaj per ĝi! Mi vidis lacerton ŝoviĝanta trans la rokon; mi vidis abelon flugetanta diligente inter la dolĉaj mirteloj. Kiel volonte en tiu momento mi estus abelo aŭ lacerto; tiam mi trovus abundan nutraĵon kaj rifuĝejon. Sed mi estis homa estaĵo kaj havis la bezonojn de homa estaĵo. Mi ne povis resti tie, kie mi trovis nenion por kontentigi min. Mi ekstaris kaj rigardis malsupren al la kuŝejo, kie mi pasigis la nokton. Ne sentante esperon je la estonteco, mi havis nur unu deziron: ke mia Kreinto trovu bone repostuli mian animon dum mia dormo en la pasinta nokto; kaj ke mia laca korpo, liberigita de ĉiu plua batalado kontraŭ la sorto, nun kviete povu miksi sian polvon kun ĉi tiu dezerto. Sed la vivo ankoraŭ ĉiam apartenis al mi! La vivo kun siaj necesajoj, respondeco kaj mizeroj. La ŝarĝo devis esti portata, la necesajoj devis esti kontentigataj kaj portataj la mizero kaj suferoj!

Mi ekvojiris.

Ree atinginte Whitcross, mi sekvis vojon kondukantan for de la suno, kiu nun staris alte kaj arde lumis malsupren. Alian vojon mi ne povis elekti. Longe mi iris antaŭen, kaj fine pensante, ke mi plenumis sufiĉe kaj kun bona konscienco povas cedi al la laceco, kiu preskaŭ superregis min — mi aŭdis sonojn de tursonorilo.

Mi iris en la direkton de la sonoj, kaj tie, inter la romantikaj montetoj, kies alternon kaj belecon mi ne plu admiris, mi ekvidis vilaĝeton kaj preĝejturon. La tuta valo je mia dekstra

flanko estis plena de paŝtejoj, grenkampoj kaj arbaroj, brilanta rivero fluis zigzage tra la diversaj nuancoj de la herbejoj, la maturiĝanta greno, la odorantaj arbaroj kaj la helaj sunplena kampoj. La laŭta rulbruo de radoj direktis miajn pensojn ree al la antaŭ mi kuŝanta vojo. Mi vidis altŝarĝitan veturilon rampi kontraŭ monteto kaj, malproksime post ĝi du bovinojn kun pelanto. Sekve homoj kaj homa laboro estas en la proksimo. Mi nun devis treniĝi plu kaj klopodi vivi kaj labori kiel la aliaj. Je la kvara horo en la posttagmezo mi venis en la vilaĝon. Ĉe la fino de ĝia sola strato estis malgranda butikon kun kelkaj bulkoj kaj panoj malantaŭ la fenestro. Mi sopiris panbulkon. Per tia refreŝigo mi eble sukcesus reakiri ian gradon de energio; sen ĝi estus al mi neeble iri pluen. La deziro al forteco kaj rezistemo revenis al mi kiam mi ree estis inter homoj. Mi sentis, ke estas senhonorige senfortiĝi pro malsato sur vilaĝa vojo. Ĉu do mi posedis nenion por doni al tiuj homoj interŝanĝe de unu el tiuj bulkoj? Mi pripensis. Ĉirkaŭ la kolo mi portis malgrandan silkan tukon; mi ankaŭ posedis gantojn. Mi ne sciis, kiel faras viroj aŭ virinoj venintaj al la ekstremaj limoj de la mizero. Mi ja ne sciis, ĉu tiuj homoj akceptos unu el tiuj objektoj; verŝajne ili malakceptos — sed mi devis klopodi.

Mi eniris la butikon. En ĝi estis virino. Vidante bone vestitan personon, kiu aspektis kiel sinjorino, ŝi kondukis tre ĝentile. Ŝi demandis per kio ŝi povos servi al mi. Min ekregis granda honto. Mia lango ne povis balbuti la preparitan peton. Mi ne kuraĝis oferi la preskaŭ eluzitajn tukon kaj gantojn. Krome mi komprenis, ke estas malsaĝe. Mi petis nur la permeson sidiĝi momenton, ĉar mi estis tre laca. Trompita en siaj atendoj ŝi konsentis mian peton tre malvarme. Ŝi fingre

montris seĝon, mi falsidiĝis sur ĝin. Mi estis eksplodonta je larmoj kaj mi sentis la plej grandan tenton cedi tiun senton, sed ĝustatempe mi komprenis, kiel malsaĝa estus tia infanaĵo, tial mi regis min demandante, ĉu en la vilaĝo loĝas tajlorino aŭ tiuspeca metiistino.

Jes, du aŭ tri. Ĝuste tiom, kiuj povis trovi tie laboron.

Mi pripensis. Mi atingis la ekstremon. Mi nun staris vizaĝon kontraŭ vizaĝo antaŭ la mizero. Mi ne havis plu helpri-medojn! neniun amikon! neniun monon! Io tamen devos esti farata. Sed kio!? Mi devis turni min al iu ajn! Sed al kiu?

Mi demandis, ĉu ŝi konas iun en la ĉirkaŭaĵo, kiu bezonas servistinon.

Ŝi konis neniun.

”Kio estas la ĉefa komerco en ĉi tiu regiono? Per kio la plej multaj homoj gajnas sian vivopanon?”

”Kelkaj estas kamparanoj; multaj laboras en la kudril-fabriko de sinjoro Oliver kaj en la fandejo.”

”Ĉu sinjoro Oliver akceptas ankaŭ virinojn por labori?”

”Ne, ĉiu laboro estas nur por viroj.”

”Kion do faras la virinoj?”

”Mi ne scias tion, kelkaj faras jenon, kelkaj alion. Malriĉaj homoj devas klopodi iel gajni sian vivopanon.”

Ŝajnis, ke miaj demandoj tedis ŝin kaj reale kian rajton mi havis ĝeni ŝin per ili? Du najbarinoj eniris. Okulŝajne oni bezonis mian seĝon kaj mi foriris. Mi supreniris la straton kaj rigardis ĉiun domon dekstre kaj maldekstre. Sed mi povis trovi neniun pretekston por eniri en iun el ili. Mi vagis kelkan tempon en la vilaĝo; poste mi denove eliris ĝin, sed horon pli malfrue mi revenis en ĝin. Tute laciĝinte kaj suferante pro malsato, mi sekvis vojon kun kreskaĵbariloj kaj eksidis ĉe la

vojflanko. Sed nur malmultaj minutoj pasis, kiam ree mi ekstaris, serĉante elirejon aŭ iun, kiu povus helpi al mi. Beleta dometo kun ĝardeno antaŭ si staris je la fino de la vojo; la ĝardeno estis eksterordinare lerte aranĝita kaj estis plena de la plej belaj floroj. Mi haltis antaŭ ĝi. Kiel mi kuraĝus proksimiĝi al la blanka pordo aŭ tuŝi la brilantan frapilon? Kiel la loĝanto iel povus senti intereson, esti servema al mi? Malgraŭ tio mi proksimiĝis kaj frapis. Pure vestita, juna virino kun mildaj vizaĝtrajtoj malfermis al mi la pordon. Per voĉo, kiu konjektigis senesperan koron kaj malsanan korpon — mallaŭta, balbutanta voĉo — mi demandis, ĉu oni bezonas servistinon.

”Ne,” ŝi diris, ”ni ne havas servistinon.”

”Ĉu vi povas diri al mi, kie mi povos trovi iun ajn laboron?” mi demandis plue. ”Mi estas fremdulino ĉi tie, sen konatoj aŭ amikoj en ĉi tiu vilaĝo.”

Sed ne estis ŝia afero, pensi por mi aŭ serĉi por mi oficon. Krom tio, kiel dubaj nepre ŝajnos al ŝi mia karaktero, mia situacio, mia rakonto. Ŝi kapneis dirante, ke ŝi tre bedaŭras ne povi doni al mi informojn, kaj la blanka pordo fermiĝis senbrue kaj ĝentile, sed mi staris ekstere! Se ŝi ne tiel baldaŭ estus ferminta la pordon, mi kredas, ke mi estis petinta pecon da pano, ĉar mi atingis la ekstremon.

Mi ne povis elteni la penson, ke mi devos reiri en la malpuran vilaĝon, kie krome por mi ne estos trovebla ia helpo. Pli volonte mi forkurus en la arbaron, kiun mi vidis ne tro malproksime kaj kiu ŝajnis promesi al mi protekton en sia malluma ombro, sed mi estis tiel malsana, tiel malforta, tiel martirigita de la natura aspiro al nutraĵo, ke daŭre mi restis

en la proksimeco de domoj, kie eble mi povus akiri peceton da pano, ĉar tiu vulturo "malsato" disŝiris miajn intestojn.

Refoje mi proksimiĝis al la domoj; mi foriris de ili, sed ĉiam reiris al ili. Poste denove mi malproksimiĝis de ili, konstante forpelita de la konscio, ke mi ne rajtas almozpeti — nek por atendi, ke iu sentas intereson pri mia senesperiga situacio. Intertempe la posttagmezo iris al sia fino dum mi kiel erarvagadanta, perdita kaj senmastra hundo iris de loko al loko.

Irante trans kampon, mi vidis antaŭ mi preĝejoturon: mi rapidis tien. Apud tombejo, meze de ĝardeno staris malgranda sed bele konstruita domo, kiun mi tuj rigardis kiel la pas-tran loĝejon. Min trafis la penso, ke fremduloj, venantaj en iun vilaĝon, kie ili serĉas laboron, sed neniun enloĝanton konas, kelkfoje sin turnas al la pastro por peti helpon. Estas ja la devo de pastro helpi al tiuj — almenaŭ per sia konsilo — kiuj volas helpi sin mem. Ŝajnis al mi, kvazaŭ mi havas la raj-ton, serĉi tie konsilon. Mia kuraĝo per tio denove reviviĝis kaj kolektinte miajn lastajn fortojn, mi iris pluen. Mi atingis la domon kaj frapis sur la pordon de la kuirejo. Maljuna virino malfermis.

Mi demandis, ĉu ĉi tio estas la pastra domo.

"Jes."

"Ĉu la pastro estas hejme?"

"Ne."

"Ĉu li baldaŭ rehejmigos?"

"Ne, li estas sufiĉe malproksime de sia domo."

"Tre malproksime?"

"Ne tre malproksime — eble tri mejlojn. Pro la subita morto de sia patro li estis vokita tien; nuntempe li estas en Marsh End kaj restos tie eble ankoraŭ dekkvar tagojn.

”Ĉu la mastrino ne estas hejme?”

”Ne, neniu krom ŝi, kaj ŝi estas la mastrumistino.”

Ankaŭ de ŝi mi ne povis petegi savon el mia mizero, kiu preskaŭ ĵetis min teren. Ankoraŭ mi ne kapablis almozpeti. Mi faletis pluen.

Refoje mi demetis de mi la malgrandan koltukon — refoje mi pensis pri la panetoj malantaŭ la butikfenestro en la vilaĝo. Ho, se mi havu nur pecon da pano! Nur peceton por esti savata de la terura malsatmorto! Instinkte mi ree turnis la vizaĝon al la vilaĝo; mi trovis la butikon kaj eniris, kaj kvankam krom la bakistino ankoraŭ aliaj homoj estis tie, mi tamen kuraĝis peti, ĉu ŝi ne volas doni al mi paneton interŝanĝe de la silka tuko.

Kun ŝajna malfido ŝi rigardis min.

”Ne, ŝi ne kutimiĝas tiel vendi siajn varojn.”

Preskaŭ senespere mi petis duonan panon. Ankaŭ tion ŝi rifuzis. ”Kiel do ŝi povus scii, kiel mi akiris tiun tukon?” ŝi diris.

”Ĉu ŝi dezirus miajn gantojn?”

”Ne! kion ŝi do farus kun ili?”

Mia leganto, ne estas agrable rakonti kaj aŭskulti tiujn detalojn. Estas homoj, kiuj certigas, ke kaŭzas ĝojon rerigardi al turmentplenaj spertoj de la estinteco; sed ĝis la hodiaŭa tago estas al mi dolorige rerigardi al la tempo, pri kiu mi parolas. La moralaj degradigo kune kun la fizika sufero formas tro malĝojigan rememoron por volonte paroli pri ili. Mi mallaŭdis neniun el tiuj, kiuj rifuzis al mi. Mi sentis, ke mi povas nur atendi rifuzon kaj ke tio ne estis aliigebla. Ordinara ĉifonvestita almozulo estas ofte objekto de malfido; bonevestita almozulo estas ĉiam kaj sub ĉiuj cirkonstancoj io malfidinda.

Ĉiuokaze mi petis nur laboron; sed kies afero tio estis, doni ĝin al mi? Certe ne de homoj, kiuj vidis min por la unua fojo kaj kiuj nenion sciis pri mia karaktero. Kaj rilate al la virino, kiu ne volis akcepti mian tukon interŝanĝe de sia pano, ŝi nepre pravis malakcepti, se la propono ŝajnis al ŝi suspekta kaj la interŝanĝo ne profitodona. Sed nun mi volas resume daŭrigi. La temo naŭzas min.

Mallonge antaŭ ol mallumiĝis mi pasis bieneton, apud kies malfermita pordo sidis farmisto, kiu manĝis sian vespermanĝon konsistanta el pano kaj fromaĝo. Mi haltis kaj diris:

”Ĉu vi volas doni al mi panpecon? Mi estas tre malsata.”

Mirigite li rigardis min; sed ne respondante, li tranĉis de sia pano pecegon kaj donis ĝin al mi. Mi supozis, ke li ne rigardas min kiel almozulinon, sed nur kiel strangulinon, kiun subite atakis la deziro manĝi pecon da nigra pano. Tuj kiam mi estis tiel malproksime de lia domo, ke li ne povis plu vidi min, mi komencis manĝi.

Mi ne povis esperi trovi rifuĝejon sub iu tegmento kaj tial mi trovis ĝin en la arbaro, kiun antaŭe mi jam elektis. Sed la nokto estis terura, mi ne trovis ripozon. La tero estis malseka, la aero malvarma; krom tio entruduloj ofte pasis min kaj ĉiam denove mi devis serĉi alian kuŝejon. Neniu sento de ripozo aŭ sendanĝereco regis min. En la mateno pluvis. La tutan sek-vintan tagon la vetero estis malseke malvarma. Ne petu al mi, kara leganto, ke mi akurate sciigu pri tiu tago; kiel antaŭe mi serĉis laboron; kiel antaŭe oni malakceptis min; kiel antaŭe mi malsatis; nur unu fojon manĝaĵo tuŝis miajn lipojn. Apud pordo de kabano mi vidis knabinecon, kiu estis verŝonta tele-ron da malvarma kaĉo en trogon de porkejo.

”Ĉu vi volas doni tion al mi?” mi petis.

Ŝi mirigite rigardis min, poste ŝi kriis:

”Patrino, ĉi tie estas virino, kiu volas havi la kaĉon.”

”Nu, knabino,” respondis la voĉo de interne, ”donu ĝin al ŝi, se ŝi estas almozulino. La porko ĝin ne bezonas.”

La knabineto ŝutis la rigidan kaĉon en mian manon kaj avide mi ĝin manĝis.

Kiam la malseka, malvarma krepusko falis, mi haltis sur soleca rajdvojo, kiun mi sekvis jam pli longe ol unu horon.

”Miaj fortoj min nun tute forlasas,” mi diris monologe. ”Mi sentas, ke mi ne povos iri pluen. Ĉu mi estos ree senhejmulino ĉi tiun nokton? Ĉu mi devos meti mian kapon sur la malvarman, malsekan teron dum la pluvo rivere fluas malsupren? Mi timis, ke tio estos neevitebla, ĉar kiu akceptos min en sian hejmon? Sed estus terure, kun ĉi tiu sento de malsato, de senforteco, de malvarmo, de senkonsoleco — de ĉi tiu komplementa neniigo de ĉiu espero. Laŭŝajne mi mortos ankoraŭ antaŭ tagiĝo. Kaj kiel do mi ne povas repaciĝi kun la perspektivo je la morto? Kial mi luktis por daŭrigi tian senvaloran vivon? Ĉar mi scias aŭ kredas, ke sinjoro Rochester vivas ankoraŭ! Kaj tiam morti pro malsato kaj malvarmo estas sorto, al kiu la homa karaktero ne submetiĝas kviete.

Ho providenco! subtenu min ankoraŭ kelkan tempon! Helpu al mi! Konduku min!

Miaj malĝojaj okuloj vagis trans la nebulan, malsekan pejzaĝon. Mi vidis, ke mi vagis malproksimen de la vilaĝo; ĝi tute malaperis antaŭ miaj rigardoj. Sur vojkruciĝoj kaj flankvojoj mi alproksimiĝis ree al la marĉejo; nun kuŝis inter mi kaj la nebalkovritaj montoj malmultaj kampoj, preskaŭ same sovaĝaj kaj senfruktaj kiel la erikejo, al kiu ili antaŭ nelonge estis forrabitaj.

”Pli volonte mi volos morti tie supre, ol apud la landvojo aŭ apud movoplena vojo,” mi pensis. ”Kaj pli bone, multe pli bone estas, ke kornikoj kaj korvoj — se korvoj vivas en ĉi tiuj regionoj — ŝiras la karnon de miaj ostoj, ol ke ili estos meta-taj en ĉerkon de malriĉulejo kaj forputros en malriĉuleja tombo.

Mi tial direktis min al la montetoj. Mi atingis ilin. Restis al mi la tasko trovi kavernon por kaŝi min en ĝi, kvankam ankaŭ tie mi ne estus sendanĝera. Sed la tuta supraĵo de la sovaĝejo aspektis ebena. Ĝi montris nur unu alternon, la verdan koloron, kie junkoj kaj musko kovris la marĉejon kaj la nigran, kie la tero produktis nur erikojn.

Kvankam jam mallumiĝis, mi povis bone vidi tiun alternon malgraŭ tio, ke ĝi montrigis nur kiel lumo kaj ombro, ĉar la koloroj jam malaperis kun la taglumo.

Miaj okuloj vagis ankoraŭ trans la mallumajn montetojn kaj laŭlonge de la rando de la torfejo perdiĝanta en la plej sovaĝa pejzaĝo, kiam subite je malproksima loko, inter la marĉoj kaj altaĵoj aperis lumo.

”Tio estas *ignis fatuus*,” mi tuj pensis, kaj mi atendis, ke ĝi baldaŭ ree malaperos. Ĝi hele brulis, sed restis sur la sama loko. ”Ĉu tio estas ĵus ekbruligita ĝojofajro?” mi demandis. Mi fikse rigardis ĝin por vidi, ĉu ĝi estingiĝos; sed ne, ĝi nek pli-grandiĝis nek plimalgrandiĝis.

”Ĝi estas kandelolumo el iu domo,” mi poste supozis, ”sed kio ajn ĝi estu, mi ne povus tamen atingi ĝin, ĝi estas tro malproksima. Kaj eĉ se ĝi estus je jarda distanco, al kio tio utilis? Mi ja frapus nur al pordo por sperti, ke ĝi estos ree ŝlosita al mi.”

Mi falis sur la lokon, kie mi staris kaj premis la vizaĝon al

la tero. Momenton mi kuŝis senmove. La nokta vento blovis sur min kaj la monteton kaj formortis ĝemante en la perspektivon. Senhalte la pluvo falis kaj malsekigis min ĝis mia korpo. Se mi nur povus rigidiĝi en la amika, kompatema malvarmo de la morto — tiam ĝi estus bonvena al mi kaj mi ne sentus ĝin; sed mia vivo-varma korpo frostotreme kuntiriĝis sub ĝia malvarmiga enfluo. Ĝi ne frostotremis longe, kaj ree mi leviĝis.

La lumo estis ankoraŭ tie; ĝi lumis malgaje sed konstante tra la pluvo. Mi penis iri pluen; mi trenis miajn trolacigitajn korpomembrojn malrapide renkonte al ĝi. Ĝi kondukis min oblikve trans la monteton tra vasta marĉo, kiu en la vintro estas netransirebla kaj eĉ nun en la malfrua somero estis malseka kaj nevidebla. Mi falis du fojojn. Sed ankaŭ du fojojn mi leviĝis kaj denove kolektis la reston de miaj fortoj. Tiu lumo estis mia lasta movo en la hazardludo de la vivo — mi devus venki!

Forlasinte la marĉon, mi vidis blankan striegon sterniĝanta trans la marĉon. Mi proksimiĝis al ĝi; ĝi estis vojo aŭ vojeto kondukanta rekte al la lumo, kiu nun de sur iu pinto aŭ supra lumis renkonte al mi inter grupo da arboj. La arboj, kiom mi povis distingi ilin en la mallumo, estis abioj. Kiam mi alproksimiĝis, malaperis mia stelo; iel malhelpo stariĝis inter ni. Mi etendis la manojn, por senti antaŭ mi la malhelan mason; mi tuŝis la malglatajn ŝtonojn de malalta muro — super ĝi estis io, simila al palisaro kaj plue mi sentis altan dornan plekto-barilon. Mi palpis pli malproksimen. Denove lumis antaŭ mi blanka objekto; ĝi estis pordo — pordego; ĝi moviĝis sur siaj hokoj, kiam mi tuŝis ĝin. Ĉe ĉiu flanko staris nigra arbeto — ilekso aŭ taksuso.

Kiam mi trairis la pordegon kaj preteriris la arbetaĵon, leviĝis antaŭ miaj rigardoj la silueto de domo. Ĝi estis nigra, malalta kaj sufiĉe longa; sed la savanta lumo lumis plu nenie. Ĉio dronis en mallumo. Ĉu la loĝantoj jam enlitiĝis? Mi timis, ke estas tiel. Serĉante la pordon, mi turnis angulon; jen la amika lumstrio denove aperis lumante renkonte al mi el la longaj vitroj de malgranda kradhava fenestro, nur unu futon super la tero; ĝi ŝajnis ankoraŭ pli malgranda pro la branĉoj de hedero aŭ ia alia grimpa kreskaĵo, kies folioj kovris preskaŭ la tutan parton de la domo, en kiu troviĝis ĉi tiu fenestrokavaĵo. La malfermaĵo estis tiel kovrita de verdaĵo kaj tiel mallarĝa, ke fenestrokurtenoj aŭ kovriloj estus tute superfluaĵ; kaj min klinante kaj ŝovinte flanken la verdaĵon, ni povis ĉion vidi, kio okazis interne. Klare mi vidis ĉambron kun frotpurigita kaj sable ŝutita planko; telerbretaron el juglando, sur kiu staris en longa vico stanaj teleroj tiel blankaj, ke la ruĝa rebriĵo de torfofajro spegulis sin en ili. Mi povis vidi horloĝon, blankan tablon el abia ligno kaj kelkajn seĝojn. La lumo, kies radio estis mia lumturo, brulis sur la tablo; ĉe ĝia brilo trikis super ŝtrumpo iom maljuna virino, aspektanta iom kruda, sed ekstreme pura kiel ĉio ĉirkaŭe.

Mi rimarkis tiun virinon nur senatente — ŝia eksteriĝo tute ne estis eksterordinara. Ĉe la kameno sidis grupeto, kiu pli multe vekis mian atenton, ĉar ĝi montris sin al miaj okuloj en rozkolora paco kaj agrabla varmo. Du junaj, ĉarmaj virinaj estaĵoj — ĉiuokaze sinjorinoj aŭ fraŭlinoj — sidis, unu en lulseĝo, alia sur malalta benketo; ambaŭ estis funebre vestitaj per krepo kaj bombazino; tiuj malhelaj vestaĵoj des pli multe montris iliajn delikatajn nukojn kaj belajn vizaĝojn; granda, maljuna perdrikhundo estis metinta sian kapon sur la ge-

nuojn de unu el la knabinoj; sur la genuoj de la alia kuŝis nigra katino.

Ĉi tiu humila kuirejo estis stranga restadejo por tiaj loĝantoj! Kiu ili estis? Neeble ili estis la filinoj de tiu iom maljuna virino sidanta ĉetable; ĉar ŝi aspektis kiel kamparanino, kaj ilia aspekto nur brilis pro delikateco kaj civilizo. Nenie mi antaŭe vidis vizaĝojn similaj al iliaj; tamen kiam mi rigardis ilin, mi konis ĉiujn vizaĝtraĵojn. Mi ne povas nomi ilin belaj, ili estis tro palaj kaj seriozaspektaj. Sidante tie, ĉiu klinita super libro, ili aspektis enpensaj kaj preskaŭ severaj.

Kandelingotablo inter ili portis duan kandelon kaj du dikajn librojn, kiujn ili ofte konsiliĝis; okulsajne ili komparis tiujn libregojn kun la pli malgrandaj, kiujn ili havis en siaj manoj, kiel personoj uzantaj vortaron, kiu utilas en tradukado. Ĉi tiu bildo estis tiel kvietaj kvazaŭ ĉiuj figuroj estis nur ombroj kaj la hele prilumita ĉambrobildo; ĉio estis tiel silenta, ke mi povis aŭdi la cindrojn fali tra la fajrokrado kaj la horloĝon tik-taki en la malluma angulo; mi eĉ imagis povi aŭdi la klaketadon de la trikiloj de la maljuna virino. Kiam poste fine voĉo interrompis tiun strangan senbruon, ĝi estis al mi sufiĉe aŭdebla.

”Aŭskultu, Diana,” diris unu el la diligentaj legantinoj: ”Franz kaj la aĝa Daniel estas kune en la nokto kaj Franz rakontas sonĝon el kiu li kun teruro vekiĝas, jam aŭdu”. Kaj mallaŭtvoĉe ŝi legis ion, pri kio mi komprenis eĉ ne unu solan vorton; ĉar ŝi legis en al mi fremda lingvo — nek en la franca nek en la latina. Mi ne povis diri, ĉu ŝi legis greke aŭ germane.

”Tio estas forta,” ŝi diris, leginte ĝis la fino, ”tio plaĉas al mi.”

La alia knabino, kiu estis levinta la kapon por aŭskulti la legadon, ripetis dum ŝi incitis la fajron, unu el la frazoj ĵus legintaj. En postaj tagoj mi konatiĝis kun la lingvo kaj la libro; tial mi volas nun citi tiun frazon, kvankam ĝi, kiam mi ĝin aŭdis por la unua fojo, estis al mi nur kiel frapado sur tintanta metalo, kiu havis por mi neniun sencon:

*"Da trat hervor Einer, anzusehen wie die Sternennacht."*<sup>1</sup> Bone! Bone! ekkriis ŝi, dum ŝiaj profundaj malhelaj okuloj ardis. "Jen vi vidas staranta antaŭ vi potencan ĉefanĝelon en deca sinteno! Ĉi tiu sola frazo valoras pli multon ol cent paĝoj da senenhavaj paroloj. *"Ich wäge die Gedanken in der Schale meines Zorns und die Werke mit dem Gewichte meines Grimms!"*<sup>2</sup> Tio plaĉas al mi.

Ambaŭ ree eksilentis.

"Ĉu vere estas ie lando, kie la homoj tiel strange parolas?" demandis la maljuna virino, rigardante supren de sia laboro. "Jes, Hanna, multe pli granda lando ol Anglujo, kie oni nur tiel parolas."

"Nu, kara ĉielo, mi ne komprenas, kiel ili per tia lingvo povas paroli unu kun alia; se unu el vi tien vojaĝus — ĉu vi kredas, ke vi povus kompreni ilin?"

"Eble ni komprenus iomete de tio, kion la tieaj homoj parolas, sed ne ĉion — ĉar ni ne estas tiel instruitaj kiel vi kredas, Hanna. Ni ne parolas germane, kaj ni ne scias legi ĝin sen helpo de vortaro."

"Kaj kiun utilon vi havas per tio?"

"Ni intencas iam lerni ĝin pli bone — aŭ almenaŭ la ele-

1 "Jen pasis antaŭen iu aspektanta kiel la steloplana nokto."

2 "Mi pesas la pensojn en la pesilo de mia kolero kaj la laborojn per la pezo de mia furiozo!"

mentojn, kiel oni nomas tion; tiam ni perlaboros pli da mono ol ni povas nun.”

”Tre povas esti! Sed nun ĉesu studadi; hodiaŭ vespere vi laboris sufiĉe.”

”Tion mi kredas ankaŭ, ĉar mi estas laca. Ĉu vi same, Maria?”

”Ĝismorte laca. Reale estas malfacila kaj enuiga laboro, trolaciĝi je lingvo sen alia instruisto krom leksikono.”

”Tio estas vera. Precipe je lingvo tiel forta kaj belega kiel la germana. Mi dezirus scii, kiam St. John venos hejmen.”

”Tre certe li ne forestos plu longe; estas preskaŭ la deka horo.” Dirante tion ŝi rigardis belan poŝhorloĝon, kiun ŝi eltiris el la zono. ”Pluvas terure, Hanna, ĉu vi bonvolos iri por ekzameni la fajron en la familia ĉambro?”

La virino leviĝis; ŝi malfermis pordon, tra kiu mi klare povis distingi koridoron. Tuj poste mi aŭdis, ke ŝi incitas fajron en interna ĉambro. Farinte tion, ŝi revenis.

”Ho, infanoj!” ŝi diris, ”estiĝas al mi malĝoje penege eniri nun tiun ĉambron; ĝi aspektas tiel solece kaj forlasite pro la malplena seĝo, kiu staras nun en angulo!”

Ŝi sekigis per la antaŭtuko siajn okulojn. La du junaj knabinoj, kiuj ĝis nun aspektis gravmiene, subite malĝojis.

”Sed li estas en pli bona loko,” parolis plue Hanna; ”mi ne povus deziri lin returne. Krom tio, neniu mortis pli kviete ol li.”

”Vi diras, ke li ne parolis pri ni?” diris unu el la junaj fraŭlinoj.

”Li ne havis la tempon, miaj infanoj, li ne havis la tempon fari tion; okazis en nur unu minuto, jes nur en unu minuto. Li ne sentis sin tiel sana, kiel la antaŭan tagon, sed li diris, ke

tio ne gravas; kaj kiam sinjoro St. John demandis al li, ĉu ni alkonduku unu el vi, tiam li priridis lin rekte antaŭ la nazo, jes, rekte antaŭ la nazo. La sekvintan tagon revenis al li tiu terura kapdoloro — jam dekkvar tagoj pasis post tio — kaj li endormiĝis kaj ne plu vekigis. Li preskaŭ tute malvarmiĝis, kiam via frato eniris en lian ĉambron kaj trovis lin en tiu stato. Ve, miaj infanoj, li estis la lasta de la maljuna gento — ĉar vi kaj sinjoro St. John estas alispecaj ol tiuj, kiuj jam mortis. Via patrino ankaŭ estis tre simila al vi kaj estis preskaŭ same instruita. Vi estas ŝia portreto, Maria; Diana pli similas sian patron.

Mi trovis ilin tiel similaj unu al alia, ke mi ne povis kompreni kiel la maljuna servistino (ĉar nun mi rigardis ŝin tia) povas trovi diferencon inter ili. Ambaŭ havis delikatan vizaĝkoloron kaj estis gracilongaj. Iliaj vizaĝoj montris inteligon kaj distingigon. La haroj de unu el ambaŭ estis iom pli malhelaj kaj ili estis aranĝintaj la harojn malsame. La hele brunaj bukloj de Maria estis dislimigitaj kaj pendis trans la tempioj; la pli malhelaj harligoj de Diana pendis amase trans ŝia nuko.

La deka horo sonis.

”Vi eble deziras vian vespermanĝon, ĉu ne?” demandis Hanna, ”kaj sinjoro St. John ankaŭ deziros sian, kiam li rehejmiĝos.”

Kaj ŝi komencis pretigi la manĝotablon. Ĝis tiu momento mi tiel okupis min rigardante la virinojn — ilia interparolo tiel vekis mian intereson, ke mi preskaŭ forgesis pri mia senespera stato. Subite mi denove pensis al ĝi. Pro la kontrasto ĝi ŝajnis al mi pli senkonsola, pli terura ol antaŭe. Kaj kiel neble ŝajnis al mi inspiri al la loĝantoj de ĉi tiu domo iun kompa-

ton rilate al mi, kredigi al ili la veron pri miaj mizero kaj suferoj por permesi al mi mallongan ripozon en sia hejmo!

Irinte al la pordo kaj frapinte, mi sentis, ke la lasta penso estis nura ĥimero.

Hanna malfermis la pordon.

”Kion vi volas?” ŝi demandis mirigite, ekzamene rigardante min en la lumo de la kandelo, kiun ŝi havis en la mano.

”Ĉu mi povas paroli al via mastrino?”

”Prefere diru al mi, kion vi volas de ŝi. De kie do vi venas?”

”Mi estas fremdulino ĉi tie.”

”Kion do vi volas ĉi tie en tia malfrua horo?”

”Mi petas lokon por dormi en stalo aŭ ie alie, kaj pecon da pano.”

Malfido — ĝuste la sama sento, kiun plej multe mi timis, estis legebla sur la vizaĝo de Hanna.

”Mi volas doni al vi panpecon,” ŝi diris post momento; ”sed al vagulino ni ja ne povas doni lokon por dormi. Tion vi do ne deziras!”

”Lasu min paroli kun la fraŭlinoj!”

”Ne, tute ne. Kion ili povus fari por vi? En ĉi tiu horo vi ne tiel ĉirkaŭvagu. Tio estas suspektinda!”

”Sed kien mi iru, kiam ankaŭ de ĉi tie oni forpelas min? Kion mi faru?”

”Ho! mi estas certa, ke vi bone scias, kien vi iru kaj kion vi faru. Atentu nur, ke vi ne plenumos ion kontraŭlegan! Krome, tio ja ne tuŝas min. Jen, akceptu moneron kaj iru for —

—”

”Moneron mi ne povas manĝi kaj mi ne havas plu la forton iri pluen. Ho! ne fermu al mi la pordon — ne faru tion! Pro la volo de Dio, ne faru tion!

”Mi devas; la pluvo falegas internen.”

”Iru paroli al la fraŭlinoj. — Diru, ke mi estas ĉi tie.”

”Tute ne, ho ne, tute ne! Vi ne estas, kiu vi volas ŝajnigi, alie vi ne farus tian bruon. Iru for!

”Sed mi devos morti, se mi estos forpelita.”

”Sensencaĵo! Tiaj vaguloj ne mortas. Mi timas nur, ke vi havas malbonajn intencojn. Kial do vi ĉirkaŭvagas tiel malfrue antaŭ la domoj de aliaj homoj? Se eble vi havas kunhelpanton — rompŝteliston aŭ iun tian, tiam diru al li, ke ni ne estas solaj hejme; ni havas ĉi tie viron kaj hundon kaj pafilon.”

Dirinte tion, la honesta sed nefleksebla servistino fermis antaŭ mia nazo la pordon kaj riglis ĝin interne.

Mia mizero atingis sian supron! La plej terura sufero — sento de vera malespero disŝiris mian koron. Miaj fortoj estis elĉerpitaj; mi ne povis fari plu unu paŝon. Mi falis sur la ŝtonan ŝtuparon; mi ĝemis, mi tordis miajn manojn — mi ploris en mia morta angoro. Ho! tiu fantomo de la morto! Ho, tiu lasta horo, kiu proksimiĝis kun siaj teruroj! Ho, tiu forlasiteco — tiu forpelado de miaj kunhomoj! Ne nur la firman ankron de hejmo, sed ankaŭ tutan mian animforton mi perdis, sed nur por unu momento. Sed mi penis reakiri tiun lastan.

”Mi povas nur ankoraŭ morti,” mi diris, ”kaj mi kredas je Dio. Mi penu sindone atendi Lian volon.”

Tiujn parolojn mi ne nur pensis, sed mi diris ilin; kaj repuŝante mian tutan mizeron en mian koron, mi penis reteni ĝin tie kaj resti senparola kaj silenta.

”Ĉiu homo devas morti,” diris voĉo apud mi; ”sed ne ĉiuj

estas kondamnitaj trovi malrapidan aŭ antaŭtempan morton, kiel estus via, se vi pereus ĉi tie pro manko.”

”Kio aŭ kiu parolas?” mi demandis kun teruro, aŭdante tiujn neatenditajn vortojn; ĉar mi ne estis plu kapabla ĉerpi esperon je helpo el iu ajn cirkonstanco. Figuro estis proksima — kiu figuro, tion mi ne povis distingi pro la nigra nokto kaj pro miaj malfortiĝinta vidkapablo. Per laŭta, longa frapado la noveveninto sin anoncis ĉe la pordo.

”Ĉu vi estas tie, sinjoro St. John? demandis Hanna.

”Jes, malfermu rapide.”

”Ho, kara ĉielo, kiel malvarme estas al vi kaj kiel vi malsekiĝis pro tia nokto! Tuj eniru! Viaj fratinoj sentas grandan timon pro vi. Kaj mi vere kredas, ke ĉirkaŭvagas tie malbonfaristoj. Almozulino estis ĉi tie — sed en vero, ŝi ankoraŭ ne foriris! — eĉ kuŝiĝis ĉi tie! Leviĝu do! Estas honto. Iru for! mi diras ankoraŭ una fojon!”

”Kviete Hanna! Mi volas paroli kelkajn vortojn kun ĉi tiu virino. Vi faris vian devon, ne enlasante ŝin, nun mi faru mian enlasante ŝin. Mi estis en la proksimeco kaj mi aŭdis, kion vi diris unu al alia. Mi kredas, ke ĉi tiu okazo estas tre speciala — almenaŭ mi devas ekzameni ĝin. Juna virino, leviĝu kaj antaŭiru min en la domon.”

Plej malfacile mi obeis al li. Tuj poste mi staris en la pura, hele prilumita kuirejo — antaŭ fremda kameno — tremante kaj plimalfortiĝante, bone sciante, ke mi aspektas en plej alta grado ĉifonvestita, fantoma kaj teruriga. La du junaj fraŭlinoj, ilia frato sinjoro St. John, kaj la maljuna servistino — ĉiuj mirigite rigardis min.

”St. John, kiu ŝi estas?” demandis iu el la aliaj.

”Mi ne scias. Mi trovis ŝin antaŭ la pordo,” li respondis.

”Ŝi aspektas tre pala,” diris Hanna.

”Pala kiel la morto,” respondis alia, ”ŝi falos, sidigu ŝin.”

Mi sentis kapturniĝon, mi falis, sed seĝo akceptis min. Mi ankoraŭ ne svenis, kvankam mi ne kapablis paroli.

”Eble iom da freŝa akvo revivigos ŝin. Hanna, alportu iom. Sed ŝi tute malfortiĝis. Kiel maldika ŝi estas! Eĉ ne unu sango-guto estas plu en ŝiaj vangoj!”

”Vera fantomo!”

”Ĉu si estas malsana aŭ mortmalsata?”

”Mortmalsata, mi kredas. Hanna, ĉu vi havas lakton? Donu ankaŭ pecon da pano.”

Diana (mi rekonis ŝin je la longaj harplektoj, kiujn mi vidis fali malsupren inter mi kaj la fajro, kiam ŝi sin klinis super mi) dispecigis iom da pano, trempis ĝin en lakto, kai tenis ĝin antaŭ miaj lipoj. Ŝia vizaĝo estis tute proksime al mia. Mi vidis sur ĝi ŝian kompaton kaj pro ŝiaj rapidaj spiroj mi sentis simpatian. El ŝiaj simplaj paroloj montriĝis same la balzam-simila emocio, kiam ŝi diris: ”Provu manĝi.” ”Jes, provu,” ripetis Maria, kaj la mano de Maria forigis mian malsekegan ĉapelon kaj levis mian kapon. Komence mi manĝis malrapide, poste avide, kion ili al mi oferis.

”Ne tiom per unu fojo — retenu ŝin,” diris la frato, ”ŝi manĝis sufiĉe.” Kaj li forprenis la tason kun la lakto kaj la teleron kun pano.

”Ankoraŭ iomete, St. John — rigardu do la timeman avidecon en ŝiaj okuloj.”

”Atendu momenton, fratino. Ni klopodos ŝin paroligi — demandu pri ŝia nomo.”

Mi sentis, ke mi kapablas paroli kaj mi respondis:

”Mia nomo estas Jane Elliot.” Mi decidis ne diri mian nomon kaj elpensi *aliason*.

”Kie vi loĝas? Kie estas viaj amikoj kaj konatoj?”

Mi silentis.

”Ĉu ni povas forsendi iun por alkonduki personon, kiu konas vin?”

Mi kapneis.

”Kion vi mem povas diri al ni pri tio?”

Estis strange! Post kiam mi transiris la sojlon de ĉi tiu domo kaj min trovis vizaĝon kontraŭ vizaĝo antaŭ ĝiaj loĝantoj, mi ne sentis min plu kiel forpeltino, kiel vagulino, ekzilita de la tuta mondo. Mi havis la kuraĝon formeti de mi la rolon de almozulino, kaj repreni miajn naturajn manierojn kaj karakteron. Mi komencis rekoni min mem. Kaj kiam sinjoro St. John deziris de mi sciigojn — kiujn mi pro malforteco ankoraŭ ne povis doni — mi diris post mallonga paŭzo:

”Sinjoro, mi ne estas kapabla sciigi al vi hodiaŭ vespere pluajn detalojn.”

”Sed kion do vi atendas de mi, ke mi faru por vi?” li demandis.

”Nenion!” mi respondis. Miaj fortoj estis nur sufiĉaj por doni mallongajn respondojn. Diana ekparolis:

”Ĉu vi intencas diri per tio, ke ni donis nun al vi ĉiun nian helpon, kiun vi bezonas?” ŝi demandis, ”kaj ke ni povos nun lasi foriri vin eksteren en pluvon kaj sur la malsekan marĉon?”

Mi rigardis ŝin. Mi trovis, ke ŝi havas rimarkindan vizaĝon sur kiu unuiĝis saĝeco, forteco kaj bonkoreco. Subite mi kuraĝiĝis. Respondante ŝian kompateman rigardon per rideto, mi diris:

”Mi volas fidi vin. Se mi estus senhejma kaj senmastra hundo, vi ne forpelus min eksteren hodiaŭ nokte, tion mi scias. Mi jam ne sentos timon. Faru por mi kaj kun mi, kion vi volas, sed ne instigu min paroli — mia spiro estas rapida — mi sentas ian spasmon, kiam mi parolas.”

Ĉiuj tri rigardis min kaj ĉiuj tri silentis.

”Hanna,” diris fine sinjoro St. John, ”lasu ŝin sidi tie momenton kaj ne faru al ŝi demandojn. Donu al ŝi post deko da minutoj la reston de la lakto kaj pano. Maria kaj Diana, ni iru en la familian ĉambron por pripensi.”

Ili retiriĝis. Tre baldaŭ poste unu el la fraŭlinoj revenis — mi ne povis distingi, kiu. Agrabla senkonscio ekregis min, kiam mi estis sidanta apud la vigla fajro. Mallaŭtvoĉe ŝi ordonis ion al Maria. Baldaŭ mi povis kun helpo de la servistino supreniri ŝtuparon; ŝi demetis de mi la malsekajn vestojn kaj tuj poste mi kuŝis en agrabla kaj varma lito. Mi dankis Dion — mi sentis malgraŭ mia terura laceco, la plej koran dankemon — kaj ekdormis.

## Ĉapitro XXIX.

**P**ri la tri tagoj kaj noktoj, kiuj pasis, mi konservis nur tre malfortan kaj malklaran rememoron. Mi povus revoki al mi kelkajn sentojn, kiujn mi havis en tiu tempo, sed firman bildon pri tio mi ne povas formi, ĉar mi estis tro malforta. Mi sciis, ke mi kuŝas en mallarĝa lito en ĉambreto. Ŝajnis al mi, ke mi firmkreskis al tiu lito. Senmove kiel ŝtono mi kuŝis kaj se oni estus portinta min el ĝi, tiam estus al mi kvazaŭ mi mortus. Mi ne rimarkis la pason de la tempo mi sciis nenion pri la ŝanĝiĝo de mateno al tagmezo, de tagmezo al vespero. Mi rimarkis, ke iu eniris aŭ eliris la ĉambreton; mi eĉ povus diri, kiu eniris aŭ eliris; mi povis kompreni, kio estis parolata kiam parolanto staris proksime de mi, sed mi ne kapablis respondi; same neeble estis al mi movi miajn korpomembrojn, nek la lipojn. Hanna, la servistino plej ofte vizitis min. Ŝia alveno tamen ĝenis min. Mi sentis, kvazaŭ mi dezirus denove esti for de tie; kvazaŭ ŝi komprenis nek mian staton nek min mem; kvazaŭ ŝi sentis kontraŭ mi antipation. Unu aŭ du fojojn tage aperis Diana kaj Maria en la ĉambreto. Multe ili flustris apud mia lito jene:

”Mi ĝojas, ke ni akceptis vin.”

”Jes. Alie ni estus trovintaj vin jam mortinta antaŭ la por-do la sekvintan matenon, se ni lasus vin tiel ekstere la tutan nokton. Mi volis nur scii, kion vi trasuferis.”

”Strangajn mizeron kaj malhavojn vi sendube spertis, mi kredas — kompatinda, pala suferantino!”

”Laŭ ŝiaj paroloj ŝi ne estas necivilizita persono, mi opinias. Ŝia akcento estis tre pura; kaj la vestoj, kiujn ni deprenis de ŝi, ne estis foruzitaj kvankam malsekaj kaj malpuraj.”

”Ŝi havas karakterizan vizaĝon; kvankam ĝi estas tre mal-dika, ĝi plaĉas al mi; kaj mi povas bone imagi al mi, ke ŝia fizionomio estas agrabla, kiam ŝi estos sana, gaja kaj feliĉa.”

Je ĉiuj iliaj interparoloj mi neniam aŭdis eĉ unu silabon de bedaŭro pro la al mi montrita gastamo; nek unu vorton pri antipatio aŭ malkonfido al mi. Mi sekve estis kvietigita.

Sinjoro St. John venis nur unu fojon; li rigardis min kaj diris, ke ĉi tiu stato de letargio estas la rezulto de la rezulto post supermezura kaj tro longa laciĝo. Li opiniis, ke ne estas necese venigi kuraciston, kaj ke estos plej bone lasi al la naturo kuraci min. Li diris, ke ĉiu el miaj nervoj estas streĉita en plej alta grado, kaj ke la tuta nerva sistemo restos longan tempon en tiu stato de letargio. Tio, li diris, ne estas malsano. Li kredis, ke mia resaniĝo subite kaj tre rapide montriĝos. Ĉion tion li diris per malmultaj vortoj, per nelaŭta, kvieta voĉo. Post mallonga paŭzo li diris plue en maniero, kiu montris, ke li ne toleras klarigajn rimarkojn: ”ŝi havas neordinaran fizionomion, kiu certe ne portas la stampon de malboneco aŭ degradeco.”

”Tre malproksime de tio,” respondis Diana. ”Malkaŝe dirite, St. John — mia koro sentas inklinon al la kompatinda, eta suferantino. Mi dezirus, ke ni daŭre povus esti al ŝi utilaj.”

”Tio estas apenaŭ supozebla,” estis la respondo. ”Montriĝos, ke ŝi estas juna knabino, kiu havis disputon kun siaj gemastroj kaj kiujn poste ŝi senpripense forlasis. Eble sukcesos

al ni, rekonduki ŝin al ili, se ŝi ne estas tro obstina; sed sur ŝia vizaĝo mi vidas trajtojn, kiuj perfidas rezistemon kaj kiuj igas min skeptika rilate al ŝia cedemo.”

Li restis momenton staranta kaj rigardis min, poste li daŭrigis: ”Ŝi aspektas saĝa, sed ŝi tute ne estas bela.”

”Ŝi ja estas tiel malsana, St. John.”

”Malsana aŭ sana, ŝi ĉiuokaze estas malbela. Al tiuj trajtoj plene mankas la ĉarmo kaj la harmonio de la beleco.”

La trian tagon mi sentis min pli bona; la kvaran mi povis paroli, moviĝi, sidi sur la lito kaj turni min. Estis, mi kredas, je tagmezo, kiam Hanna portis al mi kelkajn rostitajn pan-tranĉaĵojn kaj iom da grio. Mi manĝis kun apetito — por la unua fojo mi ne sentis plu la febran postguston, kiu ĝis tiu tempo de mia malsano malbonigis tutan mian manĝaĵon. Kiam ŝi estis forlasinta min, mi sentis min ree viviĝinta kaj laŭ la cirkonstancoj sufiĉe forta; la kuŝado sur la lito tedis min, kaj min ekregis la deziro al movo kaj laborado. Mi volis ellitiĝi; sed kiujn vestojn mi surmetos? Nur la malsekajn, malpurajn, en kiuj mi dormis sur la erikejo kaj sur la marĉejo? Mi hontis aperi en tiaj vestoj antaŭ miaj bonfarantoj. Sed feliĉe mi ne devis submetiĝi al tiu humiligo.

Sur seĝo flanke de mia lito kuŝis ĉiuj miaj vestaĵoj, sed purigitaj kaj sekaj. Mia nigra silka robo pendis sur la muro. La kotmakuloj estis forigitaj, la faldoj, kiujn ĝi ricevis pro la pluvo, estis gladitaj: ĝi aspektis dece. Eĉ miaj ŝuoj kaj ŝtrumpoj estis puraj kaj igitaj uzeblaj. Ĉiuj objektoj por purigi min kaj kombilo kun broso estis en la ĉambreto. Post tre longa tempo, dum kiu mi devis ripozi ĉiujn kvin minutojn, mi fine sukcesis vesti min. Miaj vestoj pendis larĝe ĉirkaŭ mi, ĉar mi estis tre maldikiĝinta; sed tiun mankon mi kovris per mia ŝalo, kaj

fine denove mi aspektis pura kaj deca — neniu makuleto, neniu postsigno de malordo, kiujn mi tiel malamis, kaj kiuj humiligus min laŭ mia opinio, estis plu videblaj sur mi. Daŭre tenante la balustradon, mi malsupreniris la ŝtuparon. Mi venis en mallarĝan koridoron kaj tuj trovis la vojon al la kuirejo.

Ĝi estis plena de laodoro de nove bakita pano kaj granda hela fajro varmigiĝis ĝin. Hanna estis bakanta. Multaj scias, ke estas plej malfacile elradiki antipation el tiuj koroj, kies grundo neniam fariĝis fruktodona per edukado; tie kreskas la antipatio kaj enradikiĝas kiel la herbaĉo inter la ŝtonoj. Komence Hanna estis al mi malvarma kaj rigida; post nelonge ŝi iomete varmigiĝis kaj malrigidiĝis, kaj vidante min eniri pura kaj dece vestita, ŝi eĉ ridetis.

”Kion! Ĉu vi ellitiĝis!” kriis ŝi. ”Ĉu vi do resaniĝis fine? Se vi volas, vi povos sidiĝi sur mia seĝo apud la fajro.”

Ŝi fingre montris la lulseĝon kaj mi sidiĝis. Ŝi sin ŝovis kaj sin movis en la kuirejo, ĵetante al mi de tempo al tempo ekzamenantajn ekrigardojn. Dum ŝi prenis kelkajn panojn el la bakforno, ŝi subite kaj akre diris al mi:

”Ĉu vi jam antaŭe almozpatis, antaŭ ol vi venis al ni?”

Mallongan tempon mi sentis ofendon, sed feliĉe min trafis la penso, ke mi ne sentu ofendon, kaj ke mi laŭ ŝiaj supozoj vere estas nur almozulino; tial mi kviete, sed iom akre respondis:

”Vi trompiĝas, kredante, ke mi estas almozulino. Same kiel vi kaj viaj junaj mastrinoj mi tute ne estas almozulino.”

Post paŭzeto ŝi demandis plue: ”Tion mi ne komprenas. Vi ja ne havas hejmon nek kupreron?”

”Pro tio ke mi ne havas hejmon kaj kupraĵon (mi supozis

ke ŝi celis per tio monon), mi tamen ne estas ankoraŭ almozulino, ĉu ne?"

"Vi do estas instruitulino?" ŝi demandis tuj poste.

"Jes, certe mi estas!"

"Sed vi do neniam studis en edukejo?"

"Mi estis sinsekve ok jarojn en edukejo."

Largê ŝi malfermis la okulojn. "Kial do vi ne povas gajni vian propran vivopanon?"

"Mi ĝis nun faris tion kaj espereble baldaŭ denove. Kion vi intencas fari kun tiuj grosoj?" mi demandis, kiam ŝi aperigis korbon da tiuj fruktoj.

"Mi bezonas ilin por farota fruktotorto."

"Donu ilin al mi por ke mi diselektu ilin."

"Ne, vi ankoraŭ ne laboru."

"Sed mi ne povas tiel sidi farante tute nenion! Jam donu ilin al mi!"

Fine ŝi konsentis kaj eĉ ŝi donis al mi puran mantukon por sterni ĝin sur mia vesto, "por ke mi ne malpurigu ĝin," ŝi diris plue.

"Vi do ne kutimiĝis al mastrumada laboro; tion mi vidas je viaj manoj" ŝi rimarkis. "Eble vi estas kudristino."

"Ne, vi eraras. Nun ne plu cerbumu pri kio mi estis; ne plu rompu al vi la kapon kun miaj aferoj; sed diru al mi, kie mi nun estas, kiel nomiĝas ĉi tiu domo."

"Kelkaj homoj nomas ĝin Marsh End, aliaj nomas ĝin Moor House<sup>1</sup>."

"La sinjoro, kiu loĝas ĉi tie, sin nomas sinjoro St. John, ĉu ne?"

1 Marĉ-domo

”Li ne loĝas ĉi tie; li nur okaze estas ĉi tie kelkajn tagojn. Li loĝas en sia propra domo kaj tio estas la pastrejo de Morton.”

”Ĉu tiu vilaĝo situas kelkajn mejlojn de ĉi tie?”

”Jes.”

”Kio li estas?”

”Li estas pastro.”

Mi ekpensis pri la respondo de la maljuna mastrumistino en la pastrejo, kie mi estis petinta paroli kun la pastro.

”Ĉu ĉi tiu domo estis la domo de lia patro?”

”Jes. La maljuna sinjoro Rivers loĝis en ĉi tiu domo, kaj antaŭ li lia patro kaj lia avo, kaj eĉ lia praaavo.”

”La nomo de ĉi tiu sinjoro sekve estas ankaŭ sinjoro St. John Rivers, ĉu ne?”

”Jes. Lia bapto-nomo estas St. John.”

”Kaj liaj fratinoj nomiĝas Diana kaj Maria?”

”Jes.”

”Ilia patro mortis?”

”Mortis antaŭ tri semajnoj. Apopleksio.

”Ili ne havas plu patrinon?”

”Ŝi mortis antaŭ multaj jaroj.”

”Ĉu vi jam longe estas ĉe la familio?”

”Jam tridek jarojn. Mi vartis ilin ĉiujn.”

”Tio pruvas, ke vi estas fidinda servistino. Tiun justecon mi tamen volas montri al vi, kvankam vi ĵus nomis min almozulino.”

Mirigite ŝi denove rigardis min.

”Fine mi tamen kredas, ke mi trompis min iom pri vi,” ŝi diris tiam; ”sed pardonu tion al mi, ĉar ĉirkaŭvagas tiom da trompistinoj, ke oni ne povas esti tro singarda.”

”Kaj,” parolis mi sufiĉe severtone, ”vi volis forpeli min eksteren en tia nokto, en kia vi eĉ ne forpelus hundon.”

”Jes, mi konfesas: tio estis senkompata, — sed kion ni faru? Mi pli multe pensis pri la knabinoj ol pri mi mem. La kompatindulinoj! Pri ili zorgas neniu krom mi. Mi do devas esti singarda!”

Kelkajn minutojn mi silentis grave.

”Vi tamen ne tro malbone pensu pri mi,” daŭrigis ŝi post paŭzeto.

”Mi malgraŭ tio pensas malbone pri vi,” mi diris, ”kaj malkaŝe mi volas diri tion. Ne nur, ĉar vi rifuzis enlasi min, aŭ ĉar vi rigardis min kiel almozulinon, sed precipe ĉar vi riproĉis min pro tio, ke mi ne havas hejmon, nek kupreron. Multaj el la plej bonaj homoj, kiuj iam vivis surtere, estis same malriĉaj kiel mi estas nun; kaj se vi estus bona kristanino, vi ne rigardus la malriĉecon kiel krimon.”

”Ne, mi ne faru tion,” ŝi diris. ”Sinjoro St. John ankaŭ ĉiam diras tion al mi, kaj mi vidas, ke mi malpravas — sed nun mi ja pensas pri vi tute alie. Vi ja vere aspektas kiel deca malgranda persono.”

”Tio sufiĉas — nun mi pardonas vin. Donu al mi vian manon.”

Ŝi metis la kalan, farunkovritan manon en mian; denove rideto, sed tre kora kaj amika rideto kuris sur ŝia kruda vizaĝo, kaj de post tiu momento ni estis amikinoj.

Evidente Hanna amis babili. Dum mi diselektis la grosojn kaj ŝi pretigis la paston por la tortoj, ŝi daŭrigis rakonti al mi ĉiajn detalojn pri sia mortinta mastro kaj ties edzino kaj la ”infanoj”, kiel ŝi daŭre nomis la junajn homojn.

Ŝi diris, ke la mortinta sinjoro Rivers estis simpla viro, sed

ĉiurilate ĝentlemano, kaj devenanta de unu el la plej antikvaj epokoj. De post la fondo de Marsh End, ĝi apartenis al la Rivers-familio, kaj laŭ ŝia certigo ĝi estis pli ol ducentjara; kvankam ĝi aspektas malgranda kaj modesta, ĝi neniel povus esti komparata kun la granda sinjora domo de sinjoro Oliver en Morton Vale. Tamen ŝi bone memoris ankoraŭ, ke ŝi vidis la patron de Bill Oliver, kiel vojaĝantan kudril-fabrikiston, kaj la Rivers estis jam ĝentlemanoj en la tempo, kiam vivis kaj regis la Henrikoj; tion ĉiu povus vidi kaj ekzameni, se li nur penus foliumi la preĝejo-librojn de la preĝejoj en Morton. — Tamen ŝi devis konfesi "ke la maljuna sinjoro estis kiel aliaj homoj — nenio eksterordinara, sed ke li freneze amis la ĉasadon, la agrikulturadon kaj tiaspecajn aferojn." La mastrino estis tute alia. Ŝi sin okupis per legado kaj multe studis, kaj la "infanoj" estas similaj al ŝi. Ili ne havas siajn egalulojn en la ĉirkaŭaĵo; de post la tago, kiam ili povis paroli, ili jam komencis studi kaj ĉiam ili sin okupis pri io speciala. — Kiam sinjoro St. John fariĝis junulo, li vizitis la universitaton por estiĝi pastro, kaj la knabinoj, tuj post kiam ili forlasis la lernejon, deziris estiĝi guvernistinoj, ĉar sinjoro Rivers antaŭ kelkaj jaroj perdis multan monon pro la bankroto de bankiero, al kiu li antaŭe konfidis grandan havaĵon. Kaj ĉar li ne povis postlasi al ili sufiĉan monon, ili volis zorgi pri si mem. De post longa tempo ili estis nun en la malnova hejmo, kaj nun la morto de ilia patro estis revokinta ilin tien por kelkaj semajnoj, sed ili amis Marsh End kaj Morton kaj ĉiujn ĉi tiujn montetojn kaj valojn, marĉejon kaj erikejojn tre kore. Ili jam pasigis kelkan tempon en Londono kaj en aliaj grandaj urboj, sed ĉiam ili diris, ke nenio estas pli preferinda ol la gepatra hejmo, krom tio ili tiel amis unu la alian, neniam interdisputis

kaj ĉiam estis kvietaj. Ŝi opiniis, ke tia familio preskaŭ nenie estas trovebla pri unueco kaj konkordo.

Post kiam mi diselektis la grosojn, mi demandis, kie estas nun la du fraŭlinoj kaj ilia frato.

”Ili promenis al Morton; sed revenos en duonhoro por trinki teon.”

Jam antaŭ la paso de duonhoro ili reeniris la kuirejon. Kiam sinjoro St. John min vidis, li riverencis al mi kaj iris plu-en; la du fraŭlinoj restis. Maria per malmultaj vortoj kaj amike esprimis sian ĝojon, ke mi sufiĉe resaniĝis por veni mal-supren. Diana skuis la kapon. dum ŝi kaptis mian manon.

”Vi devus atendi mian permeson por leviĝi,” ŝi diris. ”Vi aspektas ankoraŭ terure pala — kaj tiel trolaciĝinta! Kompatindulino!”:

Diana havis voĉon, kiu al mi sonis kiel la kverado de kolombo. Ŝi havis okulojn, kies rigardojn oni povis renkonti nur kun ravo. Ŝia tuta vizaĝo estis plena de ĉarmo. La vizaĝtraĵoj de Maria estis same inteligentaj, — same belaj; sed la esprimo estis pli retenema, kaj ŝiaj agmanieroj, kvankam kvietaj, tamen multe pli silentemaj. Diana agis kaj parolis kun certa aŭtoritat-konscio; videble ŝi estis persistema. Mia karaktero estis tia, ke volonte mi cedis al volo kiel la ŝia, se miaj konscienco kaj memrespekto tion permesis al mi.

”Kaj kion vi havas por fari ĉi tie?” parolis ŝi plue. ”La kuirejo ne estas loko por vi. Maria kaj mi kelkfoje sidas tie, ĉar ni ŝatas fari tion, kio plaĉas al ni — sed vi estas gastino kaj devas veni en la familian ĉambron.”

”Sed ĉi tie mi estas tre komforta.”

”Tute ne, ĉar Hanna devas labori ĉi tie kaj ŝi farunkovros vin.”

”Krome la fajro de la kameno tro varmigos vin,” certigis Maria.

”Tre certe,” parolis plue ŝia fratino. ”Jam venu kaj estu obe-ema.” Kaj dum ŝi tenis ankoraŭ mian manon, mi lasis min forkonduki en la familian ĉambro.

”Sidiĝu tie,” ŝi diris, puŝante min sur la sofon, ”dum ni demetas niajn mantelojn kaj pretigas la teon; tio estas ankoraŭ unu el tiuj privilegioj, kiujn ni ĝuas en niaj malgrandaj stepo-regionoj: ni pretigas niajn proprajn manĝojn, se tio plaĉas al ni, aŭ kiam Hanna bakas panon, faras bieron, lavas aŭ gladas.”

Ŝi fermis la pordon kaj lasis min duope kun sinjoro St. John, kiu sidis kontraŭ mi kun libro aŭ ĵurnalo en la mano. Mi ekzamine rigardis ĉirkaŭe en la ĉambro; poste miaj rigardoj sin fiksas sur mia kontraŭsidanto.

La familia ĉambro estis sufiĉe malvasta kaj eksterordinare simple aranĝita; sed ĝi estis komforta kaj agrabla, ĉar ĉie en ĝi regis ekstrema pureco. La malnovmodaj seĝoj estis brile poluritaj kaj la tablo el juglando brilis kiel spegulo. Kelkaj strangaj malnovaj portretoj de viroj kaj virinoj el longe pasinta tempo ornamis la vandojn.

Ŝranko kun pordoj el vitro entenis kelkajn librojn kaj malnovmodan, valoran manĝilaron el porcelano. En la ĉambro ne estis superfluaĵoj — ne unu novmoda meblo, krom du kudrilaĵoj kaj sinjorina skribtablo el rozuja ligno; krom tio, ĉio aspektis, inkluzive la tapiŝo kaj la kurtenoj, kvazaŭ ĝi ĉiam estus uzita kaj samtempe indulgita.

Ne estis malfacile ekzameni la eksterajon de sinjoro St. John; li sidis kviete kaj senmove same kiel unu el la portretoj sur la vando. Liaj okuloj estis fiksitaj sur la linioj, kiujn li le-

gis kaj liaj lipoj estis kvazaŭ sigelitaj. Oni ne povus ekzamenrigardi pli oportune, se li estus statuo anstataŭ viro. Li estis juna, inter la dudekoka kaj la trideka jaro kaj svelta; lia vizaĝo nepre plaĉis al ĉiu; ĝi estis greka kun gravaj trajtoj, havis klasikan nazon, Atenajn buŝon kaj mentonon. Estas nur malofte, ke angla vizaĝo tiel similas al antikva. Ne estis mirige, ke li teruriĝis pro la malreguleco de miaj vizaĝtrajtoj, ĉar liaj estis tiel harmoniaj. Liaj okuloj estis grandaj kaj bluaj kun longaj, malhelaj okulharoj; blondaj harbukloj senorde falis tie kaj alie laŭlonge de lia alta frunto, kiu estis senkolora kiel eburo.

Ĉu ne vere, tio estas delikata pentrado. Kaj tamen tiu, kiun mi priskribis, ne faris la impreson de mola, cedema, impona, milda karaktero. Kvankam li sidis senmove, kviete, mi tamen malkovris trajtojn ĉirkaŭ liaj buŝo, frunto, nazo, kiuj laŭ mia ekzameno montris senripozajn, malkvietegajn, malmildajn elementojn. Li diris al mi nenion; eĉ tute ne atentis min, ĝis ree eniris liaj fratinoj. Kiam Diana dum la pretigado de la teo en- kaj eliris, ŝi kunportis por mi kuketon, ĵus bakitan en la bakforno.

”Manĝu tion,” ŝi diris. ”Vi sendube estas malsata. Hanna diras, ke vi de post la matenmanĝo manĝis nur iom da grio.”

Mi volonte akceptis ĝin, ĉar mia apetito tute revenis al mi. Sinjoro Rivers fermis sian libron, alproksimiĝis al la tablo kaj fiksis siajn bluajn, bildosimilajn okulojn sur min dum li sidiĝis. En liaj rigardoj nun kuŝis senceremonia decidemo, ekzamenanta firmeco, kiuj pruvis al mi, ke intenco kaj ne indifereco ĝis nun tenis lin malproksime de la fremdulino.

”Vi estas tre malsata,” li diris.

”Tio mi estas, sinjoro.” Mia karaktero estis tia, ke mi ĉiam respondis mallonge kaj decide, se oni tiel alparolis min.

”Estis feliĉe por vi, ke malforta febro devigis vin fasti dum tri tagoj; estus tre danĝere, se vi tuj kontentigus la deziron de via apetito. Nun vi povas manĝi, sed nur sobre.”

”Mi esperas, ke mi ne longe manĝos je viaj kostoj,” mi respondis malĝentile kaj tre maldece.

”Ne,” li diris malvarme, ”kiam vi estos sciiginta al ni la loĝlokon de viaj gemastroj, ni povos skribi al ili, por ke vi povu reiri tien.”

”Mi devas malkaŝe klarigi al vi, ke mi ne estas kapabla tion fari, ĉar mi ne havas hejmon nek parencojn.”

La trio rigardis min, sed ne malfide; mi vidis, ke el iliaj rigardoj ne montriĝas manko de fido, sed nur scivolemo. Mi celas nur la fraŭlinojn, ĉar la okuloj de St. John, kvankam ekstreme helaj en vorta signifo, estis en figura senco malfacile exploreblaj. Pli multe li ŝajnis uzi ilin kiel ilojn por diveni la pensojn de aliuloj, ol kiel rimedon por perfidi siajn proprajn. Kaj ĉi tiu kombinado de reteno kaj akravido pli multe estis kapabla konfuzi ol vigligi.

”Ĉu vi volas diri per tio,” li demandis, ”ke vi staras tute sola en la vivo?”

”Jes. Neniu ligilo ligas min al iu ajn vivanta estaĵo; mi ne havas la rajton postuli la akcepton sub iu ajn tegmento en tuta Anglujo.”

”Stranga situacio en via aĝo!”

Mi vidis, ke li ĵetas rigardon al miaj manoj, kiujn mi falditaj estis metinta antaŭ mi sur la tablon. Tiu ekzamenanta rigardo mirigis min. Sed liaj vortoj baldaŭ klarigis, kion li serĉis.

”Ĉu neniam vi edziniĝis? Vi estas fraŭlino?”

Diana ridetis. "Sed ŝi ja ne estas pli aĝa ol deksep- aŭ dekokjara, St. John," ŝi diris.

"Mi estas preskaŭ deknaŭjara, sed mi neniam edziniĝis."

Mi sentis, ke malhela ardo kovris mian vizaĝon; ĉar la aludo al edziniĝo vekis ĉe mi amarajn incitantajn rememorojn. Ĉiuj rimarkis miajn embarason kaj movojn. Maria kaj Diana venis renkonte al mi kun helpo, dum ili deturnis siajn rigardojn de mia ruĝiĝinta vizaĝo; sed la malvarma, senkompata frato daŭre rigardis min, ĝis la ĉagreno, kiun li per tio al mi kaŭzis, faligis el miaj okuloj amarajn larmojn.

"Kie vi vivis en la lasta tempo?" li poste demandis.

"Vi estas tro scivola kaj demandas tro multe, St. John," flustris Maria; sed li sin klinis trans la tablon kaj per dua penetranta rigardo postulis respondon.

"La loko kie, kaj la nomo de tiu, kun kiu mi vivis, estas mia sekreto," mi respondis firme.

"Kiun vi laŭ mia opinio rajtas konservi, ne nur kontraŭ St. John, sed ankaŭ antaŭ ĉiu alia persono," rimarkis kviete Diana.

"Tamen mi ne povas helpi al vi, se mi scias nenion pri vi aŭ pri via vivo," li diris. "Vi tamen bezonas helpon, ĉu ne?"

"Jes, mi bezonas ĝin kaj mi serĉas ĝin, tio estas: mi serĉas veran filantropon, kiu ofertas al mi laboron, kiun mi kapablos plenumi, kaj kies salajro donos al mi la rimedojn plej necesajn por vivi."

"Mi ne scias, ĉu mi estas vera filantropo; sed mi estas inklinata helpi al vi realigi viajn honestajn intencojn per ĉiuj fortoj, kiujn mi havas. Diru do al mi, kian laboron vi kutimis fari kaj kion vi kapablas plenumi."

Mi nun estis trinkinta mian teon. Ĝi tre multe refreŝigis

min, eĉ tiel kvazaŭ giganto estus trinkinta vinon. Ĝi plifortigis miajn ekscititajn nervojn kaj ebligis al mi, forte kaj energie respondi ĉi tiun penetrantan junan juĝiston.

”Sinjoro Rivers,” mi diris, turnante min al li kaj rigardante lin malkaŝe kaj sentime, kiel li faris tion rilate al mi,” vi kaj viaj fratinoj montris al mi grandan servon — la plej grandan, kiun homo povas plenumi al alia; per via nobla gastamo vi savis min de la morto. Ĉi tiu montrita bonfaro rajtigas al vi mian dankon kaj iagrade mian fidon. Mi rakontos al vi tiom de mia vivo, kiom mi povos, ne endanĝerigante denove mian animtrankvilon.

”Mi estas orfinon, filino de pastro. Miaj gepatroj mortis antaŭ ol mi povis koni ilin. Mi estas edukita en dependeco kaj en filantropia edukejo. Mi eĉ volas nomi la instituton en kiu mi ses jarojn estis lernantino kaj poste du jarojn kiel instruistino — nome la orfineja edukejo en Lowood en — distrikto. Sendube vi aŭdis pri ĝi, sinjoro Rivers. La reverinda sinjoro Brocklehurst estis ĝia direktoro-kasisto.”

”Mi aŭdis pri sinjoro Brocklehurst, kaj la instituton mi konas.”

”Antaŭ unu jaro mi forlasis Lowood, por estiĝi gubernistino ĉe familio. Mi havis bonan oficon kaj estis feliĉa. Kvar tagojn antaŭ mia alveno ĉi tien mi estis devigata estiĝi.

Mi ne povas, nek volas klarigi la kaŭzon de mia foriro, tio estus senutila — danĝera, kaj krome ne ŝajnus al vi kredinda. Mia vivo estas senmakula. Neniu mallaŭdo trafas min, mia ĝisnuna konduto estas senkulpa same kiel tiu de unu el vi tri. Malfeliĉa mi estas kaj restos ankoraŭ longe, ĉar la katastrofo, kiu forpelis min el la domo, kie mi trovis paradizon, estas stranga kaj terura. Mi intencis nur du aferojn, kiam mi forku-

ris: rapidecon kaj silenton; por certigi ilin al mi, mi devis postlasi ĉion, kion mi posedis escepte de pakaĵeto, kiun mi pro mia trorapideco kaj anima angoro forgesis preni kun mi el la veturilo, per kiu mi vojaĝis al Whitcross. Tiel kaj senigita de ĉiuj rimedoj mi venis en ĉi tiun regionon. Du noktojn mi dormis eksterdome sub la ĉielo de Dio kaj du tagojn mi ĉirkaŭvagis, ne transirante la sojlon de homa loĝejo. Nur du fojojn dum tiu tempo iom da nutraĵo venis trans miajn lipojn; kaj kiam vi kaj sinjoro Rivers malhelpis, ke mi mortu pro malsato kaj mizero antaŭ via domo, jam malsato kaj senespero preskaŭ pereigis min. Mi scias, kion viaj fratinoj post tiu tempo faris por mi, ĉar dum mia ŝajna sveno, mi ne estis daŭre senkonscia, kaj al ilia vera, libervola kompatato, mi dankas same multe kiel al via kristana favorkoreco.”

”Ne paroligu ŝin plue, St. John,” diris Diana, kiam mi eksilentis; ”kiel vi vidas, ŝi ankoraŭ ne povas regi siajn ekscitojn. Nun sidiĝu ĉi tie sur la sofona, fraŭlino Elliott.”

Aŭdante tiun pseŭdonimon, mi senvole ektimis; mi preskaŭ forgesis mian novan nomon. Sinjoro Rivers, al kiu nenio restis kaŝita, tuj tion vidis.

”Ĉu vi ne diris, ke via nomo estas Elliott?” rimarkis li.

”Tion mi diris; mi opinias, ke estas plej bone, nomi min tiel, sed en vero mi havas alian nomon, kaj tial ĝi sonas strange en miaj oreloj.”

”Vi sekve ne volas diri vian veran nomon?”

”Ne. Mi plej multe timas esti malkovrita; kaj mi evitas ĉiun sciigon kondukantan al malkovro.”

”Mi estas konvinkita, ke vi prave agas,” diris Diana. ”Sed nun, kara frato, lasu ŝin kvieta.”

Kiam St. John tamen estis pripensinta kelkajn minutojn, li rekomencis same akrasente kaj stoike.

”Vi ne longe restu dependa de nia gastamo — mi vidas, ke vi kiel eble plej rapide faru finon al la kompto de miaj fratinoj kaj precipe al mia favorkoreco; (mi tre bone rimarkis la diferencon, kiun vi faras ĉi tie, kaj pro tio mi tute ne kolereblas vin — ĝi estas pravigita). Vi volonte estus sendependa de ni?”

”Certe mi dezirus tion. Mi jam tion diris. Montru al mi, kiel mi povus labori ĉi tie, kaj kiel mi povus trovi laboron, jen ĉio, kion mi nun petas, poste lasu min foriri — eĉ al la plej malamenta kabano — permesu al mi resti ĉi tie ĝis tiam. Mi ne povas por la dua fojo entrepreni la batalon kontraŭ la teruro de senhejma malriĉeco.”

”Vere, vi restos ĉi tie,” diris Diana, metante sian blankan manon sur mian kapon.

”Vi restos,” ripetis Maria en modesta tono, kiu ŝajnis esti parto de ŝia karaktero.

”Vi vidas, ke faras plezuron al miaj fratinoj restigi vin ĉi tie,” diris sinjoro St. John, ”same kiel farus al ili plezuron nutri kaj prizorgi duone frostitan birdon, kiun la vintra vento pelis al ilia fenestro. Mi mem tamen pli volonte havigos al vi la eblecon prizorgi vin mem, kaj tial mi faros mian eblon rilate al tio. Sed sciu, ke mia sfero estas tre limigita. Mi estas nur prebendhava pastro de malriĉa vilaĝo; mia helpo tial povas esti nur tre modesta. Se vi pro tio estus inkлина malestimi tiun malmulton, tiam vi devus serĉi pli bonan helpon ol mi povas oferi al vi.”

”Ŝi tamen jam diris, ke ŝi volas fari ĉian honestan laboron, al kiu ŝi estos kapabla,” respondis Diana por mi; ”kaj vi sci-

as, St. John, ke ŝi ne povas elekti; ŝi estos devigata akcepti la helpon de krudulo, kia vi estas.”

”Mi volas estiĝi kudristino, mi volas estiĝi simpla laboristino, eĉ infanvartistino, se nenio alia estos trovebla,” mi respondis.

”Bone ” diris sinjoro St. John tre malvarmtone. ”Se vi intencas tion, mi promesas helpi al vi tuj kiam mi havos la tempon kaj la okazon.”

Poste li reprenis la libron en kiu li antaŭe legis. Baldaŭ mi retiriĝis, ĉar jam tiel longe mi estis el la lito kaj tiom multe mi estis parolinta, kiom estis eble al miaj stato kaj fortoj.

## Ĉapitro XXX.

Ju pli mi konatiĝis kun la loĝantoj de Moor House, des pli ili plaĉis al mi. Post malmultaj tagoj mi tiel resaniĝis, ke la tutan tagon mi povis pasigi ekster la lito kaj mi eĉ kapablis fari mallongan promenon. Mi povis partopreni en ĉiuj laboroj de Diana kaj Maria, mi povis interparoli kun ili tiom, kiom plaĉis al ili, kaj helpi al ili ĉiam, kiam ili konsentis tion al mi. En ĉio tio estis freŝa, viva plezuro, kiun mi tie spertis por la unua fojo — plezuro ĉiam donanta similan guston pri sentoj kaj principoj.

Mi amis la literaturon, kiun ili ŝatis kaj kiu ĝojigis ilin kaj kio ravis min; mi honoris, kion ili aprobis. Ili amis sian malproksime de la mondo kuŝantan hejmon. Ankaŭ mi trovis ĉarma la etan, malnovan, malaltan tegmenton, ĝiajn kradhavaĵajn fenestrojn, ĝiajn dispecetigitajn murojn, la aleon kun malnovegaj abioj, kiuj ĉiuj staris oblikve pro la premado de la ventegoj venantaj de la montaro — mi trovis ĉarma la ĝardenon plena de ileksoj kaj taksusoj, kies plej fortaj floroj nur povis flori. Plename ili estis sindonaj al la ruĝa floranta eriko, en kies mezo kuŝis la loĝejo — al la profunda valo tra kiu kondukis la ŝtonhava vojo, preter ilian pordon, kaj kiu unue serpentiris inter montetoj kovritaj de filiko kaj poste inter la plej sovaĝaj paŝtejoj, kiuj limigas vastan erikejon aŭ grizan marĉejon kun ĝiaj ŝafoj kaj malgrandaj ŝafidoj. Ili sin donis kun entuziasma amo al tiu de mi priskribita pejzaĝo. Kaj mi povis

kompreni la senton kaj ĝiajn veron kaj povon mi kapablis partopreni. Mi spertis la katenantan ĉarmon de la regiono. Mi plene sentis la sanktecon de ĝia soleco; miaj okuloj sin amuzis pro la konturoj de la montoj kaj valoj — pro la sovaĝaj kolo-roj per kiuj la musko kaj la erikej-rozoj kaj la floriĉaj paŝtejoj kaj belegaj feliko-herbejoj kaj granitaj rokrifoj plibeligis la montetojn kaj la ebenaĵojn. Ĉiuj tiuj detaloj estis al mi, kio ili estas al miaj samhejmanoj — same multaj puraj kaj dolĉaj fontoj de ĝojo. La akra vento kaj la malakra venteto; la krudaj kaj la alcionaj tagoj, la horoj de sunleviĝo kaj sunsubiro; la lunlumo kaj la nuboplenaj noktoj — ĉio tio influis je mi la saman altirforton en tiuj regionoj kiel je ili kaptis min per la sama sorĉo, kiu jam longe katenis ilin.

Ankaŭ hejme ni plene harmoniis. Ili ambaŭ estis multe pli civilizitaj, kaj ili estis legintaj multe pli ol mi, sed diligente mi sekvis ilin sur la vojo de la scienco, kiun ili jam antaŭ mi ekiris. Mi avide legis la librojn, kiujn ili al mi pruntis kaj mi sentis la plej grandan ĝojon vespere preparoli kun ili, kion mi en la tago estis leginta. Iliaj pensoj adaptiĝis al miaj; ankaŭ mi samopiniis kun ili pri ĉio ajn — per malmultaj vortoj dirite: ni harmoniis plene en ĉio.

Sed en nia trio estis unu kiu ĉefis. Nome Diana. Fizike ŝi treege superis min, ŝi estis bela, ŝi krome estis forta. Ŝia vive-mo posedis abundon da energio kaj tian kapablon pri persistemo, ke mi miregis pri ili, krom tio ŝi superis mian komprenpovon. Kiam komenciĝis la vespero, mi kapablis paroli kelkan tempon, sed kiam pasis la unua fluo de mia parolo kaj mia vikleco, mi amis sidiĝi sur benketo ĉe la piedoj de Diana, meti mian kapon sur ŝiajn genuojn por alterne aŭskulti ŝin kaj Marian, dum ŝi funde klarigis la temon, kiun mi nur supraĵe estis

preparolinta. Diana proponis instrui la germanan lingvon al mi. Estis al mi ĝuo lerni de ŝi, mi vidis, ke ŝi estas bona instruistino kaj ke ŝi ŝatas la instruadon; ne pli malmulte mi ŝatis esti ŝia lernantino. Niaj karakteroj kvazaŭ unuiĝis kaj el tio rezultis reciproka amo. Ŝi eksciis, ke mi povas pentri: ĉiuj ŝiaj kraĵonoj kaj farbokesto estis al mia dispono. Mia lerteco en tiu arto, kiu estis pli granda ol ŝia, surprizis kaj ravis ŝin. Maria povis multajn horojn sidi por rigardi kiam mi estis pentranta; poste mi devas instrui sin kaj ŝi estis obea, inteligenta, diligenta lernantino. La tagoj pasis kiel horoj, kaj la semajnoj kiel tagoj.

La intimeco, kiu tiel rapide kaj nature estiĝis inter liaj fratinoj kaj mi, ne sin etendis al sinjoro St. John. La kaŭzo de la malvarmo reganta inter li kaj mi venis de tio, ke nur malofte li estis hejme. La plej granda parto de lia tempo ŝajnis esti okupita de vizitoj ĉe malsanuloj kaj malriĉuloj de lia dise kuŝanta komunumo.

Nek ventego nek malbona vetero ŝajnis ĝeni lin en tiuj pas-traj ekskursoj. Tuj kiam estis pasintaj la horoj de liaj ĉiumatenaj studadoj, li kutimis — malgraŭ ĉia vetero — preni sian ĉapelon, kaj sekvata de Karlo, la maljuna hundo de la iama prefekto, lia patro, li ekiris sur sia vojo al sia misio de devo aŭ alio. Mi ne scias el kiu vidpunkto li rigardis ĝin. Kelkfoje, kiam la vetero estis tre malbela, liaj fratinoj faris al li kontraŭ-proponojn. Tiam li diris kun rideto, kiu estis pli multe solena ol gaja:

”Se min povus deteni ventego aŭ kelkaj pluveroj de ĉi tiu facile plenumbla devo, kiaj tiam estus la preparoj antaŭ la estonto, kiu atendas min?”

La kutima respondo de la fratinoj al tiu demando estis ĝemo kaj kelkaj minutoj da malgajaj pripensadoj.

Sed krom lia ofta foresto troviĝis ankoraŭ alia malhelpo kontraŭ nia reciproka amikeco: li havis rezervitan, abstraktan, eĉ zorgomeditantan karakteron. Malgraŭ siaj pastraj devoj kaj malgraŭ siaj senriproĉa vivmaniero kaj kutimoj, li tamen ne ŝajnis ĝui animpacon, tiun internan kontenton, kiu nepre estas la rekompenco de ĉiuj veraj kristanoj kaj energia homoĝojo. Ofte en vesperaj horoj sidante ĉe la fenestro kun pupitro kaj siaj paperaĵoj antaŭ si, li subite interrompis legadon aŭ skribadon, donante sin al Dio scias kiaj pripensoj, dum li sidis kun la mentono sur la manplato. Ofte oni povis legi en liaj kelkfoje ardantaj okuloj, ke tiuj pripensoj estas ekscitaj kaj malkvietaj.

Krome mi pensas, ke la naturo ne oferis al li tiom da fontoj de plezuro kaj ravo kiel al liaj fratinoj. Nur unu fojon li parolis en mia ĉeesto pri la mirinda ĉarmo, kiun tiuj sovaĝaj montetoj efikis je li kaj pri la natura amo, kiun li sentis al la malluma tegmento kaj la muskokovritaj muroj, kiel li nomis sian hejmon. Sed la parolo per kiu li esprimis tian senton sonis pli multe kiel akra funebro ol decis al la enhavo de lia esprimo. Ankaŭ ĉiam ŝajnis al mi, kvazaŭ li vagas tra la erikejo kaj la marĉejo, ne pro iliaj kvietigantaj, konsolantaj silento kaj soleco tie sperteblaj.

Ĉar li estis tre malkomunikema, pasis longa tempo antaŭ ol mi havis la okazon funde koni lian karakteron. Ne antaŭ ol mi aŭdis lin prediki en sia propra preĝejo en Morton, mi komprenis ion pri ĝia profundeco. Mi dezirus, ke mi povus priskribi ĉiujn tiujn predikojn, sed tio estas super mia poten-

co. Mi eĉ ne kapablas fidele rerakonti la impreson, kiun ili efikis je mi.

Ĉiu prediko komenciĝis kviete kaj restis kvieta ĝis la fino pri parolado, tono kaj voĉo — sed profunde sentata tamen severe limigita fervoro baldaŭ montriĝis el ĉiuj liaj klare parolataj vortoj kaj influis lian nerveman paroladon. Tiel ĝi fariĝis potenca! La koro estis movata, la animo estis uzurpata de la forteco de la pastro — sed la aŭskultantoj ne estis kvietigitaj. La tuton trairis stranga amareco, manko de konsolanta dolĉanimeco: rigidaj admonoj de kalvinaj doktrinoj — elektado, antaŭdestino, kondamno — ofte alternadis, kaj ĉiu rilato al ili sonis kiel verdikto. Kiam li finis, min ekregis nepriskribebbla malĝojo, anstataŭ senti min pli bona, pli kvieta kaj refreŝiĝinta pro lia prediko; ĉar ŝajnis al mi — mi ne scias, ĉu aliaj aŭskultantoj spertis tion saman, — kvazaŭ la elokventeco, kiun mi aŭskultis, devenas de profundo, kie regas la malĝoja surfundaĵo de la senluziigo, kie furiozas turmentplenaj impulsoj de malkvietigitaj aspiroj kaj senfinaj penadoj. Mi estis certa, ke St. John, malgraŭ ĉasteco, fervoro kaj konscienco, ankoraŭ ne trovis tiun dian pacon, kiu superas ĉiun prudenton; mi pensis, ke li ankaŭ ne trovis ĝin; mi kun mia sekreta, turmentanta ĉagreno pro mia ruinigita idealo — ĉagreno, pri kiu mi en la lasta tempo ne plu parolis, sed kiu tamen tute katenis min kaj kiu plene min regis.

Intertempe pasis monato. Diana kaj Maria baldaŭ ree forlasos Moor House por reiri al tute alia vivo, kiu atendis ilin kiel gubernistinoj en granda urbo sude de Anglujo; kie ili servis fierajn, riĉajn familiojn, kiuj rigardis la gubernistinojn kiel ordinarajn servistinojn, tute ne konante aŭ serĉante iliajn

kapablojn kaj ŝatante ilin kiel la lertecon de sia kuiristino kaj la bonegan guston de siaj ĉambristinoj.

Sinjoro St. John ankoraŭ ne parolis kun mi eĉ unu vorton pri la ofico, kiun li promesis havigi al mi; kaj tamen urĝis, ke mi elektu ion ajn. Lun matenon estante duopa kun li, mi kuraĝis proksimiĝi al la fenestro de la familioĉambro, apud kiu staris liaj tablo, pupitro kaj seĝo kaj mi estis parolonta, kvankam mi ne sciis ankoraŭ kiel formuli mian demandon — ĉar estas ĉiam malfacile rompi la sinretenemon de tiaj karakteroj — kiam li liberigis min de tiu ŝarĝo, komencante mem la interparoladon.

Li rigardis supren kiam li vidis; ke mi alproksimiĝas al li kaj demandis:

”Vi dezirus direkti al mi demandon?”

”Jes; mi dezirus scii, ĉu vi jam aŭdis pri ia ofico, kiun vi povus oferi al mi.”

”Jam antaŭ tri semajnoj mi trovis ion por vi; sed ĉar vi ŝajnis esti ĉi tie feliĉa kaj ĉar vi faris vin utila pro via ĉeestado, kiu plaĉis al ili, kaj ĉar ili tre ŝatas vin, mi opiniis pli bone ne ĝeni viajn reciprokajn komfortojn pli frue ol la baldaŭa forvojaĝo de miaj fratinoj necesigos tion.”

”Ili tamen forvojaĝos jam en tri tagoj,” mi respondis.

”Jes, kaj kiam ili forvojaĝos, mi reiros al la pastra domo en Morton. Hanna akompanos min kaj ĉi tiu logejo estos forlasita kaj ŝlosita.

Mi atendis kelkajn momentojn esperante, ke li daŭrigos la komencitan temon; tamen ŝajnis, ke aliaj pensoj dronigis lin en subitan silentadon. Lia rigardo diris al mi, ke lia animo vagadis en malproksimaj regionoj for de mia afero. Mi do

estis devigita rekonduki ĝin al temo, kiu por mi estis pli interesa kaj grava.

”Kaj kiu estis la ofico, kiun vi destinis al mi, sinjoro Rivers? Mi esperas, ke ĉi tiu prokrasto ne pligrandigis la penon certigi ĝin por mi?”

”Ho ne, ĉar ĝi estas ofico pri kiu nur mi povas disponi, kaj kiun vi devos akcepti.”

Ree li eksilentis. Nur kontraŭvole li ŝajnis paroli plue. Mi estiĝis malpacienca. Kelkaj malkvietaj gestoj, tima, demanda rigardo, kiun mi direktis al li, klarigis al li pli klare miajn pensojn ol vortoj povus fari tion.

”Vi ne bezonas rapidi aŭdi tion,” li diris. ”Sincere mi diru al vi, ke mia propono tute ne estas io dezirinda aŭ profitodona. Antaŭ ol mi klarigos tion plue, memoru, mi petas, mian diron, ke mia helpo estas kvazaŭ helpo de blindulo al lamulo. Mi estas malriĉa, ĉar mi estas certiĝinta, ke mia tuta havaĵo, post kiam mi pagis la ŝuldojn de mia patro, konsistos nur en ĉi tiu domaĉo, en la vico de tiuj senvaloraj abioj post ĝi kaj en malgranda marĉejo kun la taksusoj kaj ileksoj sur ĝi starantaj. Mi estas rekonata viro. Rivers estas malnova nomo; sed el la tri solaj posteuloj de tiu familio du gajnas sian malmolan vivopanon de dependeco inter fremduloj kaj la tria rigardas sin fremdulo en sia patrujo — ne nur dum ĉi tiu vivo, sed ankaŭ post la morto. Jes, kaj li kredas sin — estas devigita sin kredi — honorita de ĉi tiu sorto, kaj sopiris nur al la tago, en kiu la kruco de la disigo de ĉiuj karnaj, surteraj ligiloj estos metita sur liajn ŝultrojn, kaj la ĉefo de tiu batalanta preĝejo, kies plej maleminenta ano li estas, ordonos al li: ’Leviĝu kaj sekvu min!’”

St. John diris ĉi tiujn parolojn en la sama tono, en kiu li

diris siajn predikojn; per kvietaj, peza voĉo; kun vizaĝo, sur kiu aperis neniu koloro kaj kun ardanta rigardo. Li daŭrigis:

”Kaj estante nur malriĉa kaj nekonata, mi povas oferi al vi nur nebrilan kaj malbone pagotan oficon. Vi povas eĉ rigardi ĝin kiel ion malestimatan. Ĉar mi vidas nun, ke viaj manieroj estas civilizitaj, kiel la mondo nomas tion. Via gusto kliniĝas al la idealo kaj via societo konsistis el bone edukitaj homoj — sed laŭ mia opinio senhonorigas neniu servo, kiu kunlaboras por plibonigi la homaron. Mi tial kredas, ke ju malpli profitodona kaj ju pli malzorgita estas la tereno, sur kiu la kristano estas elektita prizorgi sian kulturlaboron — des pli malgranda estas la ekspluata profito de lia laboro — sed *des pli granda la honoro!* Sub tiaj cirkonstancoj lia sorto estas tiu de pioniro: kaj la unuaj pioniroj de la evangelio estis la apostoloj — ilia gvidanto estis Jesuo Kristo, la Savinto mem.”

”Nu,” mi demandis, kiam ree li eksilentis, ”kial vi ne daŭrigas?”

Li rigardis min antaŭ ol paroli plue; vere, li facile povis legi sur mia vizaĝo, kvazaŭ sur ĝiaj trajtoj estus presitaj vortoj de libro. La rezulton de lia ekzameno li parte esprimis per la jena respondo:

”Mi kredas, ke vi akceptos la oficon, kaj ke vi konservos ĝin almenaŭ kelkan tempon; tamen ne por ĉiam, same kiel mi ne povus plenumi por ĉiam la kvietan kaj tro limigitan oficon de angla vilaĝa pastro; ĉar en via karaktero estas io, kio kontraŭbatalas la trankvilon same kiel en mia, kvankam ĝi estas alispeca.”

”Klarigu tion,” mi insistis, kiam ree li eksilentis.

”Tion mi faros, kaj vi aŭdos, kiel mizera estas la ofero kaj kiel malgranda. Ĉar mia patro ne vivas plu, mi nun estas mia

propra mastro, tial mi ne restos plu longe en Morton. Eble mi forlasos la vilaĝon post paso de unu jaro; sed dum mia restado tie, mi streĉos miajn fortojn por favori kaj plibonigi ĝin. Kiam antaŭ du jaroj mi venis en Morton, ĝi ne havis lernejon; la infanoj de la malriĉuloj estis tute senigitaj de ĉiu espero leviĝi sociale kaj mense. Mi fondis lernejon por knaboj; nun mi intencas fondi duan por knabinoj. Tiucele mi luis konstruaĵon al kiu apartenas dometo kun du ĉambroj, utilantaj kiel loĝejo por la instruistino. La jara salajro estas tridek sterlingaj funtoj. La domo estas jam aranĝita tre simple, sed sufiĉe bone dank'al la boneco de fraŭlino Oliver, la sola filino de la ununura riĉa viro en mia komunumo. Tiu sinjoro Oliver estas la posedanto de kudril-fabrikejo, de altforno kaj de ferfandejo en la valo. La fraŭlino prizorgas la edukadon kaj la vestojn de orfinoj el la malriĉula laborejo, kondiĉe ke ŝi helpu la instruistinon en la mastrumada laboro kaj en la purigado de la lernejo kaj ĉambroj. Ĉu vi volas esti tiu instruistino?"

Li faris la demandon abrupte. Ŝajne li atendis ekscititan aŭ almenaŭ malestiman rifuzon. Ne konante miajn pensojn kaj sentojn, kvankam divenante kelkajn el ili, li neeble povus scii, kiel al mi plaĉos tiu sorto.

En vero, ĝi estis modesta — sed ĝi estis certa kaj precipe mi bezonis loĝejon; la ofico estis malfacila kaj streĉiga — sed kompare kun la sorto de gubernistino ĉe riĉuloj, ĝi estis sendependa. Kaj la timo antaŭ dependeco de fremduloj turmentegis mian animon kiel ardanta feraĵo. Ĝi ne estis malnobla — ne malinda — ne spirite humiliganta — mi do tuj decidis.

"Mi dankas vin pro la propono, sinjoro Rivers, mi danke akceptas ĝin."

"Sed vi bone komprenis min, ĉu ne?" li demandis. "Ĝi estas

vilaĝa lernejo; viaj lernantinoj estos nur malriĉaj knabinoj — infanoj de laboristoj — aŭ de farmistoj. Vi instruos al ili nur la trikadon, la kudradon, legadon, skribadon, kalkuladon — jen ĉio. Kion vi tie faros je viaj talentoj? Kion je la profundo de via animo — kion je viaj spertoj — viaj manieroj?”

”Mi konservos ilin ĝis mi bezonos ilin. Ili ne perdiĝos tie.”

”Vi do scias, kion vi entreprenos?”

”Tion mi scias.”

Li ekridetis; ne per amara aŭ malĝoja rideto, sed amike kaj kontente.

”Kaj kiam vi komencos la plenumon de viaj devoj?”

”Jam morgaŭ mi iros al la indikita loĝejo kaj en la komenco de la sekvanta semajno mi malfermos la lernejon, se tio plaĉas al vi.”

”Bone, tiel estu.”

Li leviĝis kaj iris tien kaj reen en la ĉambro. Poste li haltis kaj ree rigardis min. Li kapskuis.

”Kion vi malaprobas, sinjoro Rivers?” mi demandis.

”Vi ne longe loĝos en Morton; ne, ne!”

”Kial? Kiun motivon vi havas, por diri tion?”

”Mi legas tion en viaj okuloj; tiu ofico ne promesas ebenan, kvietan vivovojon.”

”Mi ne estas ambicia.”

Audinte tion li timiĝis, kaj li ripetis: ”Ne, ambicia vi ne estas. Kio igis vin pensi pri ambicio? Kiu estas ambicia? Mi scias, ke mi estas tia. Sed kiel vi malkovris tion?”

”Mi parolis nur pri mi mem.”

”Nu, se vi ne estas ambicia, tiam vi estas — —,” li eksilentis.

”Kio do?”

”Mi estis dironta ’pasia’ sed eble vi komprenus malĝuste tiun vorton kaj ofendiĝus. Mi nur celis diri, ke homa simpatio kaj la amo de koro al koro, havas grandan potencon je vi. Mi estas certa, ke ne longe kontentigos vin pasigi vian liberan tempon en soleco kaj dediĉi viajn laborhorojn al monotona laboro, al kiu mankas ĉiu ĉarmo — same kiel mi ne povus esti kontenta,” li aldonis emfaze, ”vivi ĉi tie meze de marĉejo, ĉirkaŭita de montoj; mia karaktero, kiun Dio donis al mi, ne povas toleri tion; miaj kapabloj, donitaj de la ĉielo, estus paralizitaj kaj sen utilo. Vi nun aŭdas, kiel mi kontraŭparolas min mem. Mi, predikante kontenton kun simpla vivosorto, kaj eĉ aprobante la metiojn de arbohakisto kaj akvoĉerpisto en la servo de Dio — mi, lia sanktoleita servisto, mi preskaŭ furiozas en mia senripozeco. Ho! en ia ajn maniero naskiĝa inklino kaj principoj devas reamikiĝi.”

Li eliris la ĉambron. En ĉi tiu mallonga tempo mi pli bone konis lin ol en la tuta pasinta monato, kaj malgraŭ tio mi rompis al mi la kapon pri li.

Ju pli proksimiĝis la tago en kiu Diana kaj Maria devos forlasi siajn fraton kaj hejmon, des pli silentaj kaj senparolaj ili estiĝis. Ambaŭ klopodis esti kiel kutime. Sed la ĉagreno, kontraŭ kiu ili devis batali estis tia, ke ĝi ne estis facile venkebla nek kaŝebla. Diana certigis, ke ĉi tiu disiĝo estos tre alia ol la antaŭaj. Rilate al St. John la disiĝo eble estos multjara, — eble por ĉiam.

”Li oferos ĉion al siaj jam longe faritaj decidoj,” ŝi diris, ”al la ligiloj de la naturo kaj al ankoraŭ pli potencaj sentoj”. Ŝi daŭrigis: ”Jane, St. John aspektas kvietaj; sed en lia animo furiozas brulanta, konsumanta febro. Vi rigardas lin kiel iun, kiu estas malsevera kaj milda — kaj tamen en multaj aferoj li

estas senkompata kiel la morto. Kaj kio estas la plej grava: mia konscienco apenaŭ konsentas al mi deteni lin de liaj severaj decidoj, ĉar vere, mi eĉ ne unu momenton povas riproĉi lin pro tio. Li estas vera — nobla — kristano — kaj malgraŭ tio ĝi rompas mian koron!”

Kaj varmegaj larmoj kovris ŝiajn belajn okulojn.

Maria klinis la kapon super sia laboro.

”Ni ne havas plu nian patron; baldaŭ ni ne havos plu fraton kaj hejmon,” ŝi diris mallaŭte.

En tiu momento io okazis, kio kvazaŭ pruvis, ke neniu malfeliĉo venas sola.

Legante leteron, St. John preteriris la fenestron kaj poste envenis. ”Nia onklo John mortis,” li diris.

La du fratinoj ŝajnis esti konsternitaj, sed ili ne estis timiĝintaj nek teruritaj. La sciigo ŝajnis esti pli subita ol malĝojiga.

”Mortis?” ripetis Diana.

”Jes.”

Ekzamene ŝi rigardis sian fraton. ”Kaj kio poste?” ŝi demandis mallaŭte.

”Kaj kio poste, Diana?” ripetis li, konservante la marmoran kvieton je la vizaĝo.

”Kio poste? Nu, — nenio! Legu!”

Li ĵetis al ŝi la leteron. Ŝi rapide legis ĝin kaj poste transdonis al Maria. Maria senparole tralegis ĝin kaj poste redonis al sia frato. Ĉiuj rigardis unu alian kaj ĉiuj tri ridetis — tio estis malĝoja, mediotplena rideto.

”Amen! Ni havos ankoraŭ vivorimedojn,” fine diris Diana.

”Ĉiuokaze nia situacio ne estiĝas pli malbona, ol ĝi estis antaŭe,” rimarkis Maria.

”Ĝi nur forte prezentas al nia animo la situacion, kia ĝi povus esti,” diris sinjoro Rivers, ”kaj montras vivan kontraston de tio, kio ĝi vere estas.”

Li faldis la leteron, metis ĝin en sian pupitron kaj ree eliris, la domon.

Kelkajn minutojn neniu parolis. Poste Diana sin turnis al mi.

”Jane, vi miros pro ni kaj niaj sekretoj,” ŝi diris, ”kaj rigardos, nin kiel malmolkorajn estaĵojn, ĉar ni montris ne pli grandan malĝojon pro la morto de tia proksima parenco, kia onklo estas. Sed ni neniam konis lin nek vidis. Li estis frato de nia patrino. Antaŭ multaj jaroj li kaj nia patro malpaciĝis kaj disiĝis. Laŭ lia konsilo nia patro riskis la plej grandan parton de sia havaĵo en spekulado, kiu ruinigis lin. Reciprokaj riproĉoj inter ili estis la rezulto; ili kolere disiĝis kaj neniam repaciĝis. Mia onklo poste spekuladis en pli feliĉaj entreprenoj; ŝajnas, ke li gajnis posedaĵon da dudek mil sterlingaj funtoj. Li neniam edziĝis kaj ne havis parencojn krom ni kaj unu alia persono, kiu al li tute ne estas pli parenca ol ni. Mia patro ĉiam opiniis, ke li plibonigas sian eraron postlasante al ni sian posedaĵon. Sed ĉi tiu letero sciigas al ni, ke li postlasis ĉion al tiu alia persono escepte de tridek sterlingaj funtoj, kiuj devas esti dividataj inter St. John, Diana kaj Maria Rivers por aĉeti tri funebroringojn. Kompreneble li havis la rajton disponi sian monon laŭplaĉe, sed tia sciigo ĵetas dummomentan malbonhumoron sur nian animon. Maria kaj mi rigardus nin riĉaj, se li estus postlasinta al ni po mil funtoj; kaj por St. John tia sumo estus grandvalora pro la bonfaroj, kiujn li povus fari per ĝi.”

Post tiu klarigo ni silentis pri tiu temo kaj neniuj, nek sinjoro Rivers nek liaj fratinoj parolis plu pri ĝi.

La morgaŭan tagon mi transloĝiĝis de Marsh End al Morton. Unu tagon poste Diana kaj Maria vojaĝis al la malproksima B—. Unu semajnon poste sinjoro Rivers kaj Hannah iris al la pastrejo — — kaj la malnova domo kuŝis forlasita.

## Ĉapitro XXXI.

**M**ia hejmo — se fine mi trovus hejmon — estas kabano: malgranda spaco kun blanke kalkŝmiritaj vandoj, kaj planko surŝutita per sablo; sur ĝi staras kvar kolorigitaj seĝoj, tablo, horloĝo, ŝranko kun tri teleroj kaj pladoj kaj tepoto kun apartenaĵo el Delfta fajenco. Super la teretaĝo estas ĉambro egale vasta kun litostablo el abia ligno kaj komodo sufiĉe granda por enmeti miajn mizerajn vestaĵojn, kiujn iom kompletigis miaj noblaj amikoj.

Estas vespero. Kun oranĝo kiel rekompenco, mi ĵus foririgis la malgrandan orfinon, kiu servas al mi kiel servistino. Mi sidas sola apud la kameno. Hodiaŭ matene la vilaĝa lernejo estis malfermita. Mi havas dudek lernantinojn. Nur tri el ili scias legi; ne unu scias skribi aŭ kalkuli. Iuj scias triki, sed tre malmultaj kapablas iom kudri. Ili ĉiuj parolas la krudan dialekton de la regiono kaj en la unuaj tagoj ni nur malbone komprenos nin reciproke. Kelkaj el ili estas same senedukaj, krudaj, malobeemaj kiel nesciaj; kontraŭe aliaj estas cedemaj, obeemaj kaj montras grandan lernemon kaj havas talenton, kio faras al mi plezuron. Mi ne forgesu, ke ĉi tiuj mizere vestitaj vilaĝ-knabinoj estas el karno kaj sango, kiel la markotoj de la plej noblaj familioj, kaj ke la ĝerموj de la naturdotitaj supereco, kleriĝo, inteligenteco, animbono eble same bone kaŝiĝas en iliaj koroj kiel en tiuj de la plej alte-naskiĝintoj. Estos mia devo disvolvi tiujn ĝerموjn; sendube ĉi tiu kon-

science elektita ofico donos al mi kontentigon kaj ĝuon. Multan ĝojon mi ne atendas de la vivo, kuŝanta antaŭ mi; sed mi sukcesos treni mian ekzistadon de unu tago al alia, kiam mi hardas mian animon kaj streĉas miajn fortojn kiel eble plej multe.

Ĉu mi estis tre ĝoja, kontenta en la horoj, kiujn mi pasigis hodiaŭ matene kaj hodiaŭ posttagmeze en la nuda, modesta lerneja ĉambro? Se mi ne volas trompi min mem, tiam mi devas respondi: Ne, ĉar iagrade mi estis senkonsola. Mi sentis min — ho idiotino — humiligita. Mi demandis al mi, ĉu mi ne faris paŝon, kiu malaltigas min en la homa societo, anstataŭ altigas. Mi estis tiel malforta, ke mi esti skandalita pro la mizera kaj kruda de ĉio, kion mi vidis kaj aŭdis ĉirkaŭ mi. Sed pro tiu sento mi ne volas malami aŭ malestimi min: mi scias, ke tio estis granda maljustaĵo — kaj tio estas jam longa paŝo al pliboniĝo; mi batalos por venki ĝin. Mi esperas, ke morgaŭ mi plene regu ĝin; kaj en malmultaj semajnoj tiaj sentoj malaperos el mia koro. Eble post malmultaj monatoj kontento jam prenos la lokon de la naŭzo, kiam mi vidos progresojn ĉe miaj lernantinoj kaj ŝanĝon al pli bono.

Intertempe mi volas adresi al mi demandon: Kio estas pli bona? — esti cedinta al la tento, esti aŭskultinta al la pasio; ne esti peninta, ne esti kontraŭbatalinta, sed trafi en silkan kaptilon, inter la floroj, kiuj kovras ĝin kaj esti endormiĝinta tie; vekiĝi en suda klimato meze de luksa belega vilao; vivi en Francujo kiel la amatino de sinjoro Rochester; esti freneza pro amo dum parto de mia ekzistado, ĉar kelkan tempon li estus aminta min, ho, tre certe, li estus adorinta min! Li estis aminta min — neniu homo iam amos min kiel li min amis. Neniam plu mi spertos la dolĉan honoradon, montritan ordi-

nare al beleco, juneco — ĉar antaŭ nenies okuloj mi ree aperos naturdotita de tiuj ĉarmoj. Li amis min — li estis flera pro mi — tion faros plu neniŭ viro!

Sed kien vagas miaj pensoj kaj kion mi diras? Antaŭ ĉio — kion mi sentas? Ĉu estas pli bone, demandas mi, esti la sklavino en la paradizo de malsaĝulo en ia suda lando — esti kaptita de la febro de la feliĉego — kaj tuj poste droni en la plej amaraj larmoj, kiujn verŝigos honto kaj konscienciproĉoj — aŭ esti libera kaj honesta en freŝa monthava regiono plenumante la oficon de lerneja instruistino en saniga loko de Anglujo?

Jes. Nun mi sentas, ke mi prave agis, tenante min severe al leĝo kaj principoj kaj neniigante kaj sufokante la frenezajn inspirojn de malbona momento. Dio inspiris al mi la ĝustan elekton! Mi dankis Lin pro la bona gvidado!

Kiam miaj meditadoj en la krepusko atingis tiun lokon, mi iris al mia pordo kaj rigardis la sun-malleviĝon en la aŭtuna tago, la kvietajn paŝtejojn antaŭ mia loĝejo, kiu kun la lernejo kuŝis duonan mejlon de la vilaĝo. La birdoj kantis sian lastan kanton:

*"La aero estis milda, la ros' balsamo."*

Tiel rigardante eksteren, mi sentis min feliĉa kaj malgraŭ tio tute mirigita tuj poste vidi min ploranta — kaj kial? Pro la sorto, kiu disigis min de mia sinjoro kaj mastro, kiun mi neniam revidos plu; — pro la ĉagreno de la senespero kaj la fatala kolero — la sekvoj de mia forkuro, — kiuj eble kondukos lin for de la vojo de la justo, tro malproksimen por povi esperi finan reiron. Pensante pri tio, mi forturnis mian vizaĝon de la ĉarma vespera ĉielo kaj de la soleca valo de

Morton; mi diras: soleca, ĉar sur tiu parto de la valo staris eĉ ne unu konstruaĵo, krom la preĝejo kaj la pastrejo kaj ankaŭ tiuj estis tute kovritaj sub la ombroriĉaj arboj. En la malproksimo tre fore oni vidis la tegmenton de Vale Hall, kie loĝas la riĉa sinjoro Oliver kun sia filino. Mi metis la manon super la okulojn kaj apogis per la kapo al la ŝtona muro, ĉirkaŭanta la pordon; sed baldaŭ mallaŭta bruo ĉe la pordego, tra kiu oni povis iri el mia malgranda ĝardeno en la antaŭ ĝi kuŝantan paŝtejon, igis min ree supren rigardi. Hundo — la aĝa Karlo, la ĉashundo de sinjoro Rivers, mi rekonis ĝin ĉe la unua rigardo — puŝis per la nazo la pordegon, kaj sinjoro St. John apogis sin al ĝi per la falditaj brakoj. Li sulkigis la frunton kaj grave, malbonhumore li rigardis min.

Mi invitis lin eniri.

”Ne, mi ne povas; mi portas al vi paketon, kiun miaj fratinoj postlasis por vi. Mi kredas, ke ĝi enhavas pentraĵ-keston, penikojn kaj paperon.”

Mi iris al li por ricevi ilin; ĝi estis al mi bonvena donaco. Irante al li, li ekzamenis mian vizaĝon, ŝajne li faris tion severe kaj malmilde; sendube ĝi monfris ankoraŭ tre klarajn postesiginojn de ĵus verŝitaj larmoj.

”Ĉu vi trovis la laboron de via unua tago pli malfacila ol vi atendis?” li demandis.

”Ho ne, kontraŭe; mi kredas, ke mi tre bone akordiĝos kun miaj lernantinoj.”

”Sed eble via komforto — via loĝejo — viaj mebloj — ĉu ili respondis al viaj atendoj? — Ili ja estas tre mizeraj; sed —”

Mi interrompis lin.

”Mia loĝejo estas pura kaj ĝi povas kontraŭstari malbonan veteron; miaj mebloj estas komfortaj kaj sufiĉe bonaj. Ĉio,

kion mi vidas, faris min danka, ne malĝoja. Mi ne estas tia malsaĝulino, ke mi povus malĝoji pro manko de tapiŝo, sofo, arĝentaj pladoj; krome — antaŭ kvin semajnoj mi posedis tute nenion — mi estis elpelitino, almozulino, senhejmulino sur la landvojo — nun mi havas amikojn — hejmon — oficon. Mi miregas pro la bono de Dio, pro la grandanimeco de miaj amikoj; la mildeco de mia sorto. Mi bedaŭras nenion — mi priploras nenion.”

”Ĉu vi ne sentas la solecon kiel premadon? La malgranda domo tie malantaŭ vi estas ja malluma kaj malplena.”

”Apenaŭ mi havis la tempon ĝoji pro la sento de trankvilo, kiel do mi estus malpacienca pro la premado de la soleco.”

”Nu, bone. Mi esperas, ke vi ankaŭ sentos la kontenton, kiun esprimas viaj respondoj. Ĉiuokaze via prudento diros al vi, ke estas ankoraŭ tre frue por cedi al la timo de la edzino de Lot. Mi tute ne scias, kion vi forlasis, antaŭ ol mi konatiĝis kun vi; sed mi konsilas al vi kontraŭstari ĉiun tenton, kiu povus instigi vin rigardi reen. Plenumu sen hezitoj la devojn de via nuna ofico, almenaŭ dum kelkaj monatoj.”

”Tion mi intencas fari,” mi respondis.

St. John parolis plue:

”Estas malfacila tasko regi niajn inklinojn kaj kontraŭlabori niajn denaskitajn pasiojn. Sed la sperto instruis al mi, ke ni kapablas tion. Dio donis al ni ian povon krei nian propran sorton; kaj se niaj fortoj deziras la plifortiĝon, kiun ili ne povas akiri — se nia volo sin direktas al vojo, kiun ni ne laŭiru — tiam ni ne bezonos morti pro malsato, nek halti en senespero: tiam ni devas elekti alian nutraĵon por nia animo, same nutra kiel tiu, kiun ni deziris ĝui — kaj eble pli puran kaj pli sanigan; kaj por niaj aventuraj piedoj ni trabatu al ni vojon,

same rektan kaj same larĝan kiel tiu, kiun la sorto baris al ni — kvankam ĝi eble estas pli malglata kaj pli penplena.

”Antaŭ unu jaro ankaŭ mi mem sentis min nedireble mizera, kredante, ke mi faris eraron, deducinte min al eklezia profesio; ĝiaj unuformaj devoj tedis min ĝismorte. Mi pasie aspiris la laborplenan vivon de la mondo — mi aspiris la eks-citajn penadojn de literatura kariero — la profesion de artisto, de aŭtoro, de oratoro; ĉion alian, sed ne tiun de pastro; jes, sub la surpriso de subpastro batis la koro de politikulo, de soldato; mi aspiris famon; mi amis la famon, eĉ deziregis povon. Mi pripensis. Mia vivo estis tiel mizera, ke nepre ŝanĝiĝo devis akazi, alie mi mortus. Post longa tempo de malmumo kaj batalo la helpo kaj la liberiĝo venis. Mia tro limigita ekzistado subite plivastiĝis je ebena sen limoj — miaj kapabloj ekaŭdis vokon de la ĉielo, ke mi streĉu ĉiujn miajn fortojn, la flugiloj de miaj kapabloj sin etendu, por ke mi leviĝu super la vidvaston. Dio estis elektinta por mi mision, kies plenumado bezonis la taŭgecon kaj la forton, la elokventecon kaj la kuraĝon, la plej bonajn proprecojn de soldato, diplomato kaj oratoro: ĉar ĉiuj ĉi tiuj ecoj koncentriĝas en bona misiisto.

”Mi decidis fariĝi misiisto. De tiu tempo mia animstato ŝanĝiĝis; la katenoj rompiĝis kaj postlasis de la mallibereco nenion krom la dolorplenan ofend-sentemon, kiun nur la tempo kapablas kuraci. Mia patro kontraŭstaris mian decidon; sed post lia morto restas al mi plu neniu malhelpo por kontraŭbatali. Kiam miaj aferoj estos aranĝitaj, kiam posteulo estos trovita en mia loko, kiam kelkaj sentoaferoj, tio estas: aferoj tuŝantaj mian koron, estos neniigita — lasta batalo kontraŭ homa malforteco, en kiu mi certe venkos, ĉar mi

ĝuris, ke mi venkos — tiam mi por ĉiam forlasos Eŭropon kaj iros al la oriento.”

Ĉion ĉi li diris per sia karakteriza, obtuza kaj tamen patosa voĉo. Kiam li eksilentis, li ne rigardis min, sed la kuŝiĝintan sunon, kiu ankaŭ atentigis min. Ni ambaŭ estis turnintaj la dorson al la piedvojo, kondukanta de la kamparo al mia ĝardeneto. Ni ne estis aŭdintaj paŝojn sur la herbokovrita vojo; la rivereto, murmurante, serpentumante tra la valo, estis la sola brueto en la regiono en ĉi tiu horo. Sekve ne estis mirige, ke ni timiĝis, kiam pura gaja voĉo, klara kiel arĝenta sonorilo, kriis:

”Bonan vesperon, sinjoro Rivers. Kaj bonan vesperon, Karlo. Via hundo pli rapide rekonas siajn amikojn ol vi, sinjoro; ĝi jam levis la orelojn kaj movetis la voston, kiam mi estis ĉe la plej malproksima fino de la paŝtejo, kaj vi ankoraŭ ĉiam turnas al mi la dorson, sinjoro.”

Estis vere. Kvankam sinjoro Rivers timiĝis ĉe la unuaj el tiuj belsonaj vortoj, kvazaŭ fulmotondro subite disŝiris la nubojn super lia kapo, li staris ankoraŭ tie, kiam la tuta frazo estis parolita, en la sama teniĝo, en kiu la parolantino estis surprizinta lin — dum li apogis sin per la brako al la pordego kaj lia vizaĝo estis turnita okcidenten. Fine li sin turnis, kvazaŭ kun mezurita malrapideco. Estis al mi, kvazaŭ ĉarma vizio aperis je lia flanko. Apenaŭ tri futojn malproksime de li staris blank-vestita figuro — juna, belega knabino kun graciaj rondaj konturoj; kaj kiam ŝi, kliniĝinte al Karlo por karesi ĝin, ree leviĝis kaj flankenŝovis longan vualon, ŝi montris floran-tan vizaĝon perfekte belan. La esprimo ”perfekte belan” estas forta esprimo, sed mi ne reprenos ĝin, ankaŭ mi ne pravigos ĝin. La vizaĝtraĵtoj estis tiel dolĉaj kaj mildaj, kiel la moderi-

gita klimato iam skulptis ilin. La koloroj tiel rozoruĝaj kaj li-blankaj, kiel iam ili brilis sub ĉi tiu nuboplena ĉielo, en ĉi tiuj malseketaj ventoj, en ĉi tiu okazo pravigas la signifon: "perfekte belan". Neniu ĉarmo mankis, neniu manko estis videbla; la juna knabino havis molajn kaj regulajn vizaĝtrajtojn; la okuloj estis plenaj de tiaj formo kaj koloro, kiajn oni vidis nur sur pentraĵoj belegaj, ili estis grandaj kaj malhelaj kaj la rigardo estis malkaŝa; la longaj, dikaj okulharoj, kiuj aldonis al la belaj okuloj tian mildan ĉarmon, la kvazaŭ pentritaj brovoj, kiuj igis la okulojn tiel klaraj kaj brilaj, la blanka pura frunto, kiu plibeligis la esprimon de la vizaĝo kaj kiu tiel pligrandigis ĝian kvieton, la vangoj, ovalaj, freŝaj kaj molaj, la lipoj same freŝaj, ruĝaj, sanaspektaj kaj milde formitaj, la brilantaj kvazaŭ perlodontoj sen ia makuleto, la eta mentono kun la ŝercema kavaĵo, la ornamaj dikaj harplektaĵoj — per unu vorto ĉio, kio povas formi perfektan belegecon, kolektiĝis sur ŝia vizaĝo. Mi estis mirigita, kiam mi rigardis al tiu belega figuro; mi tutkore admiris sin. Okulŝajne la naturo kreis ŝin en sia plej brila kaprico; kaj forgesinte donaci al ŝi sian kutiman duonpatrinan parton, ŝi ornamis sian favoratinon per la malavareco de avino.

Kaj kion St. John Rivers opiniis pri ĉi tiu anĝelo en homa formo? Estis tre nature, ke mi adresis al mi tiun demandon, vidante kiel li sin turnis al ŝi kaj kiel li ŝin alrigardis; kaj same nature mi serĉis la respondon al tiu demando sur lia vizaĝo. Li jam estis fortuninta la okulojn de la perlo kaj alrigardis modestan tufon da amarantoj, florantan apud la pordego.

"Ĉarma vespero estas, sed estas tro malfrue por vi esti tute sola ekstere," li diris, piedpremante la neĝe blankajn kapetojn de la dormantaj floroj.

”Ho, mi revenis nur hodiaŭ posttagmeze de S—,” (ŝi nomis grandan urbon je ĉirkaŭ dudek mejla distanco). ”Mia patro diris al mi, ke vi jam malfermis vian lernejon, kaj ke jam alvenis la nova instruistino; tial post la tetrinkado mi surmetis la ĉapelon kaj eniris la valon por rigardi. Ĉu ŝi estas la nova instruistino?” Dirante tion, ŝi fingre montris al mi.

”Jes, ŝi estas,” diris St. John.

”Ĉu vi kredas, ke Morton plaĉos al vi?” ŝi demandis kun milda kaj simpla naiveco pri tono kaj voĉo, kiu estis ĉarma kvankam iom infana.

”Mi sendube esperas tion; ĉar mi havas multajn kaŭzojn esperi tion.”

”Ĉu vi trovis viajn lernantinojn tiel atentemaj, kiel vi atendis?”

”Absolute.”

”Kaj via dometo plaĉas al vi?”

”Treege.”

”Ĉu mi belete aranĝis ĝin?”

”Vere tre belete.”

”Kaj ĉu mi faris bonan elekton, kiam mi faris Alice Wood via servistino?”

”Vi vere bone trafis. Ŝi estas tre lernema kaj laborema.”

Kaj tiu estas, mi pensis, fraŭlino Oliver, la heredontino; same riĉa pro la donacoj de Fortuno kiel pro tiuj de la Naturo! Kiu feliĉa konstelacio de la astroj prezidis do ĉe ŝia naskiĝo?

”Mi kelkfoje venos al vi por helpi vin en via instruado,” parolis ŝi plue. ”Tio estos por mi variado, se mi tiam kaj tiam povos viziti vin, kaj mi amas la variadon. Ho, sinjoro Rivers, mi estis dum mia restado en S— tiel ĝoja kaj petola. Hieraŭ vespere aŭ pli bone dirite la pasintan nokton mi dancis ĝis la

dua horo. Dum la tumultetoj la regimento de — estas lokita tie; kaj la oficiroj estas la plej amindaj homoj en la mondo; ili metas en la ombron ĉiujn viajn junajn tondilakrigistojn kaj tranĉilvendistojn.”

Al mi ŝajnis, ke la malsupra lipo de sinjoro St. John ŝoviĝis antaŭen dum momento kaj ke la supra lipo iom retiriĝis, ĉar lia buŝo aspektis tre kunpremita, kaj la malsupra parto de lia vizaĝo estis tre gravmiena, kiam la ridanta knabino sciigis al li tion. Poste li levis la okulojn kaj fikse rigardis ŝin. Tiu rigardo estis penetranta, neamika kaj tre signifodona. Ŝi respondis per dua ridado, kaj la ridado bonege harmoniis kun ŝiaj juneco, rozoj, kavetaĵo kaj ardantaj okuloj.

Kiam li staris tie tiel senparola kaj grava, ŝi denove komencis karesi Karlon. ”La kompatinda Karlo amas min,” ŝi diris. ”Ĝi ne estas severa kaj fremda al siaj amikoj, kaj se ĝi povus paroli, ĝi ne silentadus.”

Kiam ŝi karesis la kapon de la hundo, kaj sin klinis kun denaskita ĉarmo antaŭ ĝia juna, severa mastro, mi vidis, ke purpura koloro kovris la vizaĝon de tiu mastro. Mi vidis, ke subita fajro fandis la malmolecon de liaj okuloj kaj ke tie eklumis neregebla emocio. Tiel ruĝiĝinta kaj emociita, li kiel viro aspektis same bele kiel ŝi kiel virino. Lia brusto leviĝis, sed nur unu solan fojon, kvazaŭ lia koro, tedita pro la despota devigo, plivastiĝis kontraŭ lia volo kaj faris senesperan penon por liberiĝi. Sed li regis sin kiel decidita rajdisto regus sian obstine stariĝintan ĉevalon. Nek per unu movo, nek per unu vorto li respondis ŝian delikatan cedemon.

”Mia patro plendas pro tio, ke vi vizitas nin neniam plu,” parolis plue fraŭlino Oliver, rigardante supren. ”Vi estiĝis fremdulo en Vale Hall. Hodiaŭ vespere li estas tute sola hej-

me kaj li ne sentas sin bone. Ĉu vi volas iri kun mi por viziti lin?”

”Estas jam tro malfrue por ĝeni sinjoron Oliver ankoraŭ nun,” respondis St. John.

”Jam tro malfrue! Sed mi certigas al vi, ke tute ne estas tro malfrue. Ĝuste en ĉi tiu horo li plej multe bezonas vizitanton. La ferfabrikejoj estas nun fermitaj kaj li ripozas post siaj aferoj. Tial, sinjoro Rivers, mi petas vin, iru kun mi! Kial do vi estas tiel retenema, tiel terure grava?”

Ŝi mem daŭrigis post mallonga tempo:

”Ho, mi tute ne pensas pri tio, ke mi estas tiel senpensa kaj distrita! Pardonu min!” Ŝi skuis sian belan kapon kvazaŭ ŝi estus terurita pro si mem. ”Mi tute ne pensis pri tio, ke vi havas sufiĉajn motivojn por ne meti atenton al mia stulta babilado. Diana kaj Maria forlasis vin; Moor House estas ŝlota, kaj vi estas tute sola. Mi kore kompatas vin. Venu kun mi por viziti mian patron.”

”Ne hodiaŭ vespere, fraŭlino Rosamond, ne hodiaŭ vespere.” Sinjoro St. John parolis preskaŭ kiel aŭtomato. Nur li mem sciis, kiel malfacile estis al li malakcepti la peton.

”Nu, ĉar vi estas tiel nekurbigema, mi forlasos vin, ĉar mi ne kuraĝos forresti pli longe. La roso komencas jam fali. Bonan nokton!”

Ŝi etendis al li la manon. Li tuŝetis ĝin. ”Bonan nokton!” ripetis li per voĉo, kiu sonis kel eĥo. Ŝi estis forironta, sed tuj posterevenis.

”Ĉu vi ne sentas vin tute bone?” ŝi demandis. Prave ŝi faris tiun demandon, ĉar lia vizaĝo estis pala kiel ŝia vestaĵo.

”Tute bone,” certigis li kaj kun mansaluto li malproksimiĝis de la pordego. Ŝi iris en la direkto al unu flanko, li al la alia.

Ŝi turnis sin dufoje por postrigardi lin, kiam ŝi kiel feino mal-supreniris la kamparon al la valo; li eĉ ne unu fojon rerigardis, kiam li per longaj, firmaj paŝoj sin direktis al la pastrohejmo.

Ĉi tiu vidaĵo de sufero kaj ofero de aliulo deturnis miajn pensojn for de la pripensoj pri mi mem. Diana Rivers estis nominta sian fraton "senkompata kiel la morto". Ŝi ne estis troiginta.

## Ĉapitro XXXII.

**M**i plenumis mian taskon en la vilaĝa lernejo kiel eble plej fidele kaj bone. En la komenco tiu laboro vere estis malfacila. Malgraŭ ĉiuj miaj penoj pasis longa tempo antaŭ ol mi povis kompreni la dialekton de miaj lernantinoj. Ili estis tute malkleraj, ĉiuj iliaj kapabloj ŝajnis dormi nevekitaĵoj kaj ĉe la unua rigardo ĉiuj estis same stultaj. Sed baldaŭ mi rimarkis mian eraron. Same kiel inter la civilizitoj, ankaŭ inter miaj lernantinoj estis diferenco; kaj kiam mi pli bone konatiĝis kun ili kaj ili kun mi, tiu diferenco montriĝis pli kaj pli rapide. Post kiam malaperis ilia miro pri mi, pri mia lingvo, pri miaj ordonoj kaj agmanieroj, mi vidis je mia plej granda miro, kiel kelkaj el ĉi tiuj mallertaj kun malfermita buŝo rigardantaj kamparidinoj disvolviĝis je lertaj, saĝaj knabinoj. Iuj el ili eĉ fariĝis komplezemaj kaj amindaj; kaj mi rimarkis inter ili pli ol unu ekzemplon de natura, denaska ĝentilo kaj eĉ de memestimo. Tiuj bonegaj kapabloj naskis miajn miron kaj koran simpation. Kaj tiuj knabinoj baldaŭ laboris kun plezuro, ili ne malpuriĝis kaj regule studis siajn taskojn; ili adaptiĝis al kvietaj kaj ordaj manieroj. En kelkaj okazoj la rapideco de iliaj progresoj estis eĉ miriga kaj pri tio mi sentis honestan, feliĉan fieron; krome mi baldaŭ spertis personan bonvolon al kelkaj el la plej bonaj knabinoj, kaj reciproke ili amis min. Inter miaj lernantinoj estis filinoj de farmistoj, preskaŭ plenkreskulinoj. Ĉi tiuj jam sciis legi, skribi kaj kudri, kaj al ili

mi instruis la unuajn elementojn de la gramatiko, geografio, historio kaj la delikatajn specojn de kudraĵo. Mi trovis inter la knabinoj kelkajn kun estimindaj karakteroj — karakteroj, kiuj sopiris je scienco kaj kiuj kapablis kompreni ĝin. Kun ili mi pasigis multajn agrablajn vesperojn en iliaj propraj hejmoj. Ĉe tiuj okazoj la gepatroj — la gefarmistoj — superŝarĝis min per siaj atentoj. Kun ĝojo mi akceptis tiun simplan koran afablecon, kaj per estimo kaj komplezo mi repagis ĝin. Tiu repago tamen ofte estis doloriga al ilia sento, ĉar ili eble ne kutimiĝis al ĝi kvankam ĝi estis al ili utila; dum ĝi levis ilin en iliaj prapraj okuloj, ĝi instigis ilin igi sin indaj al la estimplena traktado, kiun mi montris al ili.

Mi sentis, ke mi farigis la favoratino de mia ĉirkaŭaĵo. Kiam mi eliris, mi aŭdis de ĉiuj flankoj amikajn salutojn kaj ĉie oni ridetante diris bonvenon al mi. Vivi meze de ĝenerala estimo, eĉ se tiu estimo venas nur de simplaj laboristoj, similas la senton "sidi en sunbrilo, kvietaj, dolĉa sunbrilo"; puraj, kvietigantaj sentoj ĝermas kaj floras sub la vivigantaj radioj. En tiu periodo de mia vivo mia koro ŝvelis multe pli ofte pro dankemo, ol ĝi estus malĝojinta; kaj tamen, mia kara leganto, se mi devas diri ĉion al vi, meze de tiu kvietaj, utila ekzisto — post kiam mi senbrue kaj kontente estis pasiginta la tagon en honesta klopodo inter miaj lernantinoj, kaj la vesperon per desegnado kaj legado — mi nokte ofte havis strangajn sonĝojn: multkolorajn, ekscitajn malkvietigantajn sonĝojn — dum kiuj mi renkontis sinjoron Rochester en stranga ĉirkaŭaĵo plena de aventuroj, inter teruraj danĝeroj kaj romantikaj epizodoj kaj ĉiam en momento, kiam komenciĝis ia decidanta krizo; kaj tiam ripetiĝis kun sia tuta unua forto, kun sia tuta unua fajro la sento, kvazaŭ mi kuŝus

en liaj brakoj, aŭdante lian voĉon kaj vidante lian rigardon, tuŝante liajn manojn kaj vangojn, amante lin kaj esti de li amata — kaj per tio ripetiĝis la espero povi pasigi tutan mian vivon ĉe lia flanko. Kaj poste mi vekigis. Tiam mi memoris, kie mi estas kaj kia estas mia situacio. Mi leviĝis tremante. Kaj la kvietaj, mallumaj noktoj vidis la tremadojn de mia senespero, aŭdis la plendojn de la pasio. La sekvintan matenon precize je la naŭa horo mi ree estis en mia lernejo por instrui kaj tiam mi estis kvietaj, preparita por la gravaj devoj de la tago.

Rosamond plenumis sian promeson viziti min. Ŝia vizito en la lernejo ordinare okazis en la tempo de ŝia matenrajddo. Ŝi kutimis rajdi ĝis la pordo de la lernejo kaj post ŝi sekvis livree vestita servisto ankaŭ surĉevalo. Apenaŭ oni povas imagi pli amindan estaĵon ol ŝia aperaĵo en tiu malhele ruĝa rajdvesto, kun la amazono-ĉapeleto el nigra veluro, kiu gracie estis lokita sur ŝiaj longaj harbukloj pendantaj laŭlonge de ŝiaj vangoj kaj ŝultroj. Tiel ŝi eniris la simplan lernejon kaj kvazaŭ ŝvebis tien kaj reen inter la vicoj de duone blindigitaj vilaĝinfanoj. Plej ofte ŝi aperis, kiam sinjoro Rivers instruis la kateĥismon. Mi timis, ke la okuloj de la belega vizitantino dolore traboros la koron de la juna pastro. Ŝajnis kvazaŭ ia instinkto sciigis al li ŝian eniron, eĉ kiam li ne vidis ŝin per la okuloj. Kiam li rigardis en la kontraŭa direkto de la pordo, tra kiu ŝi eniris, liajn vangojn kovris hela ruĝo, kaj liaj trajtoj sangigis nepriskribeble, kvankam li faris sian eblon por kontraŭbatali tiun ŝanĝon.

Kompreneble ŝi konsciis pri sia povo kaj li ne kaŝis tion al ŝi, ĉar tion li ne kapablis. Malgraŭ lia kristana stoiko, liaj manoj tremis, liaj okuloj flamis, kiam ŝi iris al li kaj parolis kun li, dum ŝi gaje kaj eĉ karese ridetis al li. Li ŝajnis diri per

sia malgaja, decidita rigardo, kvankam li ne elparolis tion: "Mi amas vin kaj mi scias, ke vi min amas. Miaj lipoj restas mutaj, ne ĉar mi dubas pri la sekvo. Mi kredas, ke vi akceptus mian koron. Sed ĉi tiu koro kuŝas jam sur sankta altaro, la oferflamo jam brulas. Baldaŭ ĝi estos plu nenio krom la cindro de la oferaĵo."

Tiam ŝi koleretis kiel koleranta infano; melankolieta nuboj tiam malheligis ŝian radiantan viglon. Rapide ŝi retiris sian manon el lia kaj kolere sin deturnis de li, dum li restis staranta kiel heroo kaj martiro samtempe. Sen dubo li volus doni ĉion, se li povus sekvi aŭ reen voki ŝin, kiam ŝi forturnis sin de li en tiu maniero; sed li ne volis cedi eĉ unu atomon de sia atendado pri la ĉielo; li ne volis oferi eĉ unu solan esperon je la vera eterna paradizo por la elizeo de ilia amo. Krome li ne povis ĉeni en la malvastaj limoj de unu pasio ĉion, kion li havis en sia karaktero; tio estis neeblo al la revanto, la poeto, la pastro. Li ne povis — li ne volis — cedi sian sovaĝan misio-terenon al la belegaj salonoj kaj la paco de Vale Hall. Ĉion ĉi mi eksciis de li mem per enrompo, kiun mi, malgraŭ lia sinretenemo, havis la kuraĝon fari en sian konfidon.

Fraŭlino Oliver jam ofte faris al mi la honoron per siaj vizitoj en mia loĝejo. Mi konatiĝis kun ŝia tuta karaktero, kiu ne havis sekretojn nek ŝajnigojn. Ŝi estis koketa sed ne sensenta, ordonema sed ne malnoble egoista. De ŝia naskiĝo oni estis dorlotinta sed ne tute malboniginta ŝin. Ŝi estis trorapidema sed bonhumora; vantema (sed ŝi ne estis kulpa en tio, ĉar ĉiu rigardo en la spegulo montris al ŝi tian superfluan daĉarmo) sed ne afektema; ŝi estis malavara, tute sen tia petolkuraĝo, kiun ordinare granda riĉeco akompanas; originala; sufiĉe inteligenta; gaja, vivoplena kaj senpensema; koncize

dirite, ŝi estis ĉarma eĉ en la okuloj de indiferenta observantino, kia mi estis; sed ŝi ne estis tre interesa aŭ speciale impona. Ŝia karaktero tro diferencis de tiuj de la du fratinoj de St. John. Tamen mi ne amis ŝin pli malmulte ol mian lernantinon Adèle; nur la diferenco estis, ke pli kora inklinio naskiĝis por la infano, kiun mi gardis kaj instruis, ol por plenkreskulino, posedanta la samajn kvalitojn. Subita kaprico ŝati min estis reginta ŝin. Ŝi diris, ke mi similas al sinjoro Rivers (sed, tiel ŝi parolis plue, tute ne tiel bela, kvankam mi estas ankaŭ malgranda beleta persono; sed li estas anĝelo). Tamen laŭ ŝia opinio mi estis bona, saĝa, decidema kaj karakterenergia kiel li. Laŭ ŝia opinio mi estis *lusus naturae*, fenomeno vilaĝinstruistino; ŝi estis certa pri tio, ke mia vivohistorio, se oni konus ĝin, taŭgus kiel modelo por la plej bela romano.

En unu vespero, en sia kutima, senpripensa kaj infana sciivolemo, traserĉante la ŝrankon kaj la tirkeston de la tablo en mia kuirejo, ŝi por la unua fojo vidis du francajn librojn, unu volumon de la verkoj de Schiller, germanajn gramatikon kaj vortaron, poste mian desegnan ilaron kaj kelkajn skizojn, unu krajone desegnitajn kapon de malgranda anĝelsimila knabino, kaj diversajn desegnaĵojn laŭ la naturo, kiujn mi antaŭe faris en la valo de Morton kaj sur la ĉirkaŭkuŝantaj marĉejoj. Unue ŝi estis muta pro mirego, poste kvazaŭ elektrita de ravego. Ŝi demandis: Ĉu mi faris tiujn desegnaĵojn; ĉu mi konas la francan kaj la germanan lingvojn? Kaj ŝi diris plue: "Kia trezoro, kia mirindaĵo vi do estas! Vi desegnas pli bone ol mia instruisto de la instituto de S—. Ĉu vi volas fari skizon de mi, por ke mi montru ĝin al mia patro?"

"Kun plezuro," mi respondis kaj mi sentis ion de artista ravo, povante desegni tian perfektan kaj brilan modelon. Ŝi

estis vestita per malhele bruna robo el silko; ŝiaj brakoj kaj nuko estis nudaj; ŝia sola ornamaĵo estis la kaŝtan-brunaj harplektaĵoj, kiuj pendis libere kaj nature gracie trans ŝiaj ŝultroj. Mi prenis folion de bela kartono kaj zorge desegnis la konturojn. Mi ĝojis desegni ŝin per koloroj, kaj ĉar jam krepuskiĝis, mi petis ŝin reveni ankoraŭ fojon por pozi antaŭ mi.

Al sia patro ŝi rakontis pri mi tiajn mirindaĵojn, ke sinjoro Oliver akompanis ŝin en la sekvinta vespero. Li estis alta, grizhara viro kun masivaj vizaĝesprimoj kaj jam mezaĝa. Ĉe lia flanko la aminda filino aspektis kiel belega floro apud prujne griza turo. Li ŝajnis silentema, eble ankaŭ fiero viro; sed al mi li estis bona kaj amika. La skizo de la portreto de Rosamond tre plaĉis al li; li diris, ke mi faru el ĝi pretan portreton. Ankaŭ li deziris, ke la sekvontan tagon mi venu en Vale Hall por pasigi tie la vesperon.

Mi iris tien. Ĝi estis vasta, bela konstruaĵo, kiu plene montris la riĉecon de la posedanto. Dum la tuta tempo de mia vizito Rosamond estis plena de ĝojo kaj amindeco. Ŝia patro estis amika kaj kiam post la tetrinkado li komencis interparoli kun mi, li sciigis al mi per fortaj esprimoj sian kontenton pri ĉio, kion mi jam faris en Morton. Li nur timis, ke mi estas tro bona por tiu ofico kaj ke baldaŭ mi interŝanĝos ĝin por pli bona.

”Vere,” kriis Rosamond, ”ŝi estas sufiĉe kompetenta por plenumi la oficon de guvernistino ĉe eminenta familio.”

Mi pensis tamen, ke plej volonte mi restos, kie mi estis, ol iri al eminenta familio ie en la lando. Sinjoro Oliver parolis pri sinjoro Rivers kaj pri ties tuta familio kun la plej granda estimo. Li diris, ke ĝi estas la plej malnova en la tuta ĉirkaŭaĵo, ke la praavoj de la familio estis tre riĉaj, ke tuta Mor-

ton antaŭe apartenis al ĝi kaj ke li opinias, ke la sola restinto de tiu familio nur povis kaj decis aspiri la manon de filino de la plej eminenta familio. Estas bedaŭrinde, li diris plue, ke tiel bela kaj talenthava juna viro havas la intencon fariĝi misiisto; ĉar tio estas forfuŝi riĉan, valorplenan vivon. Ŝajnis do, ke la patro ne kontraŭstarus la edziĝon de St. John kun Rosamond. Sinjoro Oliver do rigardis la bonan devenon, la malnovan nomon kaj la pian oficon de la juna pastro kiel sufiĉan kompenson por la manko de kapitalo.

Estis la kvina de novembro kaj ripoztago. Post kiam mia malgranda servistino helpis min purigi la domon, ŝi foriris, tre feliĉa per la penco, kiun mi al ŝi donis por ŝia servado. Ĉio ĉirkaŭ mi estis brilante pura kiel spegulo — la planko estis frotpurigita, la fajrejo polurita. Mi estis bele vestinta min kaj antaŭ mi estis la posttagmezo, kiun mi povos pasigi laŭplaĉe.

Traduko de kelkaj paĝoj de la germana literaturo postulis de mi tutan horon. Poste mi prenis mian paletron kaj miajn krajonojn kaj komencis fini la miniaturbildon de Rosamond Oliver. La kapo estis jam finita; nur la fundo kaj la ombrumo de drapiraĵo mankis; iom da karmino devis ankoraŭ esti metita sur la belformajn lipojn tie kaj alie, la haroj ne sufiĉe ondis — pli malhela nuanco devis ankoraŭ reliefigi la okulharojn sub la blueta palpebro. Mi estis profundiginta en la plenumo de tiuj belaj detaloj, kiam post mallonga, laŭta frapado mia pordo malfermiĝis kaj St. John Rivers eniris.

”Mi venas por vidi, kiel vi pasigas vian ripoz-tagon,” li diris. ”Vi ne profundigis en pensoj, mi esperas? Nu, tio estas bona. Vi ne sentos vin soleca, kiam vi pentras. Vi vidas, ke mi malfidas vin ankoraŭ, kvankam ĝis nun vi kondukis mirinde kuraĝe. Kaj mi kunportis por vi ĉi tiun libron por la vesperaj

horoj.” Dirinte tion, li metis sur la tablon ĵus aperintan libron — poemon de tiaj geniaj produktoj, kiaj al la publiko tiel ofte estis oferataj en tiuj tagoj de la ora epoko pri moderna literaturo. Sed kuraĝon! Mi ne volas malĝoji aŭ plendi. Mi scias, ke la poezio ankoraŭ ne mortis, ke la genio ankoraŭ ne estas perdita, kaj la mamono ankoraŭ ne regas ĝin; ĝi ne povas kateni nek mortigi la poezion — iun tagon ree ĝia ĉeesto certigos ĝian liberecon kaj ĝian povon. Potenca anĝelo, kiu tie supre en la ĉielo trovis vian certecon! Vi ridetas kiam malicaj animoj triumfas, kaj malfortaj ploras pro via neniigo. Ĉu la poezio estas neniigita? Ĉu la genio estas ekzilita? Ho ne! mezkvalito, la envio ne flustru al vi tiajn pensojn! Ne! ili ne nur vivas, sed ili regas! ili liberigas! Kaj sen ilia dia enfluo, kiu ĉien enpenetras, vi estus en la infero — en la infero de via propra malnobleco!

Dum fervore mi foliumis la libron (ĝi estis Marmion de Walter Scott) St. John sin klinis por ekzamenrigardi mian desegnaĵon. Subite lia longa figuro rektiĝis supren — sed li diris nenion. Mi rigardis lin: li evitis mian rigardon. Mi bone konis liajn pensojn kaj povis klare legi en lia koro; en ĉi tiu momento mi sentis min pli kvieta kaj pli malvarma ol li, kaj tial superis lin, kaj subite kaptis min la deziro montri al li ion ĝentilan, se mi povus.

”Malgraŭ liaj firmeco kaj memregado li metas sur sin tro pezan ŝarĝon,” mi pensis, ”li subpremas ĉiun senton, ĉiun doloron — li esprimas, konfesas, sciigas nenion. Mi estas certa pri tio, ke kelka parolado pri tiu ĉarma Rosamond, kiun, laŭ sia kredo, li ne povas edziĝi, faros al li bonon. Mi volas devigi lin paroli.”

Unue mi diris: ”Sidiĝu, sinjoro Rivers.”

Sed kiel ĉiam li respondis, ke li ne povos resti.

"Bone," mi diris enpense al mi, "restu staranta se tio plaĉas al vi, sed mi decidis, ke vi ne foriru tiel rapide, ĉar la soleco estas al vi same malbona, kiel al mi. Mi tamen volas klopodi, ĉu mi ne povos malkovri la sekretan risorton de via konfido kaj la malfermaĵon de ĉi tiu marmora brusto, tra kiu mi povus engutigi guton de simpatia balzamo."

"Ĉu la portreto estas simila?" mi demandis kvazaŭ sentence.

"Ĉu simila ... al kiu? Mi ne rigardis ĝin tre atente."

"Ho jes, vi rigardis ĝin atente, sinjoro Rivers."

Li ektimis pro mia subita kaj eksterordinara abrupteco kaj mirigite rigardis min dum mi pensis: Ho, tiu malvarmo viaflanke tute ne timigos min; mi decidis iri pluen ankoraŭ; kaj mi daŭrigis: "Vi atente rigardis tiun bildon, sed volonte mi konsentas, ke vi ree ĝin rigardu," kaj mi ekstaris, prezentante ĝin al li.

"Ĝi estas desegnita bildo," li diris, "la koloro estas tre klara kaj korekte farita."

"Jes, jes. Ĉion tion mi scias. Sed kion vi opinias pri la simileco? Al kiu ĝi estas simila?"

Post mallonga hezito li respondis: "Al fraŭlino Oliver, mi supozas?"

"Kompreneble. Kaj tial, sinjoro, por rekompenci vin, ĉar vi tiel bone divenis, mi volas desegni por vi trafe similan kopi-aĵon, kondiĉe, ke tia donaco estu al vi agrabla. Mi tamen ne volas forfuŝi miajn tempon kaj penon por laboro, kiu havas por vi nenian valoron." Li daŭrigis rigardi la pentraĵon; ju pli longe li ĝin rigardis, despli firme li ĝin tenis en la mano kaj des pli li ŝajnis aspiri ĝin.

”Ĝi estas simila,” murmuris li, ”ĝi estas tre simila al ŝi! La okuloj mirinde similas; la koloro, la nuancoj kaj la vizaĝesprimoj estas belegaj, tute perfektaj! La tuto kvazaŭ ridetas!”

”Ĉu vi sentos konsolon aŭ ofendon posedi similan portreton? Diru tion al mi. Kiam vi estos en Madagaskaro aŭ en Hindujo, ĉu tiam ĝia posedo konsolos vin; aŭ ĉu ĝi inspiros al vi memorojn, kiuj povus nur kaŭzi al vi ĉagrenon kaj senkuraĝon?”

Li rigardis supren. Li rigardis min, nedecidite, ekscitite; poste li denove fiksas la okulojn sur la portreton, dirante:

”Certe mi volonte posedus ĝin. Sed alia demando estas, ĉu tio estus saĝa kaj konsilinda.”

Estante certa pri tio, ke Rosamond vere lin amis, kaj ke ŝia patro ne kontraŭstarus ilian geedziĝon, mi estis decidinta favori tion.

Ŝajnis al mi, ke, se li iam estus la posedanto de la granda riĉaĵo de sinjoro Oliver, li povus fari same tiom da bono en la ĉirkaŭaĵo, kiel ie ajn malproksime en la mondo, kie lia genio forvelkus sub tropika suno kaj liaj fortoj fine elĉerpiĝus. Kaj estante certa pri tio, mi respondis:

”Kiom mi komprenas la cirkonstancojn, estus pli saĝe kaj pli konsilinde kunpreni la originalon.”

Intertempe li estis sidiĝinta; li estis metinta la portreton antaŭ sin sur la tablon, kaj dum li ripozigis la kapon en ambaŭ manoj li rigardis ĝin per amplenaj okuloj. Mi subite rimarkis, ke mia kuraĝa teniĝo ne ofendis nek kolerigis lin. Mi eĉ rimarkis, ke li sentis kvazaŭ ĝojon, kvazaŭ neesperitan senŝarĝigon, ke oni senkaŝe parolis al li pri io, kion li ĝis nun rigardis kiel netuŝebla. Retenemaj homoj ofte pli bezonas malkaŝajn preparolojn pri siaj ĉagrenoj kaj sentoj, ol la kom-

unikemaj. Reale la plej severa stoikulo estas ja nur homo; kaj ofte estas plej granda bonfaro, kiun oni povas montri al li, kiam oni kuraĝe kaj bonvole penetras la "silenteman maron" de lia animo.

"Ŝi amas vin, pri tio mi estas certa," mi diris, starante post lia seĝo, "kaj ŝia patro estimas vin. Krom tio, ŝi estas aminda knabino — iom senpripensema; sed vi sola ja havus sufiĉan pripenson por ŝi kaj vi kune. Vi devas edziĝi kun ŝi."

"Ĉu ŝi amas min?" li demandis.

"Certe. Vin ŝi amas pli multe ol iun alian. Ŝi ĉiam parolas pri vi; ne estas temo, kiu estas tiel kara al ŝi, aŭ kiun ŝi tuŝas tiel ofte."

"Estas tre bonfare aŭdi tion," li diris, "tre bonfare. Mi petas parolu plue en tiu maniero ankoraŭ kvaronhoron." Kaj vere li tiris la horloĝon el sia poŝo kaj metis ĝin sur la tablon por mezuri la tempon.

"Sed al kio utilos daŭrigi," mi demandis, "se vi tiel sidas kaj eble preparas feran pugnobaton kiel kontraŭdiron aŭ forĝas novan ĉenon por kateni vian kompatindan koron?"

"Ne imagu tiajn terurajn aferojn. Pli volonte pensu, ke mi cedas kaj degelas, ĉar tion mi nun vere faras. Surtera amo penetras kiel freŝa fonto en mian animon kaj per sia dolĉa murmurado superakvas la tutan terenon, kiun mi preparis tiel zorgoplene kaj tiel diligente kulturis per la semo de bonaj intencoj kaj memforĝado. Kaj nun kvazaŭ fluo de ĉiela nektaro superakvas ĉion tion — la junaj ĝermoj estas dronigataj, dolĉa veneno putrigas ilin. Nun mi vidas min sur divano en Vale Hall; antaŭ la piedoj de mia fianĉino Rosamond Oliver, ŝi parolas al mi per sia melodia voĉo — rigardas malsupren al mi per tiuj okuloj, kiujn vi tiel simile pentris — ridetas al mi

per tiuj koral-similaj lipoj. Ŝi apartenas al mi — mi apartenas al ŝi — ĉi tiu surtera vivo, ĉi tiu mondo sufiĉas al mi! Silentu! silentu! diru nenion — mia koro estas plena de feliĉego — miaj sentoj estas ravitaj, — lasu preteriri ĉi tiun kvaronhoron en paco.”

Mi obeis lin. La horloĝo tik-takis plue. Li spiris rapide kaj mallaŭte. Senparole mi staris ĉe lia flanko. En tiu senparoleco la kvaronhoro pasis. Poste li ŝovis la horloĝon en la poŝon, metis la portreton sur la tablon, sin levis kaj staris antaŭ la kameno.

”Nu,” li diris, ”ĉi tiu mallonga momento estis dediĉita al la fantazio kaj al la iluzio. Mi premis mian vangon al la brusto de la tento kaj kurbigis mian dorson libervole sub ĝia jugo de floroj; mi gustumis je ĝia pokalo. La kapkuseno brulis; la vino estis al mi amara; ilia promeso estas konkava — kaj falsa ilia ofero — ĉion tion mi scias kaj vidas.”

Mirigita mi rigardis lin.

”Estas strange,” parolis li plue, ”ke mi, kiu tiel senlime kaj sovaĝe kaj eĉ kun la tuta fajro de unua pasio ŝin amas, ĉar si estas senfine belega kaj ĉarma — tamen samtempe kaj klare konscias, ke ŝi ne estus al mi taŭga edzino; ke ŝi ne estas la vivokunulino, kiun mi bezonas; mi scias, ke mi spertus tion jam en la unua jaro de nia geedziĝo, ankaŭ mi scias, ke post la feliĉego unuajara sekvus la pento de tuta longa vivo.”

”Vere, tio estas stranga!” mi kriis ne povante reteni tiun krion de mirego.

”Dum io en mi estas influebla je ŝiaj belegeco kaj aliaj avantaĝoj,” li diris plue, ”io alia en mi estas ofendata pro ŝiaj mankoj. Tiuj lastaj estas tiaj, ke ŝi ne povus simpatii kun mi en ĉio, kion mi aspiras — ke ŝi eĉ en unu afero de mi entre-

prenota ne povus helpi min. Ĉu ŝi povus esti suferantino, laborantino kaj virina apostolo — ĉu si povus esti la edzino de misiisto? Ne, ne, ne!”

”Sed vi ja ne bezonas fariĝi misiisto! Tiun intencon vi ja povus forlasi.”

”Kion!?!... Forlasi mian oficon? Mian grandan laboron!? La fundamenton, kiun mi sur la tero faris por loĝejo en la ĉielo? Forlasi mian esperon aparteni estonte al la nombro de tiuj, kiuj forŝutis de si ĉiun ambicion pro la pli granda idealo esti pliboniginta la homaron — esti portinta scion en la regnon de la nesciado — esti metinta pacon anstataŭ militon — elekti liberecon anstataŭ servuton — religion anstataŭ superstiĉon — esperon je la eterna vivo anstataŭ timon antaŭ la infero? Ĉion tion mi forlasu!!? Ĉio tio estas al mi pli kara ol la sango en miaj vejnoj. Ĝi estas tio, por kio mi vivas!”

Post longa silentado mi diris: ”Kaj fraŭlino Oliver? Ĉu ŝia ĉagreno kaj ŝia seniluziiĝo estas al vi nenio?”

”Fraŭlino Oliver estas ĉiam ĉirkaŭata de amantoj kaj flatantoj. En malpli ol unu monato mia bildo estos forviŝita el ŝia koro, ŝi forgesos pri mi kaj sendube edziniĝos kun viro, kiu kapablos fari ŝin pli feliĉa ol mi iam povus.”

”Vi parolas tre saĝe kaj kviete; sed vi suferas en ĉi tiu batalado. Vi forvelkas.”

”Ne, se eble mi ŝajne iom forvelkas, tion kaŭzas la timo antaŭ mia estonto, kiu estas tiel malcerta — tion kaŭzas la malkvieto, pro la ĉiam daŭranta prokrastado de mia forvojaĝo. Nur hodiaŭ matene mi ricevis la sciigon, ke la posteulo, kies alvenon mi jam longe atendis, povos anstataŭi min nur post tri monatoj. Post tiuj tri monatoj sekvos eble ankoraŭ tri aliaj.”

”Vi tremas kaj ruĝiĝas tuj kiam fraŭlino Oliver eniras la lernejan ĉambbron.”

Ree esprimo de mirego montriĝis sur lia vizaĝo. Li ne estis kredinta, ke virino povus tiel paroli al viro. Rilate al mi, mi sentis min tre hejmece dum tiaj interparoloj. Mi ne povis kontentigi min kun la interrilato de fortaj, diskretaj, sentemaj karakteroj ne nur de viroj, sed ankaŭ de virinoj, antaŭ ol mi transiris la eksteraĵojn de la konvencia sinretenemo kaj la sojlon de la fido, kaj antaŭ ol mi konkeris lokon en la pli profunda kerno de ilia koro.

”Vi estas originala,” li diris, ”kaj tute ne timema. Io kuraga kaŝiĝas en via spirito kaj io penetranta en viaj okuloj. Sed permesu, ke mi certigu al vi, ke vi parte juĝas malbone pri miaj sentoj. Vi opinias ilin pli profundaj kaj pli potencaj ol ili vere estas. Vi atribuas al mi pli grandan parton da simpatio ol reale mi povas pretendi. Kiam mi ruĝiĝas aŭ tremetas antaŭ fraŭlino Oliver, tiam mi ne kompatas min mem. Mi malestimas tian malfortecon. Mi scias, ke ŝi estas malnobla; rilate al mi ĉio estas nur febro de la karno kaj vere ne tremeto de la animo, tion mi certigas al vi. Mia animo estas fortika kiel ŝtonego, kiu havas sian fundamenton en la plej profundo de furiozanta maro. Rigardu en mi tiun, kiu vere mi estas — malvarma, rigida viro!”

Mi ridetis nekredeme.

”Vi konkeris perforte mian fidon,” parolis li plue, ”kaj nun mi estas tute je via dispono. Senigite de la sangmakulita vesto, per kiu la kristaneco kovras la homajn malfortecojn kaj mankojn, mi estas nur rigida, malvarma, ambicia viro. El ĉiuj sentoj, nur la Amo, kiun la naturo metis en nian koron, daŭre regas min. Ne la sento, sed la prudento estas mia gvidanto.

Mia ambicio estas senlima; mia sopiro, supreniri pli alte, fari pli multon ol aliaj homoj, estas nesatigebla. Mi estimas la suferadon, la persistadon, la diligenton, la talenton, ĉar ili estas la rimedoj, per kiuj la homoj atingas altajn celojn kaj supreniras al kapturnigantaj altecoj. Mi rigardis vian karieron kun intereso, ĉar mi opinias, ke vi estas ekzemplo de diligenta, ordema, energia virino: ne ĉar mi profunde kompatas je tio, kion vi spertis aŭ kion vi suferas ankoraŭ riun.”

”Vi povus prezenti vin kiel idolanan filozofon,” mi diris.

”Ne. Inter mi kaj diistaj filozofoj estas diferenco: mi kredas, kaj mi kredas je la evangelio. Via epiteto estis falsa. Mi ne estas idolana, sed kristana filozofo — sekvanto de la sekto de Jesuo. Kiel lia lernanto, mi akceptis lian puran, favorkoran, mildan doktrinon. Mi batalas por ĝi. Mi ĵuris disvastigi ĝin. Jam en mia juneco mi dediĉis min al la religio kaj ĝi plinobligis miajn denaskajn kvalitojn: el la malgranda ĝermo de la natura amo ĝi faris la grandan ombroriĉan arbon de amo al la homoj. El la sovaĝa, eltenpova radiko de homa honesteco ĝi maturigis la veran senton de la dia justeco. El la ambicio, akirigi al mi povon kaj famon, ĝi formis la ambicion disvastigi la regnon de mia Sinjoro kaj konkeri venkon por la standardo de la kruco. Tiom multe la religio faris por mi. La originalajn talentojn ĝi plej bone uzis; ĝi ĉirkaŭtrancis kaj plinobligis la naturon. Sed ĝi ne povis ekstermi la naturon; kaj ĝi ne povas esti ekstermata, ĝis ĉi tiu mortebulo estos metinta sur sin la veston de senmorteco.”

Dirinte tion, li prenis sian ĉapelon, kiu kuŝis sur tablo flanke de mia paletro. Ankoraŭ unu fojon li rigardis la portreton.

”Vere ŝi estas aminda,” murmuris li: ”ŝi rajte portas la nomon rozo de la mondo!”

”Kaj ĉu mi por tiu por vi?”

”*Cui bono?*<sup>1</sup> — Ne!”

Poste li ŝovis sur la pentraĵon la folion de papero, sur kiu ordinare kuŝis mia mano, kiam mi estis desegnanta, por ne malpurigi la portreton. Estas al mi neeble diri, kion li subite vidis sur tiu folio da papero.

Sed lia rigardo vidis ion. Li tiris ĝin al si; li atente rigardis la rando kaj direktis al mi siajn okulojn kun esprimo stranga, nedireble stranga kaj al mi tute nekomprenebla. Liaj okuloj ŝajnis trabori mian korpon, mian vizaĝon, miajn vestojn; ili trafis min rapide kiel fulmo. Liaj lipoj malfermiĝis kvazaŭ por paroli; sed li subpremzis la dirotan frazon, kiu ajn ĝi estos.

”Kio estas al vi?” mi demandis.

”Nenio, tute nenio,” sonis la respondo, kaj dum li remetis la folion sur la portreton, mi vidis, ke li kaŝe deŝiris peceton de la rando. Ĝi malaperis en lian ganton; kaj kun rapida kap-saluto sekvata de ”bonan vesperon” li iris for.

”Nu,” mi kriis, ”tio superas ĉion, kion mi ĝis nun spertis pri li.”

Mi ekzamenis la folion, sed povis rimarki nenion eksterordinaran krom kelkaj malhelaj farbomakuletoj sur loko, kie mi provis la koloron de miaj penikoj. Mi cerbumis kelkajn minutojn pro la sekreto; sed trovante ĝin neklarigebla kaj estante certa, ke ĝi neeble estas io grava, mi rezignis kaj baldaŭ ne pensis plu pri ĝi.

1 *cui bono?* = pro kio? kiacele?

## Ĉapitro XXXIII.

**E**kneĝis, kiam sinjoro St. John foriris kaj la neĝado daŭris la tutan nokton. En la sekvinta tago akra vento alportis freŝan, blindigan neĝfaladon; je krepuska tempo la valo estis plena de neĝo kaj preskaŭ netrairebla. Mi estis ferminta la fenestrovrilojn, metinta maton antaŭ la pordon por malhelpi la neĝon penetri en la ĉambron, ordiginta la fajron kaj sidinte preskaŭ tutan horon antaŭ la kameno kaj aŭskultinte dume la muĝadon de la ventego, mi bruligis kandelon, prenis "Marmion" el la librobreto kaj komencis legi.

Baldaŭ mi ne aŭdis plu la ventegon pro la muziko de la poemo.

Mi aŭdis bruon kaj pensis, ke la vento skuas la pordon. Sed estis St. John, kiu reen ŝovis la riglilon kaj venis al mi tra la ventego kaj la preskaŭ nepenetrebla mallumo. Li staris antaŭ mi. La mantelo ĉirkaŭanta lian altan figuron estis blanka kaj glacikovrita kiel glaciejo. Mi estis konsternita; mi ja tute ne atendis vizitanton el la neĝkovrita vilaĝo.

"Ĉu malbonaj sciigoj?" mi demandis. "Ĉu okazis akcidento?"

"Ne. Kiel facile vi do teruriĝas!" li respondis, demetante sian mantelon kaj pendigante ĝin sur la pordon, al kiu li tute kviete relokis la protektantan maton, kiu ĉe lia eniro estis forŝovita de sia loko. Poste li piedobatis la neĝon de la botoj.

”Mi neĝmalpurigas vian plankon,” li diris, ”sed ĉi tiun solan fojon vi pardonu tion al mi.”

Li proksimiĝis al la fenestro kaj varmigante la manojn antaŭ la fajro li rimarkis: ”Estis malfacila laboro reveni ĉi tien, tion mi povas certigi. Mi trafis ĝis la brusto en neĝamaso; feliĉe la neĝo estas ankoraŭ tre mola.”

”Sed kial do vi venas al mi?” mi diris, ne povante reteni tiun demandon.

”Ne estas gastame demandi ion tian al vizitanto; sed ĉar vi demandas, mi respondos: mi revenis nur por iom interbabilo kun vi. Fine miaj mutaj libroj kaj malplena ĉambro tedas min. Krome de post hieraŭ min regas la scivolo de homo, al kiu oni rakontis la duonon de historio kaj malpacience mi atendas nun la finon.”

Li sidiĝis. Mi memoris lian strangan konduton de la pasinta tago kaj vere timis, ke lia prudento estis tuŝita de malsaneto. Tamen se li estus iom frenezigiĝinta, lia frenezo estis tre silenta kaj sendanĝera por aliuloj. Neniam antaŭe lia bela kaj kvazaŭ el marmoro ĉizita vizaĝo tiel impresis al mi kiel nun, ĉar li estis ŝovinta siajn malsekajn harojn for de la frunto kaj la lumo de la kameno falanta sur lian palan fronton kaj same palajn vangojn klare montris la sulkojn, kiujn la ĉagreno kaj la zorgo jam metis sur ilin. Mi silentis, atendente, ke li diros al mi ion saĝan. Sed li metis la mentonon sur la manon kaj la fingron sur la buŝon — li pensis. Mi rimarkis, ke lia mano estas same pala kaj maldikiĝinta kiel lia vizaĝo. Nekonata kaj apenaŭ komencanta sento de kompatato regis min; tio instigis min diri:

”Mi dezirus, ke Diana kaj Maria venus por loĝi kune kun

vi; estas tiel malgaje, ke vi loĝas tiel solece, kaj vi ja tute ne atentis pri via sano.”

”Tute ne. Se estas necese, mi mem estas tre singarda, sed nun mi sentas min tre bone. Ĉu vi vidas je mi ion, kio montras malsanemon?”

Li diris tion kun senzorga, abstrakta indiferenteco, kio pruvis, ke mia zorgemo, laŭ lia opinio, estas superflua. Mi tial silentis. Malrapide li movis la fingron trans la supran lipon kaj ankoraŭ lia rigardo estis reve fiksita sur la ardantaj karboj en la fajrujo. Pensante, ke estas nepre necese ion diri, mi fine al li demandis, ĉu la aertrablovo el sur la pordo post lia dorso, ĝenas lin.

”Ne, ne,” li abrupte respondis kaj kun kolereto en sia voĉo.

”Bone,” mi pensis, ”silentu se vi ne volas paroli, mi ne plu atentis vin, sed rekomencos mian legadon.”

Mi do ordigis la vakslumon per la tondilo kaj legis ree en Marmion. Baldaŭ poste li sin movis; nevole tio altiris al si mian atenton; li eltiris el la poŝo ledan notlibreton kaj elprenis el ĝi leteron, kiun li senparole tra legis, klinfaldis kaj ree metis en la libreton. Poste li denove dronis en pensojn. Estis neeble al mi legi, dum antaŭ mi sidis tia neesplorablebla figuro; kaj en mia malpacienca mi ankaŭ ne povis ŝajnigi esti muta; eble li ne respondos, sed ĉiuokaze mi volis paroli.

”Ĉu antaŭ nelonge vi aŭdis pri Diana kaj Maria?”

”Nenion mi aŭdis post la ricevo de la letero, kiun mi montris al vi antaŭ semajno.”

”Ĉu ankaŭ nenio aliiĝis rilate al vi? Ĉu vi forlasos Anglujojn ankoraŭ pli frue ol vi atendis?”

”Ne, mi vere timas, ke tio ne okazos. Tia feliĉo estus tro granda por okazi al mi.”

Jen denove li abrupte eksilentis. Mi ŝanĝis la temon kaj komencis paroli pri la lernejo kaj la lernantinoj.

”La patrino de Maria Garretts resaniĝis, kaj Maria revenis hodiaŭ vespere en la lernejon; estontan semajnon venos kvar novaj lernantinoj de la fandejo; ili estus venintaj jam hodiaŭ, se la neĝo ne estus malhelpinta ilin.”

”Ho!”

”Sinjoro Oliver pagos por du el ili.”

”Vere!”

”Kaj li intencas aranĝi lernejfeston okaze de kristnasko.”

”Tion mi scias.”

”Ĉu tio okazos laŭ via propono?”

”Ne.”

”Kies propono do ĝi estas?”

”Mi kredas, ke lia filino faris la proponon.”

”Tion oni povas atendi de ŝi. Ŝi estas tiel bonanima.”

”Jes.”

Denove fariĝis paŭzo. La horloĝo batis la naŭan horon. Tio vekis lin; li sidiĝis rekte kaj sin turnis al mi.

”Formetu por momento vian libron kaj sidiĝu antaŭ la fajro,” li diris.

Kun senfina mirego mi faris, kion li petis.

”Antaŭ duona horo,” li diris plue ”mi parolis pri mia malpacienco aŭdi la daŭrigon de ia historio. Bone pripensinte la aferon mi vidas, ke estos pli bone, ke mi prenu la rolon de rakontanto kaj vi tiun de aŭskultantino. Antaŭ ol komenci estas pli bone jam anticipi diri al vi, ke la historio sonos en viaj oreloj iom ĝistede uzita; sed ĉiuj historioj ricevas ian gradon de freŝeco, se aliaj lipoj rakontas ilin. Krom tio — kiel ajn nova aŭ malnova, ĝi estas mallonga.”

”Antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj juna malriĉa helppastro — lian nomon mi ankoraŭ ne bezonas diri — enamiĝis al la filino de riĉa viro; ankaŭ ŝi enamiĝis al li kaj edziniĝis kun li kontraŭ la volo kaj konsilo de siaj geamikoj. Ĉi tiuj sin deturnis de ŝi post la geedziĝo. Antaŭ ol pasis du jaroj, la senpripensema paro estis mortinta kaj kviete kuŝis unu flanke de alia sub tomoŝtono. Mi vidis ilian tombon; ĝi estas parto de la pavimo de vasta tombejo, kiu ĉirkaŭas la malhelan, fume nigran, malnovan katedralon de jam longe troloĝita fabrikurbo en — graflando. Ili postlasis unu filinon, kiu jam ĉe sia naskiĝo estis akceptita en la sinon de la filantropio, kiu tamen estis tiel malvarma, kiel la neĝamaso, en kiun mi trafis hodiaŭ vespere. La filantropio portis la kompatindan, forlasitan kreitaĵon en domon de riĉaj parencoj patrinflankaj. Ŝi estis edukata en la domo de boonklino, nomita — sinjorino Reed de Gateshead (Mi nun rememoras la nomon). Vi ektimis, ĉu vi aŭdis ian bruon? Mi supozas, ke tio estas rato, kiu iras laŭlonge de la tegmentotrabetoj en la apuda lernejoĉambro; ĝi estis garbejo, antaŭ ol mi igis ĝin rekonstrui, kaj ratoj ĉiam vizitas garbejojn.

Sed mi rakontu plue. Tiu sinjorino tenis ĉe si dum dek jaroj la orfinon. Mi ne povas diri, ĉu ŝi sentis sin feliĉa tie aŭ malfeliĉa, ĉar pri tio mi neniam eksciis ion; sed post tiuj dek jaroj la onklino sendis ŝin al loko, kiun vi bone konas — nome al la lernejo de Lowood, ke vi mem estis tiel longe. Ŝajnas, ke ŝia kariero tie estis tre honorinda; el lernantino ŝi estiĝis instruistino, kiel vi mem, — vere, estas, mirinde, kiel via historio similas al tiu de la orfino — poste ŝi forlasis la instituton por fariĝi guvernistino, ankaŭ tiurilate viaj historioj estas analo-

gياج. Ŝi prenis sur sin la edukadon de zorgatino de certa sinjoro Rochester.”

”Sinjoro Rivers!” mi interrompis lin.

”Mi divenas viajn sentojn,” li diris, ”sed mi petas, regu vin ankoraŭ momenteton. Mi preskaŭ alvenis al la fino, aŭskultu min trankvile. Mi scias nenion pri la karaktero de sinjoro Rochester, sed nur la solan fakton, ke li intencis honorinde edziĝi kun tiu juna fraŭlino, kaj ke ŝi antaŭ la altaro eksciis, ke li havas edzinon, kiu estas frenezulino. Oni povas nur supozi, kiuj estis liaj sekvantaj konduto kaj proponoj; sed kiam okazis io, kio necesigis informiĝon pri la gubernistino, oni malkovris, ke ŝi malaperis — neniu povis diri kiel, kiam kaj kien. Ŝi estis forlasinta Thornfield en la nokto; ĉiuj esploroj kompreneble estis vanaj. Ĉie en la ĉirkaŭaĵo oni serĉis ŝin, sed oni trovis neniun postsignon. Malgraŭ tio fariĝis necesege trovi ŝin. Oni metis anoncojn en ĉiuj gazetoj; mi mem ricevis leteron de certa sinjoro Briggs, advokato, ĝi enhavis la specialaĵojn, pri kiuj mi ĵus parolis. Ĉu tio ne estas stranga historio?”

”Rakontu al mi nur ĉi tion,” diris mi, ”ĉar sciante pri tio tiel multe, vi sendube povas ankaŭ diri — kio estiĝis el sinjoro Rochester? Kiel li fartas kaj kie li estas? Ĉu li bone fartas?”

”Pri sinjoro Rochester mem mi scias nenion. La letero rakontas pri li nenion, krom la trompa kaj kontraŭleĝa klopodo, kiun mi jam menciis. Estus pli bone demandi al mi la nomon de la gubernistino, ĉar la nunaj cirkonstancoj postulas ŝian ĉeeston.

”Ĉu neniu do iris al Thornfield Hall? Ĉu neniu iris al sinjoro Rochester por viziti lin?”

”Mi opinias, ke ne.”

”Sed, ĉu oni skribis al li?”

”Kompreneble.”

”Kaj kion li respondis? Kiu skribis liajn leterojn?”

”Sinjoro Briggs sciigas min, ke la letero, kiun li ricevis, ne estas de sinjoro Rochester, sed de sinjorino, kiu nomiĝas Alice Fairfax.”

Mi sentis min malvarma kaj malagrabla impresita. Mia plej granda timo do verŝajne realiĝis. Sendube li estis forlasinta Anglujon, kaj lia senespero pelis lin al restadejo sur la kontinento. Kiujn resanigantajn rimedojn por sia sufero kaj por siaj pasioj li estis elektinta tie? Mi ne kuraĝis respondi tiun demandon. Ho, mia kompatinda mastro! — iam preskaŭ mia edzo kaj kiun mi estis nominta mia kara Edward!”

”Sendube li estis malbona homo,” rimarkis sinjoro Rivers.

”Vi ne konas lin — vi ne diru vian opinion pri li,” mi respondis kun varmo.

”Bone,” li diris kviete, ”mi ja havas tute aliajn aferojn por pripensi ol lin. Mi devas fini mian historion. Ĉar vi ne volas peti de mi la nomon de la guvernistino, mi devas diri ĝin propravole. Atendu — jen ĝi estas — estas ĉiam plej bone, ke gravaj aferoj estu klare skribitaj sur papero.”

Ree kaj malrapide li aperigis la notlibreton, malfermis ĝin kaj serĉis ion en ĝi; li elprenis peceton da papero ŝajne rapide deŝirita de folio; je la koloro kaj makuletoj ultramaraj kaj bluaj kaj malhele ruĝaj mi rekonis la deŝiritan randon de la portreta koverto. Li levigis, metis ĝin sub miajn okulojn kaj legis per ĥina inko kaj de mi mem skribitan nomon: ”Jane Eyre” — verŝajne mi estis skribinta ĝin en momento de spiritforesto.

”Briggs skribis al mi pri certa Jane Eyre,” li diris, ”la gaze-

toj ankaŭ nomis certan Jane Eyre — mi konis certan Jane Elliot. — Mi devas konfesi, ke mi suspektis ion, sed nur hieraŭ en la posttagmezo tiu suspekto fariĝis pruvo. Ĉu vi konfesas, ke vi portas tiun nomon, neante la alian?”

”Jes, jes — sed kie estas sinjoro Briggs? Eble li scias pli multon pri sinjoro Rochester ol vi?”

”Briggs estas en Londono; mi dubas pri tio, ĉu li scias ion pri sinjoro Rochester; ne pri sinjoro Rochester li sin interesas. Sed vi forgesas pri la ĉefa afero, dum vi okupas vin kun bagateloj. Vi ne demandas, kial sinjoro Briggs vin serĉas — kion li deziras de vi.”

”Nu, kion li deziras?”

”Sciigi al vi, ke via onklo, sinjoro Eyre en Madejro mortis, ke li postlasis al vi sian tutan posedaĵon, kaj ke vi estas nun riĉa nur tion — nenion plu.”

”Mi!... riĉa?”

”Jes! vi estas riĉa — heredantino!”

Sekvas paŭzo.

”Nature vi devos pruvi vian identecon,” parolis plue sinjoro St. John post longa silentado, ”sed tio estos al vi sufiĉe facila; poste vi povos tuj postuli la ricevon de via posedaĵo. Via posedo troviĝas en angla banko; Briggs havas la testamenton kaj la necesajn dokumentojn.”

Tiel subite ĉio per unu fojo aliĝis! Estas bela afero, kara leganto, esti levata de malriĉeco al riĉeco en unu momento — tre bela afero, sed ĉiuokaze ne afero, kiun oni povas tuj kompreni kaj ĝui. Krom tio estas en la vivo okazoj, kiuj estas multe pli skuantaj aŭ ravaj: nome io firma, io vera sen io ideala; ĉio, kio rilatas tion estas firma kaj taŭga kaj la efiko estas ankaŭ tia. Oni ne kriegas kaj saltadas! oni ne krias brave!

kiam oni subite ekscias, ke oni ricevis havaĵon. Oni komencas pripensi la respondecon kaj la manieron, en kiu plej bone oni prizorgos sian havaĵon, sur la bazo de la kontentiĝo sin levigas gravaj zorgoj, — kaj ni alcentrigas la pensojn kaj cerbumas kun solena graveco pri la ricevita beno.

Krom tio la vortoj heredaĵo kaj morto kun enterigo ĉiam iras unu flanke de alia. Mi estis aŭdinta, ke mia onklo, mia sola parenco, mortis. De la momento, kiam mi aŭdis pri lia ekzisto, mi ankaŭ esperis iam vidi lin; kaj nun ankaŭ tio estis nebla. Fine nur mi sola ricevis tiun grandan havaĵon, ne mi kaj feliĉa familio, nur mi, sole mi! Sendube tiu bonfaro estis grandega, kaj estus agrablege senti min sendependa — jes, tion mi sentis — tiu penso tremigis mian koron pro feliĉego.

”Fine vi ree rigardas supren,” diris sinjoro Rivers, ”mi jam kredis, ke Meduzo rigardis vin kaj ŝangis vin al ŝtono — eble vi ankoraŭ ankaŭ demandos al mi, kiom vi nun valoras?”

”Kiom mi valoras?”

”Ho, bagatelon! Ĝi ne penvaloras esti nomata; nur dudek mil sterlingajn funtojn, mi kredas. Sed kio do estas tio!”

”Dudek mil funtojn?”

Tio estis por mi nova mirego. Mi atendis nur kvar aŭ kvin mil.

Tiu sciigo por momento preskaŭ senspirigis min. Sinjoro St. John, kiun mi ankoraŭ neniam antaŭe aŭdis ridi — sinjoro St. John ridis pro mi!

”Nu,” li diris, ”se vi estus farinta murdon kaj mi dirus al vi, ke via krimo estas malkovrita, tiam vi ne povus aspekti pli konsternita.”

”Tio estas granda monsumo — ĉu vi ne opinias, ke iel oni eraris?”

”Oni tute ne eraris.”

”Eble vi malbone legis la nombron — sendube ĝi estas nur dumil.”

”La sumo estas litere skribita, ne cifere — dudek mil.”

Estis al mi, kiel al individuo, posedanta nur malgrandan gastronoman forton kaj kiu eksidas ĉe tablo plenigita per manĝaĵoj kaj frandaĵoj por cent personoj.

Nun sinjoro Rivers leviĝis kaj surmetis sian mantelon.

”Se la vespero ne estus tiel ventega,” li diris, ”mi sendus al vi Hannah por esti kun vi. Vi aspektas tiel senespere malfeliĉa; oni tial ne restigu vin sola ĉi tie. Sed la kompatindulino ne povas tiel bone iri tra tia neĝblovado kiel mi; ŝiaj kruroj ne estas tiel longaj kiel miaj. Tial mi devas restigi vin sola kun via ĉagreno. Bonan nokton!”

Li ŝovis flanken la riglilon, samtempe subita penso ekregis min.

”Atendu unu minuton,” mi kriis.

”Nu?”

”Mi rompas al mi la kapon, kial sinjoro Briggs skribis al vi pri mi; kaj kiel li povis kredi, ke vi, kiu loĝas en tia izolita loko, havas la povon helpi lin por malkovri mian restadejon.”

”Ho! mi estas pastro,” li diris, ”kaj al ekleziuloj oni ordinare sin direktas en tiaj cirkonstancoj.”

Ree la riglilo tintis.

”Ne, tiu respondo ne kontentigas min!” mi kriis. Kaj vere io trorapida, io malklara sin kaŝis en la respondo kaj tio instigis ankoraŭ pli multe mian scivolon anstataŭ kontentigi ĝin.

”Tio estas stranga historio,” mi diris plue, ”kaj mi devas aŭdi pli multe pri ĝi.”

”Alian fojon.”

”Ne, hodiaŭ vespere! — hodiaŭ vespere!” kaj kiam li estis ironta al la pordo, mi ekstaris inter ĝi kaj li. Li aspektis iom ĝenita.

”Vi ne iros de ĉi tiu loko, antaŭ ol vi diris al mi ĉion!”

”Liberigu min de tio, almenaŭ nun.”

”Vi devas — vi devas!”

”Mi pli volonte dezirus, ke Diana aŭ Maria parolus al vi pri tio.”

Kompreneble liaj kontraŭdiroj ekscitis min ankoraŭ pli multe. Mia deziro ekscii ĉion atingis la plej altan gradon. Ĝi devos esti kontentigata kaj senprokraste. Tion mi diris al li.

”Mi jam antaŭe diris al vi, ke mi estas malmolnuka, obstina viro,” li diris, ”kaj malfacile cedebla.”

”Kaj mi estas obstina virino; — estas neeble ne cedi al mi!”

”Kaj krome,” daŭrigis li, ”mi estas malvarmsanga; neniu pasio tiras min kun si.”

”Kontraŭe mi estas varmegsanga, kaj fajro degeligas glacieron. La lignofajro degeligos ĉiun neĝon sur via mantelo; nun ĝi kuŝas sur la planko, kiu aspektas kiel malpura vojo. Se vi esperas ricevi pardonon por la krimo esti malpuriginta la per sablo priŝutitan plankon de la kuirejo, tiam diru al mi ĉion, kion mi deziras ekscii.

”Nu,” li diris, ”bone; mi cedas, pli multe al via persistemo ol al via seriozeco; same kiel ŝtono estas kavigata de daŭre falantaj akveroj. Krome, vi ja iun tagon devos scii tion — sekve pli bone nun ol poste. Via nomo do estas Jane Eyre?”

”Kompreneble. Pri tio ni ja ne plu bezonas diskuti.”

”Eble vi tamen ne scias, ke mi estas via samnomulo? ke mia baptonomo estas St. John Eyre Rivers?”

”Ne, vere; sed mi rememoras bone, ke mi vidis en la libroj,

kiujn vi pruntedonis al mi, ankaŭ la literon E. ; sed mi ne demandis, en kies loko tiu nomo staras. Sen dubo —”

Mi eksilentis. Mi eĉ ne havis la kuraĝon nutri, pli malmulte esprimi per vortoj la penson, kiu naskiĝis en mi kaj post paso de minuto korpigis kiel forta verŝajno. La cirkonstancoj sin ligis unuj al aliaj, adaptiĝis iuj al aliaj, ordiĝis laŭ vico kaj eroj; la ĉeno, kiu ĝis nun kuŝis antaŭ mi kiel senforma amaso, estis tute distirata — ĉiu ero estis kompleta, la kunigo estis disrompita. Instinkte mi sciis, kiel statis la afero, antaŭ ol estis parolita ankoraŭ unu vorto; sed mi ne povas postuli, ke mia leganto posedu la saman instinktan antaŭsentkpaŭblon, tial mi devas ripeti lian deklaron.

”La nomo de mia patrino estis Eyre; ŝi havis du fratojn; unu estis pastro kaj edziĝis kun fraŭlino Reed de Gateshead; la alia John Eyre Esq., negocisto, mortis antaŭ nelonge en Funchal sur la insulo Madejro. Ĉar sinjoro Briggs estas la advokato de sinjoro Eyre, li la lastan de aŭgusto skribis al ni kaj sciigis al ni la morton de nia onklo; samtempe li sciigis nin pri tio, ke li postlasis sian havaĵon al la filino de sia frato; ni estis senhereditaj pro malpaco inter li kaj mia patro, al kiu li estis neniam pardoninta. Antaŭ kelkaj monatoj sinjoro Briggs ree skribis por sciigi al ni, ke la heredantino estas netrovebla kaj por demandi, ĉu ni scias ion pri ŝi. La nomo, kiun vi eble en momento de distro skribis sur peceto da papero, ebligis al mi malkovri vin. La ceteron vi scias.”

Ree li volis foriri, sed mi stariĝis antaŭ la pordon.

”Lasu min paroli,” mi diris, ”donu al mi momenton por libere spiri kaj pripensi.”

Mi eksilentis — li staris antaŭ mi kun la ĉapelo en la mano kaj aspektis kvieta kaj trankvila.

Mi parolis plue:

”Via patrino estis la fratino de mia patro.”

”Jes.”

”Sekve mia onklino.”

Li kapjesis.

”Mia onklo John estis via onklo John. Vi, Diana kaj Maria estas la infanoj de lia fratino, same kiel mi estas la infano de lia frato ... Ĉu ne?

”Sendube.”

”Vi do estas miaj gekuzoj; la duono de nia sango sekve devenas de la sama fonto!”

”Jes, ni estas gekuzoj.”

Mi rigardis lin. Estis al mi kvazaŭ mi estus trovinta fraton, kaj eĉ tian, pri kiu mi povus fieri kaj kiun mi povus ŝati; kaj du fratinojn, kun tiaj grandaj, noblaj ecoj, ke kiam ili estis al mi nur fremdaj homoj, ili estis inspirintaj al mi grandajn amon kaj admiron. Tiuj du knabinoj, kiujn en tiu vespero, kiam mi genuis sur la malseka tero kaj vidis tra la malalta krad-fenestro de la kuirejo de Moor House, mi estis rigardinta kun intereso kaj malespero, — ili estis miaj plej proksimaj parencoj! Kaj la juna, eleganta viro, kiu estis trovinta min mortantan sur la sojlo de sia domo — li estis ligita al mi per la sango. Kia malkovro por malfeliĉa forlasitino! Tio en vero estis riĉaĵo! — Riĉaĵo por mia koro! — tuta trezorejo de pura kaj natura amo! Tio estis bonfaro ĉiela, pura, klara, reviviganta. Ne kiel peza donaco el oro, kiu siaspece tamen estas sufiĉe bonvena pro sia pezo, tamen ĉiam premas teren. Eks-citita de subita ĝojo, mi kunfrapis la manojn — miaj pulsoj, miaj tempioj bategis.

”Ho, mi estas tiel gaja! — mi estas tiel ĝoja!” mi kriis.

St. John ridetis kaj diris:

”Ĉu mi ne diris, ke vi malzorgas la ĉefaferojn kaj vin okupas kun bagateloj? Vi fariĝis serioza, kiam mi diris al vi, ke vi akiris grandan posedaĵon, kaj nun vi estis ĝoja kaj ekscitita pro afero, kiu estas sensignifa.”

”Kion vi volas diri per tio? Por vi ĝi eble estas sensignifa; vi havas fratinojn kaj malmulte atentis havi kuzinon; sed mi havis neniun, kaj nun subite tri parencoj — aŭ nur du, se estas al vi indiferece esti alkalkulata — plenkreske aperas antaŭ mi. Ho, mi ankoraŭ fojon diras, ke mi estas tiel feliĉa!”

Rapide mi trairis la ĉambron, sed haltis. La pensoj, kiuj venis al mi pli rapide ol mi povis kompreni ilin kaj ordigi, preskaŭ sufokis min, — ili estis la pensoj pri tio, kio eble baldaŭ estiĝos. Mi rigardis la blankan muron; ĝi ŝajnis al mi kiel ĉielo, plene kovrita de hele lumantaj steloj — kaj ĉiu el ili signifis al mi ian feliĉon. Nun mi povus montri bonfaron al tiuj, kiuj estis savintaj mian vivon kaj kiujn mi ĝis nun kapablis repagi nur per mia amo. Ili vivis kvazaŭ sub jugo, mi povus liberigi ilin de ĝi, ili estis disigitaj, mi povus reunuigi ilin, — ili povus ankaŭ ĝui kaj partopreni miajn sendependecon kaj superfluan. Ni estis ja parencoj. Dudek mil funtoj, dividitaj en egalajn partojn, estus por ĉiu kvinmil — pli ol sufiĉe; la justeco devus plenumiĝi, — nia feliĉo estu certigata. Nun la riĉeco ne plu premis min teren, nun ĝi ne estis plu mona heredaĵo — sed heredaĵo de vivo, espero kaj ĝuo!

Mi ne povas diri, kiel mi aspektis, dum tiuj pensoj ekregis min perforte; sed baldaŭ mi rimarkis, ke sinjoro Rivers metis post mi seĝon kaj kviete penis sidigi min sur ĝin. Li konsilis al mi rekonsciiĝi; sed min ekscitis tiu aludo pri miaj senhelpeco kaj eksciteco; mi forpuŝis lian manon de mia ŝultro kaj

ree ekiris tien kaj reen, dirante: "Skribu jam morgaŭ al Diana kaj Maria kaj diru al ili, ke ili tuj revenu hejmen. Diana ofte diris al mi, ke ŝi opinius sin riĉa, se ŝi posedus mil funtojn, sekve per kvin mil funtoj ŝi povus senzorge vivi."

"Diru al mi, ke mi portu al vi glason da akvo," respondis St. John. "Vi vere devas trankviliĝi kaj iom regi viajn sentojn."

"Sensencaĵo! kaj kiajn sekvojn havos por vi tiu heredaĵo? Ĉu ĝi decidigos vin resti en Anglujo kaj edziĝi kun fraŭlino Oliver? Ĉu vi trankvile loĝos ĉi tie, kiel ordinara mortulo?"

"Vi deliras. Viaj pensoj konfuzas vin; mi tro rapide komunikis al vi tiun novaĵon; tio estis tro por viaj fortoj."

"Sinjoro Rivers! Vi vere senpaciencigas min; mi parolas tre saĝe. Sed vi miskomprenas min, aŭ prefere, volas miskompreni min."

"Eble mi pli bone komprenus vin, se vi nur esprimus pli klare viajn pensojn."

"Pli klare! Kion do mi devas pli klare esprimi? Vi komprenos, ke dudek mil funtoj, dividitaj en egalajn partojn inter mia kuzo kaj la tri kuzinoj estos por ĉiu kvin mil funtoj? Kion mi volas, estas, ke vi skribu al viaj fratinoj kaj sciigu al ili pri la havaĵo, kiu estas postlasita al ili."

"Al vi mem ĝi estas postlasita."

"Mi klare diris al vi mian intencon pri tiu afero. Mi ne estas brute egoista, nek blinde maljusta, nek diable sendanka. Krom tio; mi decidis ekloĝi ĉi tie kaj eĉ kun parencoj. Mi amas Moor House, kaj en ĝi mi volas loĝi. Mi amas Dianan kaj Marian kaj ĉe ili mi volas resti mian tutan vivon. Estos al mi beno kaj ĝojo posedi kvin mil funtojn; sed turmentus min kaj premus teren havi dudek mil; kaj krome ili neeble kaj laŭleĝe estas mia sola posedaĵo, kvankam la leĝo aljuĝas ilin al mi. Mi

tial cedas al vi tion, kio al mi estas absolute superflua. Kontraŭstaro kaj diskutado en ĉi tiu afero estas senutilaj. Ni tial tuj interkonsentiĝu kaj decidu.”

”Tio estus agi laŭ la unua impulso, vi bezonas kelkajn tagojn por pripensi la oferon antaŭ ol mi povus akcepti vian intencon kiel akcepteblan.”

”Ho! Se vi nur dubas pri la sincereco kaj la daŭro de mia volo, tiam mi estas kvieta. Ĉu almenaŭ vi vidas la ĝustecon de tiu afero?”

”Jes, ian ĝustecon mi sentas en ĝi; tamen ĝi estas kontraŭa al la kutimo. Krome vi rajte povas akcepti la tutan havaĵon; mia onklo akiris ĝin per siaj propraj penadoj; li rajtis postlasi ĝin laŭ sia bontrovo: li postlasis ĝin al vi. Kaj fine la leĝo konsentas al vi akcepti ĝin. Kun pura konscienco vi povas rigardi ĝin kiel vian.”

”Ankaŭ ĉe mi tio estas afero de konscienco kaj sento,” mi diris. ”Mi devas agi laŭ mia sento. Ĝis nun mi preskaŭ neniam havis la okazon fari tion. Se vi tutan jaron kontraŭagis kaj ĉagrenus min, mi ne rifuzus al mi la feliĉegan ĝojon, kiu en ĉi tiu horo elmontriĝis al mi — nome, repagi parton de peza devo kaj havigi al mi amikojn por mia tuta vivo.”

”Tiel vi pensas nun,” denove parolis St. John, ”ĉar vi ne scias, kion signifas posedi riĉaĵon kaj samtempe tuj ĝoji pro ĝi; vi tute ne komprenas la gravecon, kiun la posedo de dudek mil funtoj havigos al vi; vi ne komprenas la situacion, kiun ĝi donos al vi en la societo; nek la antaŭvidon, kiun vi per ĝi povos malfermi por vi; vi ne povas —

”Kaj vi,” mi interrompis lin, ”ne povas imagi al vi la sopiron, kiun mi sentas al gefrata amo. Neniam mi havis hejmon,

neniam fraton aŭ fratinojn. Mi volas havi ilin kaj mi havos ilin. Ĉu vi sentas malinklinon akcepti min?"

"Jane, mi volas esti al vi frato — miaj fratinoj estos viaj fratinoj — eĉ sen kondiĉoj pri la oferoj viaflanke."

"Ĉu frato? Jes, je distanco de kelkaj miloj da mejloj: Ĉu fratinoj? Jes: kiuj estas kvazaŭ sklavinoj inter fremduloj: Kaj mi estus riĉa! Superŝutita per oro, kiun mi ne perlaboris kaj kiun mi ne meritas: Kaj vi estus malriĉaj: malriĉaj! Jen belega egaleco kaj frateco! Jen vera unuiĝo, kora amo kaj sendependeco!"

"Sed Jane, via sopiro al familiaj ligiloj kaj hejma feliĉo povus ja esti kontentigita en alia maniero ol en tiu, kiun vi intencas! Vi ja povus edziniĝi!"

"Ree sensencaĵo! edziniĝi! Mi ne volas edziniĝi kaj neniam edziniĝos!"

"Jen vi diris tro multe. Tia danĝera certigo estas pruvo de via eksciteco en kiu vi troviĝas."

"Mi ne diris tro multe. Mi scias, kion mi sentas kaj kiel ĉiuj miaj pensoj kontraŭbatalos la nuran penson pri edziniĝo. Neniam mi edziniĝos el amo kaj mi ne dezirus elmeti min al monspekulado. Krom tio, mi ne volus fremdan, al mi malsimpatian homon, kiu tute diferencas de mi. Mi volas havi miajn parencojn, kun kiuj mi povas simpatii. Diru ankoraŭ unu fojon, ke vi volas esti mia frato. Kiam vi diris tiun vorton, mi estas kontenta kaj feliĉa; ripetu tion se vi povas; ripetu tion sincere!"

"Mi kredas, ke mi povas fari tion. Mi scias, ke ĉiam mi amis miajn proprajn fratinojn; kaj mi scias sur kio mia amo al ili estas fondita — sur la estimo de iliaj promesoj, sur la admiro de iliaj ecoj kaj talentoj. Ankaŭ vi posedas principojn kaj

karakteron; viaj gustoj kaj kutimoj similas tiujn de Maria kaj Diana; ilia societo ĉiam estas al mi agrabla; en la interparolado kun vi mi jam longe trovis bonfarantan konsolon. Mi sentas, ke facile mi povas doni al vi lokon en mia koro; vi estas mia tria kaj plej juna fratino.”

”Mi dankas vin! Hodiaŭ vespere tio min kontentigas. Nun iru for; ĉar se vi restos ĉi tie ankoraŭ pli longe, vi eble ekscitus min denove per viaj malfidaj konscienc-riproĉoj.”

”Kaj la lernejo, fraŭlino Eyre? Ĝi supozeble nun estos fermita?”

”Ne; mi plenumos mian oficon kiel instruistino ĝis mi trovis anstataŭanton.”

Li ridetis konsentante. Poste ni premis al ni reciproke la manojn kaj li foriris.

Mi ne bezonas rakonti en ĉiuj detaloj la plurajn batalojn kontraŭ multaj argumentoj, antaŭ ol mi fine tiel estis aranĝinta la heredaĵ-aferon, kiel mi deziris. Mia tasko estis tre malfacila; sed ĉar mi estis firme decidinta kaj ĉar miaj parencoj fine komprenis, ke mi vere intencis efektiviĝi egalan dividon de la heredaĵo — kaj ĉar fine en siaj koroj ili rekonis la justecon de tiu intenco, kaj krome klare konsciis, ke ili mem estus agintaj same al mi — ili finfine tiagrade konsentis, ke la afero estos submetata al arbitracia tribunalo. La elektitaj juĝistoj estis sinjoro Oliver kaj eminenta advokato; ambaŭ voĉdonis laŭ mia ideo. Mi venkis. La dokumentoj de la dividado estis redaktitaj, St. John, Diana, Maria kaj mi ĉiuj akiris sufiĉegan posedaĵon.

## Ĉapitro XXXIV.

**L**a kristnaskofesto jam proksimiĝis, kiam ĉio estis ordigita.

Mi fermis la lernejon de Morton kaj zorgis pri tio, ke mia foriro ne okazu sen donacoj. La feliĉo ja malfermas la manon kaj la koron tre mirinde; kaj doni ion, kiam ni mem ricevis multe, estas nur eksplodo de ekscitiĝo neordinara. Jam longe mi kun ĝojo rimarkis, ke multaj el miaj lernantinoj ŝatas min kaj tio plene kaj forte montriĝis, kiam ni disiĝis. Kiel granda estis mia danko vidante, ke vere mi akiris lokon en iliaj nemalboniĝintaj koroj; mi tial promesis al ili, ke neniam pasos semajno en kiu mi ne vizitos ilin por instrui ilin almenaŭ unu horon en la lernejo.

Sinjoro Rivers venis por fermi la pordon, post kiam la sesdek knabinoj linie preterpasis min. Mi staris kun la ŝlosilo en la mano kaj reiris ankoraŭ kelkajn specialajn adiaŭajn vortojn al seso el miaj plej bonaj lernantinoj; ĉi tiuj estis tiaj dekonduktaj, estimindaj, modestaj kaj bone instruitaj junaj estaĵoj, kiajn eble nenie oni povus trovi en britaj farmovilaĝoj. Kaj tio estas serioza certigo; ĉar vidinte multajn "*paysannes*"<sup>1</sup> kaj "*Bauerinnen*"<sup>2</sup>, mi devas konfesi, ke la brita farmistaro estas plej bone instruita kaj krome la plej dekonduktaj kaj la plej honorinda en tuta Eŭropo.

1 francaj vilaĝaninoj.

2 germanaj vilaĝaninoj.

”Ĉu vi rigardas vin kompensita por multaj monatoj da peno kaj streĉado?” demandis sinjoro Rivers, kiam ili estis foririntaj. ”Ĉu la konscio, ke vi bone uzis vian tempon kaj vi faris bonon al tiuj knabinoj kaŭzas al vi veran ĝojon?”

”Sendube.”

”Tamen vi nur malmultajn monatojn plenumis malfacilan laboron! Ĉu tuta vivo dediĉita al la plibonigo de la homaro, ne estus bone uzita vivo?”

”Jes,” mi diris. ”Sed mi ne povus ĉiam vivi en tiu maniero. Same volonte mi volas ĝoji pro miaj propraj talentoj kaj kapabloj, kiel por disvastigi tiujn de miaj proksimuloj. Kaj eĉ nun mi devas ĝoji pro miaj; ne ree konduku miajn animon kaj korpon en la lernejon; ĝi nun kuŝas post mi kaj mi bezonas longan libertempon.”

Li aspektis tre serioza.

”Kion signifas tio? Kio estas tiu subita aspiro al distrado? Kion vi intencas fari?”

”Mi volas esti agema, kiel eble plej agema. Kaj precipe mi devas peti vin serĉi anstataŭanton por Hannah.”

”Ĉu vi bezonos ŝin?”

”Jes, ŝi devas iri kun mi al Moor House. Post semajno Diana kaj Maria estos hejme, kaj ĉe sia alveno ili trovos ĉion en plej bela ordo.”

”Mi komprenas. Mi kredas, ke vi intencas fari ekskurseton. Bone, Hannah akompanos vin.”

”Tial diru al ŝi, ke ŝi morgaŭ estu preta. Jen akceptu la ŝlosilon de la lerneja ĉambro. Morgaŭ frue mi donos al vi la ŝlosilon de mia dometo.”

Li akceptis ĝin.

”Vi tre ĝoje transdonas ĝin,” li diris. ”Via facilanimeco ŝaj-

nas al mi iom nekomprenebla, ĉar mi ne scias, kiujn okupojn vi elektis anstataŭ tiuj, kiujn vi forlasas, kaj kiujn celon, intencan kaj ambicion vi havas.”

”Mia unua intenco estas purigi Moor House de la kelo ĝis la tegmento; ĉu vi komprenas la grandan signifon de tiu esprimo? Poste ni devos froti ĝin per vakso kaj oleo, per nedifinita aro da tukoj ĝis ĉio brilegas; trie aranĝi ĉiun tablon, ĉiun seĝon, ĉiun liton, ĉiun tapiŝon kun matematika precizeco; kvare mi preskaŭ ruinigos vin per nekalkuleblaj amasoj da torfoj kaj bruloligno, por ke mi povu nutri en ĉiu ĉambro ardantan fajron; kaj fine la lastaj du tagoj antaŭ la alveno de viaj fratinoj estos dediĉataj de mi kaj Hannah al pretigado de batmiksitaĵoj, elektado de sekvinberoj, rostado de spicaĵoj, bakado de kristnaskfestaj kukoj, tranĉado de viando kaj alia kulinara laboro, pri kiu neensekretigitaj kiel vi komprenas nenion. Malmultvorte, mia intenco estas antaŭ la proksimiĝanta ĵaŭdo pretigi ĉion por la ricevo de Diana kaj Maria; mia ambicio konsistas en tio, ke mi oferu al ili idealan bonvenon.”

St. John ridetis preskaŭ nerimarkeble. Sed li ne estis ankoraŭ tute kontenta.

Tio por la momento estas tre bela,” li diris, ”sed rilate al la estonteco mi esperas kaj fidus, ke vi fiksos iom pli alten vian rigardon ol sur domaj ĝojoj kaj plibeligoj, kiam la unuaj ĝojoj kaj ekscito estos pasintaj.”

”Ho, ili estas la plej bonaj aferoj, kiujn la vivo al ni prezentas!” mi lin interrompis.

”Ne Jane, ne! Ĉi tiu mondo ne estas loko de ĝuoj; ne penu fari tion el ĝi; nek fari el ĝi lokon de ripozo: ne fariĝu mallaborema.

”Kontraŭe! Mi intencas esti tre laborema!”

”Jane, por ĉi tiu momento mi pardonas vin ankoraŭ; mi donas al vi du monatojn por ĝui vian novan vivostaton; du monatojn vi povos plene ĝui la ĉarmon de ĉi tiu nove malkovrita parenceco; sed poste mi esperas, ke vi levu vian rigardon super Moor House kaj Morton; vi celu kaj aspiru pli ol la societon de la fratinoj, pli ol la egoistan ripozon kaj volupteman plaĉon de la civilizita superfiuo. Mi esperas, ke la forto de via energio tiam ne lasos vin kvieta.”

Mirigite mi rigardis lin.

”St. John,” mi diris fine, ”estas preskaŭ malpie tiel paroli! Mi intencis esti feliĉa kaj kontenta kiel reĝino, kaj jen vi klopodas vekti en mi denove la senripozecon de antaŭe! Kiacele?”

”Kun la celo inciti vin apliki la talentojn, kiujn Dio donacis al vi kaj pri kio iam vi devos doni respondecon. Jane, mi daŭre atentis vin, tion mi jam antaŭe diras al vi. Klopodu subpremi la fortegan ardon, kun kiu vi ĵetas vin sur ĉiajn bagatelojn. Ne tiom kroĉiĝu al la aferoj de la karno. Ĉu vi komprenas min, Jane?”

”Jes, same bone kiel mi komprenus vin se vi parolus greke. Mi sentas, ke mi havas multajn tialojn por esti feliĉa, kaj feliĉa mi volas esti. Adiaŭ!”

Mi estis tre feliĉa en Moor House, kaj mi multege laboris, same kiel Hannah. Ŝi estis ravita vidante, kiel afabla mi povas esti, eĉ meze de la malordo en purigata domo. Kiam ĉio estis preta, mi trovis Moor House tre hejmeca.

La grava jaŭdo fine proksimiĝis. Ni atendis Marian kaj Dianan je krepuskiĝo kaj jam antaŭ tiu tempo ni bruligis la fajron supre kaj malsupre en la domo. La kuirejo aspektis tre ordigita. Hannah kaj mi estis jam vestitaj kaj ĉio preta.

Kiel unua venis St. John. Mi estis petinta lin ne alveni antaŭ ol ĉio estos preta. Li trovis min en la kuirejo, dum mi bakis kuketojn por la teo.

Alproksimiĝante al la forno li demandis, ĉu mi bone sukcesis pri la servistina laboro. Mi respondis al li invitante lin trairi kun mi la domon por vidi la rezulton de mia laboro. Kun peno mi decidigis lin fari tion. Li ĵetis nur rapidan rigardon en la ĉambrojn, kiujn mi malfermis al li kaj irinte de supren malsupren, li diris, ke sendube mi havis multan penon arangi ĉion en tiel mallonga tempo, sed ne per unu vorto li sciigis, ke la plibonigo plaĉas al li.

Tiu silentado iom malpliigis mian ĝojon, tion mi devas konfesi ... Mi pensis, ke la ŝango en la domo vekus ĉe li malnovajn rememorojn, kaj tion mi demandis iom senkuraĝiĝinte.

”Ho ne, tute ne;” li kontraŭe estis rimarkinta, ke mi respektis ĉiun rememoron. Li eĉ timis, ke mi dediĉis al tio pli multe da tempo ol penvaloras. Ekzemple, kiom da tempo mi bezonis por bone aranĝi ĉion en ĉi tiu ĉambro? — ”Cetere, ĉu vi povas diri al mi, kie estas tiu libro?”

Mi montris ĝin al li sur la librobreto: li ĝin prenis, kaj retirinte sin al sia kutima loko ĉe la fenestro, li eklegis.

Nu, mia kara leganta, tio ne plaĉis al mi. St. John estis bona viro; sed nun mi spertis, ke li diris la veron pri si mem, dirante, ke li estas maldolĉa kaj malvarma. La humaneco kaj la ĉarmo de la vivo ne tuŝis lin, ne altiris lin. Vere, li vivis nur por celi tion, kio estas bona kaj granda, sed li ne konis ripozon, ne volis ĝin; ankaŭ li ne aprobis ĝin al tiuj, kiuj ĉirkaŭis lin. Rigardante malsupren al lia alta frunto, kiu estis senmova kaj pala kiel tombŝtono — al liaj belaj trajtoj, kiuj per longa stu-

dado fariĝis rigidaj kaj severaj, mi subite komprenis, ke li neniam povus esti bona edzo, ke estus malfacila tasko esti lia edzino. Kvazaŭ de subita sento mi komprenis lian amon al fraŭlino Oliver; mi samopiniis kun li, ke ĝi estis nur amo de la sentoj. Mi komprenis, kiel li malestimus sin mem pro la febra influo, kiun ĝi efikis je li, kiel li devos deziri sufoki tiun amon, kiel li devos dubi pri tio, ke ĝi nen iam kondukos al ilia daŭra feliĉo. Mi vidis, ke li estas el tiu materio, el kiu la naturo kreas siajn heroojn — kristanajn same kiel idolanajn — siajn leĝdonantojn, politikistojn, konkerantojn; firman fortikaĵon, sur kiu oni en grandaj epokoj povus fidi pro grandaj intereso! Sed kiu apud la hejma kameno estas nur tro ofte peza, malvarma kolono, malĝojiga kaj mislokita!

”Ĉi tiu familia ĉambro ne estas lia amata sfero,” mi pensis, ”la himalaja montaro, la arbaretoj de la kafroj, eĉ la pestvizitata, malbeninda marbordo de Gvineo estus pli taŭga por li. Li abomenas ripozon en la familia rondo, ĉar ĝi ne estas lia elemento; ĉi tie liaj grandaj kapabloj ne disvolviĝas kaj ne povas bone elmontriĝi. En bataladoj kaj danĝero, kie kuraĝo estas bezonata kaj energio estas ekzercata kaj kie la forto povas esti hardita — tie li parolos kaj agos kiel ĉefo, kiel kondukisto! Apud ĉi tiu kameno tamen ĝojema infano venkobatus lin. Li prave elektis la oficon de misiisto — nun mi tion komprenas!”

”Ili venas! ili venas!” kriis Hannah larĝe malfermante la pordon de la familia ĉambro. En la sama momento la maljuna Karlo ĝoje ekbojis. Mi kuris eksteren. Estis jam mallume, sed klare mi aŭdis la rulbruon de la radoj. Hannah rapide bruligis lanternon. La veturilo haltis antaŭ la kradpordego. La veturigisto malfermis la veturilpordeton; unua eliris bone kona-

ta figuro, poste la dua. Sammomente mia vizaĝo estis sub iliaj ĉapeloj, unue mi kontaktiĝis je la palaj vangoj de Maria, poste je la harbukloj de Diana.

Ili ridis, kisis min — poste Hannah; ili karesis Karlon, kiu preskaŭ sovaĝiĝis pro ĝojo, ili demandis ĉu ĉio estas en ordo, kaj rapidis en la domon, kiam mi prijesis iliajn demandojn.

Ili preskaŭ malsaniĝis pro la longa vojaĝo en la veturilo kaj pro la malbona vojo de Whitcross; iliaj membroj preskaŭ rigidiĝis pro la malvarmega nokta aero; sed iom post iom iliaj vizaĝoj malrigidiĝis antaŭ la ĝoje flagranta fajro de la kamento. Dum la veturigisto kaj Hannah enportis la kofrojn, la fratinoj informiĝis pri St. John. Sammomente li eliris la familian ĉambron. Ambaŭ fratinoj ĉirkaŭbrakis lin. Al ĉiu li donis kvietan kison, diris kelkajn vortojn de bonveno, lasis paroli al si mallongan tempon kaj retiriĝis denove en la familian ĉambron kiel en sian rifugejon, post kiam li diris al la fratinoj, ke ili ja baldaŭ ankaŭ iros tien.

Mi estis bruliginta la kandelojn por konduki ambaŭ supren, sed antaŭe Diana intencis direkti gastamajn ordonojn al la veturigisto; post kiam ili estis plenumitaj, ambaŭ sekvis min. Ili estis ravitaj pro la novaĵoj kaj ornamaĵoj de siaj ĉambroj. Ĝojege ili parolis pri la novaj fenestro-kurtenoj, pri la freŝaj tapiŝoj kaj la riĉe pentritaj porcelanaj vazoj. Mi sentis kontentiĝon, ke miaj aranĝoj tute harmoniis kun iliaj gustoj, kaj ke ĉio, kion mi estis farinta kontribuis al la granda ĉarmo de ilia ĝoja rehejmiĝo.

La vespero estis belega. Miaj kuzinoj en sia ĝoja kaj ekscitita agordo estis tiel elokventaj pri siaj sciigoj kaj informiĝoj, ke la silentemo de St. John per ili estis tute kovrita; li estis sincere ĝoja revidi siajn fratinojn, sed li ne povis simpatii kun

iliaj brua ĝojo kaj parolemo. La okazantaĵo de la tago — nome la rehejmiĝo de Diana kaj Maria ĝojigis lin; sed la sekvo de ĉio tio, la tumulto, la multparola ĝojo — malĝojigis lin. Mi vidis je li, kiel li aspiris la pli trankvilan morgaŭon. Kiam la plej alta grado de feliĉego estis atingita, ĉirkaŭ unu horon post la tetrinkado, ni subite aŭdis, ke iu frapas al la pordo. Hannah eniris kun la sciigo, ke malriĉa knabo venis en ĉi tiu nekutima horo por peti sinjoron Rivers tuj iri al lia malsana patri-no, kiu estis mortonta.

”Kie ŝi loĝas, Hannah?”

”Tute malsupre en Whitcross Brow, preskaŭ kvar mejlojn de tie ĉi; kaj la tuta vojo konsistas nur el marĉoj.

”Estas pli bone ne iri tien, sinjoro, la vojo estas neirebla, en la nokto ĝi estas eĉ danĝera pro la marĉoj. Krome la nokto estas tiel malvarma; la vento estas pli akra ol iam. Mi ja povas diri, sinjoro, ke vi venos morgaŭ jam tre frumatene.”

Sed li estis jam en la koridoro kaj surmetis la mantelon, li iris sen grumbloj, sen kontraŭstaro. Estis nun la naŭa horo, li sekve ne revenos antaŭ noktomezo. Revenante li estis malsata kaj ĝismorte laca; sed li aspektis pli feliĉa kaj pli kontenta ol antaŭe. Li estis plenuminta devon, li estis kontraŭbatalinta grandan penon kaj elprovinta siajn energion kaj abnegacion — sufiĉe, li estis pli kontenta pri si mem.

Mi timis, ke la tuta sekvonta semajno provos lian paciencon. Estis la semajno de kristnasko; neniue el ni komencis specialan laboron, sed ni pasigis la tempon en ĝojo kaj hejma senzorgeco. La aero de la marĉo, la libereco de propra hejmo, la matenruĝo de feliĉo de la sendependeco: ĉio tio efikis je Diana kaj Maria kiel viviganta eliksiro; ili estis gajaj de mateno ĝis tagmezo, de tagmezo ĝis vespero. Ili senhalte povis

babeladi; kaj ilia sprita, proprece kerna konversacio havis por mi tiel grandan ĉarmon, ke mi pli volonte partoprenis en ĝi aŭ aŭskultis ĝin, ol ĉiun alian amuzaĵon.

St. John ne malaprobis nian viglecon, sed evitis ĝin per foriro; nur malofte li estis hejme; lia preĝeja komunumo estis vasta, la komunumanoj loĝis dise, kaj lia taga tasko devigis lin viziti la malsanulojn en la malsamaj distriktoj.

Iun matenon ĉe la matenmanĝo Diana demandis lin, ĉu liaj planoj ankoraŭ ĉiam estas samaj.

”Ĉiam samaj kaj neŝanĝotaj,” li respondis. Kaj li sciigis al ni, ke lia forvojaĝo estas fiksita por la sekvonta jaro.

”Kaj Rosamond Oliver?” demandis Maria. Ŝi demandis tion senvole; ĉar apenaŭ ŝi estis eliginta la demandon, ŝi faris movon kvazaŭ ŝi dezirus repreni ĝin.

St. John havis libron en la mano, — li havis la malhejmeccan kutimon legi dum la manĝoj — li fermis ĝin kaj rigardis antaŭ si, respondante:

”Rosamond Oliver baldaŭ edziniĝos kun unu el la plej estimindaj kaj eminentaj loĝantoj de S..., nome kun la nepo kaj heredonto de sinjoro Frederic Granby. Hieraŭ ŝia patro sciigis tion al mi.”

Liaj fratinoj rigardis sin reciproke, poste min; ni ĉiuj rigardis lin. Li estis kvieta kiel marmoro.

”Tiu geedziĝo okazos neatendite kaj rapide,” diris Diana, ”ili konas unu la alian nur tre mallonge.”

”Nur du monatojn. En oktobro ili konatiĝis unu kun la alia dum balo en S... Ĉiu prokrasto estas nenecesa, ĉar neniu malhelpo sin prezentas, kaj la geedziĝo ŝajnas esti dezirinda ĉiurilate. Ili geedziĝos tuj kiam la kastelo R, kiun sinjoro Frederic cedos al ili, estos preta por ilia akcepto.”

Kiam post tiu sciigo, mi por la unua fojo revidis St. John, mi tre deziris demandi lin, ĉu tiu okazontaĵo faris lin malfeliĉa. Sed li ŝajnis tiel malmulte bezoni tiun simpatipruvon, ke mi ne diris mian demandon, sed kontraŭe mi sentis honton pro la jam antaŭe al li montrita kompatato. Krome mi estis tute malkutimiĝinta interparoli kun li; denove lia retenemo estis tute frosta kaj mia malkaŝemo kuŝis sub ĝi rigida. Li ne estis teninta sian promeson trakti min kiel sian fratinon; ĉiam li montris inter ni malgrandajn malvarmetajn distingojn, kiuj tute ne kontribuis al disvolviĝo de koreco. Mallonge dirite, post kiam li rekonis min kiel sian parencinon kaj loĝis kun mi en la sama domo, mi sentis, ke la distanco inter ni fariĝis pli granda, ol kiam li konis min kiel la instruistino de la vilaĝlernejo. Memorante lian antaŭan intimecon, mi ne povis kompreni lian retenemon.

Ĉar tio estis fakto, mi sentis grandan miron, kiam subite li levis la kapon super la pupitro antaŭ kiu li sidis kliniĝinta, kaj diris:

”Vi vidas, Jane, ke la batalo estas finita kaj venkita.”

Mirigite, ke li tiel subite alparolis min, mi ne povis tuj respondi.

Post mallonga hezito, mi respondis:

”Ĉu vi certe scias, ke ne okazos al vi kiel al konkerinto, kies venko estis tro multekoste akirita? Ĉu dua tia venko ne estus via pereco?”

”Mi kredas ke ne. Kaj se vere tio okazus al mi — kion tio signifus? Neniam mi trafos en la okazon batali tiel la duan fojon. Ĉi tiu konflikto decidis. Nun mia vojo kuŝas klara antaŭ mi. Mi dankas Dion pro tio!”

Dirinte tion, li ree dronis en sia silentado kaj sin okupis kun siaj paperaĵoj.

Kiam nia reciproka feliĉo (nome tiu de Diana, Maria kaj mi mem) ricevis pli kvietan karakteron, kaj kiam ni rekomencis niajn antaŭajn kutimojn kaj regulajn studadojn, sinjoro St. John estis pli ofte hejme; kelkfoje li estis eĉ horojn ĉe ni en la ĉambro. Dum Maria desegnis, Diana sin okupis per legado de enciklopedio, kiun ŝi je mia granda miro trastudis, kaj mi rompis al mi la kapon per la germana lingvo, li cerbumis super ia mistika scienco; mi kredas, ke ĝi estis orienta lingvo, kies studo ŝajnis al li necesa por la plenumo de liaj planoj.

Kiam li, tiel droninta en siaj studoj, sidis ĉe la kutima fenestro, li ŝajnis esti tre kvieta; sed liaj bluaj okuloj havis proprecan kutimon leviĝi de la fremda gramatiko; ili tiam ŝvebis super ni, siaj samstudantinoj, kaj ofte restis super ni kelkan tempon kvazaŭ por fikse ekzameni nin; sed se ni renkontis lian rigardon, tiam same subite ĝi returnis sin al la gramatiko; tamen ĉiam denove ili sin direktis al nia tablo. Mirigite mi demandis al mi, kion tio signifas. Ankaŭ min mirigis la regula kontenteco, kiun li ĉiam montris ĉe la sama okazo, nome ĉe mia ĉiusemajna vizito al la lernejo de Morton, kvankam ĝi ŝajnis al mi tre malgrava. Sed tiu regula kontenteco pligrandigis mian miron, kiam la vetero estis malbona, aŭ kiam neĝis, pluvis aŭ ventegis, kaj kiam liaj fratinoj petegis min resti hejme, ke li ĉiam kaj neŝanĝeble mokis ilian antaŭzorgemon kaj instigis min sen indulgo kontraŭstari la elementojn.

”Jane ne estas la senenergiulino, kiun vi volas fari ŝin,” li tiam kutimis diri; ”ŝi povas elteni montaran venton kaj pluvegon aŭ kelkajn neĝflokojn same bone kiel iu ajn el ni. Ŝia

korpostato estas ne nur sana, sed ankaŭ elasta kaj eltenas la ŝanĝojn de klimato pli bone ol multaj fortikuloj.”

Kaj kiam mi poste revenis hejmen, ofte tre laca kaj turmentita de la vento aŭ malbona vetero, tiam mi ne kuraĝis plendi, vidante, ke li ekkolerus pro mia plendado. Fortikeco ĉiam plaĉis al li; la malo ĉagrenis lin.

Unu posttagmezon li tamen konsilis al mi resti hejme, ĉar mi tre malvarmumis. Liaj fratinoj en mia loko estis irintaj al Morton. Mi sidis kaj legis en Schiller, kaj li estis klinita super sia orienta gramatiko, kies hieroglifojn li penis deĉifri. Kiam mi metis flanken mian tradukon kaj komencis skribekzercon, mi okaze rigardis lin kaj rimarkis, ke la gardemaj bluaj okuloj ree estas direktataj sur min. Mi ne povas diri, kiel longe ili jam traboris min kaj ekzamenis min de la kapo al la piedoj; ili estis tiel akraj kaj tamen tiel malvarmaj, ke sento de superstiĉo min ekregis — estis al mi kvazaŭ mi estas en ĉambro de monstro.

”Jane, kion vi faras?”

”Mi studas la germanan.”

”Mi dezirus, ke vi anstataŭ la germanan studus la hindostanan.”

”Jen vi ja ne estas serioza.”

”Tiel serioza, ke tio okazu; kaj mi diros al vi kial.”

Tiam li klarigis al mi, ke ĝi estas la lingvo, kiun li estas studanta; ke li tamen jam forgesis pri la komencaj elementoj post kiam li enpenetris pli funden en la lingvon; ke estus al li tre utile, se li havus lernantinn, kun kiu li ĉiam denove povus ripeti la elementojn, por ke ili en tiu maniero pli bone restu en lia memoro; ke li jam kelkan tempon hezitis, kiun li elektos kiel sian lernantinon: min aŭ siajn fratinojn, ke li fine

elektis min, rimarkante, ke el la trio mi pli longe eltenus ian laboron kaj li finis per la demando: "Ĉu vi volas fari al mi tiun servon? Eble vi ne bezonus longe montri tiun oferon, ĉar pasos nur tri monatoj inter nun kaj mia forvojaĝo."

St. John ne estis viro, al kiu oni facile povis rifuzi peton, ĉar ĉiu impresio — ĉu ĝoja, ĉu malĝoja — estis al li daŭra kaj tre profunda. Tial mi konsentis. Kiam Diana kaj Maria revenis hejmen, la unue nomita trovis sian lernantinon transirinta al ŝia frato. Ŝi ridis kaj ŝi same kiel Maria samopiniis, ke St. John neniam povus decidigi ilin fari ion tian.

Li respondis kviete: "Tion mi scias."

Mi trovis en li tre paciencon, indulgan, tamen severan mastron, li atendis de mi grandan diligentecon; kaj kiam mi plenumis lian atendon, li en sia propreca maniero plene konigis al mi sian kontentecon. Iom post iom li akiris super mi ian influon, kiu rabis al mi la liberecon pri miaj pensoj kaj volo. Liaj atentoj kaj laŭdoj pli multe efikis je mi ol lia indiferenteco. Mi ne povis plu senĝene ridi kaj paroli, kiam li ĉeestis, ĉar tede ĝenanta instinkto igis senti, ke ĉio vivoplena (almenaŭ ĉe mi) estas al li malagrabla. Mi sciis bone, ke li ŝatas nur seriozan animstaton kaj okupiĝon, ke estas al mi vane klopedi ion kontraŭan en lia ĉeesto. Min regis kvazaŭ glacia sorĉo. Kiam li diris: "Iru", tiam mi iris. Kiam li diris: "Venu", tiam mi venis. "Faru tion", tiam mi obeis. Sed mi ne amis tiun sklaveccon. Eĉ mi ofte dezirus tutkore, ke li estus daŭriginta tute min ne atenti.

Iun vesperon, kiam liaj fratinoj kaj mi estis irontaj por dormi, li kisis ambaŭ laŭ sia kutimo; al mi ankaŭ laŭkutime li etendis la manon. Diana, okaze estante en la plej petola hum-

oro (ŝi tute ne submetis sin al lia volo kiel mi, ĉar ŝia volo en kontraŭa direkto estis same forta kiel lia) ekkriis:

”St. John! vi kutimas nomi Jane via tria fratino, sed vi ne pritraktas ŝin kiel tian; vi ankaŭ ŝin kisu!”

Ŝi puŝis min al li. Mi opiniis Dianan tre enuiga kaj estis malagrabla konfuzita. Kaj dum mi sentis tion, St. John klinis la kapon, lia greka vizaĝo estis tuŝonta mian, liaj okuloj serĉis miajn — li kisis min. Reale ne ekzistas marmoraj aŭ glaciaj kisoj, alie mi dirus, ke la kareso de mia spirita nevo apartenus al unu el tiuj specoj, sed eble ekzistas eksperimentkisoj — kaj lia estis eksperimentkiso. Doninte ĝin al mi li rigardis min por ekzameni la efikon; ĝi ne estis tre frapanta; tre certe mi ne ruĝiĝis; eble mi iom paliĝis, ĉar mi sentis tiun kison kiel sigelon sur miaj katenoj. Poste li neniam plu preterlasis tiun ceremonion, kaj la seriozeco kaj submetiĝo, kun kiuj mi submetiĝis al ĝi, ŝajne por li aldonis al ĝi ian ĉarmon.

Rilate al mi, ĉiutage mi deziris pli kaj pli kontentigi lin. Sed por fari tion, mi sentis ankaŭ ĉiutage pli kaj pli, ke mi devas malkonfesi pli ol la duonon de mia karaktero, subpremi miajn emojn, puŝi miajn dezirojn perforte el iliaj originalaj direktoj, kaj devigi min al okupoj kaj amuzaĵoj, por kiuj mi laŭkaraktere trovis en mi neniun inklinon. Li volis levi min ĝis ia alto, ĝis kiu mi ne povis leviĝi; ĉiuhore mi ellaciĝis atingi nivelon, kiun li tiel neatingeble alte estis metinta. Kaj tio estis same neebla kiel klopodi ŝanĝi miajn malregulajn vizaĝtrajtojn laŭ lia klasika specimeno, doni al miaj ŝanĝeble verdaj okuloj la marbluan koloron kaj solenan pompon de liaj.

Tamen ne nur lia supera influo min katenis por tiu momento. Dum kelka tempo ne nur mi aspektis malgaje, sed eĉ

konsumanta ĉagreno mordetis mian koron kaj sufokis mian feliĉon jam ĉe ĝia fonto — la ĉagreno pri necerteco kaj dubo.

Eble, mia leganto, vi kredas, ke mi forgesis pri sinjoro Rochester, — post kiam ŝanĝiĝis mia sorto kaj aliĝis mia ĉirkaŭaĵo. Eĉ ne unu momenton mi forgesis pri li. Mia memoro al li restis tia sama; ĉar ne estis nebulo, kiu povis forpeli helan sunbrilon, ĝi ne estis bildo desegnita en la sablo kaj kiu povis esti forblovata de ventego. Ĝi estis nomo, kiu per bronza grifelo estis skribita sur tablo, kiu daŭros same longe kiel la marmoro, kaj kiu portis liajn trajtojn. Ĉie min sekvis la sopiro ekscii, kio el li estis fariĝinta. Kiam mi estis ankoraŭ en Morton, mi ĉiuvespere eniris mian loĝejon por pensi pri tio, kaj nun en Moor House mi ĉiuvespere eniris mian ĉambron por nutri tiun penson la tutan nokton.

Dum mia necesa korespondado kun sinjoro Briggs pri la testamento, mi estis demandinta, ĉu eble li scias ion pri la sanstato kaj la restadejo de sinjoro Rochester; sed kiel St. John jam konjektis, Briggs sciis nenion pri ĉio, rilatanta sinjoron Rochester. Poste mi skribis al sinjorino Fairfax petegante ŝin informi min pri tio. Kun certeco mi atendis atingi per tio mian celon; mi estis konvinkita ricevi tujan respondon. Mi tial estis mirigita, kiam en la daŭro de du semajnoj neniu sciigo venis, sed post paso de du monatoj, en kiuj la poŝtisto ĉiutage venis, ne portante al mi eĉ unu leteron, min ekregis morta angoro.

Mi skribis ankoraŭ unu fojon, estis ja eble, ke mia unua letero iel perdiĝis. Post nova klopodo sekvis nova espero, kiel antaŭe ĝi lumis kelkajn semajnojn, poste ĝi flagretis ankoraŭ kelkajn fojojn kaj fine tute estingiĝis. Eĉ ne unu linion mi ricevis, eĉ ne unu vorton! Kiam pasis duona jaro en vana

atendado, formortis en mi ĉiu espero, kaj ĉirkaŭ mi estiĝis mallumo.

Ĉirkaŭe floris ĉarma printempo; min ĝi ne ĝojigis. La somero alproksimiĝis. Diana faris sian eblon por ĝojigi min; ŝi diris, ke mi aspektas malsana kaj proponis, ke ŝi akompanu min al la marbordo. St. John kontraŭstaris, dirante, ke mi ne bezonas distriĝon, ke mia nuna vivo havas celon; kaj tian celon mi ĝuste kaj nepre bezonas. Supozeble por plenigi miajn devomankojn, li plilongigis miajn studhorojn en la hindostana lingvo kaj iĝis ankoraŭ pli instiganta rilate al mia perfektigado en tiu lingvo. Kaj mi — malsaĝulino — eĉ ne pensis, ke mi kontraŭdiru lin — mi ne povis kontraŭstari lin.

Iun tagon mi estis ankoraŭ pli malĝoja dum la leciono, tion kaŭzis granda senluziigo. Hannah estis dirinta al mi en la mateno, ke venis por mi letero kaj kiam mi malsupreniris por akcepti ĝin, preskaŭ certa, ke fine la tiel longe aspiritaj sciigoj atingis min, mi trovis nur tre malgravan aferleteron de sinjoro Briggs. La forta bato elpremis larmojn el miaj okuloj kaj dum mi sidis kurbiĝinta super la nekompreneblaj literoj kaj la florea stilo de hinda verkisto, miaj okuloj denove pleniĝis de larmoj.

St. John vokis min al sia flanko por legi; kiam mi penis fari tion, mia voĉo min forlasis, singultoj sufokis miajn vortojn. Ni estis duope en la ĉambro. Diana sin okupis pri sia muziko en la familia ĉambro, Maria laboris en la ĝardeno. Estis ĉarma, klara, sunplena, ĝojiga tago en majo. Mia kunulo tute ne montris miregon pro mia animstato kaj eĉ ne informiĝis pri ĝia kaŭzo. Li diris nur:

”Jane, ni atentos kelkajn minutojn ĝis vi regis vin.”

Dum mi kiel eble plej rapide klopodis subpremi mian emo-

cion, li kviete kaj pacience restis sidanta, klinita super sia pupitro kiel kuracisto, kiu per la okulo de la scienco atendis la jam longe atenditan, plene klarigitan krizon en la malsano de paciento. Kiam mi ĉesis singulti kaj sekigis miajn okulojn kaj iom murmuris, ke tiun matenon mi sentis min malsaneta, mi denove komencis mian laboron kaj klopodis fini ĝin.

Poste St. John metis flanken miajn librojn, fermis sian pupitron kaj diris:

”Jane, vi nun faru promenon kaj eĉ kun mi.”

”Mi vokos Dianan kaj Marian.”

”Ne. Ĉi tiun matenon mi bezonas nur unu akompananton, kaj tio estu vi. Vestu vin, eliru tra la kuireja pordo, eniru la vojon al Marsh Glen\*, post malmultaj momentoj mi estos apud vi.”

Kompromison mi ne konis. Neniam en mia vivo, kiam mi devis agi kontraŭ firmaj karakteroj, kiuj staris malflekseblaj antaŭ mi, mi konis mezvojon inter plena submeto kaj obstina kontraŭstaro. Mi ĉiam rimarkis kiel la unua, kelkfoje kun vulkana fortegeco transiris en la duan; kaj ĉar en tiu momento neni el la cirkonstancoj, kaj ankaŭ ne mia animstato estis klinita al kontraŭstaro, mi sekvis obee la ordonojn de St. John kaj en dek minutoj mi malsupreniris la preskaŭ neireblan vojon al la ravino ĉe lia flanko.

La vento venis el la okcidento kaj trans la montetojn, ĝi estis plena deodoro de erikejo kaj kanoj; la ĉielo estis senmakule blua kaj la rivereto, rapidanta tra la ravino kaj alta pro la multaj pluvadoj de la pasinta printempo, klare fluis preternin kaj kaptis la sunradiojn, respegulante ilin. Daŭrigante nian vojon kaj forlasinte la vojeton, ni venis sur delikatan,

\* Glen = krutvalo aŭ ravino

muskan, smeralde verdan grundon, sur kiu floris tie kaj alie blankaj kaj stelformaj flavaj floroj. Ni estis nun tute ĉirkaŭitaj de montetoj, ĉar ĝis iliaj suproj la ravino sin etendis.

”Ĉi tie ni volas ripozi,” diris St. John, kiam ni atingis la unuajn postrestintojn de tuta aro da ŝtonegoj, kiuj protektis iaspecan vojeton, al kies alia ekstremo la rivereto formis profundan akvofalon kaj kie kelkajn metrojn pli for la monto estis senigita de monto-musko kaj floroj kaj kie floris nur erikoj; tie el la romantiko fariĝis sovaĝejo kaj mallumo el la freŝeco — tie regis nur soleco kaj malĝoja paco.

Mi sidiĝis; St. John staris ĉe mia flanko. Li rigardis supren al la intermonto kaj malsupren en la ravinon; liaj rigardoj ŝvebis for kun la rivereto kaj returniĝis por vagi trans la sennuban ĉielon, kiu donis al la akvo ĝian koloron. Poste li demetis sian ĉapelon por ke la vento ludu per liaj haroj kaj kisu lian frunton. Li ŝajnis havi kontakton kun la spirito de ĉi tiu soleca kaŝejo: liaj okuloj kvazaŭ diris adiaŭ al iu estaĵo.

”Mi revidos ĝin,” li laŭte diris, ”en songo, kiam mi dormos ĉe la bordo de Gango; kaj tiam — en pli malfrua horo — kiam alia dormo min regos — ĉe la bordo de pli malhela rivero.”

Strangaj vortoj de stranga amo! Ili estis la pasio de severa patrioto al lia patrujo! Li sidiĝis. Dum duona horo ni diris nenium vorton, nek li al mi, nek mi al li. Post la paso de tiu tempospaco li denove komencis:

”Jane, mi forvojaĝos post ses semajnoj; mi jam rezervis mian kajuton en velŝipo, kiu la dekduan de junio velveturos al orienta Hindujo.”

”Dio protektos vin, ĉar vi laboros por Li,” mi respondis.

”Jes,” li diris, ”tio estas mia fiereco kaj mia ĝojo. Mi estas servisto de ne erarema Sinjoro. Mi ne eniras la vivon sub

homa gvidado, ne sub gvidado, kiu estas submetita al erarplenaj leĝoj kaj al erarema perforto de miaj malfortaj kunhomoj, — mia Reĝo, mia Leĝdonanto, mia Gvidanto estas la Ĉiupotenca, la Perfekta! Al mi ŝajnas tiel strange, ke ne ĉiuj, kiuj ĉirkaŭas min, mortas pro la dezirego ariĝi sub la sama standardo — por plenumi la saman laboron.”

”Ne ĉiuj havas vian forton, kaj estus malsaĝe, se la malfortuloj volus iri kun la fortuloj.”

”Pri la malfortuloj mi ne parolas kaj al ili mi ne pensas; mi turnas min nur al tiuj, kiuj estas indaj kaj kapablaj plenumi tiun laboron.”

”Ilia nombro estas nur malgranda, kaj estas malfacile trovi ilin.”

”Vi prave parolas; sed se oni ne trovis ilin, tiam ĝi estas nia devo inciti — decidigi ilin, montri al ili, kiuj talentoj al ili estas donitaj kaj kial ili ricevis tiujn talentojn — nia devo estas kriegi al ili en la oreloj tiun sciigon de la ĉielo, oferi al ili lokon en la aro de la elektitoj.”

”Ĉu unue ilia koro ne diros al ili, se vere ili estos kapablaj pri tiu tasko?”

Estis al mi, kvazaŭ terura sorĉo pli kaj pli kaptis min. Mi tremis pro angoro, ke mi aŭdus diri vorton, kiu samtempe klarigus kaj rompus la sorĉon.

”Kaj kion via koro al vi diras?” demandis St. John.

”Mia koro estas muta — mia koro estas muta,” mi respondis tremante.

”Tiam mi devas paroli anstataŭ ĝi,” daŭrigis li per sia profunda senkompata voĉo. ”Jane, iru kun mi al Hindujo! Iru kun mi kiel mia helpantino, mia kunlaborantino.”

La ravino kaj la ĉielo ŝanceliĝis; la monteto sin levis kaj sin

mallevis! Estis al mi, kvazaŭ mi aŭdis voĉon de la ĉielo — kvazaŭ estus aperinta antaŭ mi sendito kiel tiu de Macedonujo, kiu kriis: "Venu kaj helpu al ni!" Sed mi ne estis apostolo — mi ne povis vidi la heroldon — mi ne povis aŭdi lian vokadon.

"Ho, St. John!" mi kriis. "Kompatu min!"

Sed mi petis al viro, kiu ne konis kompaton nek konscienc-riproĉon, kiam li kredis plenumi sian devon.

Li parolis plue:

"Dio kaj la naturo destinis vin kiel edzinon de misiisto. Ili donacis al vi ne korpajn, sed spiritajn ecojn; vi estas kreita por laboro, ne por amo. Vi devas, nepre devas fariĝi edzino de misiisto. Vi devas fariĝi mia. Mi postulas vin — ne por mi, ne por mia feliĉo, mi postulas vin por la servo de mia ĉiopotenca Sinjoro."

"Ne, por tio mi ne taŭgas — mi ne sentas vokinklinon por tio," mi diris.

Li estis preparinta sin al tiuj protestoj; ili ne emociis lin. Vere, kiam li dorsapogis sin al ŝtonego kaj krucis la brakojn sur la brusto kaj rigardis min, tiam mi vidis je liaj vizaĝesprimoj, ke li estas preparita al longa kaj forta kontraŭstaro, kaj ke li provizis sin per multa pacienco, kiu sufiĉos ĝis la fino — tamen ke li decidis, ke tiu fino estos lia venko.

"Humileco, Jane, estas la fundamento de ĉiuj kristanaj virtoj," li diris, "vi pravas dirante, ke vi ne taŭgas por tiu laboro. Kiu en vero taŭgas por ĝi? Aŭ kiu, estante vere vokita, kredis sin inda je tio? Ekzemple, mi mem estas nur polvo kaj cindro. Kun la apostolo Paŭlo mi nomas min la plej granda el ĉiuj pekuloj. Sed mi ne permesas al tiu konscio pri mia propra humileco, ke ĝi submetu aŭ timigu min. Mi konas mian kondukanton: mi scias, ke li estas same justa kiel ĉiopotenca;

kaj elektante malfortulon por plenumi grandan taskon, li fine ankaŭ perfektigos la nesufiĉecon de la rimedoj. Pensu kiel mi, Jane — fidu kiel mi! Mi postulas de vi, ke vi apogu vin sur la rokon de la jarmiloj; ne dubu, sed estu certa, ke ĝi kapablos porti la ŝarĝon de viaj homaj malfortecoj.”

”Mi komprenas nenion de la vivo de misiisto; mi ne pripenis la laboron de iu tia.”

”En tio, mi povus instrui vin malgraŭ mia humileco; de horo al horo mi povas indiki al vi vian taskon, de momento al momento mi povas helpi vin. Kaj tio estus ja nur necesa en la komenco. Baldaŭ vi estos same forta kaj same taŭga por la laboro kiel mi mem, ĉar mi konas vian forton kaj poste vi ne plu bezonas mian helpon.”

”Sed kie do estas mia forto por tia entrepreno? Pri tio mi scias nenion. Dum vi tiel parolas al mi, nenio en mi ekscitiĝas, tute nenio. Mi sentas nenion — miaj pulsoj ne batas pli rapide, neniu interna voĉo konsilas aŭ kuraĝigas min. Ho, mi dezirus, ke mi povus montri al vi, kiel mia animo en ĉi tiu momento estas simila al malluma malliberejo, sur kies terura planko enradikiĝas nur unu turmentiga frukto — la frukto esti konvinkita de vi pri klopodo, kiun mi neniam povus plenumi!”

”Mi havas respondon por vi — aŭskultu. De post nia unua renkonto mi severe ekzamenis vin. Dek monatojn mi faris vin mia studobjekto. Per malgrandaj diversaj elprovoj mi ekzamenis vin — kaj kion mi spertis kaj vidis? Mi trovis, ke vi en la vilaĝa lernejo akurate kaj honeste povis plenumi laboron, kiu estis kontraŭa al viaj inklinoj kaj kutimoj; mi eĉ vidis, ke vi plenumis ĝin taŭge kaj lerte; dum vi regis, vi povis ankoraŭ konkeri al vi korojn. Per la kvieteco, kun kiu vi eksciis, ke

subite vi fariĝis riĉa, mi ekkonis vian karakteron, kiu estas senigita de la malvirto de Demas, — riĉeco ne regis vin. En la decida servemo, per kiu vi dividis vian riĉecon en kvar partojn, tenante por vi mem nur unu parton kaj lasante la aliajn al la postulo de tute abstrakta juĝdecido, mi ekkonis animon, en kiu ardis la fajro de dankemo kaj de oferemo. En la cedemo, laŭ kiu vi forlasis studadon, kiu interesis vin, kaj komencis alian, nur ĉar ĝi interesis min; en la nelacigebla diligentecco, per kiu vi ĝis nun persistas en tio — en la firma, neŝancelebla energio kaj egala humoro, per kiu vi venkis la malfacilaĵojn de tiu studado — en ĉio tio mi ekkonis la perfektecon de la ecoj, kiujn mi serĉas. Jane, vi estas dolĉanima, diligenta, altruisma, fidela, konstanta kaj kuraĝa; tre amriĉa kaj tre heroa; ĉesu malfidi vin mem — mi fidus vin senkondiĉe. Kiel ĉefino de hindaj lernejoj, kaj helpantino inter hindaj virinoj, via kunhelpo estos al mi de netaksebla valoro.”

La fera kiraso, en kiu mi estis vestinta min, kuntiriĝis pli kaj pli ĉirkaŭ mi; la konvinko venis per malrapidaj, certaj paŝoj. Eĉ se mi malfermus miajn okulojn — ĉi tiuj delikataj lastaj vortoj sufiĉis por liberigi al mi la vojon. Mia tasko, kiu komence ŝajnis al mi tiel nedifinita, tiel senespere implektita, estis preninta difinitan formon sub lia mano, dum li parolis. Li atendis respondon. Mi petis kvaronhoron por pripensi, antaŭ ol li denove parolos.

”Volonte,” li respondis, kaj forlasante la rokon, li iris kelkajn paŝojn supren en la direkto al la ravino, sin ĵetis tie sur la erikojn kaj restis kuŝanta senmove.

”Mi estas devigata konfesi, ke mi povus fari kaj plenumi, kion li deziras de mi,” mi diris al mi — ”nome se mi ne mortos. Sed mi sentas, ke mi ne longe vivos sub la hinda suno. —

Kio poste? Tio preskaŭ ne tuŝas lin! Kiam la tempo de mia morto venos, li en trankvilo kaj sankteco redonus min al la Dio, kiu estus doninta min al li. Tio estus tre simpla afero. Se mi forlasos Anglujon, mi forlasos nur karan, sed senfine dezertan, solecan landon — ĉar en ĝi ne estas plu sinjoro Rochester, — kaj eĉ se li estus en ĝi, kio tio estus por mi? Kiun signifon tio iam povus havi por mi? Mia tasko nun estas: vivi sen li. Nenio estas pli malsaĝa, nenio estas pli malforta, pli senutila, ol mizere tiel vivi de unu tago en alian; estus al mi kvazaŭ ie mi atendus ankoraŭ neeban ŝanĝon de la cirkonstancoj, kiu povus denove unuigi min kun li. Komprenoble mi devis serĉi alian intereson en la vivo anstataŭ tio, kion mi estis perdinta, kiel iam diris St. John, kaj ĉu la tasko, kiun li nun metos sur min, vere ne estas la plej gloriĉa, kiun Dio povas surmeti kaj homo povas plenumi? Ĉu ĝi kun siaj noblaj zorgoj kaj altaj sekvoj, ne plej bone taŭgas por plenumi la malplenan lokon, kiun ruinigita espero kaj mortinta amo postlasas? Mi kredas, ke mi povas respondi nur 'jes' — tamen tremo min regas. — Ĉar, ho ve! se mi iros kun St. John, tiam mi fordonos pli ol la duonon de mia propra memo; irante al Hindujo mi iros renkonte al frutempa morto. Kaj kiel pasos la tempo inter mia adiaŭo al Anglujo kaj mia tombo en Hindujo? Ho! tion mi scias tre bone! Ankaŭ tio kuŝas klare antaŭ miaj okuloj! Streĉante ĉiujn miajn fortojn ĝis doloros miaj membroj kaj ŝiriĝos miaj nervoj, tiam mi plenumos la dezirojn de St. John ĝis iliaj malgrandaj detaloj. Irante kun li — oferi min tiel, kiel li deziras, mi metos ĉion sur la altaron — koron, vivoforton, tiam la ofero estos kompleta. Neniam li amus min; sed li estos kontenta je mi. Mi montrus al li fortecon kaj energion, helpfontojn, kies ekzistadon li neniam

supozis. Jes! mi povas same streĉite labori kiel li, kaj kun la sama komplezemo.

Mi estus kapabla konsenti lian peton — jes. Sed troviĝas fakto — terura fakto. Kaj ĝuste tion li postulas, mi devos esti lia edzino; kaj por mi li ne havas pli multan inklinon de edzo ol tiuj malmolaj ŝtonegoj, trans kiujn la rivero sin ĵetas mal-supren en la abismon.

Li ŝatas min kiel soldato ŝatas bonan armilon — kaj tio estas ĉio! Tio ne ĝenos min, se mi ne estas lia edzino; sed ĉu mi povus toleri, ke li daŭrigu siajn planojn ĝis la fino, kaj ĉu mi povus iri kun li laŭlonge de la edziĝ-ceremoniojn? Ĉu mi povus akcepti de li la edziĝan ringon kaj elporti ĉiujn formojn de amo, kiujn sendube ankaŭ li rigardas konsciencie — kaj tamen scii, ke la spirito estas malproksime de li? Ĉu mi povus elporti la konscion, ke ĉiu kareso, kiun li al mi montros, estas ofero, kiun li dediĉas nur al siaj principoj? Ne! Tia martireco estus monstrega! Neniam mi prenos ĝin sur min. Mi povus akompani lin kiel lia fratino — ne kiel lia edzino. Kaj tion mi volas diri al li.”

Mi rigardis al la monteto; li kuŝis tie kiel falinta kolono. Lia vizaĝo estis turnita al mi. Akre kaj atente liaj rigardoj estis fiksitaj sur mi. Li salte leviĝis kaj alproksimiĝis al mi.

”Mi estas preta iri al Hindujo — se mi povos iri tien libere.”

”Tiu respondo bezonas komenton; ĝi ne estas klara.”

”Ĝis nun vi estis mia adoptita frato — mi via adoptita fratino. Ni daŭrigu esti tiaj. Estas pli bone, se ni ne geedziĝos.”

Li kapneis. ”En tiu okazo la adoptita gefrateco ne respondu sian celon. La afero estus alia, se vi estus mia vera fratino: tiam mi irus kun vi kaj ne serĉus edzinon. En la nunaj

cirkonstancoj nia unuiĝo devas esti sanktigita kaj sigelita de la edziĝo, alie ĝi tute ne ekzistus. Praktikaj malhelpaĵoj kontraŭas ĉiun alian planon. Ĉu vi ne komprenas tion, Jane? Pripensu nur momenton — via prudento kondukos vin.”

Mi pripensis. Malgraŭ tio mia prudento diris al mi nenion, krom tiu sola fakto, ke ni ne amas unu la alian, kiel edzo kaj edzino devas ami sin. Kaj tial ĝi komprenigis al mi, ke ni ne geedziĝu! Tion mi diris al li.

”St. John,” mi respondis, ”mi amas vin kiel mian fraton — vi min kiel vian fratinnon. Tiel ni daŭrigu.”

”Tion ni ne povas — ne povas,” li respondis akre, mallonge kaj decidite, ”tio estos nebla. Vi diris, ke vi volas iri kun mi al Hindujo, ne forgesu tion — vi diris tion.”

”Kondiĉe.”

”Bone — bone. Kontraŭ la ĉefafero — la forvojaĝo el Anglujo kun mi, la kunlaborado kun mi en mia estonta laboro — vi havas neniun malhelpon. Vi kvazaŭ jam metis la manon sur la plugilon; vi estas tro konstanta kaj persistema por repreni vian konsenton. Vi bezonas nur fiksi la okulojn sur la celo, tio estas plenumi ĝis la fino la laboron de vi entreprenotan. Plisimpligu viajn tro komplikitajn interesojn: senton, pensojn, dezirojn, celon; kunfandu ilin en la solan intencon — nome, forte plenumu la mision de via potenca sinjoro. Por povi tion, vi bezonas kunhelpon, edzon — ne fraton, ĉar tia ligilo estas tro malforta. Ankaŭ mi ne bezonas fratinnon: mi povus elekti ŝin ĉiutage. Mi bezonas edzinon — tio estas la sola helpantino, kiun mi sufiĉe bone povos influi kaj kunligi al mi ĝis la morto.”

Frostotremo regis min, dum li parolis; ĝis mia midolo mi sentis la influon — mi konsciis la povon, kiun li posedis super

mi. "Ne serĉu en mi tian helpantaron, St. John! Serĉu edzinon, kiu estas al vi pli inda ol mi."

"Pli inda je mia celo, vi volas diri — pli inda je mia ofico. Mi ankoraŭfoje ripetas, ke ŝi ne estos sensignifa estaĵo — ne por viro kun egoistaj deziroj mi serĉas kunulinon — ne, mi serĉas edzinon por la misiisto."

"Kaj mi estas inklina, doni al la misiisto miajn fortojn — ĉar jen ĉio, kion li deziras — sed ne min mem; tio ja signifus aldoni al la kerno la ŝelon kaj la ilekson. Li ne bezonas ilin — kaj tial mi volas konservi ilin."

"Tion vi ne povas — tion vi ne rajtas! Ĉu vi kredas, ke Dio kontentiĝas kun duona ofero? Mi reprezentas la aferon de Dio, en lian armeon mi enkorpusigas vin. Pro Li mi ne povas akcepti duonan ĵuron de fideleco — ĝi estu kompleta!"

"Ho! mi estas inklina doni al Dio mian koron, ĉar vi ne bezonas ĝin!"

Mi ne povas ĵuri tion, mia kara leganto, ke en la tono en kiu mi diris la lastajn vortojn, kaj en la sento ĝin akompananta, ne kuŝis iom da subpremita sarkasmo. Ĝis tiu tempo mi timis St. John silente, ĉar mi ankoraŭ ne komprenis lin. Li tenis min en stato de angoro, ĉar mi dubis pri li. Ĝis nun mi ne estis kapabla diri, kiom en li estis sankta kaj homa; sed ĉi tiu konferenco kondukis al malkaŝigo; la analizo de lia estaĵo plenumiĝis antaŭ miaj okuloj. Mi vidis liajn malfortecojn, mi komprenis ilin. Mi komprenis, ke ĉi tie sur la erikobedo, kun tiu bela virfiguro antaŭ mi, mi kuŝas antaŭ la piedoj de viro, kiu eraris, kiel mi eraris. La vualo defalis de lia rigoreco kaj de lia despotismo. Kaj malkovrinte tiujn liajn ecojn, mi vidis lian malperfektecon kaj mi kuraĝiĝis. Mi staris antaŭ

egalulo — antaŭ homo, kun kiu mi povis disputi— kiun mi povis kontraŭstari, se tio estus bona kaj necesa.

Dirinte la lastajn parolojn, li eksilentis: mi kuraĝis fikse rigardi lin. Liaj okuloj, direktataj al mi, samtempe esprimis gravan miregon kaj akran scivolon. Li ŝajnis diri: "Ĉu ŝi estas sarkasma? Kaj eĉ kontraŭ mi?"

"Kion ĉi tio signifas?"

Post kelka tempo li parolis plue: "Ni ne forgesu, ke ĉi tio estas grava afero, afero pri kiu ni ne senpune povas paroli facilanime. Mi esperas Jane, ke vi estas sincera, kiam vi diras, ke vi volas doni vian koron al Dio — tio estas ĉio, kion mi postulas. Kiam vi estos seniginta vian koron de ĉio monda kaj doninta ĝin al via Kreinto, tiam la disvastiĝo de la regno de tiu via Kreinto estos via plej alta feliĉego, via sola aspiro, kaj ĉiuhore vi estos inklina fari ĉion, kion tiu celo postulas. Vi vidus, kian potencon forton ricevus niaj kunigitaj klopodoj per nia korpa kaj spirita geedziĝo — per tiu unuiĝo, kiu donas daŭran interkonsenton al destinoj kaj celoj de homaj kreitaĵoj —; kaj, dum mi transiras ĉiujn aliajn kapricojn, ĉiujn bagatelajn malfacilaĵojn kaj kontraŭaĵojn de la sentoj kaj la gradon, potencon aŭ karesemon de pura persona inklino, vi rapidos por tuj efektiviĝi tiun unuiĝon!"

"Ĉu vere?" mi demandis kaj rigardis liajn trajtojn, kiuj estis tiel belaj en sia harmonio, sed malofte timigaj pro sia severeco; mi rigardis lian frunton, kiu estis tirana kaj potenca, sed ne sincera; liajn okulojn, kiuj estis lume brilaj kaj profundaj kaj penetrantaj, sed neniam kvietaj; lian sveltan imponan figuron — kaj tiam mi imagis esti lia edzino. Ho! tio estus io nebla! Kiel lia helpantino, kamaradino, al tio mi konsentus! En tiuj lastaj ecoj mi irus kun li trans marojn, mi laborus kun

li en la aziaj dezertoj sub tropika suno, mi admirus lian forton, lian dediĉon, sindonon; mi eĉ instigus lin; mi vidus trankvile kaj senemocie lian neekstermeblan ambicion; mi povus disigi la kristanon de la homo, mi povus altgrade estimi la unuan, kaj pardonu tutkore la alian. Sendube mi ofte kaj multe suferus, sed miaj koro kaj animo, mi mem estus libera! Tiam mi ĉiam povus reiri al mia neĝenita memo, mi havus ankoraŭ miajn nekatentajn sentojn por la momentoj de malĝoja soleco. En mia animo estus rifuĝejoj, kiuj apartenus al mi mem, en kiujn li neniam povus penetri; tie povus freŝe kaj senĝene ekĝermi kaj kreski la sentoj, kiujn lia severeco ne povus brulsekigi, lia mezurita paŝo ne povus piedpremi — sed kiel lia edzino, ĉiam ĉe lia flanko, ĉiam subpremita — devigita ĉiam konservi la fajron de mia karaktero, devigi ĝin, ke ĝi konsumiĝu en mi mem; neniam povi eligi krion, kiam la kaŝita flamo konsumus unu organon post la alia ho ne! tio estus neelportebla!

”St. John!” mi ekkriis, kiam en mia imago mi ĉion tion pripensis.

”Nu?” li diris glacimalvarme.

”Mi ripetas ankoraŭ unu fojon, mi konsentas iri kun vi kiel via kunulino, kiel via helpanta misiistino — sed ne kiel via edzino. Mi ne povas edziniĝi kun vi — mi ne povas fariĝi parto de vi.”

”Vi devas fariĝi parto de mi,” li decide rediris, ”alie la tuto estus neebla. Kiel mi, viro malpli ol tridekjara, povus irigi kun mi en Hindujon knabinon deknaŭjaran, se ŝi ne estus mia edzino? Kiel ni ĉiam povus esti kune — kelkfoje en izolitaj sovaĝejoj, kelkfoje inter sovaĝaj gentoj — kaj ne esti geedziĝintaj?”

”Tre bone vi povus,” mi respondis. ”Tre bone sub tiaj cirkonstancoj; same bone kiel se mi estus via vera fratino aŭ viro kaj ekleziulo kiel vi mem.”

”Oni scias, ke vi ne estas mia fratino; nenien mi povas konduki vin kiel fratino; estus ligi insultan malfidon al niaj kalkanoj, se mi klopodus tion. Kaj cetere — se vi havas la fortan prudenton de viro, vi tamen havas ankaŭ la koron de virino — kaj — kaj estus neeble.”

”Estus eble,” mi certigis iom malestime. ”Estus tre eble. Mi havas la koron de virino — sed ne rilate al vi; al vi mi sentas nur la konstantan amikecon de kunulino, la sincerecon, la fidelecon, la fratan senton de milit-kamarado; la estimon kaj la submetiĝon de novekonvertita por ĉefpastro. Nenion pli! Do, timu nenion!”

”Ĝuste tion mi bezonas,” li diris parolante al si mem, ”ĝuste tion mi bezonas! Sed malhelpaĵoj estas sur la vojo! — ili devas esti batitaj teren. Jane, vi ne pripentos, edziniĝinte kun mi; pri tio estu certa. Ni devas geedziĝi. Mi ripetas, ke alia eliro ne ekzistas; kaj post la geedziĝo sendube sufiĉe da amo venos por igi en viaj okuloj la unuigon portebla.”

”Mi abomenas vian opinion pri amo,” mi ne povis ne diri, kiam mi leviĝis kaj staris antaŭ li kun la dorso apogita al la roko, ”mi malestimas la falsan senton, kiun vi prezentas al mi! Jes, St. John! Kaj vin mi malestimas, ĉar vi proponas ĝin!”

Fikse li rigardis min kaj kunpremis siajn bele formitajn lipojn. Estus malfacile diri, ĉu li estis ekscitita aŭ mirigita; li plene regis siajn vizaĝtraĵojn.

”Mi apenaŭ atendis aŭdi tiun esprimon el via buŝo,” li diris. ”Mi kredas, ke mi faris aŭ diris nenion, kio estas malestiminda.”

Lia dolĉa voĉo trafis min; lia kvieta, majesta vizaĝo subigis min.

”Pardonu al mi la esprimon, St. John; sed vi mem estas kulpa, ke mi ne plu regis min, kaj parolis nepripensinte. Vi tuŝis temon pri kiu ni, laŭ niaj karakteroj, opinias tute malsame, — temon, pri kiu ni neniam devus disputi. La nura vorto ’amo’ fariĝas inter ni pomo de malpaco — kion ni farus, se la fakto estus necesa? Kiel ni tiam sentus en niaj koroj? Mia kara kuzo, forlasu vian edziĝplanon — ne pensu plu pri ĝi!

”Ne,” li respondis, ”ĝi estas jam longe pripensita plano kaj la sola, kiu povas certigi mian altan celon, sed nun mi ne volas plu insisti. Morgaŭ mi vojaĝos al Cambridge. Tie mi havas multajn amikojn, kiujn mi volas adiaŭi. Ĉirkaŭ dek kvar tagojn mi estos for de ĉi tie; dum tiu tempo pripensu mian proponon; kaj ne forgesu: se vi malakceptos, tiam vi malkonfesas ne min, sed Dion. Mi estas nur la ilo, per kiu li prezentas al vi noblan karieron, sed nur kiel mia edzino vi povos akcepti ĝin. Se vi rifuzas estiĝi mia edzino, tiam vi preparas al vi por ĉiam nur vojon plenan de egoista komforto kaj dezerta mallumo. Tremu! Ĉar en tiaj cirkonstancoj vi similos tiujn, kiuj malkonfesis la kredon kaj kiuj estas pli malbonaj ol nekredemuloj.”

Nun li estis finparolinta.

Forturnante sin de mi, li ankoraŭ unu fojon rigardis supren al la montoj, poste malsupren al la rivero. Sed ĉiujn impresojn li fikse konservis en sia koro: mi ne estis plu inda aŭdi ilin elparolitaj. Reirante hejmen ĉe lia flanko, mi legis en lia ŝtona kvieteco, en lia glacia silentado ĉion, kion li sentis kontraŭ mi: la senluziigon de malvarma, nefleksebla prudento, kiu estis malkovrinta sentojn kaj opiniojn en alia pru-

dento, kun kiuj li ne kapablis simpatii. Resume, kiel viro li estis dezirinta devigi min al obeemo; kaj nur kiel fervora kristano li suferis mian obstinecon tiel pacience kaj donis al mi tiom da tempo por pripensi kaj por penti.

Kiam li en tiu vespero antaŭ ol iri al sia dormejo estis kisin-ta siajn fratinojn, li opiniis, ke li agas dece eĉ ne premante mian manon kaj silentante forlasante la ĉambron. Kvankam ne sentante amon al li, sed tamen koran amikecon, mi sentis min tiel ofendita pro tiu preterlaso, ke larmoj venis al mi en la okulojn.

”Jane, mi vidas, ke vi disputis kun St. John dum via promenado sur la marĉejo,” diris Diana, ”Iru post li, li estas ankoraŭ en la koridoro kaj atendas vin — li volas reamikiĝi.”

Sub tiaj cirkonstancoj mi tute ne estas fiera; pli volonte mi estus feliĉa kaj kontenta ol plena de indeco. Tial mi postiris lin — li staris malsupre de la ŝtuparo, kiu kondukis al la supra etaĝo.

”Bonan nokton, St. John,” mi diris.

”Bonan nokton, Jane,” li trankvile respondis.

”Etendu al mi la manon,” mi diris plue.

Kian malvarman, malfortan premon mi sentis sur miaj fingroj! Li estis profunde ofendita de ĉio, kio okazis al li tiun tagon; larmoj ne tuŝis lin; koreco ne varmigis lin. De li mi ne povis atendi feliĉan reamikiĝon — nek kuraĝigan rideton, nek grandaniman vorton, sed la kristano estis ankoraŭ ĉiam trankvila kaj pacienca; kaj kiam mi demandis al li, ĉu li pardonis min, li diris, ke ne estas lia kutimo konservi la memoron al ofendo, ke li havas nenion por pardoni, ĉar li ne estas ofendita.

Dirinte tion, li foriris de mi. Estus al mi pli agrable, se li per pugnoj estus batinta min teren.

## Ĉapitro XXXV.

**L**a sekvintan tagon li tamen ne forvojaĝis al Cambridge, kvankam li antaŭe diris tion. Li prokrastis la vojaĝon tutan semajnon kaj dum tiu tempo li sentigis al mi, kian grandan punon bona tamen severa, konsciencema sed nekurbebla viro povas meti sur estaĵon, kiu ofendis lin. Sen ago de malamikeco, sen vorto de riproĉo al li sukcesis daŭre sentigi al mi la konvinkon, ke mi tute perdis lian favoron.

Malgraŭ ĉio tio St. John ne sentis malkristanan venĝdeziron — li ne insultis unu solan hareton de mia kapo, li ne farus tion eĉ se li havus la povon! Pro la principoj kaj pro sia karaktero li staris super tiu malnobla kontentiĝo de ĉiu venĝdeziro; li estis pardoninta mian diraĵon, ke mi malestimas lin kaj lian amon, sed la vortojn li ne estis forgesinta; kaj neni-am li forgesos ilin, tiel longe kiel li kaj mi vivos. Kiam li sin turnis al mi, mi en lia rigardo vidis, ke tiuj vortoj konstante estis skribitaj en la aero inter li kaj mi; kiam mi parolis, ili per mia voĉo trafis liajn orelojn kaj ilia eĥo sonis el ĉiu vorto, kiun li diris al mi.

Li sin ne detenis de interparolado kun mi; kiel kutime li eĉ vokis min ĉiumatene al sia pupitro, por ke mi laboru kun li, sed mi timis, ke la malica homo en li amuziĝis montri, kun kiu lerteco li sukcesis — kvankam li okulŝajne agis kaj parolis kiel kutime — forigi el ĉiu vorto kaj el ĉiu ago la spiriton de la intereso, kiu antaŭe donis certan akran ĉarmon al liaj

paroloj kaj al tuta lia personeco — ĝi estis amuziĝo en kiu ne partoprenis la pura kristano. Por mi li en realo ne estis plu karno kaj sango, sed marmoro; liaj okuloj estis malvarmaj, helaj bluaj gemoj; liaj trajtoj estis parolanta instrumento — nenio alia.

Ĉio tio kaŭzis al mi rafinitan, rapidan ĉagrenon. Malrapida fajro de ekscitiĝo, ĉiam daŭranta ĉagreno, kiu doloris kaj kurbigis min, per tio estis konstante nutrata. Mi sentis, kiel ĉi tiu bona homo — pura kiel la plej pura fonto — mortigus min en mallonga tempo, se mi estus lia edzino, li mortigus min ne eltirante unu solan sangoguton el miaj vejnoj, sur sia propra kristale pura konscienco, ne sentante la plej malgrandan makuleton de krimo. Precipe mi sentis tion, kiam mi klopodis plimildigi lin. Mia kompato ne renkontis kompaton. Al li nia malproksimiĝo ne kaŭzis ĉagrenon; li ne sentis la deziron al reamikiĝo; kaj kvankam miaj larmoj pli ol unu fojon falis sur la libron, super kiu ni ambaŭ sidis kliniĝintaj, ili tamen impresis lin ne pli ol se lia koro vere estus objekto el metalo aŭ ŝtono.

Al siaj fratinoj tamen li estis pli kora ol kutime; kvazaŭ li timis, ke nura malvarmo ankoraŭ ne povis konvinki min, kiel plene mi estis ekzilita, li volis al tio aldoni la povon de la kontrasto. Kaj tion li faris ne el malico, pri tio mi estis konvinkita, sed el principo.

Je malleviĝo de la suno en la vespero antaŭ lia forvojaĝo mi okaze vidis lin promeni tien-reen en la ĝardeno. Rigardante lin, mi ree pensis pri tio, ke tiu viro, nun fremdiĝinta al mi, iam savis mian vivon kaj ke ni estas proksimaj parencoj. Tio instigis min lastfoje klopodi reakiri lian amikecon.

Mi eliris kaj proksimiĝis al li, kiam li staris apud la malgranda pordego. Tuj mi parolis pri tio, kio kuŝis sur mia koro.

”St. John, mi estas malfeliĉa, ĉar vi ankoraŭ ĉiam koleras min. Ni estu denove geamikoj.”

”Mi esperas, ke ni estas geamikoj,” li trankvile respondis, dum lia rigardo direktiĝis al la leviĝanta luno, kiun li jam rigardis kiam mi proksimiĝis al li.

”Ne, St. John, ni ne estas plu geamikoj kiel antaŭe. Tion vi tre bone scias.”

”Ĉu ni ne estas? Tio estus malbona. Miaflanke mi deziras al vi nenion malbonan, sed nur ĉion bonan.”

”Mi kredas vin, St. John, ĉar mi estas firme konvinkita, ke vi ne estus kapabla deziri malbonon al iu ajn. Tamen, estante via parencino, mi dezirus iom pli da amo ol tiu ĝenerala filantropio, kiun vi montras ankaŭ al fremduloj.”

”Nature,” li diris. ”Tiu deziro estas tre justa, kaj mi estas malproksime de tio, rigardi vin kiel fremdulon.”

Tion li diris tre malvarme kaj trankvile, kaj tio estis sufiĉe ofenda kaj humiliga. Se mi estus aŭskultinta la konsilojn de mia fiero kaj de mia kolero, mi tuj estus forlasinta lin. Sed en mi estis io pli forta ol tiuj sentoj. Mi tre estimis la principojn kaj la talentojn de mia kuzo. Lia amikeco estis al mi de granda valoro; perdi ĝin estus por mi peza elprovo. Tial mi ne tiel baldaŭ forlasis la klopodon, reakiri ĝin.

”Ĉu ni do disiĝos en tia animstato, St. John? Kaj kiam vi iros al Hindujo — ĉu vi tiam volas forlasi min sen diri amikan vorton, kiel vi faris antaŭe?”

Li nun sin deturnis tute de la luno kaj rigardis min en la vizaĝon.

”Jane, ĉu mi forlasos vin do, kiam mi iros al Hindujo? Kion! Ĉu vi do ne kuniros al Hindujo?”

”Vi ja diris, ke mi ne povus kuniri ne edziniĝinte kun vi antaŭe.”

”Vi do ne volas edziniĝi kun mi? Vi tenas vin al tiu decido?”

Kara leganto, ĉu vi iam spertis, kian teruron tiaj malvarmakoraj homoj povas kaŭzi per la glacio de siaj demandoj? Kiom de la falo de lavango estas en ilia kolero? Kiel ilia malplezuro similas la glacirompiĝon de sovaĝa riverego?

”Ne, St. John, mi ne edziniĝos kun vi. Mi tenas min al mia decido.”

La lavango ekmoviĝis, sed ĝi ankoraŭ ne falegis en la valon.

”Ankoraŭ unu fojon — kial tiu rifuzo?”

”Antaŭe, ĉar vi min ne amis,” mi respondis, ”nun, ĉar vi preskaŭ malamas min. Se mi edziniĝus kun vi, tiam vi mortigus min. Vi jam nun estas faronta tion.”

Liaj vangoj kaj lipoj paliĝis — morte paliĝis.

”Ĉu mi mortigus vin? — mi jam nun mortigas vin? Viaj esprimoj estas tiaj, kiaj ili neniam devus esti dirataj: akraj, malvarmaj, malveraj. Vi pruvas, ke vi estas en malfeliĉa spirita kaj anima stato; vi meritas severan riproĉon, vi estus nepardonebla, se la devo de la homo ne ordonus pardoni sian fraton, eĉ sepfoje sepdekfoje.”

Nun mi estis fininta la aferon. Dum mi flatis la esperon forigi el lia animo la signon de mia unua ofendo, mi subite postrestigis sur tiu malmola supraĵo pli profundan impreson, mi por ĉiam estis engravurinta ĝin tie, kaj mi diris:

”Nun vi vere malamas min. Estas tute vane fari la penon

repacigi vin; mi vidas, ke mi faris vin por ĉiam mia malamiko.”

Tiuj vortoj estis por li kiel nova maljustaĵo, kaj ankoraŭ pli granda, ĉar ili tuŝis la veron. Liaj sensangaj lipoj tremetis kiel en spasma. Mi sciis, kian akran koleron mi ekscitis. La koro en mia brusto estis krevonta.

”Vi tute miskomprenas miajn parolojn,” mi diris, subite kaptante lian manon: ”Mi ne intencis insulti aŭ eksciti vin — vere, tion mi ne intencis.”

Li amare ridetis — kun granda decidemo li retiris sian manon el mia. ”Kaj nun vi reprenas vian promeson, mi konjektas, kaj tute ne iros al Hindujo?” li diris post longa silentado.

”Jes, mi iros, sed nur kiel via kunlaborantino.”

Nun sekvis longa paŭzo. Mi ne povas diri kiel malfacila dume estis la batalo, kiu furiozis en li. Sed en liaj okuloj brilis strangaj radioj kaj strangaj ombroj flugis trans lian vizaĝon. Fine li ree parolis.

”Mi jam unu fojon pruvis al vi la absurdecon de la propono, ke knabino de via aĝo povus akompani needziĝintan viron de mia aĝo. Mi pruvis ĝin en tiaj esprimoj, pri kiuj mi povus supozi, ke ili malhelpis vin iam reveni al la plano. Ke vi malgraŭ tio tamen tion faris, tion mi bedaŭras — pro vi.”

Mi interrompis lin. Io simila al komprenebla riproĉo tuj redonis al mi kuraĝon.

”Ne forlasu do vian sanan prudenton, St. John, nun vi vere diras sensencaĵon. Vi certigas, ke vi estas konsternita pri tio, kion mi diris. Ĉu vi vere ne ekscitiĝis pri tio, ĉar kun via eksterordinara prudento vi neeble estas tiel absurda nek tro memfida por miskompreni mian opinion. Ankoraŭ unu fojon

mi ripetas al vi, mi volas esti via kunlaborantino, sed neniam via edzino.”

Ree li morte paliĝis. Sed kiel antaŭe li regis sian pasion perfekte. Li respondis medite sed trankvile:

”Virina kunlaborantino, kiu ne estas mia edzino, neniam sufiĉus al mi. Ŝajnas tial, ke vi ne povos iri kun mi; tamen se vi estas honeste sincera pri via propono, mi parolos kun misiisto dum mia restado en la urbo, kies edzino bezonas kunlaborantinon. Via propra monposedaĵo faros vin sendependa de la helpo de la misia asocio; en tiu maniero vi liberigos vin de la malhonoro rompi vian promeson, kaj malfideliĝi al la ligo, kies membrino vi promesis fariĝi.”

Kiel mia leganto scias, neniam mi formale donis mian promeson aŭ akceptis ian devon; kaj liaj paroloj estis tro severaj kaj tro despotaj por ĉi tiu okazo.

Tial mi respondis:

”En ĉi tiu okazo ne troviĝas malhonoro, nek rompita promeso, nek malfideleco. Mi ne havas la plej malgrandan devon iri al Hindujo, precipe ne kun fremduloj. Kune kun vi mi kuraĝas multon, ĉar mi admiras, fidus vin kaj amas vin kiel fratino. Sed samtempe mi estas konvinkita, ke, se mi irus kun iu ajn, mi ne vivus longe en tiu klimato.”

”Ho! vi timas pro via persono,” li diris kun moke distorditaj lipoj.

”Tion mi faras. Dio ne donis al mi la vivon, por ke mi ĝin forĵetu; kaj nun mi kredas, ke plenumo de via deziro estus memmortigo. Krom tio, antaŭ ol mi forlasus Anglujon, mi antaŭe volus certe scii, ĉu mi ne povus esti de pli granda utilo, amante mian patrujon, anstataŭ forlasi ĝin.”

”Kiel vi povus klarigi tion?”

”Estus senutile provi klarigi tion; sed troviĝas unu punkto, pri kiu jam longe mi sentas teruran dubon; kaj mi povus nenien iri antaŭ ol mi estus foriginta tiun dubon.”

”Mi scias, kien vin tiras via koro, kaj al kiu ĝi dediĉas sin. La intereso, kiun vi sentas, estas malsankta kaj kontraŭ la leĝo. Jam longe vi devus sufoki ĝin, kaj nun vi devus ruĝiĝi citi ĝin. Vi pensas al sinjoro Rochester!”

Li parolis prave kaj mia silento pruvis tion.

”Ĉu vi volas iri al sinjoro Rochester?”

”Mi volas kontroli, kio el li fariĝis.”

”Tial al mi restas plu nenio ol memori vin en miaj preĝoj,” li diris, ”kaj kore petegi Dion, ke per Lia helpo vi ne estiĝos kondamnita. Mi kredis vidi en vi unu el la elektitoj. Sed Dio ne vidas, kiel la homoj vidas: Lia volo estu!”

Li malfermis la pordeton de la latbarilo, eliris la ĝardenon kaj sin direktis tra la paŝtejo al la ravino, kaj baldaŭ malaperis.

Revenante en la familian ĉambron, mi vidis Dianan, kiu staris apud la fenestro; ŝi ŝajnis droni en malgajaj pensoj. Diana estis multe pli alta ol mi, ŝi metis sian manon sur mian ŝultron kaj kliniĝante super mi, ŝi ekzamene rigardis min en la vizaĝon, dirante:

”Jane, vi en la lasta tempo ofte estas pala kaj ekscitita. Mi estas konvinkita, ke io al vi okazis. Diru al mi, kio okazas inter vi kaj St. John. Duonan horon mi vidis vin kune tra la fenestro. Pardonu min, ke mi estas tia spionino, sed jam longe mi imagis ĉiajn aferojn. John estas tiel stranga kaj tute propreca homo.”

Ŝi eksilentis — mi ne parolis; baldaŭ poste ŝi diris:

”Mi estas konvinkita, ke mia stranga frato havas tre speci-

alajn intencojn rilate al vi; jam longan tempon li montris pri vi tiajn interesojn, kiajn li ankoraŭ neniam montris al iu — kaj kiacele? Mi dezirus, ke li vin amus, Jane — ĉu tio vere estas la okazo, mia infano?”

Mi metis ŝian malvarmetan manon sur mian varmegan frunton:

”Ne Diana, tute ne.”

”Kial do li tiel sekvas vin per la okuloj — kaj kial li daŭre serĉas vian ĉeeston kaj kial li daŭre estas ĉe via flanko? Maria kaj mi jam konjektis, ke li deziras edziĝi kun vi.”

”Tion li deziras — li postulis de mi, ke mi iĝu lia edzino.”

Pro ĝojo Diana kunfrapis la manojn.

”Ĝuste tion ni esperis kaj pensis! Kaj vi edziniĝos kun li, ĉu ne vere, Jane? Tiam li ja ankaŭ devus resti en Anglujo.”

”Tute kontraŭe, Diana; la sola intenco, kiun li havas ĉe sia edziĝopeto estas, certigi al si en mi taŭgan helpantinon por siaj hindaj laboroj kaj malfacilaĵoj.”

”Kion? Li postulas de vi, ke vi iru Hindujon?”

”Jes.”

”Sensencaĵo!” ŝi kriis. ”Mi estas konvinkita, ke vi vivus tie apenaŭ tri monatojn. Iru tien sub neniu cirkonstanco. Vi ne konsentis, ĉu ne vere, kara Jane?”

”Mi rifuzis edziniĝi kun li.”

”Kaj per tio vi profunde insultis lin, ĉu ne?”

”Profunde! Neniam li pardonos min, mi timas.”

”Estus nekredeble malsaĝe iri tien, Jane. Pensu nur al la tasko, kiun per tio vi prenis sur vin — estus nur senfinaj laciĝoj kaj streĉiĝoj; kaj streĉiĝoj kaj laciĝoj mortigas en tiuj landoj eĉ la plej fortajn. Sed vi estas delikata kaj malforta. Vi konas St. John kaj scias, ke li instigos vin al maleblaĵoj; en lia

proksimeco vi ne ricevus la konsenton ripozi dum la varmegaj horoj, kaj malfeliĉe vi devigas vin, kiel mi rimarkis, ĉion plenumi, kion li de vi postulas. Mi estas mirigita, ke vi havis la kuraĝon malakcepti lian manon. Vi do ankaŭ lin ne amas, Jane?”

”Ne kiel edzino devas ami sian edzon.”

”Malgraŭ tio, ke li estas tiel bela viro.”

”Kaj mi estas tiel malbela, ĉu ne, Diana? Ni ja tute ne taŭgas kiel feliĉa paro —”

”Malbela? Vi? Tute ne! Vi estas multe tro beleta kaj multe tro juna por esti viva rostita en Kalkuto.”

Kaj denove ŝi priĵuris min, ke mi forĵetu de mi ĉiun penson iri kun ŝia frato al Hindujo.

”Vi pravas,” mi diris, ”ĉar kiam mi ripetis al li mian konsenton sekvi lin kiel lia kunhelpantino, tiam li ekscitiĝis pro mia manko de konvencio. Li ŝajnis opinii, ke mi faris nedecaĵon, proponante al li akompani lin needziniĝinta. Tamen mi de la komenco esperis trovi en li fraton, kaj rigardis lin ĉiam kiel tian!”

”Kiel do vi povas diri, Jane, ke li vin ne amas?”

”Vi devus mem aŭdi lin paroli pri tio. Li ĉiam denove kaj denove certigis min, ke li ne por si mem, sed por sia ofico deziras kunulino. Li diris al mi, ke mi naskiĝis por la laboro — ne por la amo! Kaj sendube tio estas vera. Sed, mia opinie mi ankaŭ ne naskiĝis por edziĝo, se mi ne estas naskita por amo. Tial ĉu ne estus strange, Diana, esti por la tuta vivo katenita al viro, kiu en mi vidas nur utilan laborilon?”

”Neelteneble — nenature — tute neeble!”

”Kaj krome,” mi diris plue, ”kvankam mi sentas por li nun nur fratinan inklinon, mi tamen tre bone povas imagi al mi

la eblecon, ke estante devigita estiĝi lia edzino, mi post kelka tempo sentus por li neeviteblan strangan, dolorplenan specon de amo. Ĉar li havas altajn talentojn kaj en liaj rigardo; karaktero, interparolado estas ofte trajto de heroa grandeco. En tiu okazo mia sorto fariĝus neeldireble terura. Li ne postulus, ke mi amu lin, kaj se mi montrus al li amon, tiam li dirus al mi, ke ĝi estas superflua, ke li ne deziras ĝin kaj ke ĝi malbone decas al mi. Mi scias, ke li tiel agus.”

”Kaj tamen St. John estas bona homo,” diris Diana.

”Li estas bona kaj granda viro, sed senkompate li forgesas pri la sentoj kaj pretendoj de pli malgrandaj homoj, dum li daŭrigas siajn proprajn altajn planojn. Tial la sensignifuloj agas plej bone, se ili evitas lian vojon, por ke li ne piedpremu ilin en sia senripoza progresado. Sed jen li venas. Mi foriras de vi, Diana.”

Mi suprenrapidis la ŝtuparon, kiam mi vidis lin veni en la ĝardenon. Tamen ĉe la vespermanĝo mi estis devigata ree lin renkonti. Dum tiu manĝo li ŝajnis same trankvila kiel kutime. Mi estis kredinta, ke li nur malmulte parolos al mi, kaj mi estis firme konvinkita, ke li forlasis sian edziĝoplanon; sed la estonteco instruos al mi, ke mi eraris pri ambaŭ punktoj. Li parolis al mi en la kutima maniero; sed nur tiel, kiel li faris en la lasta tempo: li estis ĝene ĝentila. Sendube li estis peteginta la helpon de la sankta spirito por kontraŭbatali la kolerecon, kiun mi vekis en li kaj nun mi kredis, ke li pardonis al mi ankoraŭ fojon.

Por la legado antaŭ la vesperpreĝo, li estis elektinta la dudekunuan ĉapitron de la Apokalipso. Ĉiam estis bonfare aŭskulti lin, kiam la paroloj de la biblio venis de liaj lipoj, neniam lia voĉo sonis tiel dolĉe kaj klare — neniam liaj agma-

nieroj en sia simpleco tiel profunde impresis, ol kiam li anoncis la antaŭdirojn de Dio; kaj hodiaŭ vespere lia voĉo akceptis ankoraŭ pli solenan tonon — liaj movoj kaj gestoj akceptis pli profundan signifon, kiam li tiel sidis meze de siaj samejmanoj, dum la maja luno lumis tra la flanken ŝovitaj fenestraj kurtenoj kaj igis la kandelan lumon preskaŭ superflua; kiam li sidis tie klinita super la granda biblio kaj priskribis el ĝiaj folioj la vizion de la nova ĉielo kaj de la nova tero — kiam li diris, kiel Dio venos por loĝi inter la homoj, kiel Li forviŝos la larmojn el iliaj okuloj kaj promesis, ke morto ne plu estos, nek suferoj, nek ploroj, nek doloroj, ĉar la unuaj aferoj forpasis.

La sekvintaj vortoj strange tremigis min, kiam li diris ilin, precipe ĉar mi rimarkis je la dolĉaj nepriskribeblaj ŝanĝoj de la tono, ke li sin turnis al mi, kiam li eldiris ilin:

”Kiu venkas, tiu heredos ĉion, kaj mi estos lia Dio kaj li mia filo. Sed, ”tie li tre malrapide kaj klare legis, ”por la timemaj kaj nekredemaj kaj abomenindaj kaj mortigistoj kaj malĉastuloj kaj sorĉistoj kaj idolanoj kaj ĉiuj mensoguloj, ilia lotaĵo estos en la lago, brulanta per fajro kaj sulfuro; tio estas la dua morto.”

De tiu tempo mi sciis, kian loton St. John timis por mi. Trankvila, subpremita triumfo, miksita kun sopira sincereco certigis liajn klarigojn de la lasta glororiĉa verso de tiu ĉapitro. La leganto estis konvinkita, ke lia nomo estas jam skribita en la vivolibro de la Ŝafido, kaj li sopiris al la horo, kiam li eniros urbon, en kiun la teraj reĝoj portas siajn gloron kaj honoron; kiu ne bezonas sunon nek lunon por lumi en ĝin, ĉar la gloro de Dio prilumas ĝin kaj ĝia lumo estas la Ŝafido.

Dum la preĝo, kiu sekvis la ĉapitron de la biblio, li kolek-

tis sian tutan energion — sian tutan akran, rigidan fervoron; li estis en sankta sincereco, li batalis kaj luktis kontraŭ Dio kaj estis decidinta venki. Li petegis pri forto por la malfortuloj, pri konduko por la ŝafidoj, kiuj devagis de la brutaro, pri reiro, eĉ en la dek-unua horo, por tiuj, kiuj estis delogitaj de la mallarĝa sed rekta vojo per la tentoj de la mondo kaj de la karno. Li petis, li petegis, li postulis la donacon de brulego, de fulmo, por ĵetegi ilin en la korojn de la aŭskultantoj. La sincereco estas ĉiam profunde solena: kiam komence mi aŭskultis la preĝon, mi miris pri lia sincereco; poste, kiam li daŭrigis, li ekscitis min, kaj fine li plenigis min per teruro. Li sentis la grandecon kaj la valoron de sia intenco tiel sincere; ĉiu, kiu aŭskultis lian petegon, ne povis ne kunsenti kun li.

Kiam la preĝo finiĝis, ni adiaŭis lin, li intencis forvojaĝi tre frue la sekvontan matenon. Post kiam Diana kaj Maria lin kisis, ili eliris la ĉambron; per tio ili obeis, kiel mi kredas, ordonon, kiun li flustre estis doninta al ili. Tiam mi etendis al li la manon kaj deziris al li feliĉan vojaĝon.

”Mi dankas vin, Jane. Kiel mi jam diris, mi revenos de Cambridge post dek kvar tagoj; tiu tempo do estas ankoraŭ donita al vi. Se mi aŭskultus la kutiman, homan fierecon, tiam mi ne plu parolus al vi pri nia unuiĝo; sed mi obeas al mia devo kaj tenas min ankoraŭ al mia unua, mia ĉefa celo: fari ĉion por la honoro de Dio. Mia Sinjoro suferis longe; tion ankaŭ mi faros. Mi ne povas lasi vin al la kolero de la eterna malbeno. Pentu — decidu, kiam estas ankoraŭ ne tro mafrue. Ne forgesu — ni laboru tiel longe kiel daŭros la tago — ni scias, ke la nokto venos, en kiu neniu homo devas labori. Pensu pri la sorto de la riĉa viro en la evangelio, kiu posedis la

riĉaĵojn de ĉi tiu vivo. Dio donu al vi la forton elekti tiun pli bonan parton, kiu ne povos esti rabita de vi!”

Dirante tiujn lastajn parolojn, li metis la manon sur mian kapon. Li estis parolinta sincere kaj milde; lia rigardo en la vero ne estis tiu de amanto, kiu rigardas sian amatinon; sed ĝi estis tiu de paŝtisto, kiu kunvokas sian disigitan brutaron, aŭ pli multe tiu de gardanĝelo, kiu gardas la animon, por kiu li estas respondeca. Ĉiuj viroj kun talentoj, indiferente ĉu ili estas sentemaj aŭ ne, ĉu ili estas zelotoj, ambiciuloj aŭ despotoj — kondiĉe ke ili estu honestaj — havas siajn majestajn momentojn: nome kiam ili venkas aŭ potencas.

Mi sentis grandan respekton antaŭ St. John — respekton, kiu estis tiel forta, ke ĝia potenco subite puŝis min al tiu punkto, de kie mi tiel longe estis forkurinta. La tento min ekegis, ke mi cedu en la batalo kontraŭ li — lasu min fortreni de lia volo por forlasi mian propran. Mi estis nun preskaŭ en lia povo, same kiel antaŭe en tiu de aliulo, kvankam en tute malsama maniero. En ambaŭ okazoj mi estis malsaĝulino. Se antaŭe mi estus cedinta, ĝi estus eraro kontraŭ la moralalo; se mi nun cedus, tiam estus eraro kontraŭ la sana prudento. Tiel mi pensas ankoraŭ nun, rerigardante al tiu krizo per la mediuo de la tempo. Sed tiutempe mi ne konsciis mian malsaĝemon.

Senmove mi staris tie sub la tuŝo de mia hierofanto<sup>1</sup>. Mi forgesis pri ĉiuj rifuzoj — mia timo estis venkita — mia luk-tado paralizita. La neeblo — mia unuigo kun St. John — rapide iĝis eblo. Per unu bato ĉio ŝanĝiĝis. La religio vokis — anĝeloj mangestis. — Dio ordonis — la vivo malŝvelis kiel limako — la pordoj de la morto malfermiĝis kaj montris al mi

1 pastro greka, kiu instruas la misterojn kaj devojn de sia religio.

la eternecon, kiu kuŝis transe; estis al mi kvazaŭ mi povus oferi ĉion surteran por la certeco kaj feliĉego transaj en unu sekundo. La malluma ĉambro estis plena de vizioj kaj la misiisto demandis:

”Ĉu vi povus nun decidi?” Li faris tion dolĉvoĉe kaj malforte li tiris min al si. Ho, tiu mildeco! Kiel pli potenca ĝi estas ol la perforto! Mi kapablis kontraŭstari la koleron de St. John; antaŭ lia mildeco mi estiĝis malforta kiel kano. Malgraŭ tio mi absolute sciis, ke li poste igos min penti pro mia antaŭa kontraŭstaro, ĉar per unu horo de arda, sankta preĝado lia tuta karaktero ne estis ŝanĝiĝinta; ĝi fariĝis nur pli majesta.

Mi respondis: ”Mi povus decidi, se mi nur certe sciis, se mi havus nur la firman konvinkon, ke tio estas la volo de Dio, ke mi edziniĝu kun vi! Tiam mi ĉi tie kaj nun ĵurus — kio ajn rezultus!”

”Mia preĝo estas aŭdita!” kriis St. John. Li pli firme premis sian manon sur mia kapo, kvazaŭ li posedus min. Li metis la brakon ĉirkaŭ mi, *preskaŭ* kvazaŭ li min amus (mi diras *preskaŭ*, mi ja konis la diferencon — ĉar mi estis spertinta ĝin, kio estas vera amo; sed kiel li, mi nun metis flanken la amon nur pensante al mia devo); mi batalis ankoraŭ per mia necerta interna vizio, malheligita de nebuloj. Varmege kaj kore mi aspiris fari tion, kio estas justa — kaj nur tion.

”Montru al mi, ho, montru al mi la rektan vojon!” mi petegis al la ĉielo. Mi estis ekscitita kiel ankoraŭ neniam antaŭe. Kaj la ĉielo juĝu ĉu tio, kio sekvis, estis la efiko de mia eksciteco.

La tuta domo dronis en profunda silento; ĉar mi kredas, ke esceptinte St. John kaj min, ĉiuj jam enlitiĝis. La sola kandelo estis estingiĝonta. La lunlumo hele penetris en la ĉambron.

Mia koro laŭte kaj rapide batis, kaj mi aŭdis ĉiun pulsobaton. Subite ĝi haltis sub nepriskribebla sento, kiu tremis tra ĝi kaj kiu paralizis miajn kapon kaj piedojn. La sento ne estis kiel elektra frapo, sed same forta kaj stranga kaj timiga, ĝi efikis sur miajn sentojn kvazaŭ ties eksteraj kapabloj kaj senripozeco ĝis nun estis nur kiel ia glaciigo, el kiu ili nun estis vekataj. Mi aŭskultis plena de atendo, la okuloj kaj oreloj estis streĉitaj, dum ĉiu nervo en mi tremis.

”Kion vi aŭdis? Kion vi vidas?” demandis St. John. Mi vidis nenion. Sed ie mi aŭdis voĉon, kiu vokis:

”Jane! Jane! Jane!”

Nenion pli.

”Ho Dio, kio estas tio?” mi kriis.

Same bone mi povus krei: ”Kie ĝi estas?” ĉar ĝi ŝajne ne estis en la ĉambro — ne en la domo — ne en la ĝardeno. Ĝi ne venis el la aero — nek el la tero — nek de supre. Mi estis nur aŭdinta ĝin — kiel aŭ de kie, estas neeble tion diri! Kaj ĝi estis la voĉo de homa estaĵo — de konato kaj amato, ĝi estis neforgesebla voĉo — nome tiu de Edward Fairfax Rochester; kaj ĝi kriis petegante kaj ĝemante en sovaĝa dolo:ro.

”Mi venas!” mi kriis. ”Atendu min! Ho! mi volas veni!” Mi rapidis al la pordo kaj rigardis en la koridoron, sed tie estis mallume. Mi iris en la ĝardenon; ĝi estis senhoma.

”Kie vi estas?” mi vokis.

La monteto malantaŭ la ravino obtuze resendis la respondon: ”Kie vi estas?” Mi aŭskultis. La vento aŭdiĝis mallaŭte en la pinoj. Nenio krom soleca, dezerta marĉejo kaj noktomeza silento.

”For la superstiĉon!” mi ordonis, kiam tiu malluma fantomo leviĝis apud la nigra taksusarbo. ”Ĉi tio ne estas via trom-

po, nek via sorĉarto — ĉi tio estas la laboro de la naturo. Ĝi estis vekata kaj plenumis — ne miraklon — sed sian plej bonan.”

Mi liberigis min de St. John, kiu estis sekvinta kaj retenonta min. Nun venis *mia* tempo uzi perforton. Nun *mia* potenco devis venki.

Mi diris al li, ke li demandu nenion nek faru rimarkojn; mi petis lin forlasi min; mi nepre volis esti sola. Li tuj obeis. Kie troviĝas sufiĉe da energio por ordoni, tie obeemo ĉiam sekvas. Mi eniris mian ĉambron, ŝlosis la pordon, falis surgenue kaj preĝis en mia maniero — alie ol en tiu de St. John. Estis al mi kvazaŭ mi leviĝis ĝis potenca spirito, kaj mia animo senŝargiĝis dankeme antaŭ liaj piedoj. Post la preĝo mi leviĝis — decidis — kaj kuŝiĝis, sen timo, plena de espero — sopirante la tagiĝon.

## Ĉapitro XXXVI.

**L**a tago venis. Ĉe la krepusko mi ellitiĝis. Mi okupis min lalmenaŭ dum du horoj por ordigi la ŝrankon, la tirkestojn kaj aliajn aferojn en mia ĉambro, por postlasi ĉion tiel, kiel estis necese por la daŭro de mallonga foresto. Intertempe mi aŭdis, ke St. John eliras sian ĉambron. Ĉe mia pordo li haltis; mi timis, ke li frapos — sed ne; folieto de papero estis ŝovita tra la mallarĝa fendo sub la pordo. Mi prenis ĝin. Ĝi surhavis la jenajn vortojn:

”Hieraŭ vespere vi tro rapide foriris de mi. Se vi estus restinta ankoraŭ mallongan tempon, tiam vi fine estus metinta vian manon sur la krucon de Kristo, sur la kronon de la anĝelo. Kiam mi post dek kvar tagoj revenos, mi atendos vian klaran definitivan decidon. Intertempe gardu kaj preĝu, por ke vi ne falu en tenton: la spirito, mi fidas, estas bonvola, sed la karno, mi vidas, estas malforta. Ĉiuhore mi preĝos por vi! Via, St. John.”

Mia animo respondis: ”Mia spirito volas fari, kio estas justa, kaj mia karno, mi esperas, estas sufiĉe forta por plenumi la volon de la ĉielo, se nur unue mi klare scios ĝian volon. Ĉiuokaze ĝi estos sufiĉe forta por serĉi, petegi elirejon el ĉi tiu nuboj de dubo kaj trovi la taglumon de la konscienco.”

Estis la unua de junio; sed la mateno estis malvarma kaj nuba, la pluvo forte batis sur mian fenestron. Mi aŭdis la pordon malfermiĝi kaj St. John eliris. Rigardante tra la fenestro,

mi vidis, kiel li iris tra la pluvo. Li iris la vojon trans la nebulan marĉejon en la direkto al Whitcross — tie li trafos la poŝtveturilon.

Mi pensis: "Post malmultaj horoj mi iros la saman vojon kaj ankaŭ atendos poŝtveturilon en Whitcross. Mi ankaŭ devas iri al personoj en Anglujo kaj paroli al ili, antaŭ ol mi por ĉiam forlasos ĝin."

Post du horoj ni matenmanĝos. Tiun intertempon mi uzis irante tien reen en mia ĉambro por pripensi la vizion, kiu estis doninta al miaj planoj la nunan direkton. Mi revokis en mian memoron tiun strangan senton, ĉar mi estis kapabla revoki ĝin kun tuta ĝia nepriskribebbla mirindeco. Mi memoris la voĉon, kiun mi estis aŭdinta; ree mi demandis, de kie ĝi venis, sed vane kiel antaŭe. Ŝajne ĝi estis en mi — ne en la ekstera mondo. Mi demandis, ĉu ĝi estas nura nerva impresio — aŭ trompo? Mi povis nek kompreni nek kredi, ĝi estis pli ol inspiraĵo. La mirakla skuo de mia animo venis kiel tertremo, kiu estis skuinta la fundamentojn de la malliberejo de Paŭlo; ĝi malfermis la pordon de la ĉelo de mia animo kaj rompis la katenojn —. ĝi vekis ĝin el la dormo, el kiu ĝi aŭskultante kun teruro kaj tremado estis eliĝinta; poste trifoje vibranta krio penetris en mian timigitan orelon; mi aŭdis ĝin en mian tremantan koron, en mian ekscititan animon, kiuj nek timis nek ŝanceliĝis, sed plengoje entuziasmiĝis pro la sekvo de ununura penado, kiu povis liberigi ilin de la ŝarĝo de la karno.

"Antaŭ ol multaj tagoj estos pasintaj," mi diris, pripensinte ĉion tion, "mi scios ion pri tiu, kies voĉo hieraŭ vespere ŝajnis voki al mi. La leteroj ne estis efikaj — nun persona ekzameno anstataŭos ilin."

Dum la matenmanĝo mi sciigis al Diana kaj Maria, ke mi vojaĝos kaj ke mi forestos eble almenaŭ kvar tagojn.

”Ĉu sola, Jane?” ili demandis.

”Jes, mi volas informiĝi pri persono, pri kiu jam longan tempon mi estas malkvieta.”

Ili povus respondi, kion sendube ili ankaŭ pensis, nome, ke ili kredis, ke mi, krom ili, ne havas amikojn; ĉar tion mi antaŭe ja ankaŭ certigis al ili; sed pro ilia justa, natura diskretemo, ili sin detenis de ĉiu rimarko; nur Diana demandis, ĉu mi sentas min tute bona por povi vojaĝi, ĉar jam kelkajn tagojn mi aspektas tiel suferanta kaj pala. Mi respondis, ke mi ne estas malsana; ke nur certa angoro min regis, kiun mi baldaŭ esperis fortimigi.

Sen kontraŭstaro mi povis fini pluajn preparojn, ĉar neniu turmentis min plu per demandoj aŭ supozoj. Post kiam mi ankoraŭfoje diris, ke mi nun ne povas pli detale klarigi miajn planojn, ili trankvile toleris mian silentadon; ili permesis al mi la privilegion pri decido, kiun ankaŭ mi estus permesinta al ili sub samaj cirkonstancoj.

Estis la tria horo posttagmeze, kiam mi forlasis Moor House kaj baldaŭ post la kvara mi staris ĉe la vojmontrilo de Whitcross, atendante la alvenon de la poŝtveturilo, kiu kondukos min al la malproksima Thornfield. Pro la silento sur la solecaj vojoj kaj dezertaj montetoj mi aŭdis jam en la malproksimo la rulbruon de ĝiaj radoj. Ĝi estis tiu sama veturilo, el kiu mi malsupreniris sur la sama loko en somervespero — senespera, soleca, vivolaca! Ĝi haltis, kiam mi mangestis. Mi eniris ĝin — ne estante devigata pagi mian tutan posedajon, kiel la antaŭan fojon. Trovante min denove sur la vojo al Thornfield, mi sentis min kiel rehejmiĝanta leterkolombo.

Estis tridekseshora vojaĝo. Iun mardon en la posttagmezo mi estis foririnta de Whitcross, kaj estis frumatene en la sekvinta ĵaŭdo, kiam la poŝtveturilo haltis por trinkigi la ĉevalojn antaŭ gastejo apud la landvojo. Tiu gastejo kuŝis meze de pejzaĝo, kies verdaj plektobariloj kaj vastaj kamparoj kaj malaltaj montetoj plenaj de arbaroj renkontis miajn okulojn. Kiel mildaj estis tiuj ĉirkaŭaĵoj, kiel mildaj estis tiuj koloroj kompare kun la akraj, dezertaj nordaj marĉejoj de Morton! — Jes, ĉi tiun pejzaĝon mi konis; mi estis proksima al la celo de mia vojaĝo!

”Kiel malproksime estas Thornfield de ĉi tie?” mi demandis la gastejserviston.

”Ĝuste ankoraŭ du mejlojn, sinjorino, se vi iros la vojon trans la kamparon.”

”Mia vojaĝo nun finiĝis,” mi pensis. Mi eliris el la poŝtveturilo, transdonis mian pakaĵon al la servisto, por ke li ĝin prizorgu ĝis mia reveno; mi pagis la veturigiston, donis trinkmonon al li kaj ekiris. La unuaj radioj de la leviĝanta suno falis sur la elpendaĵon de la gastejo, kaj mi legis la oritajn literojn de la surskribaĵo: ”Je la blazonŝildo de la Rochesteroj”. Mia koro laŭte batis; mi do estis jam sur la grundo de mia sinjoro. Sed subite mi haltis kaj al mi venis la penso:

”Eble via sinjoro kaj mastro estas nun trans la brita kanalo! Kion vi scias pri li! Kaj plue, se li estus en Thornfield, al kiu vi nun rapidas — kiu estos tie krom li? Lia freneza edzino! Kaj vi ne povas havi rilatojn kun li; vi ne povas paroli kun li, ne veni en lian proksimecon. Ĉiuj viaj penoj kaj streĉadoj estis vanaj — estus pli bone, tuj reiri,” tiel parolis avertanta, admonanta voĉo. ”Petu la loĝantojn de la gastejo pri informoj; ili povas ĉion diri, kion vi bezonas scii, ili per unu vorto povas

forigi ĉiun dubon. Iru al la gastejestro kaj demandu ĉu sinjoro Rochester estas hejme.”

La konsilo estis saĝa, malgraŭ tio mi ne povis decidi agi laŭ ĝi. Mi timis ricevi respondon, kiu malesperigos min. Deziri la dubon estas plilongigi la esperon. Mi volis ankoraŭfoje vidi la halon sub la radioj de ĝia stelo. Tie antaŭ mi kuŝis la piedvojo. Tie kuŝis tiuj samaj kamparoj, tra kiujn mi iris dum mia forkuro de Thornfield, tiam mi estis kvazaŭ blinda, surda, freneza, atakita de vengema kolero, kiu skurgĝis kaj persekutis min en la koro. Antaŭ ol mi ankoraŭ sciis, en kiun direkton mi iros, mi estis jam inter la kampoj. Kiel rapide mi iris! Kiel mi rigardis antaŭen por vidi la unuan supron de la bone konata parko! Kun kiaj sentoj mi bonvenigis kelkajn arbojn, kiujn mi konis! Kaj vidaĵojn sur paŝtejoj kaj montetoj, kiuj jam fariĝis al mi karaj!

Fine la parko kaj la arboj leviĝis antaŭ mi. Mallume kuŝis tie la kornika nestaro: laŭta gratado interrompis la silenton de la mateno. Stranga ravsento ekregis min: mi rapidis pluen. Ankoraŭ unu kampo estis trairota — poste malzorgita vojeto kun plektobariloj — kaj tie staris la muroj de la korto kaj la konstruaĵoj de la mastrumado. La domo mem kuŝis nevidata post la kornikejo.

”Unue mi volas revidi la antaŭan flankon,” mi decidis, ”kie la majestaj kreneloj tuj faras grandan impreson al la okuloj, kaj kie mi povos vidi la fenestron de mia sinjoro. Eble li staras apud ĝi — li kutimas frue leviĝi. Eble li estas en la fruktoĝardeno, aŭ sur la teraso de la domo. Se mi nur povus vidi lin! Nur unu momenton! Se vere tio estus — ĉu mi povus esti tiel freneza postkuri lin? Tion mi ne povas diri — mi ne estas plu mastro de mi mem. Kaj se mi tion farus — kio poste? Dio lin

benu! — Kio poste? Al kiu mi maljuste agus, se mi ĝuus ankoraŭ unu fojon la feliĉegon, kiun lia rigardo fluigos en miajn vejnojn? — Mi estas freneza! Mi deliras! Eble en ĉi tiu momento li vidas la leviĝon de la sunon super la Pireneoj, aŭ super la suda maro.”

Mi estis irinta laŭlonge de la malalta muro de la fruktoĝardeno, — nun mi turnis min ĉirkaŭ la angulo; tie estis la pordego, tra kiu oni inter du ŝtonaj kolonoj kun grandaj ŝtonaj bulegoj iris sur la paŝtejon. Post unu el la kolonoj mi povus senĝene rigardi la tutan antaŭaĵon de la sinjora domo. Tre singarde mi etendis la kapon por certigi al mi, ĉu la kurtenoj de la dormeja fenestro estas jam ŝovitaj flanken. De ĉi tiu loko mi povis vidi la longan antaŭaĵon, la fenestrojn kaj la krene-lojn.

Eble la korvoj, ŝvebantaj tra la blua aero, rigardis min. Mi deziris scii, kion ili pensas! Ili sen dubo opiniis, ke komence mi timas kaj poste estos maltima kaj senĉagrena. Mi ĵetis rapidan rigardon al la domo — poste mi longe ĝin rigardis; mi iris de malantaŭ la kolono, rapidis trans la herbejon. Subite mi ree haltis tuj antaŭ la antaŭa flanko de la domo kaj kuraĝe, longe mi rigardis en tiu direkto. ”Kian ŝajnan timon en la komenco!” eble diris la alte ŝvebantaj korvoj kaj ”kian sentimemon ŝi subite montras!”

”Aŭskultu la klarigon, mia leganto!”

Amanto trovas sian amatinon, kiu endormiĝis sur muskovrita benko; li deziras ĵeti unu solan rigardon sur ŝian vizaĝon sen vekti ŝin. Senbrue li ŝteliras trans la herbon kaj timas fari bruon; li haltas — kredante, ke ŝi sin movas. Li ne volas esti vidata de ŝi: li retiras sin. Ĉio estas silenta; li ree proksimiĝas al ŝi, li sin klinas super ŝi; delikata vualo kuŝas sur ŝia

kapo; li levas ĝin, sin klinas pli profunden; nun liaj okuloj jam antaŭe ĝuas la vizion de la belaĵo — la varman, florantan, amindan, ripozantan belaĵon. Kiel rapida estis lia unua rigardo! Sed kiel streĉita ĝi estas nun! Kiel li timas! Kiel li nun subite kaj pasie ĉirkaŭbrakas la tutan figuron, kiun antaŭ mal-longa momento li ne kuraĝis tuŝi per unu fingro! Kiel laŭte li krias nomon, kiel li ellasis la figuron kaj ĝin fikse kaj sovaĝe rigardas! Ne pli longe bezonante timi, ke li vekos la amatinon per krio aŭ per movo, li eligas laŭtan krion kaj terurita ŝin rigardas. Li kredis ŝin kviete, pace dormanta — sed ŝi estas malvarma kaj mortinta!

Kun tremanta ĝojo mi estis fiksinta mian rigardon sur majestan domon: subite mi vidis nur fume makulitan ruinon.

Mi ne bezonis plu kaŝi min post pordega kolono! Mi ne bezonis plu homevite suprenrigardi al la fenestroj de la dormejo, timante ke mi vidos post ili movojn! Mi ne bezonis plu aŭskulti ĉu fermiĝas aŭ malfermiĝas pordoj — kaj imagi, ke mi aŭdas homajn paŝojn sur la teraso aŭ sur la vojoj. La ĝardeno kaj la parko estis piedpremitaj kaj ruinigitaj; la portalo gapis al mi kun teruriga malpleno. La antaŭo de la domo estis kiel mi iam vidis ĝin en sonĝo, nur alta muro plena de krevajoj kaj kun senfenestraj truegoj.

La tegmento, kreneloj kaj kamentuboj estis for — ĉio kuŝis ruinigita sur la tero. Ĉie regis la trankvilo de morto, la senbruo de dezerta sovaĝejo!

Ne estis mirige, ke la leteroj, adresitaj al personoj loĝantaj ĉi tie neniam ricevis respondon; same bone mi povus sendi ilin al la tombokeloj de preĝejo. La fuma nigro diris al mi, kia katastrofo trafis la domon — ĝi estis neniigita de brulo. Sed kiel tio estiĝis? Kiaj okazintaĵoj sin ligis al tiu katastrofo? Kiu

perdo estis priplendinda krom pri mortero, marmoro kaj lignaĵo? Ĉu ankaŭ homoj pereis? Kaj kiuj? Tio estis terura demando! Ĉi tie estis neniu por respondi min. Mi aŭdis eĉ ne unu sonon kaj vidis eĉ ne unu vivantan estaĵon!

Vagante inter la krevitaj muroj kaj la ruinigita interno de la domo, fariĝis al mi klare, ke la katastrofo okazis jam antaŭ longa tempo. Ŝajnis al mi, ke la neĝo de la pasinta vintro penetris jam tra la pordegarkaĵoj; ke la pluvo de tuta vintro jam eniris tra la fenestro-malfermaĵoj, ĉar en la ruinamaso la kreskaĵoj de la printempo jam ekfloris; tie kaj alie la fiherboj tre alte leviĝis inter la ŝtonoj kaj falintaj traboj. Kaj ho! kie estis la malfeliĉa posedanto de ĉi tiu ruinaĵo? En kiu lando? Sub kiuj cirkonstancoj? Senintence miaj rigardoj ŝvebis al la malnova preĝejturo apud la granda enireja pordego kaj mi demandis: "Ĉu li kuŝas flanke de Damer de Rochester kaj ripozas kun li en tiu malvasta marmora domo?"

Kaj tamen mi volis ricevi la respondon al tiuj demandoj. Nenie mi povus ricevi ĝin krom en la gastejo, kaj tien mi reiris post kelka tempo.

La gastejestro mem portis al mi la matenmanĝon en la familian ĉambron. Mi petis lin fermi la pordon kaj sidiĝi. Kiam li faris tion, mi preskaŭ ne sciis, kiel komenci pro la teruro, kiun mi sentis antaŭ la ricevotaj respondoj. Tamen la dramo de la teruraĵo, kiun mi ĵus forlasis, jam preparis min por teruriga historio. La gastejestro estis ĝentile aspektanta viro de meza aĝo.

"Kompreneble vi konas Thornfield Hall," mi kun peno diris.

"Jes, sinjorino, mi estis tie unu fojon."

”Ĉu vere?” Tamen, ne kiam mi loĝis en ĝi, mi pensis, ĉar vi estas al mi fremdulo.

”Mi estis la kelisto de la mortinta sinjoro Rochester.”

De la mortinta ...! Plenpeze min trafis la bato, kiun mi tiel longe estis evitinta.

”De la mortinta ...!” mi pene diris. ”Ĉu li do estas mortinta?”

”Mi parolas pri la patro de la nuna sinjoro Edward,” klarigis li.

Mi reekspiris. Mia sango ree komencis flui. Tiuj vortoj ja certigis al mi, ke sinjoro Edward — mia sinjoro Rochester (Dio lin benu kie ajn li estas) vivas ankoraŭ. Revivigantaj vortoj! Estis al mi, kvazaŭ mi povus aŭdi ĉion, kio estis sekvon-ta — kiel ajn terura tio estus. Mi rekvietiĝis, li ne kuŝis en la tombo! Nun mi povus elporti eĉ la sciigon, ke li estas ĉe la antipodoj.

”Ĉu sinjoro Rochester nun loĝas en Thornfield Hall?” mi demandis, kvankam mi jam sciis, kio estos la respondo. Mi tamen deziris eviti rektan demandon pri lia restadejo.

”Ne, sinjorino, ho ve, ne! Tie loĝas nun neniu. Mi supozas, ke vi ne konas ĉi tiun regionon, alie vi scius, kio okazis la pasintan aŭtunon; — Thornfield Hall estas nun nur ruino, ĝuste en la rikoltotempo ĝi tute forbrulis. Estis terura katastrofo! Ĉio forbrulis kaj eĉ la mebloj ne povis esti savitaj. La brulo eksplodis en la mezo de la nokto, kaj antaŭ ol la ŝprucigiloj venis el Millcote, la tuta konstruaĵo estis maro da flamoj. Estis terura aspekto. Mi mem ĉeestis.”

”Noktomeze!” mi murmuris. Jes, estis la fatala horo por Thornfield!

”Ĉu oni scias, kiel tio okazis?” mi demandis.

”Mi supozas tion, sinjorino, oni supozas tion, sed vere mi povus certigi, ke dubo ne ekzistas. Eble vi ne scias,” li flustre daŭrigis, dum li puŝis sian seĝon pli proksimen al la tablo, ”ke iu sinjorino — freneza sinjorino estis kaŝita en la domo?”

”Pri tio mi aŭdis.”

”Ŝi estis severe gardata, sinjorino, jes, multajn jarojn la homoj eĉ ne sciis ion definitivan pri ŝia ekzisto. Neniu vidis ŝin; nur la famo rondiris, ke ie en la sinjora domo iu estas kaŝita, sed malfacile estis supozi, kiu kaj kiel. Oni diris, ke sinjoro Edward kunkondukis ŝin el fremda lando, kaj multaj kredis, ke ŝi antaŭe estis lia amatino. Sed antaŭ unu jaro okazis io stranga — tre stranga.”

Mi timis nun aŭdi mian propran historion, tial mi klopdid reen konduki lin al la ĉefa afero.

”Kaj tiu sinjorino?”

”Tiu sinjorino estis, kiel poste montriĝis, la edzino de sinjoro Rochester! Tiu malkovro okazis en la plej stranga maniero. En la sinjora domo estis fraŭlino, la guvernistino, kaj sinjoro Rochester ...”

”Sed rilate al la brulo!” mi interrompis lin.

”Tion mi tuj rakontos, sinjorino — kaj sinjoro Rochester enamiĝis al ŝi. La servistoj diris, ke ili en sia tuta vivo neniam vidis tiel enamiĝintan homon, kiel li estis. Konstante li estis apud ŝi. Ili kvazaŭ spionis lin — vi ja scias, sinjorino, ke servistoj amas fari tion — kaj li amis ŝin pli ol iun ajn en la mondo. Krom li, neniu trovis ŝin bela. Ŝi estis eta sensignifa estaĵo, ili diris, kaj preskaŭ infano. Mi mem neniam vidis ŝin, sed Leah, la ĉambristino, rakontis al mi pri ŝi. Leah tre amis ŝin. Sinjoro Rochester estis ĉirkaŭ kvardek jara kaj tiu guvernistino ne estis ankoraŭ dudek. Kaj vi bone scias, ke, se viroj de

lia aĝo enamiĝas je juna knabino, kia ŝi estis, tiam ili ofte estas kvazaŭ sorĉitaj. Li do volis edziĝi kun ŝi.”

”Tiun parton de la historio vi povus rakonti al mi alian fojon,” mi diris, ”sed mi havas tute specialan motivon aŭdi la historion pri la brulado. Ĉu oni supozas do, ke tiu frenezulino — sinjorino — sinjorino Rochester havas aferon kun ĝi?”

”Vi ĝuste trafis, sinjorino; estas tre certe, ke ŝi kaj neniu alia bruligis la domon. Ŝi havis kun si gardistinon, nome sinjorinon Poole, laŭ sia speco tre taŭga, lerta virino kaj tute fidinda; sed ŝi havis mankon — mankon, kiun havas preskaŭ ĉiuj maljunaj flegistinoj, ŝi kutimis tro ofte trinki kelkan brandon el sia botelo por trankviligi la soifon. Tio estas pardonebla, ĉar ŝi havis tre malfacilan, malagrablan taskon; sed malgraŭ tio, tiu kutimo estis danĝera; ĉar kiam sinjorino Poole, trinkinte tro multe, endormiĝis, la frenezulino, kiu estis ruza kaj malica kiel sorĉistino, prenis la ŝlosilon el ŝia poŝo, ŝteliĝis tra la pordo kaj ĉie vagis tra la domo kaj plenumis ĉian malbonon, kiu venis al ŝi en la kapon. La homoj diras, ke foje ŝi preskaŭ forbruligis sian edzon en lia lito; sed mi ne scias, ĉu tio vere okazis. Sed en tiu vespero ŝi unue bruligis la kurtenojn de la ĉambro, kuŝanta plej proksime de ŝia; poste ŝi ŝteliris malsupren al la dua etaĝo, eniris en la ĉambron, kiu antaŭe apartenis al la gubernistino — (estis kvazaŭ ŝi suspektis la rilaton inter ŝia edzo kaj la knabino, kaj tial malamis ŝin) — kaj bruligis tie la liton. Feliĉe neniu dormis tie. La gubernistino estis forkurinta du monatoj pli frue; kaj kvankam sinjoro Rochester serĉis ŝin, kvazaŭ ŝi estus la plej multekosta juvelo sur la tero, li tamen povis ekscii nenion pri ŝi. Tiam li fariĝis kiel sovaĝulo — tute kiel sovaĝulo en sia ĉagreno. Neniam antaŭe li estis milda homo, sed post kiam li perdis ŝin, li fariĝis eĉ

danĝera. Li volis esti tute sola. La mastrumistinon, sinjorinon Fairfax li forigis malproksimen al ŝiaj parencoj; sed li kondukis al ŝi tre dece, ĉar ŝi ricevis asekurpension por sia tuta vivo. Sed tion ŝi indis, ĉar ŝi estis tre bonkora virino. Fraŭlino Adèle, kiu kiel lia zorgatino, ankaŭ estis en la domo, estis sendita al instituto. Li rompis ĉiun interrilaton kun la najbaraj nobeloj kaj vivis en sia domo kiel ermito.”

”Kion! ĉu li ne eliris el Anglujo?”

”Ĉu li ...? Dio vin benu, li ne faris tion! Li ne transiris plu la sojlon de la domo, escepte en la nokto, kiam li kiel spirito vagis tra la parko kaj tra la fruktoĝardeno, kaj furiozis kvazaŭ li perdis la prudenton. Kaj miaopinie li vere ĝin perdis. Ĉar vi ne povas imagi pli ĝojan, kuraĝan sinjoron ol li estis, antaŭ ol la eta guvernistino venis sur lian vojon. Li estis nek ludema, nek trinkema, li ne sin okupis pri la kurkonkursoj de ĉevaloj, kiel multaj aliaj sinjoroj. Li ankaŭ ne estis bela; sed li havis kuraĝon kaj fortan volon kiel iam ajn alia viro. Mi bone konis lin de lia knabeco, kaj rilate al mi, ofte mi deziris, ke fraŭlino Eyre estus droninta en la profunda maro antaŭ ol iri al Thornfield Hall.”

”Sinjoro Rochester do estis hejme, kiam la brulo eksplodis?”

”Jes, li estis; kaj li suprenkuris al la tegmentejaj ĉambroj, kiam sub li ĉio jam brulis kaj savis la servistaron, kiu kuŝis en la litoj, li helpis ilin malsupren kaj poste li reiris ankoraŭ unu fojon por savi sian frenezan edzinon. Oni kriis al li, ke ŝi staras sur la tegmento; kaj vere tie ŝi staris kaj disbatis la brakojn tiel laŭte kriante, ke oni povis aŭdi ŝin je mejla distanco. Per miaj propraj okuloj kaj oreloj mi vidis kaj aŭdis ŝin. Ŝi estis alta, forta virino kun longaj nigraj haroj, ni vidis ilin flirti en

la vento, dum la flamoj jam ĉirkaŭis ŝin. Mi vidis, kaj multaj aliaj vidis, ke sinjoro Rochester rampis tra la tegmenta fenestro kriante: Berta! Berta! Ni vidis, kiel li proksimiĝis al ŝi; kaj subite ŝi eligis teruran krion, saltis — kaj tuj poste ŝi kuŝis frakasita sur la ŝtona teraso.”

”Senviva?”

”Senviva? Ho, senviva kiel la ŝtonoj sur kiuj ŝia cerbo kaj sango estis diŝjetitaj.”

”Bona Dio!”

”Prave vi diras tion, sinjorino, estis terure!”

Li tremetis.

”Kaj poste?” mi demandis.

”Nu, sinjorino, poste la domo forbrulis ĝis la tero; restis nur ruino.”

”Ĉu pereis aliaj homoj?”

”Ne. Sed eble estus pli bone — —”

”Kion vi volas diri per tio?”

”Kompatinda sinjoro Edward!” li kriis, ”ke mi devis ĝisvivi tion, tion mi neniam pensis. Kelkaj diras, ke li estas juste punita, ĉar li tenis en sekreto sian unuan edziĝon kaj volis edziĝi kun dua virino, dum lia unua edzino vivis ankoraŭ. Sed kore mi kompatas lin.”

”Sed vi ja diris, ke li vivas!” mi kriis.

”Jes, jes, li vivas. Sed multaj opinias, ke estus pli bone, se li estus mortinta.”

”Kial? Kiel?” La sango en miaj vejnoj preskaŭ koaguliĝis.

”Kie li estas?” mi demandis. ”Ĉu li estas en Anglujo?”

”Jes, jes, li estas en Anglujo; estas ja neeble al li forlasi ĝin; li ja estas kvazaŭ katenita!”

Kia angoro min kaptis! Kaj ĉi tiu viro ŝajnis esti decidinta daŭrigi tiun angoron kiel eble plej longe.

”Li estas tute blinda,” li diris fine. ”Jes, jes, li estas tute blinda, la kompatinda sinjoro Edward.”

Mi atendis ion pli teruran. Mi timis, ke li fariĝis freneza. Mi kolektis ĉiujn miajn fortojn kaj demandis, kiel tiu katastrofo okazis.

”Lia propra kuraĝo estis kulpa en tio, kaj eble ankaŭ lia bonkoreco, sinjorino; li ne volis forlasi la domon antaŭ ol ĉiuj aliaj estis savitaj el ĝi. Kiam fine li malsupreniris, post kiam sinjorino Rochester ĵetis sin sur la terason, aŭdiĝis laŭtega krakado — kaj la tuta konstruaĵo enfalis. Oni tiris lin el sub la ruinoj ankoraŭ vivan, sed li estis danĝere vundita; unu el la traboj falis tiel, ke ĝi parte protektis lin; sed unu okulo estis elbatita al li kaj unu mano tiel frakasita, ke sinjoro Carter, la kirurgo tuj devis amputi ĝin. La alia okulo estis inflamita kaj poste perdis ankaŭ la vidkapablon. Nun li estas tute helpbezona, — tute helpbezona, vere, blinda kaj kripligita.”

”Kie li estas? Kie li loĝas nun?”

”En Ferndean en sinjora domo sur unu el siaj bienoj. Ĝi estas dezerta, malĝoja restadejo.”

”Kiu loĝas ĉe li?”

”La maljuna John kaj ties edzino. Neniujn aliajn li toleras ĉe si. Oni diras, ke li estas tute kadukiĝinta.”

”Ĉu vi havas ian veturilon?”

”Ni havas duradan veturileton, tre belan.”

”Pretigu ĝin tuj kaj se via servisto povas veturigi min al Ferndean antaŭ ol mallumiĝis, tiam mi donos al vi kaj al li duoblan pagon.”

## Ĉapitro XXXVII.

La sinjora domo en Ferndean estis jam malnova konstru-  
laĵo de meza grandeco kaj tute ne arkitektura belaĵo. Ĝi  
kuŝis meze de la arbaro. Pli frue mi ofte aŭdis paroli pri ĝi.  
Sinjoro Rochester de tempo al tempo parolis pri Ferndean kaj  
multfoje iris tien. Lia patro antaŭe aĉetis la bienon pro ĝiaj  
vastaj ĉasejoj. Volonte li poste ludonus la domon, sed pro la  
maloportuna situo ne povis trovi luanton. Tial ĝi restis neme-  
blita kaj nelogata, escepte de tri ĉambroj, kiuj estis pretaj por  
la posedanto, kiam li pasigis tie la ĉasan sezonon.

En la vespero de la tago mi alvenis al tiu domo. La ĉielo  
estis malluma kaj pluvis preskaŭ seninterrompe. La lastan  
mejlon mi iris piede, post kiam mi pagis al la veturigisto la  
promesitan sumon kaj reiris lin per sia veturileto.

Eĉ starante tre proksime de la domo, oni ne povis vidi ĝin,  
tiel dense ĝi estis ĉirkaŭita de la malhelaj arboj. Fera porde-  
go inter du kolonoj el granito montris al mi, kie mi devas en-  
iri, kaj trairinte la pordegon mi ree trovis min sub la densaj  
suproj de longa vico de arboj. Inter la altaj musko-kovritaj  
arbotrunkoj kaj arbetaĵo sin etendis la de herbo plenkreski-  
ta vojo. Mi laŭiris ĝin atendente baldaŭ atingi loĝejojn; sed ĝi  
etendiĝis pli kaj pli antaŭen kaj nenie mi vidis domon aŭ par-  
kon.

Mi kredis, ke mi iris en malĝustan direkton. La mallume-  
co de la vespero kaj de la arbaro fariĝis pli kaj pli malpene-

trebla. Mi rigardis ĉirkaŭe por serĉi alian vojon, sed nenie ĝi estis. Nenio krom sovaĝa arbeto, kandelrektaj arboj kaj densa somerfoliaro.

Mi iris pluen. Fine la vojeto plilarĝiĝis, la arboj staris malpli dense; nun mi vidis latbarilon, poste domon preskaŭ ne distingeblan de la arboj pro la pligrandiĝanta mallumo, tiel malsekaj kaj muskokovritaj estis ĝiaj muroj.

Irite tra la pordego, fermita nur de klinko, mi staris meze de spaco ĉirkaŭita de plektobarilo, sin etendanta duoncirkle inter la arboj. Tie kreskis nek floroj nek bedoj, sed estis nur larĝa, silika vojo, kiu ĉirkaŭis herbejon. La domo havis du frontonojn; la fenestroj estis mallarĝaj kaj kun kradoj; ankaŭ la pordo estis mallarĝa kaj ŝtupareto kondukis al ĝi. La tuto estis, kiel la gastejestro de "Je la blazono de la Rochesteroj" jam diris, tre malĝojiga loko. Ĉio estis silenta, kiel en preĝejo meze de la semajno; la pluvo, kiu senhalte falis sur la foliaron, faris la solan brueton, kiu frapis mian orelon, kaj mi demandis min:

"Ĉu ĉi tie povas loĝi vivaj estaĵoj?"

Jes, ĉi tie loĝis iu, ĉar mi aŭdis ion. La mallarĝa pordo malfermiĝis kaj figuro estis elironta la konstruaĵon.

La pordo malrapide malfermiĝis, figuro eliris en la mallumon, viro sen ĉapelo, li etendis la manon kvazaŭ por senti, ĉu pluvas. Malgraŭ la mallumo mi rekonis lin — li estis mia mastro, Edward Fairfax Rochester, — neniu alia.

Mi restis staranta, retenis la spiron kaj tiel rigardis lin — ne estante vidata de li kaj, ho ve — estante al li nevidebla!

La renkonto estis tre subita, kaj la ravo, kiun ĝi kaŭzis al mi, estis tuj bridata de la teruro, kiun ĝi inspiris. Ne estis al mi malfacile reteni krion, mi ne estis tentata rapidi al li. Lia

figuro havis la saman fortan eksterajon kiel antaŭe; lia sintenado estis rekta, liaj haroj korve nigraj, liaj trajtoj ne estis ŝanĝiĝintaj; unu jaro de ĉagreno kaj sufero ne kapablis kurbigi lin, rompi lian noblan viran fortecon. Sed mi rimarkis ŝanĝon en lia vizaĝesprimo; ĝi estis malluma kaj senespera — ĝi memorigis min pri katenita sovaĝa besto aŭ pri birdo, al kiu oni en ĝia doloro ne povas proksimiĝi sen danĝero. La malliberigita aglo, kies kvazaŭ de oro ĉirkaŭita okulo estas blindigita de la krueleco, povus rigardi kiel ĉi tiu blinda Ŝimŝon. Sed, mia leganto, ĉu vi kredas, ke mi timis lin en lia blinda sovaĝeco? Se tiel estas, vi konas min nur malbone. En mia ĉagreno sin miksis la dolĉa espero, ke mi baldaŭ sukcesos premi kison sur tiun marmoran frunton, kaj sur tiujn prefermitajn lipojn — sed — sed ankoraŭ ne nun. Mi ankoraŭ ne volis paroli al li.

Li malsupreniris la ŝtonan ŝtupareton kaj malrapide sin direktis al la herbejo. Kie estis liaj firmaj paŝoj? Li haltis subite kvazaŭ nesciante en kiun direkton iri. Li levis la manon kaj malfermis la palpebrojn, levis ilin, ŝajne kun streĉita peno ĉielen kaj poste al la amfiteatro de la arbaro — sed por li ĉio estis malplena kaj nur mallumo. Li etendis la manon (la senmanan brakon li tenis kaŝita en la brustopoŝo) estis kvazaŭ li per tuŝoj volis ekzameni, kio estas en lia plej proksima ĉirkaŭaĵo, sed ankaŭ tie li trovis nur malplenan spacon, ĉar la arboj staris kelkajn metrojn pli malproksime. Li tial forlasis sian klopodon, krucis la brakojn kaj staris senmove kaj senparole en la pluvo, kiu nun seninterrompe falis sur lian nekovritan kapon.

En tiu momento John, kiun mi ĝis nun ne rimarkis, iris al li.

”Sinjoro, ĉu vi volas preni mian brakon?” li diris, ”ĉar plus vas torente. Estus pli bone, se vi irus en la domon.”

”Lasu min!” li respondis. John sin retiris, ne vidante min. Nun sinjoro Rochester denove klopodis iri, sed vane. Ĉio estis tro malcerta. Palpserĉante li reiris al la domo kaj eniris ĝin, fermante post si la pordon.

Nun mi alproksimiĝis kaj frapis. La edzino de John malfermis al mi la pordon.

”Maria,” mi diris ”kiel vi fartas?”

Ŝi ektimis kvazaŭ ŝi vidus fantomon. Mi kvietigis ŝin. Al ŝia laŭta krio: ”Ĉu vere vi estas tie, fraŭlino, tiel mafrue venanta al ĉi tiu soleca loko?” Mi respondis nur kaptante ŝian manon. Poste mi sekvis ŝin en la kuirejon, kie John estis sidanta antaŭ hele brulanta fajro.

Per malmultaj vortoj mi klarigis al ili, ke mi scias jam ĉion, kio okazis post mia foriro el Thornfield, kaj ke mi venis por vidi sinjoron Rochester. Mi petis John iri al la vojbarila domo, al kiu mi estis konfidinta mian kofron, post kiam mi resendis la veturileton, kaj por alporti ĝin al Ferndean. Tiam mi formetis de mi la ĉapelon kaj la ŝalon kaj petis Marian, ĉu ŝi por tiu nokto povus konsenti al mi tranokti en la domo kaj vidante, ke tio estas ebla malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj, mi diris al ŝi, ke mi restos. En tiu momento la sonorilo en la familia ĉambro aŭdiĝis.

”Se vi iros al via sinjoro, Maria, tiam diru, ke iu estas ĉi tie, kiu deziras paroli kun li, sed ne diru mian nomon.”

”Mi ne kredas, ke li akceptos vin,” ŝi respondis, ”ĉar li akceptas neniun.”

Kiam ŝi revenis, mi demandis, kion li diris.

”Li informiĝas pri via nomo kaj pri la celo de via vizito,” ŝi

respondis, kaj plenigis glason per akvo metante ĝin kun du kandeloj sur pleton.

”Ĉu li sonorigis por ricevi ion?” mi demandis.

”Jes, ĉiam li portigas al si kandelojn, kiam ekmallumiĝas, malgraŭ sia blindeco.”

”Donu al mi la pleton, mi volas porti ĝin al li.”

Mi prenis ĝin el ŝia mano kaj ŝi montris al mi la pordon de la familia ĉambro. La pleto tremis en mia mano kaj mi disverŝis la akvon; mia koro aŭdeble batis en mia brusto. Maria malfermis por mi la pordon kaj fermis ĝin ree post mi.

La ĉambro aspektis mallume; malbone prizorgita fajro fumaĵis en la kameno, kaj klinita super ĝi kun la kapo apogita sur la alta kamen-kornico, staris la blinda loĝanto de la ĉambro. La aĝa hundo Piloto kuŝis ĉe lia flanko; ŝajnis ke ĝi singarde eliris el lia vojo timante esti puŝata per la piedoj. Kiam mi eniris, Piloto starigis la orelojn; tiam ĝi krietante salte leviĝis kaj rapidis al mi, preskaŭ puŝante la pleton el mia mano.

Mi metis ĝin sur la tablon, karesis la hundon frustrante: ”kuŝiĝu Piloto!” Mehanike sinjoro Rochester sin turnis, kva-zaŭ por vidi, de kie venas la movo. Sed povante vidi nenion, li ree turnis la kapon kaj eligis laŭtan ĝemon.

”Donu al mi la akvon, Maria,” li diris.

Mi proksimiĝis al li kun la nur duone plena glaso. Piloto ankoraŭ ĉiam sekvis min kun svingiĝanta vosto.

”Kio do estas?” li demandis.

”Kuŝiĝu Piloto!” mi diris ankoraŭfoje. Eltrinkonte la akvon, li haltis kaj aŭskultis, tiam li trinkis kaj metis la glason sur la tablon.

”Estas vi, ĉu ne vere, Maria?”

”Maria estas en la kuirejo,” mi respondis.

Kun subita gesto li etendis la manon, sed ne vidante, kie mi staras, li ne tuŝis min.

”Kiu estas? Kiu estas?” li demandis maltrankvile kaj ŝajne klopodis vidi per la kompatindaj okuloj. Sed la klopodo estis vana! ”Respondu min, parolu ankoraŭfoje!” li laŭte kaj ordone diris.

”Ĉu vi volas ankoraŭ iom da akvo, sinjoro? Mi diŝjetis la duonon de tio, kio estis en la glaso,” mi diris.

”Kiu vi estas? — Kiu do parolis?”

”Piloto konas min, kaj John kaj Maria scias, ke mi estas ĉi tie. Mi venis nur hodiaŭ vespere,” mi respondis.

”Ĉiopotenca Dio! Kia trompo min kaptis? Kia dolĉa frenezo ekregas min?”

”Neniu trompo — neniu frenezo, sinjoro! Via spirito estas tro forta por esti trompata; via sano tro bona por ke frenezo ĝin kaptu.”

”Kaj kie estas la parolantino? Ĉu tio estas nur ŝia voĉo? Ho! mi ne povas vidi, sed mi devas senti, alie mia koro ĉesos bati kaj mia kapo rompiĝos. Kiu ajn vi estas —tuŝu min, alie mi ne povas vivi!”

Li palpis ĉirkaŭe. Mi kaptis lian serĉantan manon kaj premis ĝin en la miajn.

”Ŝiaj fingroj!” li kriis, ”ŝiaj malgrandaj, delikataj fingroj! Kaj se ŝiaj fingroj estas ĉi tie, ankaŭ pli multe da ŝi estas ĉi tie.”

La muskola mano sin detiris de la miaj, li kaptis mian brakon mian ŝultron — mian kolon — mian talion — li tiris min al si kaj ĉirkaŭbrakis min.

”Ĉu tio estas Jane? Aŭ kio alia? Ĉi tio estas ŝia figuro — ŝia tuta persono —”

”Kaj tio estas ŝia voĉo,” mi aldonis. ”Ŝi estas ĉi tie, kun sia

tuta persono, kaj ankaŭ sia koro. Dio vin benu, sinjoro! Mi estas tiel feliĉa refoje esti tiel proksime al vi!”

”Jane Eyre! — Jane Eyre!” tio estis ĉio, kion li diris.

”Mia kara sinjoro,” mi diris, ”mi estas Jane Eyre; mi retrovis vin — mi revenis al vi!”

”Ĉu vere? Ne nur via spirito? Sed ankaŭ via korpo? Ĉu vi estas mia vivanta Jane?”

”Vi ja tenas min, sinjoro — vi ja tenas min, kaj eĉ firme tenas min. Mi ne estas malvarma, kiel mortinto, ne travidebla kiel la aero, ĉu ne?”

”Mia karulino vivas! Ĉi tio estas ŝiaj membroj! Ĉi tio estas ŝia vizaĝo! Sed estas ja neeble estiĝi tiel feliĉa post tiu tuta mia mizero. Ĝi estas sonĝo! Same kiel en senkonsolaj noktoj, kiam mi premis ŝin sur mian koron, kaj tion nun mi faras; kaj ŝin kisis — kiel nun, kaj kiel mi sentis, ke ŝi min amas, kaj kiel mi esperis, ke ŝi ne plu forlasos min.”

”Kaj de nun mi tion ne plu faros, sinjoro.”

”Ne plu faros tion, ĉu la vizio diras tion? Sed ĉiam mi vekigis kaj spertis, ke ĉio estis nur amara trompo; kaj denove mi estis soleca kaj forlasita — mia vivo estis malluma, mizera, senespera — mia animo soifis, kaj neniu donis al mi refreŝigan trinkaĵon — mia koro malsatis, kaj la nutraĵo estis al ĝi rifuzita. Ho, dolĉa sonĝo, ĉar nun vi estas inter miaj brakoj, ĉu ankaŭ vi forkuros de mi kiel ĉiuj viaj fratoj forkuris antaŭe. Sed kisu min antaŭ ol forkuri! Kisu min, mia Jane, mia amatino!”

”Jes sinjoro, unu fojon — kaj ankoraŭ unu fojon!”

Mi premis miajn lipojn sur liajn, antaŭe tiel brilantajn sed nun tute senbrilajn okulojn — mi ŝovis la harojn de lia frun-

to kaj ankaŭ kisis tiun. Subite li ŝajnis tute vekigi; li konsciiis pri tio, kio okazis!

”Ĉu estas vi, Jane? — ĉu vere — vere? Ĉu vi revenis al mi?”

”Jes.”

”Kaj vi ne kuŝas senviva ie en foso aŭ rivero? Vi ne velkas malĝoja kaj soleca kaj ekzilita inter fremduloj?”

”Ne, sinjoro, mi estas tute sendependa.”

”Sendependa? Kion signifas tio?”

”Mia onklo en Madejro mortis kaj postlasis al mi kvin mil funtojn.”

”Ho! tio estas praktika! Nun ni revenis al la realo!” li kriis, ”ion tian mi neniam kuraĝis imagi! Mi aŭdas refoje ŝian propran voĉon, tiel vivigan, tiel ĉarman, tiel pikantan kaj tamen tiel dolĉan. Mia malsana koro refreŝiĝas, ĉar mi aŭdas vin paroli; mi sentas en mi novan — vivon. — Kion, Jane! vi estas nun sendependa? — — eble riĉa?”

”Preskaŭ riĉa, sinjoro. Se vi ne volas lasi min loĝi ĉi tie, tiam mi povas konstruigi por mi domon proksime al via, kaj tiam vi povos iri al mi kaj sidi ĉe mi en mia familia ĉambro, kiam vespere vi deziros ne esti tute sola.”

”Sed estante riĉa, Jane, vi sendube havas amikojn, kiuj ne deziros, ke vi tute dediĉu vin al kompatinda, blinda kriplulo, kia mi estas.”

”Mi ja diris al vi, sinjoro, ke mi estas sendependa kaj krom tio riĉa; mi estas nun mia propra mastrino.” ;

”Kaj ĉu vi volas resti ĉe mi?”

”Certe — se vi ne kontraŭstaros. Mi estos via najbarino, via flegistino, via mastrumistino. Mi trovas vin ĉi tie soleca kaj malĝoja: mi estos via fraŭlino de akompano. Mi laŭtleĝos al vi, mi promenos kun vi, ĉiam estos ĉe vi, respondos viajn

demandojn, servos al vi, mi estos viaj okuloj kaj manoj. Mia kara sinjoro, nun ne aspektu plu tiel malĝoja; tiel longe, kiel mi vivos, vi ne estos plu soleca.”

Li respondis nenion; li ŝajnis esti serioza — droninta en pensoj. Li dispartigis la lipojn kvazaŭ por paroli, sed ree fermis la buŝon. Mi estis iom embarasita. Eble mi transiris la limojn de bonmaniero tro rapide, kaj same kiel St. John li rimarkis ion nedecan en mia senpripenseco. Mi vere diris mian proponon, kvazaŭ li dezirus peti min fariĝi lia edzino. Kvankam mi ne esprimis mian atendon, ke li tuj faros tion, mi tamen preskaŭ kun certeco diris ion tian. Ĉar el lia buŝo eliris eĉ ne unu vorto rilate al tio, kaj ĉar lia vizaĝo fariĝis pli kaj pli malĝoja, min subite ekregis la penso, ke mi trompis min kaj ke mi agis kiel malsaĝulino. Tial mi iom post iom liberigis min el liaj brakoj — sed li premis min ankoraŭ pli forte al sia brusto.

”Ne — ne — Jane; ne foriru de mi. Ne, mi sentis vin, mi aŭdis vin paroli, mi sentis la konsolon de via proksimeco — la mildecon de via konsolo! Tiujn ĝojojn mi ne denove povas oferedoni. De mi mem restis nur malmulto, mi devas posedi vin. La mondo eble ridos — eble ĝi nomos min stulta, egoista — tio ne estas grava. Mia animo aspiras vin! Ĝia deziro devas esti plenumata, alie ĝi plenumos teruran venĝon kontraŭ sia ĉirkaŭkovraĵo.”

”Nu, sinjoro, mi ja diris, ke mi volas resti ĉe vi.”

”Jes, sed per tio vi celas ion, kion mi tute ne celas. Eble vi intencas per tio konstante esti apud mi por flegi min kiel bonkora eta flegistino (ĉar vi havas sindonan koron kaj noblani-man spiriton, kiuj instigas vin montri sinoferojn al tiuj, kiujn vi kompatas), kaj sendube tio devas sufiĉi por mi. Mi supo-

zas, ke mi devas havi por vi nur patrajn sentojn, ĉu ne? Nun respondu al mi.”

”Mi volas pensi, kion vi deziras, sinjoro, mi estos kontenta, se mi povus esti via flegistino, se vi tion deziras.”

”Sed vi ne povas ĉiam esti mia flegistino, Jane: vi estas juna — vi eble iam edziniĝos.”

”Estas al mi indiferente edziniĝi.”

”Ne estu indiferenta pri tio, Jane: se mi estus, kio mi iam estis, tiam mi klopodus paroligi vin alie — sed — mi estas nur senokulaĉo!”

Ree li ekdronis en malgajaj pensoj, sed mi fariĝis pli ĝoja kaj denove kuraĝiĝis. Liaj lastaj vortoj malfermis al mi la okulojn antaŭ la malfacilaĵoj. Por mi tamen, tiu malfacilaĵo ne ekzistis; miaj antaŭaj malcerteco kaj timo tute malaperis kaj mi komencis pli ĝojan interparoladon.

”Estas bezonate, ke iu faru vin ree pli homsimila,” mi diris, dum mi per la mano glatigis liajn malordiĝintajn harojn, ”ĉar mi vidas, ke iom post iom vi ŝanĝiĝas je leono aŭ io simila. Tute certe vi portas en vi ion pri la *”faux air”* de Nebukadnezar; viaj haroj memorigas min pri la plumoj de aglo; mi ankoraŭ ne rimarkis, ĉu viaj ungoj sanĝiĝis en birdo-ungegojn.”

”Je ĉi tiu brako mi havas nek manon nek ungojn,” li diris, tirante la kripligitan brakon el la brustopoŝo kaj montrante ĝin al mi. ”Ĝi estas nur stumpo — nur terura vidaĵo! Ĉu ne, mia eta Jane?”

”Malĝoja vidaĵo! Kaj estas ankaŭ malĝoje rigardi viajn okulojn kaj la bruldifekton sur via frunto; kaj kio estas plej malbona, oni estus inklina tro multe vin ami pro ĉiu tiu mizero kaj trodorloti vin.”

”Mi kredas, Jane ke vi kaptos teruro, se vi vidus mian brakon kaj mian difektitan vizaĝon.”

”Ĉu vere vi kredas tion? Sed ne diru tion al mi — pro timo, ke mi povu diri ion pri via prudento, tio estus flatado. Nun lasu min unu momenton, por ke mi bruligu helan fajron. Ĉu vi povas vidi hele brulantan fajron?”

”Jes, per la maldekstra okulo mi povas iom vidi ardolumon — ruĝetan nebulon.”

”Kaj ĉu vi vidas la kandelojn?”

”Tre nebule, — ĉiu el ili estas kvazaŭ hela nubeto.”

”Ĉu vi povas min vidi?”

”Ne, mia feino. Sed mi estas jam tre danka, se mi povas aŭdi aŭ senti vin.”

”Kiam vi vespermanĝas?”

”Neniam mi kutimas vespermanĝi.”

”Hodiaŭ vespere vi tamen vespermanĝu. Mi estas malsata, kaj mi estas certa, ke ankaŭ vi estas malsata, sed vi nur ne atentis pri tio.”

Post kiam mi estis vokinta Marian, ni baldaŭ estis pli bone ordigintaj la ĉambron; ankaŭ mi preparis por li bongustan vespermanĝon. Mia spirito estis ekscitita kaj dum la manĝo mi parolis kun li gaje kaj facile. Eĉ mi sukcesis mallongigi lian tempon per mia babilado. Ĉi tie forestis ĉiu retenemo, ĉiu premita viveco kaj gajeco; ĉar antaŭ li mi sentis min tre senĝena, sciante ke mi estis al li agrabla. Ĉio, kion mi diris aŭ faris, ŝajnis konsoli aŭ revivigi lin. Tio estas agrablega konscio! Tio vivigis kaj aperigis mian tutan proprecon. En lia apudeco mi vivis duoble, kaj li vivis en mia. Malgraŭ lia blindeco ofte rideto kuris sur lia vizaĝo kaj ĝojo montriĝis sur lia frunto. Liaj trajtoj estiĝis pli mildaj, pli molaj, pli feliĉkonsciaj.

Post la vespermanĝo li faris al mi multajn demandojn: kie mi antaŭe estis kaj faris kaj kiel mi sukcesis trovi lin. Mi respondis tamen nur parte, ĉar estis jam tro malfrue por priparoli specialajn detalojn. Krome mi ne deziris tuŝi delikatajn, vibrantajn kordojn, nek malfermi novan fonton de ekscito en lia koro; mia sola celo nun estis distri lin kaj tion mi jam faris, sed nur iom post iom. Post paŭzo en nia interparolado, li denove fariĝis senripoza, li tuŝis min kaj diris: "Jane."

"Ĉu vi vere estas homa estaĵo, Jane? Ĉu tute vere vi estas tia?"

"Pro honoro kaj konscienco, mi kredas ke jes, sinjoro Rochester."

"Kiel do estis eble, ke tiel subite vi aperis sur mia soleca kameno en ĉi tiu senkonsola vespero? Mi etendis la manon por preni glason da akvo de servistino — kaj vi donis ĝin al mi. Mi faris demandon kaj atendis, ke la edzino de John respondu min — kaj via voĉo sonis en miaj oreloj."

"Ĉar anstataŭ Maria mi estis enirinta en la ĉambron kun la pleto."

"Kaj vera sorĉo kuŝas en la horo, kiun mi nun pasigas kun vi. Neniu scias, kiel senkonsolan, malluman, malplenan, senesperan vivon mi trabatalis dum kelkaj monatoj! Mi havis plu nenion kaj atendis plu nenion; la tago ŝanĝiĝis en nokton, kaj mi ne rimarkis tion; mi sentis malvarmon, kiam mi lasis estingiĝi la fajron; kaj malsaton, kiam mi estis forgesinta manĝi; poste neniam finiĝantan doloron, kaj ofte preskaŭ frenezan deziron ankoraŭ unu fojon revidi mian Jane. Jes, pli multe mi aspiris, ke vi estu redonata al mi ol reakiri la perditan lumon de miaj okuloj. Kiel estas eble, ke Jane estas ĉe mi kaj diras,

ke ŝi min amas? Ĉu ŝi denove ne malaperos kiel ŝi revenis? Ho, mi timas ne revidi vin morgaŭ.”

Mi estis certa, ke estas por li plej bone en ĉi tiu animstato, doni al li tre trivialan praktikan respondon, kiu havas nenion por fari kun lia nuna ekscitita pensirado. Tial mi glitigis la fingron trans liajn brovojn kaj rimarkis, ke ili estas bruldifektitaj, sed mi konis rimedon, refoje fari ilin tiel larĝaj kaj nigraj, kiel ili estis antaŭe.

”Kian utilon tio havos, fari al mi ian bonon, ho bonfaranta feino, se en fatala momento vi tamen forlasos min? Se vi forŝteliĝos de mi kiel ombro kaj mi ne scias kial kaj kien, kaj se poste vi restos por mi neretrovebla?”

”Ĉu vi havas kombilon en la poŝo, sinjoro?”

”Kiacele, Jane?”

”Nur por kombaranĝi la senordajn nigrajn kapharojn. Kiam mi atente vin rigardas, tiam vi preskaŭ timigas min. Vi diras, ke mi estas kiel feino, sed mi opinias, ke vi similas pli multe koboldon.”

”Ĉu mi estas malbelega, Jane?”

”Tre malbelega, sinjoro. Vi ja scias, ke vi ĉiam estis tia.”

”Hm! Nu, kie ajn vi estis dum ĉiu tiu tempo, via maliceco ne forlasis vin.”

”Tamen mi estis ĉe bonaj homoj, kiuj estas pli bonaj ol vi, centfoje pli bonaj; kiuj havas ideojn kaj opiniojn, kiujn vi dum via tuta vivo neniam konis; kiuj estas pli delikataj kaj pli civilizitaj ol vi!”

”Pro la diablo, ĉe kiuj vi do estis?”

”Se vi ne sidas senmove kaj kviete, tiam mi nepre elŝiros al vi la harojn; kaj tiaokaze vi espereble perdos ĉiun dubon pri mia apudesto.”

”Ĉe kiuj vi do estis, Jane?”

”Hodiaŭ vespere vi ne sukcesos rakontigi tion al vi, sinjoro; vi devas atendi ĝis morgaŭ; vi scias, ke estos speco de certeco por vi, ke mi ree aperos morgaŭ matene je matenmanĝo, se mi rakontos mian historion nur duone hodiaŭ vespere. Sed subite min trafas la penso, ke mi devis aperi antaŭ vi kun nur duona glaso da akvo; mi devos alporti almenaŭ ovon, jam ne parolante pri fritita ŝinko.”

”Ho mokema sorĉistino! — naskita de feino kaj edukita de homoj! Dum dek du monatoj mi ne spertis, kion mi nun speratas pere de vi. Se Saul estus veniginta vin al Davido, tiam la malbonaj spiritoj estus ankaŭ ekzorcitaj sen la harpo.”

”Jen sinjoro, nun mi dece kombaranĝis viajn harojn kaj nun mi volas forlasi vin. La dutaga vojaĝo tre lacigis min. Bonan nokton!”

”Ankoraŭ unu sola demando, Jane! Ĉu estis nur sinjorinoj en la domo, kie vi loĝis?”

Laŭte mi ekridis kaj forŝteliĝis de li. Kaj kiam mi supreniris la ŝtuparon, mi ridis ankoraŭ.

”Jen bonega ideo!” mi pensis, plena de ĝojo. ”Mi vidas, ke mi posedas la rimedon, tiom turmenteti lin, ke lia melankolio almenaŭ dum mallonga tempo ne plu regos lin.”

Jam tre frue la sekvintan matenon mi aŭdis lin senriproze promeni tien kaj reen de unu ĉambro en alian. Tuj kiam Maria venis malsupren, mi aŭdis lin demandi: ”Ĉu fraŭlino Eyre estas ĉi tie?” kaj poste: ”Kiun ĉambron vi pretigis por ŝi? Ĉu ĝi estis seka? Ĉu ŝi jam leviĝis? Iru kaj demandu, ĉu ŝi bezonas ion kaj kiam ŝi venos malsupren.”

Mi venis malsupren, tuj kiam mi pensis, ke la matenmanĝo estas preta. Tre mallaŭte mi eniris en la ĉambron kaj vidis lin

antaŭ ol li rimarkis mian apudeston. Estis vere malĝoje vidi, kiel korpa kripleco subigis tiun fortan spiriton. Li sidis en sia seĝo — senmove, sed ne kviete, okulŝajne plena de atendo; la trajtoj de lia kutima malĝojo tre profundigis sur lia vizaĝo. Li memorigis min pri perforte estingita lampo, kiu atendas ree esti bruligata — kaj ho ve! li ne estis plu si mem, kiu povis flamigi la brilon de vivigita mieno: li estis dependa de aliulo, kiu devis preni sur sin tiun taskon! Mi estis intencinta esti ĝoja kaj senzorga, sed la senhelpeco de ĉi tiu forta viro tuŝis mian animon! Tamen mi alparolis lin per la tuta gajeco, kiun mi en tiu momento povis montri:

”La mateno estas hela kaj suna, sinjoro,” mi diris. ”Ne pluvas plu kaj la suno lumas tiel milde; ni povus fari promenon duope.”

Mi estis viviginta ĉiun brilon, pri kiu mi ĵus parolis; lia vizaĝo heliĝis.

”Ho, ĉu vere estas tie mia kara alaŭdo! Venu al mi. Ĉu vi ree ne forflugis por malaperi? Antaŭ horo mi aŭdis ekstere alian alaŭdon, ĝi laŭte kaj alte kantis super la arbaro, sed ĝia kanto ne havis melodion por mi, same kiel la supreniranta suno ne havas por mi radiojn. Por miaj oreloj koncentriĝas la melodio de la tuta tero en la voĉo de mia Jane (kaj kiel ĝoja mi estas, ke ŝi ne estas silentema!) kaj sunbrilon mi sentas nur en ŝia apudeco.”

La larmoj eniris en miajn okulojn, kiam mi aŭdis la konfeson de lia dependeco. Estis ĝuste kvazaŭ reĝa aglo, katenita al sia stango, petegus paseron, ke ĝi estu ĝia provizisto. Sed mi ne volis plori, mi forviŝis la larmojn kaj pretigis por li la matenmanĝon.

La plej grandan parton de la mateno ni pasigis eksterdo-

me. Mi kondukis lin tra la sovaĝa arbaro sur la sunplenan kamparon; mi rakontis al li, kiel freŝe verdaj ili estas; kiel refreŝiĝinte aspektas la floroj kaj plekto-bariloj post la pluvo, kiel brile blua estas la ĉielo. Sur soleca, agrabla loko mi serĉis por li sidejon: sekan arbostumpon. Kiam li estis sidanta, mi ne kontraŭstaris, kiam li tiris min sur sian genuon. Kaj kial mi kontraŭstaru? Ni ja estis feliĉaj estante tiel proksime unu al alia! Piloto kuŝis flanke de mi. Ĉirkaŭe regis la senbruo, paco!

Subite li ĉirkaŭbrakis min kriante:

”Kruela, kruela forkurintino! Ho Jane, kion mi sentis, malkovrante, ke vi forkuris de Thornfield, kaj ke nenie mi povas trovi vin; kiam mi traserĉis vian ĉambron kaj vidis, ke vi kunprenis nek monon nek ion alian, kio povus utili vin! Ĉirkaŭkolo el perloj, kiun mi antaŭe donacis al vi, kuŝis en sia ujo; viaj kofroj estis ŝlositaj kaj ĉirkaŭitaj de ŝnuroj, kiel ili estis pretigitaj por nia edziĝvojaĝo. Kion do mia karulino povus entrepreni; tiel mi seninterrompe demandis al mi, sen mono kaj senigita de ĉiuj rimedoj? Kaj kion ŝi entreprenis? Nun rakontu tion al mi.”

Cedante al liaj petoj mi fine rakontis miajn travivaĵojn de la lasta jaro. Kiam mi rakontis pri tiuj tri tagoj de disvagado, de almozpetado kaj malsato, mi silentis pri multa spertita mizero, ĉar ĝi povus nur kaŭzi al li senutilan ĉagrenon, se li ekscius ĉion, kion mi estis travivinta; la malmulto, kiun mi rakontis, vundis lian fidelan koron jam pli profunde, ol mi dezirus.

Li diris, ke mi ne devus lin forlasi tiel tute sen mono, por serĉi mian vojon; mi devus sciigi al li mian intencon. Mi devus fidi lin, ĉar neniam li estus deviginta min estiĝi lia ama-

fino. Kiel ajn kolera li estis en sia senespero, li vere min amastro multe kaj tro kore por iam fariĝi mia tirano. Li estus donacinta al mi sian duonan havaĵon ne postulante eĉ unu kison kiel rekompenco; sed mi ne forkuru senmona, senhelpa, senamika por vagi en la mondo. Li diris, ke li estas certa pri tio, ke mi suferis multe pli multe ol mi nun al li konfesis.

”Nu, kiaj ajn estu miaj sufero kaj manko, ili tamen ne daŭris longe,” mi respondis kaj daŭrigis rakonti, kiel oni akceptis min en Moor House, kiel mi ricevis la oficon de instruistino en vilaĝa lernejo kaj tiel plu. Rakontante sinsekve plue mi poste klarigis kiel mi akiris mian havaĵon kaj kiel mi eksciis, ke mi estas ĉe parencoj. Komprenoble dum la rakonto mi venis al la nomo de St. John Rivers kaj ofte mi ripetis tiun nomon. Kiam mi finis, li tuj menciis ĝin, demandante:

”Ĉi tiu St. John sekve estas via kuzo?”

”Jes.”

”Ofte vi parolis pri li: ĉu vi lin ŝatas?”

”Li estas tre bona viro, sinjoro; mi ne povas ne ŝati lin.”

”Bona viro. Ĉu tio signifas respektinda, bone edukita viro kvindekjara? Aŭ kion alian tio signifas?”

”St. John estas nur dudek naŭ, sinjoro.”

”*Jeune encore*, kiel diras la francoj. Ĉu li estas malalta, flegma kaj malhela? Ĉu persono, kies boneco konsistas pli multe en senkulpeco pri malvirtoj, ol en tio, ke li praktikas virtojn?

”Li estas nelacigeble laborema. Li vivas nur por plenumi grandajn aferojn.”

”Sed lia prudento? Sendube ĝi estas malgranda! Eble li havas la plej bonajn intencojn, ĉu ne? kaj oni skuas la ŝultrojn aŭdante lin paroli, ne vere?”

”Li parolas malmulte; sed tio, kion li diras, ĉiam trafas la celon. Li estas tre prudenta — laŭ mia opinio — ne tre impresema, sed potenca.”

”Sekve, li estas kapabla viro, ĉu ne?”

”Tre kapabla.”

”Kaj tre tre civilizita viro?”

”St. John Rivers estas rimarkebla kaj funde civilizita viro.”

”Sed al mi ŝajnas, ke laŭ via diro liaj manieroj ne estas tute laŭ via gusto? — afektitaj kaj pastraj?”

”Mi tute ne parolis pri liaj manieroj; sed mia gusto estus tre malbona, se ili ne plaĉus al mi. Li estas ĝentila, kvieta kaj konstante sin regas.”

”Kiel li aspektas, — mi tute forgesis pri tio, kion vi diris pri tio; ĉu li estas kruda vilaĝpastro, kiu preskaŭ sufokas en sia blanka ĉirkaŭkolo kaj en siaj dikplandaj botoj iras kiel sur stilzoj?”

”St. John sin vestas tre bone. Li estas bela viro, svelta, pala, kun bluj okuloj kaj greka profilo.”

(flanken): ”La diablo lin prenu!” — (al mi): ”Kaj ĉu vi lin ŝatas Jane?”

”Jes, Sinjoro Rochester, mi lin ŝatas; sed vi jam du fojojn demandis tion.”

Mi nature jam longe rimarkis, kion la demandanto celis. La ĵaluzo estis kaptinta lin kaj ĝi turmenis kaj ekscitis lin; sed tio estis bona, ĉar ĝi senigis lin de lia malĝoja melankolio, kiu premis lin teren. Tial mi ne tuj volis forpeli la ĵaluzon.

”Eble estos al vi maloportune, fraŭlino Eyre, sidi ankoraŭ pli longe sur mia genuo, ĉu ne?” li fine kaj neatendite rimarkis.

”Kial do, sinjoro Rochester?”

”La bildo, kiun vi ĵus priskribis al mi, sendube pligrandigos la grandegan kontraston. Viaj paroloj pentris ĉarman Apolonon; vi tre klare prezentas lin al la okuloj — svelta, pala, blujaj okuloj, greka profilo! Kaj nun viaj okuloj renkontas Vulkanon — veran forĝiston, brunan, larĝŝultran kaj krom tio kripligitan kaj blindan.”

”Pri tio mi ĝis nun ankoraŭ ne pensis; sed vi multe similas Vulkanon, sinjoro.”

”Bone, bela fraŭlino. Nun forlasu min; sed antaŭ ol vi faras tion,” (kaj li tenis min pli firme ol antaŭe) ”vi havu la komplezon respondi al mi ankoraŭ unu aŭ du demandojn.”

Li eksilentis.

”Kiujn demandojn, sinjoro Rochester?”

Tiam sekvis la sekvanta kontraŭdemando:

”St. John havigis al vi oficon de instruistino en Morton, antaŭ ol li sciis, ke vi estas lia kuzino?”

”Jes.”

”Ĉu vi ofte estis kune kun li? Ĉu li ofte vizitis la lernejon?”

”Ĉiutage.”

”Kaj li aprobis vian instrumanieron, Jane? Mi estas certa, ke ĝi estis bona, ĉar vi estas talentplena kreitaĵo.”

”Li aprobis ĝin, jes.”

”Li malkovris en vi multajn bonajn flankojn, kiujn li antaŭe ne atendis, ĉu ne? kelkaj el viaj talentoj estas ja eksterordinaraj.”

”Tion mi vere ne scias.”

”Vi diris, ke vi havas dometon apud la lernejo, ĉu ne? ĉu li ofte venis en ĝin por viziti vin?”

”Tiam kaj tiam.”

”Vespere?”

”Unu — aŭ du fojojn.”

Sekvis paŭzo.

”Kaj kiel longe vi loĝis kun li kaj liaj fratinoj, post kiam li malkovris la parencecon?”

”Kvin monatojn.”

”Ĉu St. John Rivers pasigis grandan parton de sia tempo ĉe la fraŭlinoj de sia familio?”

”Jes. La malantaŭa familia ĉambro estis ne nur lia studejo, sed ankaŭ nia. Li kutime sidis apud la fenestro kaj ni ĉetable.”

”Ĉu li multe studis?”

”Tre multe.”

”Kion?”

”La hindostanan lingvon.”

”Kaj kion vi faris intertempe?”

”Komence mi studis la germanan.”

”Ĉu li instruis vin?”

”Li tute ne konis la germanan lingvon.”

”Ĉu li instruis al vi tute nenion?”

”Iomete la hindostanan.”

”Ĉu Rivers instruis al vi la hindostanan?”

”Jes, sinjoro.”

”Ĉu ankaŭ al siaj fratinoj?”

”Ne.”

”Nur al vi?”

”Nur al mi.”

”Ĉu vi petis lin, ke li instruu vin?”

”Ne.”

”Do li deziris instrui vin?”

”Jes.”

Sekvis dua paŭzo.

”Kial li deziris tion? Kiun utilon alportus al vi tiu lingvo?”

”Li volis, ke mi iru kun li al Hindujo.”

”Ha! nun mi venas al la radiko de ĉio. Li volis, ke vi fariĝu lia edzino!”

”Li petis min, ke mi edziniĝu kun li.”

”Tio estas mensogo — impertinenta mensogo por kolerigi min!”

”Mi petas pardonon, tio estas vera; li petis tion pli ol unu fojon kaj obstine sin tenis al sia volo, same kiel vi estus farinta tion.”

”Fraŭlino Eyre, mi ripetas ankoraŭfoje, vi forlasu min. Kiomfoje mi do devas ripeti tiun saman aferon? Kial vi restas tiel obstine sidanta sur mia genuo, kiam mi diras al vi, ke vi foriru?”

”Ĉar ĉi tie mi sentas min tre komforta.”

”Ne, Jane, vi ne sentas vin tre komforta ĉi tie, via koro ne estas ĉe mi; ĝi estas ĉe via kuzo St. John Rivers! Ho, ĝis ĉi tiu momento mi kredis, ke mia eta Jane apartenas nur al mi! Ĝi post kiam ŝi forkuris de mi, mi kredis ankoraŭ, ke ŝi min amas, — tio estis la sola atomo de dolĉeco en mia amara vivo-kaliko. Kiel longe ajn ni estis disigitaj — kiom ajn da varmegaj larmoj mi verŝis pro nia disiĝo — mi tamen *neniam* kredis, ke ŝi amas iun alian, dum mi tiel kore malĝojis pro ŝi! Sed kio utilas al mi mia malĝojo! Jane, forlasu min! Iru for kaj edziniĝu kun Rivers.”

”Vi do forpuŝas min de vi, sinjoro — forpuŝas min! Propravole mi ne forlasos vin.”

”Ho, Jane, kiel mi amas ankoraŭ la sonon de via voĉo! Ĝi vekas ĉe mi denove la esperon, ĝi sonas tiel honeste kaj fidele. Kiam mi ĝin aŭdas, ĝi rekondukas min tutan jaron en la estin-

tecon. Mi forgesas, ke vi kunigis novajn ligilojn! — Sed mi ne estas malsaĝulo — iru for —”

”Kien mi iru, sinjoro?”

”Iru vian propran vojon kun la edzo, kiun vi elektis por vi.”

”Kaj kiu li estas?”

”Tion vi scias, — St. John Rivers.”

”Li ne estas mia edzo kaj neniam estos. Li min ne amas — mi lin ne amas. Li amas (se li *povas* ami, kaj tio ne estas, kiel vi povas ami) belan, junan knabinon, Rosamond. Min li volis nur edziĝi ĉar li kredas, ke mi taŭgas kiel edzino de misiisto — kaj tion li ne atendis de Rosamond. Li estas bona kaj granda, sed severa, kaj antaŭ mi li estas malvarma kiel glacimonto. Li ne estas kiel vi, sinjoro; mi ne estas feliĉa ĉe lia flanko, nek en lia apudeco, nek en lia akompano. Li ne indulgas min — li ne sentas amon al mi. En mi li vidas nenion allogan, eĉ ne mian junecon — sed nur kelkajn spiritajn proprecojn. — Ĉu nun mi forlasu vin, sinjoro, por iri al li?”

Senvole tremeto trakuris min kaj instinkte mi premis min pli forte al mia amata, blinda mastro. Li milde ridetis.

”Kion, Jane? Ĉu tio estas vera? Ĉu vere la aferoj staras tiel inter vi kaj St. John Rivers?”

”Ĝuste tiel, sinjoro. Ho, vi ne havas kaŭzon esti ĵaluza! Mi volis nur iom inciteti vin por tiri vin el via malĝojo. Mi kredas, ke kolereto por vi estas pli bona ol ĉagreno. Se vi tamen dezirus, ke mi vin amu, se vi povus nur vidi, kiom mi vin amas, tiam vi estus fieraj kaj kontentaj. Mia tuta koro, mia tuta animo apartenas al vi, sinjoro. Kaj ĉe vi ili ĉiam restos, se la sorto estos tiel kruela, ke ĝi por ĉiam ekzilos mian ceteran ”min” el via apudeco!”

Li kisis min. Sed refoje malhelaj nuboj glitis trans lian frunton.

”Mia perdita okulolumo! Mia paralizita forteco!” li malĝoje murmuris.

Mi karesis lin por kvietigi lin. Mi sciis, al kio li pensis; volonte mi volus paroli por li, sed mi ne kuraĝis. Kiam li turnis la kapon iom flanken, mi vidis flui larmon el sub liaj fermitaj palpebroj kaj ruliĝi trans liajn bruniĝintajn vangojn. Mia koro laŭte kaj forte batis. Post longa silentado li rimarkis: ”Nun mi ne estas io pli ol la maljuna nuksarbo trafita de la fulmo en la okcidenta parko de Thornfield Hall. Kaj kiun rajton havis tiu arbotrunko, ke arbara vento kovru ĝin per freŝa verdaĵo?”

”Vi ne estas malviva arbotrunko, nek ruino, sinjoro — vi estas de fulmo frakasita arbo; vi estas ankoraŭ verda kaj forta. El viaj radikoj elkreskos plantoj, indiferente ĉu vi petas tion al ili aŭ ne, ĉar ili amas vian bonfarantan ombron. Kaj kiel ili kreskas, ili apogos sin je vi kaj volviĝos ĉirkaŭ vi, ĉar via forto transdonas al la malfortaj markotoj tian certan subtenon.”

Refoje li ridetis kaj mi konsolis lin.

”Ĉu vi parolas pri amikoj, Jane?” li demandis.

”Jes, pri amikoj,” mi respondis iom hezitante, ĉar mi bone konsciis, ke mi celis pli multe ol amikojn. Sed mi ne tiel rapide trovis la ĝustan vorton. Tamen li helpis al mi.

”Ho, Jane! mi aspiras je edzino.”

”Ĉu vere, sinjoro?”

”Jes! Ĉu tio mirigas vin?”

”Kompreneble! Ĝis nun vi tute ne aludis ion tian.”

”Ĉu la sciigo estas al vi malbonvena?”

”Tio dependas de cirkonstancoj, sinjoro — aŭ reale de via elekto.”

”Vi elektu por mi, Jane. De via decido dependos ĉio.”

”Tial elektu tiun — kiu plej multe vin amas, sinjoro.”

”Almenaŭ mi volas elekti tiun — kiu min plej multe amas, Jane, ĉu vi volas edziniĝi kun mi?”

”Jes, sinjoro.”

”Kun kompatinda, blinda viro, kiun vi devos konduki je la mano, Jane?”

”Jes, sinjoro.”

”Kun kriplulo, kiu estas dudek jarojn pli aĝa ol vi, kaj kiun vi devos flegi kaj prizorgi!”

”Jes, sinjoro.”

”Ĉu vere, Jane?”

”Certe kaj tre vere, sinjoro.”

”Ho, mia karulino! mia karulino! la ĉiopotenca Dio benu, rekompencu vin!”

”Sinjoro Rochester, se iam en mia vivo mi plenumis bonan aferon — se iam mi havis noblan penson — se mi sendis supren sinceran preĝon — se mi havis justan deziron — tiam mi estas nun rekompencita. Fariĝi via edzino signifas por mi esti tiel feliĉa, kiel iam mi povus esti en ĉi tiu mondo.”

”Ĉar vi estas feliĉa, kiam vi faras oferon.”

”Oferon! Kian oferon mi do faras? Malsategon por manĝaĵo! atendon por kontenteco. Ke estas al mi permesate ĉirkaŭbraki, kion mi ŝatas — premi miajn lipojn sur tion, kion mi amas — ripozi ĉe tiu, kiun mi fidis: ĉu tio estas fari oferon? Kaj se vere estas tiel, tiam mi estas feliĉa povi fari oferon.”

”Kaj elporti mian kriplecon, Jane, kaj rigardi trans miajn mankojn?”

”Por mi tio ne estas kripleco, nek mankoj, povi esti utila al vi; mi amas vin pli kore ol en la tempo de via fiera sendependeco, kiam vi malŝatis ĉiun rolon esceptinte tiun de donacanto kaj protektanto.”

”Ĝis nun mi sentis malamon, kiam oni helpis al mi, kaj kiam oni kondukis min. Sed de nun — tion mi sentas — mi ne plu malamos tion. Estis al mi terure meti mian manon en tiun de dungito, sed estas bonfaro kiam la delikataj fingroj de Jane ĉirkaŭas ilin. Mi preferis absolutan solecon pli ol ĉiaman apudecon de servistoj; sed la pacienca kondukado de Jane estos por mi ĉiama ĝojo. Jane estas agrabla al mi. Ĉu mi ankaŭ al ŝi?”

”Ĝis mia plej delikata nervo, sinjoro.”

”Nu, se tiel estas, ni havas plu nenion en la mondo por atendi; ni devas geedziĝi kiel eble plej baldaŭ.”

Li aspektis ekscitita kaj parolis vive; lia antaŭa malkvieto refoje vekigis.

”Sen prokrasto ni devas fariĝi unu karno, Jane; ni bezonos nur la leĝan permeson — poste ni geedziĝos.”

”Sinjoro Rochester, ni vidis, ke la suno jam subiris sub la meridianon, kaj Piloto jam iris hejmen por vespermanĝi. Montru al mi vian poŝhorloĝon.”

”Metu ĝin je via zono, Jane, kaj tenu ĝin tie. Mi ja ne povas uzi ĝin plu.”

”Estas preskaŭ la kvara posttagmeze, sinjoro. Ĉu vi ne estas malsata?”

”Post tri tagoj okazos nia geedziĝo, Jane. Ni ne atentu pri belaj vestoj kaj juveloj kaj tiaj aferoj: ĉio tio valoras nenion.”

”La suno forsekgis ĉiun pluveron, sinjoro. La vento kuŝigis — fariĝis varmega vetero.”

”Ĉu vi scias, Jane, ke mi en ĉi tiu momento portas sur mia bronzkolora nuko sub mia kravato vian malgrandan perloĉirkaŭkolon? Mi portas ĝin de la tago kiel memoraĵon je mia perdita trezoro.”

”Ni iros hejmen tra la arbaro, tie ni havos ombran vojon.”  
Ne atentante miajn parolojn, li daŭrigis sian pensiradon.

”Jane, mi estas certa, ke vi rigardos min kiel idolanon, sed en ĉi tiu momento mia koro ŝvelas pro dankemo al la kompatema Dio de ĉi tiu tero. Li ne vidas kiel la homoj, j. Li vidas pli klare. Li ne juĝos kiel homoj juĝas, sed pli saĝe. Mi agis maljuste. Mi volis makuli mian senkulpan floron — mi volis malpurigi ĝian purecon kun kulpo — kaj la ĉiopotenca Dio fortiris ŝin de mi. En mia obstina ribelo mi malbenis tiun dian aranĝon; anstataŭ min fleksi, mi ĝin kontraŭstaris. Sed la dia justeco iris sian vojon; la malfeliĉo preskaŭ premis min teren; mi estis devigata trairi tra la valon de la morto. Liaj punoj estas potencaj, kaj unu el ili min trafis, kiu por ĉiam humiliĝis min. Vi scias, ke mi estis fiero pro mia forto. Kaj kio ĝi estas nun? Mi devas transdoni min al la kondukado de aliuloj, kiel malforta, neplenaĝa infano. Nur antaŭ nelonge, Jane — nur antaŭ nelonge mi ekkonis la manon de Dio en mia puno. Mi sentis konscienc-riproĉojn, mi sentis la deziron repaciĝi kun mia kreinto. Kelkfoje mi preĝis; la preĝoj estis mallongaj sed sinceraj.”

”Antaŭ kelkaj tagoj — ne, mi povas kalkuli ilin — antaŭ kvar tagoj; estis en la vespero de la lasta monato; tiam min regis tre stranga animstato; anstataŭ koleron kaj frenezon mi sentis ĉagrenon, en loko de fiero mi sentis doloron. Jam longe estis vekiĝinta en mi la konvinko, ke sen dubo vi estas mortinta, ĉar nenie vi estis trovebla. Mafrue tiun vesperon — estis

eble inter la dek-unua kaj la dek-dua — antaŭ ol mi kuŝigis sur mian senkonsolan liton, mi preĝis al Dio, ke Li baldaŭ, se plaĉus al Li, forprenu min de ĉi tiu vivo, en kiu mi estis perdinta la esperon revidi mian Jane.

”Mi estis en mia ĉambro kaj sidis apud la malfermita fenestro; la balzama nokta aero efikis sur min kvietigante. Mi ne povis vidi la stelojn, kaj nur unu pala hela nebulo montris al mi, ke la luno jam leviĝis. Ho, Jane, kaj mi sopiris al vi. Mi sopiris vin korpe kaj anime. Mi demandis Dion — en angoro kaj humileco, ĉu mi ankoraŭ ne sufiĉe longe estis soleca, punita kaj turmentita; ĉu neniam plu mi trovos feliĉon kaj pacon. Mi konfesis al Li, ke mi meritas ĉion, kion mi devas suferi — sed ke mi preskaŭ ne povos elporti pli multon. Kaj tiam la alfo kaj la omego de tuta mia kordeziro senvole eksplodis de miaj lipoj per la vortoj:

”Jane! Jane! Jane!”

”Kaj ĉu vi laŭte diris tiujn vortojn?”

”Tion mi faris, Jane. Se iu min estus aŭdinta, tiam li estus kredinta min freneza, ĉar mi eldiris ilin kun freneza energio.”

”Kaj tio okazis la lastan lundon vespere? Ĉirkaŭ noktomezo?”

”Jes; sed la tempo estas sen signifo; kio tamen sekvis, tio estas la plej stranga en la afero. Vi kredos min superstiĉa — ĉar en mia sango sin kaŝas kelka superstiĉo — sed malgraŭ tio estas vere — almenaŭ estas vere, ke mi aŭdis, kion mi nun rakontos:

”Kiam mi kriis Jane! Jane! tiam voĉo respondis — mi ne povas diri, de kie ĝi venis, sed mi scias, kies voĉo ĝi estis — ”Mi venas, atendu min,” kaj tuj poste la vento alportis al mi la flustre parolitaj vortoj: ”Kie vi estas?”

”Se mi povus, mi priskribus al vi la penson, la bildon, kiun tiuj vortoj disvolvis antaŭ mia animo; sed estas malfacile esprimi, kion mi volus esprimi. Kiel vi vidas, Ferndean kuŝas kaŝita en densa arbaro, kie ĉiu bruo formortas obtuze kaj sen ĉho. Ŝajne ”Kie vi estas?” estis parolata inter montoj, ĉar mi aŭdis, ke monta ĉho ripetis la vortojn. Ŝajnis, ke la vento en tiu momento karesis mian frunton pli malvarmete kaj pli freŝe, preskaŭ mi povus imagi, ke Jane kaj mi denove staras sur sovaĝa soleca loko. Mi kredas, ke niaj animoj retrovis unu la alian. Sendube vi en tiu horo dronis en profunda kaj senkonscia dormo, eble via animo liberiĝis de sia ĉirkaŭkovraĵo kaj rapidis al mia por konsoli ĝin; ĉar estis via voĉo tiel vere kiel mi vivas — tio estis via voĉo!”

Leganto! estis en lundovespero — je noktomezo — kiam ankaŭ mi aŭdis la misterplenan voĉon; estis tiuj vortoj, per kiuj mi estis respondinta ĝin. Mi aŭskultis la rakonton de sinjoro Rochester, sed miaflanke mi ne donis klarigon. La koincido ŝajnis al mi tro neklarigebla kaj tro terurplena por paroli pri ĝi. Se iel mi rakontus pri ĝi, tiam mia rakonto nepre estus tia, ke ĝi profunde impresus la animon de mia aŭskultanto; kaj tiu animo, kiu pro sia malĝoja cerbumado estis jam tro multe premita, ne bezonis la profundan ombron, kiun la supernatureco ĉiam ĵetas ĉirkaŭ si. Tial mi silentis pri tiuj aferoj kaj sola cerbumis pri ili.

”Vi sendube nun ne plu miros,” parolis plue mia sinjoro, ”ke fariĝis al mi malfacile rigardi vin kiel ion alian ol vizio, voĉo, kiam hieraŭ vespere vi tiel subite staris antaŭ mi; mi kredis, ke refoje vi malaperos en silenton kaj en la nenion, kiel tiu noktomeza flustrado kaj montoĉho antaŭe formortis.

Nun mi dankas Dion! nun mi ne dubas plu! Jes, fundkore mi dankas Dion!”

Li starigis min de sia genuo, leviĝis, respekte prenis la ĉapelon de sia kapo, kaj teren mallevante siajn blindajn okulojn, li longe restis staranta en senparola meditado. Nur la lastaj vortoj de lia preĝo estis aŭdeblaj:

”Mi dankas mian Kreinton, ke meze de la puno Li pardonis al mi. Humile mi petegas mian Liberiginton, ke Li donu al mi la forton rekomenci de nun pli bonan, pli puran vivon ol mi faris antaŭe!”

Poste li etendis la manon, por ke mi konduku lin. Mi prenis la karegan manon, premis ĝin momenton sur miaj lipoj kaj tiam lasis ĝin meti sur mian ŝultron. Estante tiom pli malgranda ol li, mi servis lin ne nur kiel apogilo, sed ankaŭ kiel kondukantino. Ni en iris la arbaron kaj direktis nin hejmen.

## Ĉapitro XXXVIII.

— *La fino* —

**L**eganto, mi edziniĝis kun li kaj nia geedziĝo okazis tran-  
kvile. Ĉeestis nur li, mi, la pastro kaj la pedelo. Kiam mi  
revenis de la preĝejo, mi malsupreniris al la kuirejo de la  
domo, kie Maria pretigis la matenmanĝon kaj John brilpuri-  
gis la tranĉilojn, kaj mi diris:

”Maria, hodiaŭ matene mi edziniĝis kun sinjoro Roches-  
ter.”

La mastrumistino kaj ŝia edzo apartenis al tiaj decaj kaj  
flegmaj homoj, al kiuj oni ĉiumomente kun certeco povas  
sciigi rimarkindan, eksterordinaran okazintaĵon, ne bezonan-  
te timi, ke unue akra krio rompos al vi la timpanan membra-  
non, kaj ke poste oni dronos en rivero da vortoriĉaj miregoj.  
Maria rigardis supren al mi, tio estas vera; la kulerego, el kiu  
ŝi verŝis varmegan grason sur paron da kokinoj, kiuj estis  
rostataj super la fajro, restis ĉirkaŭ tri minutojn senmove en  
la aero, kaj dum tiu tempo la polurado de la tranĉilo en la  
mano de John estis interrompita. Sed poste Maria diris nur,  
klinante sin super la rostaĵo:

”Ĉu vere, fraŭlino? Kion vi diras!”

Kaj post momento ŝi diris plue: ”Mi vidis vin eliri kun la  
sinjoro, sed mi ne sciis, ke vi iras al la preĝejo por geedziĝi,”  
kaj denove ŝi daŭrigis la rostadon.

Kiam mi iris al John, li amike grimacridetis al mi, dirante:  
”Mi jam diris al Maria, kio okazos; mi sciis, ke sinjoro

Edward” (John estis malnova servisto, kaj jam konis sian sinjoron, kiam ĉi tiu estis ankoraŭ la pli juna filo de la domo, tial li ofte nomis lin je lia baptonomo, kaj tio estis pardonata al li) — ”mi sciis, kion faros sinjoro Edward kaj estis konvinkita, ke li ne longe atendos. Nu, kiom mi povas juĝi, li agis prave. Mi deziras al vi multan ĝojon, fraŭlino!”

Tion dirante, li respekte tuŝis siajn fruntharojn.

”Mi vin dankas, John. Sinjoro Rochester donacis al mi ĉion por vi kaj por via edzino,” kaj mi enmanigis al li bankbileton kvinfuntan. Ne atendante pluajn ruĝiĝojn kaj dankesprimojn, mi eliris el la kuirejo. Mallongan tempon poste irante laŭlonge de la pordo de tiu sanktejo, mi subaŭskultis la jenajn parolojn:

”Eble ŝi estos por li pli taŭga edzino ol iu el la eminentaj fraŭlinoj.” Kaj poste:

”Kvankam ŝi ne estas unu el la plej belaj, ŝi tamen ne estas malbela, kaj krome tre tre bonkora, kaj laŭ lia opinio ŝi estas mirakle bela. Tion ĉiu ja vidas.”

Mi skribis tuj al Cambridge kaj al Moor House, por sciigi al miaj geparencoj, kion mi faris. Mi ankaŭ klare deklaris, kial mi agis tiel. Diana kaj Maria senrezerve aprobis mian konduton kaj Diana skribis al ni, ke ŝi konsentos al ni nur la tempon, feliĉe pasigi la postedziĝan monaton kaj ke poste ŝi intencis nin viziti.

”Estus pli bone, se ŝi ne atendus tiel longe, Jane,” diris sinjoro Rochester, kiam mi laŭtlegis al li la leteron, ”farante tion ŝi venos tro malfrue, ĉar nia postedziĝa monato daŭros nian tutan vivon. Nur ĉe via kaj ĉe mia tombo ĝi finiĝos.”

Mi ne scias, kion St. John pensis, ricevante la leteron en kiu mi komunikis al li mian edziniĝon, li neniam respondis. Sed

ses monatojn poste li tamen skribis al mi tute ne tuŝante la nomon de sinjoro Rochester, nek mian edziniĝon. Lia letero estis tre kvietstila, serioza sed amika. Post tiu tempo li korespondis kun mi regule, sed ne ofte. Li esperas, ke mi estu feliĉa, ke mi ne estu unu el tiuj, kiuj forgesas pri sia Dio en la monda vivo, kaj donas sian koron nur al surteraj aferoj.

Esperable la leganto ne tute forgesis pri la malgranda Adèle. Mi mem ne faris tion. Baldaŭ post mia edziniĝo mi petis kaj akiris la konsenton de sinjoro Rochester viziti ŝin en la instituto, kien li estis metinta ŝin. Ŝia senbrida ĝojo ĉe mia revido tuŝis min tre profunde. Ŝi estis pala kaj maldika kaj plendis al mi, ke ŝi ne estas feliĉa. Mi opiniis, ke la reguloj de la edukejo estas tro severaj, same kiel la lernoprogramo, por infano de ŝia aĝo. Tial mi kunkondukis ŝin kun mi hejmen. Mi havis la intencon fariĝi denove ŝia instruistino; sed baldaŭ mi malkovris, ke tiu intenco estis malplenumebla; iu alia tro multe bezonis mian helpon — nome mia edzo. Mi tial serĉis kaj trovis por ŝi lernejon, kiu estis regata de pli facila sistemo kaj krome estis sufiĉe proksime al nia domo por povi viziti ŝin pli ofte kaj kio ebligis al mi kunkonduki ŝin pli ofte. Mi zorgis pri tio, ke al ŝi mankis nenio, kio estis bezonata por ŝia sano; tial ŝi baldaŭ sentis sin hejme en la nova edukejo, iĝis tie tre feliĉa kaj faris bonajn progresojn en sia studo. Kiam ŝi fariĝis pli alta, saniga angla edukado altgrade kompensis la mankojn de ŝia franca karaktero; kaj post kiam ŝi forlasis la lernejon, mi ĉiam trovis en ŝi amindan, ofereman amikindon; ŝi estis bonkora kaj havis severajn principojn. Per la dankataento, kiun ŝi montris al mi kaj al la miaj, ŝi jam longe repagis la bonon, kiun mi antaŭe povis montri al ŝi.

Mia rakonto estas finiĝonta. Mi devas ankoraŭ rakonti pri

la spertoj, kiujn mi travivis en mia edzineco kaj pri la aliaj personoj troviĝantaj en la libro, tiam mi estos ĉe la fino.

Mi estas edziniĝinta nun jam dek jarojn. Mi scias, kion signifas tute vivi por tio kaj por tiuj, kiujn oni amas plej multe sur ĉi tiu mondo. Mi sentas min eksterordinare feliĉa — pli feliĉa ol vortoj povus priskribi, ĉar mi estas tiel kara al mia edzo, kiel li estas kara al mi. Neniu edzino iam staris pli proksime al sia edzo ol mi: mi estas kvazaŭ la sango de lia sango, la karno de lia karno. La ĉeestado de Edward neniam lacigas min; neniam li estas unu horon sen mi; la pulsobato, la korobato de mia edzo estis ankaŭ mia — kaj mia korobato estas lia. Esti kune signifas por mi esti tiel ĝoja kiel en granda societo. Mi kredas, ke ni interparolas la tutan tagon; interparolo estas nur aŭdebla kaj viva pensmaniero. Li havas mian tutan fidon; li donacis al mi sian; niaj karakteroj adaptiĝas unu al la alia — sekve la plena interkonsento estas ĝia rezulto.

La unuajn du jarojn de nia geedzeco sinjoro Rochester restis ankoraŭ blinda; eble tiu stato tiel firme ligis nin kune, ĉar mi estis en tiu tempo lia okulolumo, kiel nun mi estas ankoraŭ lia dekstra mano. Laŭlitere mi estis, kaj tia li nomas min ofte, lia pupilo. Li vidis la naturon — li vidis ĉiujn librojn per mi; kaj neniam mi laciĝis pro amo al li rigardi ĉirkaŭ mi por vesti per paroloj la impreson, kiun la pejzaĝo, la kamparoj, arboj, urbo, rivero, nuboj kaj sunradioj, vento kaj vetero, sur min faris kaj komprenigi al li pere de liaj oreloj tion, kion liaj okuloj ne povis plu koncepti. Neniam mi laciĝis, kiam mi laŭtlegis al li, neniam mi laciĝis, kiam mi kondukis lin tien, kien li volis esti kondukata, kaj por fari por li, kion li volis, ke mi faru.

Kaj tiuj servoj kaŭzis al mi ĝojon eksterordinaran kvankam

melankolian — ĉar li deziris ilin de mi sen turmenta honto, sen premanta humiliĝo. Li tiom kaj tiel vere min amis, ke neniam li hezitis akcepti miajn helpojn; li sentis, ke mi fundkore lin amas kaj min dediĉas al li, ke mi ĝojas povi helpi lin.

Je la fino de tiuj du jaroj, kiam unu matenon mi skribis leteron, kiun li diktis al mi, li alproksimiĝis al mi kaj sin klinis super mi. Post kelka pripensado li diris:

”Jane, ĉu vi portas brilan ornamaĵon ĉirkaŭ la kolo?”

Mi portis oran horlogoĉenon kaj tial respondis:

”Jes.”

”Kaj ĉu vi estas vestita per helblua vesto?”

Mi vere estis tiel vestita. Li nun sciigis al mi, ke jam longe al li ŝajnis, ke la mallumo, kiu kovris la unuan okulon, estas malpli densa kaj malpli netravedebla ol antaŭe. Sed nun li estis certa pri tio. Ni vojaĝis kune al Londono. Li petis la konsilon de fama okulisto, kaj vere li reakiris la vidkapablon de unu el siaj okuloj. Tamen tre klare li ne kapablas legi; ankaŭ li ne povas multe skribi aŭ legi; sed li trovas sian vojon tute sen helpo kaj neniu bezonas plu konduki lin ĉe la mano; la ĉielo ne estas plu senkolora ebenaĵo por li, nek la tero malplena spaco.

Kiam oni metis al li sur la brakon lian unue naskiton, tiam li povis vidi, ke la knabo heredis liajn okulojn — kiel tiuj iam estis — grandaj, brilaj kaj nigraj. Kaj ĉe tiu okazo li ankoraŭ foje konfesis, ke la ĉiopotenca Dio montris sian gracon meze de la puno.

Edward Rochester kaj mi estas do feliĉaj, kaj des pli multe, ĉar ĉiuj, kiujn ni amas, ankaŭ estas feliĉaj. Diana kaj Maria Rivers estas ambaŭ edziniĝintaj; alterne unu el ambaŭ ĉiujare venas viziti nin, kaj ankaŭ ni vizitas ilin. La edzo de Diana

estas kapitano de militŝipo, kuraĝa oficiro kaj bona viro. La edzo de Maria estas ekleziulo, universitata amiko de ŝia frato; liaj principoj kaj bonaj kvalitoj igis lin tute inda je sia aminda edzino. Ne nur la kapitano Fitzjames sed ankaŭ sinjoro Wharton amas siajn edzinojn kaj estas amataj de ili.

Rilate al St. John Rivers, li forlasis Anglujon kaj iris al Hindujo. Li suriris la vojon, kiun li estis elektinta por si kaj ankoraŭ nun li laŭiras ĝin. Pli senlaca, pli decidita pioniro neniam laboris inter ŝtonegoj kaj danĝeroj. Firme, fidele kaj sindone, plena de energio, diligenteco kaj veremo, li laboris por la homaro; kun peno kaj streĉeco li ebenigas al ĝi la vojon al la feliĉego; kiel giganto li frakasas la malhelpaĵojn, kiujn zelotismo kaj kasto metas kontraŭ lin. Eble li estas rigida kaj severa, eble akra kaj ambicia — sed liaj rigideco kaj severeco estas tiuj de milita kondukisto, kiu defendas sian pilgrimadon kontraŭ la atako de sovaĝaj bandoj. Kiam li postulas, li postulas kiel la apostolo, kiu parolas nur por Kristo, kiam li diras: "Kiu venos post mi, tiu malkonfesu sin mem kaj prenu la krucon por sekvi min." Lia ambicio estas tiu de granda spirito, kiu volas okupi la plej unuan lokon en la vicoj de tiuj, kiuj estas liberigitaj de la peko de ĉi tiu mondo — kiuj sen manko mortas por la trono de Dio, kiuj partoprenos en la lasta granda venko de la Ŝafido, kiuj estas vokitaj kaj elektitaj kaj fidelaj!

St. John estas needziĝinta; li neniam edziĝos. Lia propra forteco ĝis nun sufiĉis por la laboro, kaj tiu laboro proksimiĝas al sia fino. Lia glora suno estas subironta. La lasta letero, kiun mi ricevis de li, fluigis miajn larmojn kaj malgraŭ tio ĝi plenigis mian koron per interna ĝojo; li atendis sian certan rekompencan, sian kronon, kiun neniu povas forrabi de li.

Mi scias ke fremda mano skribos al mi la plej proksiman fojon, por sciigi al mi, ke la bona kaj fidela servisto fine estas vokita de sia sinjoro al la ĉielaj ĝojoj. Kaj kial do mi plorus? Neniu timo antaŭ la morto turmentos St. John en lia lasta horo; lia spirito estas libera, lia koro sentima, lia espero certa, lia kredo neŝancebla. Liaj propraj vortoj pruvas tion al mi:

”Mia Sinjoro kaj Dio,” tiel li skribis, ”sendis al mi la sciigon. Ĉiutage Li pli klare sciigas tion: — ‘Certe, mi baldaŭ venos!’ kaj tiuhore mi respondas al li pli aspire: — ‘Tial venu, Jesuo Kristo! en eterno. Amen.’ ”

[www.omnibus.se/inko](http://www.omnibus.se/inko)

**ISBN 91-7303-123-2**